

MARK TWAIN

LA AVENTUROJ DE TOM SAWYER



romantraduko

ANTAŬPAROLO

La plej multaj aventuroj raportitaj en tiu ĉi libro okazis efektive. Unu aŭ du el ili mi mem travivis, la aliaj okazis al miaj lernejoj amikoj. La knabon Huck Finn mi priskribis laŭ la vivo, ankaŭ la knabon Tom Sawyer, sed ne laŭ individua modelo – Tom estas kombino el la ecoj de tri knaboj, kiujn mi konis, do kvazaŭ arkitektura kunmetaĵo.

La strangaj menciitaj superstiĉaj imagoj estis ĝenerale kutimaj en la okcidento je la tempo de tiu ĉi romano – do antaŭ tridek aŭ kvardek jaroj – inter infanoj kaj sklavoj.

Kvankam mi unuavice verkis mian libron por distri knabojn kaj knabinojn, mi esperas, ke viroj kaj inoj ne evitos ĝin, ĉar ĝi estas parto de mia plano provi afable memori plenkreskintojn pri tio, kiel ili estis iam mem, kaj kiel ili sentis kaj pensis kaj parolis, en kiajn strangajn entreprenojn ili implikiĝis.

Ĉapitro 01

„TOM!“

Neniu respondo.

„TOM!“

Neniu respondo.

„Kio okazis kun la knabo, mi miras. He, TOM!“

Neniu respondo.

La maljuna damo tiris la okulvitrojn malsupren kaj rigardis super ilin al la ĉambro ĉirkaŭe; poste ŝi tiris la okulvitrojn supren kaj sube rigardis. Ŝi malofte, pli ĝuste neniam rigardis TRA ili pro tia malgranda aĵo, kiel tio estas knabo. Ili estis ŝia paradilo, la fiero de ŝia koro. Kaj ŝi portis ilin pro stilkaŭzoj, ne por uzi ilin – same tiel bone ŝi estus povinta rigardi tra

fornoringoj. Ŝi aspektis perpleksa dum momento, sed poste ŝi diris ne kolere, sed sufiĉe laŭte, por ke la mebloj povu aŭdi ŝin:

„Do, se mi kaptos vin, tion mi promesas al vi, tiukaze mi...”

Ŝi ne finis la frazon, sed kliniĝis malsupren kaj pikadis per la balailo sub la lito – kaj tial ŝi bezonis spiri, por emfazi la batojn. Sed ŝi aperigis nur la katon.

„Knabon de tia speco mi neniam vidis!”

Ŝi iris al la malfermita pordo, haltis sur ties sojlo kaj rigardis eksteren al la tomatoplantoj kaj daturaj arbustoj, el kiuj konsistis la ĝardeno. Neniu Tom tie troviĝis. Jen ŝi levis la voĉon sufiĉe laŭte por atingi pli forajn celojn, kaj vokis:

„Heee, TOM!”

Malantaŭ ŝi io susuris mallaŭte, kaj ŝi povis ankoraŭ ĝustamomente turni dorsen por kapti la knabon je

jakofinaĵo kaj malhelpi lian fuĝon.

„Tie do! Penson pri la manĝokamero mi mem estus povinta havi! Kion vi faris en ĝi?“

„Nenion.“

„Nenion, ĉu? Rigardu al viaj manoj. Kaj rigardu al via buŝo. Kia ŝmiraĵo tie estas?“

„Mi ne scias, onjo.“

„Sed mi scias. Estas marmelado – jen ĝi. Kvardekfoje mi diris al vi, ke mi senhaŭtigos vin, se vi ne lasos la marmeladon. Donu la vergon al mi.“

La vergo ŝvebadis minace enaere – la situacio estis senlireja...

„Jen! Post via dorso, onjo!“

La maljuna damo turniĝis kirlovente kaj levis sian

jupon el la danĝerzono. En la sama momento eskapis la bubo, grimpis super la altan tabulbarilon kaj malaperis.

Lia onklino Polly staris embarasigite dum momento, kaj poste ekridis nelaŭte.

„Pendumu la knabon! Ĉu mi lernas tion neniam? Ĉu li ne sufiĉe mistifikis min! Kaj mi ĉiam denove devis serĉi lin kiel ĉifoje. Sed maljunaj ŝtipkapuloj estas la plej grandaj ŝtipkapuloj, kiuj ekzistas. Maljuna hundo ne povas lerni trukojn, kiel oni diras. Sed ĉe mia boneco, li neniam ludas ilin dufoje. Kaj kiel iu sciu en tiu kazo, kiu movo venos kiel la sekva? Li ŝajne scias tute precize, kiom longe li povas ĉagreni min antaŭ ol disŝiriĝas mia fadeno de pacienco. Kaj, se li sukcesas deflankigi min dum minuto aŭ ridigi min, pasis la momento, kiam mi povus vangofrapi lin. Mi neglektas mian devon rilate la knabon, ĉe Dio, tio estas la pura vero. Se oni ne uzas la bastonon, oni dorlotas la infanon, diras la Biblio. Mi ŝarĝas pekon kaj ĉagrenon sur nin ambaŭ, tion mi scias. Li estas plena de Satano, sed je la leĝo kaj mi, li estas la ununura filo de mia mortinta fratino, kompatindulino, kaj iel mi ne kapablas laŭorde trakti lin. Ĉiufoje, kiam mi lasis lin sen traktado, mi havis konscienciproĉojn, kaj ĉiufoje, kiam mi vangofrapas

lin, tio rompas preskaŭ mian koron. Jes ja, la homo naskita de ino, vivas nur mallonge kaj estas plagata de zorgoj, kiel diras la Skribo, kaj tio pravus, mi supozas. Li intence forestos de la lernejo posttagmeze kaj mi morgaŭ estos devigita unlaborigi lin. Estas damne streĉiga afero sabate eklaborigi lin, kiam ĉiuj knaboj havas liberan tempon. Sed li malamas labori pli ol ĉion alian, kaj mi devos plenumi mian devon je li aŭ mi ruinigos la knabon.“

Tom forestis intence de la lernejo kaj multe plezuriĝis. Li venis hejmen apenaŭ ĝustatempe por helpi al Jim, la malgranda negroknabo, antaŭ la vespermanĝo ĉe la segado kaj fendado de la fajroligno por la sekva tago. Sed certe li venis ankoraŭ sufiĉe frutempe por rakonti al Jim siajn aventurojn, dum Jim faris kvaronon de la laboro. La pli juna frato de Tom aŭ pli ĝuste duonfrato Sid jam finis sian parton de la laboro (la kunkolektado de la ligneroj), ĉar li estis kvieta knabo, ne aventurema kaj ne tiom riskopreta.

Dum Tom vespermanĝis kaj ŝtelis sukeron, kiam okazo ofertiĝis, onklino Polly metis al li demandojn, kiuj estis tute ruzaj kaj tre profundaj – ĉar ŝi volis, ke li kaptiĝos en damaĝigajn malkovrojn. Kiel multaj aliaj simple strukturitaj homoj ŝi havis la dorlotatan

supozon, ke ŝi havas doton por la kaŝita kaj sekreta arto de la diplomatio kaj ŝi ŝatis rigardi siajn tute evidentajn intrigojn kiel paradajn ekzemplojn de rafinita ruzeco. Ŝi diris:

„Tom, estis sufiĉe varme en la lernejo, ĉu ne?“

„Jes, madam'.“

„Tre varme, ĉu ne?“

„Jes, madam'.“

„Ĉu vi ne volis iri naĝi, Tom?“

Iom da ektimo trafumis lin – aludo de malkomforta suspekto. Li observis la vizaĝon de onklino Polly, sed tie li ne trovis ion. Tial li diris:

„Ne madam', ne nepre.“

La maljuna damo etendis manon, pripalpis lian

ĉemizon kaj diris: „Sed nun ne plu estas tro varme al vi, ĉu?“ Flatis ŝin, ke ŝi sukcesis tiel eltrovi, ke la ĉemizo estas seka, sen tio ke diveneblus, kiun intencon ŝi havis. Sed male al ŝi Tom sciis, el kiu direkto blovas la vento. Tial li antaŭvidis, kiun movon ŝi faros.

„Kelkaj el ni pumpis akvon sur la kapon, mia ankoraŭ estas tute malseka, ĉu vi vidas?“

Onklino Polly ĉagreniĝis, ŝi pretervidis tiun detalon de cirkonstanca evidento, kaj tiel senigita de plia truko. Sed tiam ŝi ekhavis novan inspiron.

„Tom, ĉu vi deprenis la kolumon, kiun mi alkudris por vi, kiam vi tenis vian kapon sub la pumpilon, ĉu ne? Malbutonumu foje vian jakon!“

La aflikteco malaperis el la vizaĝo de Tom. Li malfermis sian jakon. Lia kolumo estis firme alkudrita.

„Damne, do, foriĝu. Mi certis, ke vi forestis de la lernejo kaj naĝis. Sed mi pardonas al vi, Tom. Vi

faras la impreson de bruldifektita kato, kiel oni diras, sed vi estas pli bona knabo ol vi aspektas. Hodiaŭ!“

Parte ŝi bedaŭris, ke ŝia sagaco tiom mistrafis, kaj parte ŝi ĝojis, ke Tom almenaŭ je tiu ĉi fojo estis bonkonduta escepte.

Sed Sid diris:

„Do, mi pensis, ke vi alkudris lian kolumon kun blanka fadeno, sed estas nigra.“

„Efektive, kompreneble mi alkudris ĝin kun blanka! Tom!“

Sed Tom ne atendis ĝis la fino. Kiam li eliris el la pordo, li diris:

„Sidĉjo, por tio mi traktos vin.“

Je sekura loko Tom ekzamenis du grandajn pinglojn, kiuj troviĝis en la reversoj de lia jako kaj ĉirkaŭvolvitaj kun tvirno. Unu el ili per blanka

fadeno kaj la alia per nigra. Li diris:

„Ŝi tute ne rimarkus, se ne estus Sid. Damne, kelkfoje ŝi kunkudras kun blanka, kaj kelkfoje kun nigra. Kial, ho ve, ŝi ne povis foje decidiĝi por unu el ili? Mi ne povas memorteni tion. Sed tion mi ĵuras, ke mi lamigos Sidon. Lin mi instruos!“

Li ne estis la modelo de bonkondata knabo en la vilaĝo. Sed li konis la modelan knabon eĉ tro bone – kaj li malamegis lin.

Post apenaŭ du minutoj li jam forgesis sian tutan ĉagrenon. Ne tial, ĉar lia ĉagreno fariĝis je spuro pli facile eltenebla kaj malpli morniga ol la ĉagreno de viro al viro, sed ĉar novaĵo kaj potenca intereso ekokupis lin kaj flankenŝovis lian ĉagrenon por certa tempo, tiel, kiel viroj forgesas siajn misojn pro la ekscitiĝo de nova entrepreno. Tio, kio tiom katenis lin estis nova fajfmetodo, kiun li ĵus akiris de negro, kaj li estis avida pri tio elprovi ĝin senĝenite. Ĝi konsistis el precipa birdosimila sono, speco de pepanta trilado, kiu ekestas per tio, ke oni puŝas meze de la muziko dum la fajfado per la lango en mallongaj intervaloj kontraŭ la palaton – la leganto verŝajne rememoras tion – se li iam estis knabo –

kiel oni faras tion. Danke al fervora kaj atentema ekzercado li baldaŭ sciis kiel fari tion, kaj li paŝis sur la strato antaŭen kun buŝo plena de harmonio kaj kun koro plena de dankemo. Li sentis sin kiel astronomo, kiu malkovris novan planedon, kaj sendube la knabo estis supera al la astronomo, koncerne la grandon, profundon kaj purecon de sia beateco.

La someraj vesperoj estis longaj. Ankoraŭ ne estis malhele. Subite Tom ĉesis fajfi. Fremdulo staris antaŭ li – knabo, iom pli granda ol li mem. Novalveninto, egale de kiu aĝo kaj de kiu genro, estis ĉiam impresa vidindaĵo en la povra iom provinceca vilaĝo en Sankt-Peterburgo. La knabo estis bone vestita – tro bone vestita je labortago. Tio estis simple nekredebla. Lia ĉapelo estis belaspekta kaj lia kunbutonumita blua jaketo estis nova kaj senmanka, tia kia lia pantalono. Li surhavis ŝuojn, kvankam estis nur vendredo. Li eĉ portis koltukon, helan noditan rubandon. Li havis ion monduman je si, kio voris sin en la intestojn de Tom. Ju pli longe Tom gapis la elegantan miraklulon, des pli li levis sian nazon pri ties fajneco kaj des pli kaj pli aĉa fariĝis por li la propraj vestoj. Neniu el la knaboj diris ion. Se iu el ili moviĝis, moviĝis ankaŭ la alia, sed nur flanken en cirklo. Ili reciproke observis sin dum la tuta

tempo, okulon je okulo kaj vizaĝon ĉe vizaĝo. Fine
Tom diris:

„Mi povas subigi vin.“

„Mi volonte vidus, kiel vi faros tion.“

„Jes, mi povus, se mi volus.“

„Ne, vi ne povus.“

„Mi tamen povus.“

„Ne, vi ne povus.“

„Tamen mi povus.“

„Vi ne povus.“

„Mi povas.“

„Ne.“

Malagrabla paŭzo ekestis. Poste Tom diris:

„Kiel vi nomiĝas?“

„Tio ne koncernas vin.“

„Eble mi aranĝos tiel, ke ĝi koncernos min.“

„Tiukaze faru tion!“

„Se vi parolos multe plu, mi agos.“

„Multe! Multe! Multe! Jen prenu!“

„Vi pensas, ke vi estas precipe ruza, ĉu? Mi povus trakti vin kun unu mano surdorse, se mi volus.“

„Kial vi do NE AGAS? Vi nur PAROLAS, ke vi agos.“

„Jes, MI FAROS, se vi provos mistifiki min.“

„Ho, jes, mi vidis jam tutajn familiojn en tia embaraso.“

„Fanfaronulo, ĉu? Vi pensas, ke vi estas io aparta, ĉu ne? Ho, kia ĉapelo!“

„Vi ne devas ŝati ĝin, se ĝi ne plaĉas al vi. Sed estu avertita, se vi aŭ iu alia batos ĝin de mia kapo, vi manĝos teron.“

„Vi estas fanfaronulo.“

„Ankaŭ vi.“

„Vi estas granda blufulo, ĉar vi ne kuraĝas batali.“

„Foriĝu, kaj tuj!“

„He, si vi impertinentos plu tiel, mi prenos ŝtonon kaj frakasos ĝin sur via melonkapo.“

„Sed *kun certo* vi ne farus tion.“

„Tamen.“

„Nu jes, kial vi do ne agas? Kial vi babilaças plu, se vi volas: Kial vi DO NE agas? Estas tial, ĉar vi estas timigita.“

„MI NE timas!!“

„Vi tamen timas.“

„Mi ne.“

„Vi ja.“

Alia paŭzo sekvis kaj plia rigardado kaj plia cirkla irado. Momente ili troviĝis ŝultron ĉe ŝultro. Tom diris:

„Foriĝu de ĉi tie!“

„Foriĝu mem.“

„Mi eĉ ne pensas pri tio.“

„Ankaŭ mi ne.“

Tiel ĉiu el ili staris kun piedo metita flanken kvazaŭ kiel firmkrampiĝinte kaj ambaŭ kun forto ŝovis unu kontraŭ la alia kaj rigardis sin reciproke kun malamo. Sed neniu el ili povis atingi avantaĝon. Post la batalo ambaŭ ankoraŭ estis varmegaj kaj arde ruĝaj. Ĉiu el ili malstreĉiĝis kun atentemo kaj Tom diris:

„Vi estas malkuraĝulo kaj hundido. Mi diros tion al mia granda frato, tiu ruinigos vin per eta fingreto, mi konvinkos lin.“

„Kial mi afliktiĝu pro via granda frato? Mi havas fraton, kiu estas pli granda ol via – kaj kio pli gravas, li povas ĵeti vin eĉ super tiun barilon tie.“ (Ambaŭ fratoj estis tute eltrovitaj.)

„Tio estas mensogo.“

„Dirado via ankoraŭ tute ne estas farado via.“

Tom per granda dikfingro desegnis linion sur la polvon kaj diris:

„Mi avertas vin transpaŝi la linion, kaj mi traktos vin per miaj pugnoj, ĝis kiam vi ne plu kapablos restarigi vin. Ĉiu kiu kuraĝas fari tion, eĉ ne sukcesos ŝteli ŝafon.“

La nova knabo tuj transpaŝis kaj diris:

„Vi diris nun, ke vi agos, kaj nun ni foje observu, ĉu vi agos.“

„Ne provoku min, prefere atentu!“

„Bone, vi DIRIS, ke vi agos, kial vi ne agas?“

„Ho, Jezuĉjo! Por du cendoj mi faros tion!“

La nova knabo eltiris du kupromonerojn el poŝo, kaj etendis ilin plena de moko. Tom batis ilin teren. En la sama momento ambaŭ knaboj jam ruliĝadis en la polvo interkroĉitaj kiel katoj. Kaj dum la daŭro de minuto ili tiradis kaj ŝiradis sin je la hararo kaj je la vestoj, traktis sin reciproke per pugnoj, tiradis reciproke la nazojn kaj kovris sin per polvo kaj gloro. Baldaŭ la konfuziĝo komencis reakiri firman homformon kaj tra la polvo de la batalo ekaperis Tom, kiu sidis kiel rajdisto sur la knabo kaj traktis lin per pugnoj.

„Diru, ke sufiĉas!“ li vokis.

La knabo provis elturniĝi. Li ploris, unuavice pro kolero.

„Diru, ke sufiĉas!“ Kaj la pugnoj flugis plu.

Laste la fremdulo eligis sufokecan „Sufiĉe!“ kaj Tom lasis lin kaj diris:

„Tio estu instruo por vi. Prefere atentu, kiun vi

mistifikos la sekvan fojon.“

La nova knabo foriris plorsingulte kaj snufante, frapis la polvon de siaj vestoj kaj rigardis ĉeokaze malantaŭen, skuis la kapon kaj minace diris, kion li faros la sekvan fojon al Tom, se li estos kaptinta lin. Tion Tom respondis per mokaj vokoj kaj kiel pavo forpromenis, kaj tuj kiam Tom turnis sian dorson, la nova bubo levis ŝtonon, ĵetis ĝin kaj trafis la knabon Tom per ĝi inter la ŝultroj, sin turnis sur la kalkano kaj kuris for kiel antilopo. Tom ĉasis la perfidulon ĝis hejme kaj tiel eltrovis, kie li loĝas. Poste li gardis dum certa tempo la latbarilon kaj postulis, ke la malamiko elvenu, sed la malamiko faris nur grimacojn al li tra la fenestro kaj rifuzis elveni. Laste la patrino de la malamiko aperis kaj diris, ke Tom estas fia, malvirta kaj vulgara knabo, kaj ke li foriĝu. Tial li foriris, sed ankoraŭ diris, ke li ankoraŭfoje submetos la bubon al ekzameno.“

Li venis hejmen sufiĉe malfrue vespere, kaj kiam li grimpis atenteme tra la fenestro, li eniĝis embuskon en formo de sia onklino, kaj kiam ŝi vidis, en kia stato estas liaj vestoj, fariĝis ŝia intenco ŝanĝi lian liberan sabaton en prizontagon kun dura laboro necedeme firma decido.

Ĉapitro 02

La sabata mateno venis kaj la tuta somera mondo estis hela kaj freŝa kaj plenplena de vivo. Jen kanto en ĉiu koro, kaj kies koro estis juna, el ties lipoj aŭdeblis muziko. Jen jubilo sur ĉiu vizaĝo kaj printempo en ĉiu paŝo. La robinioj plene floris kaj laodoro de la floroj plenigis la aeron. La Kardifomonteto, kiu leviĝis je la alia flanko de la vilaĝo, estis verde prikreskata kaj troviĝis sufiĉe malproksime por aspekti kiel la Dolĉa lando, revema, paca kaj invitema.

Tom kun sitelo da kalkfarbo aperis sur la trotuaro kun longstanga farbista peniko. Li rigardis la tabulbarilon kaj ĉiu gajeco forlasis lin. Profunda melankolio metis sin sur lian animon. Dudek kvin metroj da barilo, pli ol du kaj duonon da metroj altaj. La vivo ŝajnis senvalora kaj la ekzisto ŝarĝo. Ĝemante li trempis sian penikon en la farbon kaj strie farbis per ĝi la plej altan parton de la barilo, li ripetis la agon, faris ĝin ankoraŭfoje, komparis la malgrandan farbostrion kun la vasta iranta kontinento de la ankoraŭ ne farbata barilo kaj sidiĝis senkuraĝigite sur arbobenkon. Jim venis saltante kun ladositelo el la

ĝardeno pordego kaj kantis „*Buffalo Gals*“. Alporti la akvon de la vilaĝputo estis por Tom ĉiam tre malŝatata laboro, ĝis nun, sed en tiu ĉi momento tio ne ŝajnis tiel al li. Li memoris pri tio, ke tie estis societo ĉe la puto. Blankuloj, mulatoj, negroknaboj kaj knabinoj, ili ĉiuj ĉiam atendis ili estis en la vico, ili ripozis, interŝanĝis ludilojn, kverelis, batalis unuiĝis kontraŭ la alia kaj petoladis. Kaj kvankam la akvopumpilo distancis eĉ ne je cent kaj kvindek metroj, Jim neniam revenis kun sitelo pli frue ol post horo, kaj eĉ tiam kutime iu devis rekonduki lin. Tom diris:

„Aŭdu foje, Jim, mi iros anstataŭ vi kaj alportos la akvon, se vi iomete farbos por mi.“

Jim kapneis kaj diris:

„Ne, mi ne povas, mastro Tom. La maljuna damo diris, ke mi iru kaj prenu akvon kaj ne haltu por fari stultaĵojn kun kiu ajn. Ŝi diris, ke ŝi suspektas, ke mastro Tom persvados min farbi, do tial ŝi diris, ke mi iru tiukaze plu kaj okupiĝu pri l' afero propra, ŝi opiniis ankaŭ, ke ŝi atentos la farbadon.“

„Ha, estas egale, kion ŝi diris, Jim. Jen la maniero, kiel ŝi ĉiam parolas. Donu la sitelon al mi, mi ne forestos pli longe ol dum minuto. Tion ŝi rimarkos neniam.“

„Ho, mi ne kuraĝas, mastro Tom. La maljuna damo deŝiros mian kapon. Efektive, ŝi faros tion.“

„ŜI, ŝi neniam batas iun – ŝi frapetas nur iom per la fingroĉapeleto sur la kapon – kaj kiun ĝenas? Tion mi volus scii.“ Ŝi ja parolas terure, sed parolo ne vundas. Almenaŭ tiom longe, ĝis kiam ŝi esploros, Jim. Mi donos al vi vitroglobeton, el blanka vitro.“

Jim komencis ekŝanceliĝi.

„Blanka vitro, Jim, krome ĝi estas luksoglobeto.“

„Ho, tio estas ja grandioza globeto, Tom. Sed aŭdu, mi terure timas la maljunan damon...“

„Kaj krome, se vi volas, mi montros al vi mian vunditan dikfingron.“

Jim estis nur homo, kaj tial tiu tento estis tro por li. Li demetis sian sitelon, prenis la blankan vitroglobeton kaj kliniĝis kun granda intereso al la dikfingro, dum Tom malvolvis la bandaĝon. Sed en la sekva momento li fuĝis kun sia sitelo kaj doloranta postparto sur la strato malproksimen. Tom farbis la barilon kun fervoro, kaj onklino Polly retiriĝis de la kampo kun pantoflo enmane kaj triumfantaj okuloj.

Sed la energio de Tom ne longe konserviĝis. Li komencis pensi pri la plezuro, kiun li planis por tiu tago, kaj liaj afliktoj multobliĝis. Baldaŭ la knaboj, kiuj havas liberan tempon, preterkuros al ĉiuj specoj da mirindaj ekspedicioj kaj ili superŝutos mondon da moko sur lin, ĉar li devas labori – jam nur la penso bruladis en li kiel fajro. Li elfosis sian surteran posedon el la poŝoj kaj ekzamenis ĝin – tie estis eroj de ludiloj, vitroglobetoj kaj fatrasaĵoj. Eble tio sufiĉis por fari interŝanĝon kontraŭ alia LABORO, sed ne estis duono de tiom, kiom necesus por elaĉeti sin almenaŭ dum tridek minutoj de ĉiu laboro. Tial li remetis siajn limigitajn rimedojn en la poŝojn kaj rezignis pri la ideo dungi la knabojn. En tiu morna kaj senespera momento li ekhavis inspiron! Estis ne malpli ol eksterordinara, glora inspiro.

Li levis sian penikon kaj trankvile iris eklabori. Ben Rogers baldaŭ aperis – el ĉiuj knaboj li estis ĝuste tiu, kies ridindigon li timis plej multe. Ben moviĝis saltetante kaj saltante – jen sufiĉe da pruvo, ke lia koro estas gaja kaj liaj atendoj grandaj. Li manĝis pomon kaj dum longaj intervaloj eligis longan, melodian hupadon sekvatan de bassona din-don-don, din-don-don, ĉar li enkorpiĝis vaporŝipon kun radoj. Kiam li proksimiĝis, li malrapidigis la veturon, moviĝis al la mezo de la strato, kliniĝis forte al tribordo kaj ĉetrotuariĝis multepeze kun konsiderinda pompo kaj bruo – ĉar ĉimomente li estis la vaporŝipo „Granda Misurio“ kun mergiĝa profundo naŭfuta. Li estis samtempe kombino el vaporŝipo, ŝipestro kaj maŝinsonoriloj, tial li devis imagi sin staranta sur la hurikanferdeko, donanta komandojn kaj plenumanta ilin.

„Stopu ŝipon, Siro! Tin-lin-lin!“ La ŝipo preskaŭ haltis kaj li proksimiĝis iom post iom al la trotuaro.

„Ŝipon duonforte malantaŭen! Tin- lin-lin!“ Li etendis siajn brakojn kaj metis ilin rigide apud si malsupren.

„Tribordrado malantaŭen! Tin-lin-lin! Tŝu-tŝ-tŝu-

tŝu!“ Lia dekstra brako dum tio priskribis imponajn cirklojn, ĉar ĝi prezentis vaporŝipradon, kiu estis dek du metrojn granda.

„Stopu baborde! Tin-lin-lin! Tŝu-tŝ-tŝu-tŝu!“ La maldekstra brako komencis cirkli.

„Stopu triborde! Tin-lin-lin! Stopu baborde! Triborde antaŭen! Stopu! Eksteran flankon lante dekstren! Tinlinlin! Tŝu,u, u! Eksteren la antaŭŝnuron! VIGLE, ek! Ŝnuron eksteren! Kial vi pigras?! Ŝnurligu bolardon! Ŝtupareton teni preta! Nun elmetu ĝin! Maŝinojn stopu, Siro! Tin-lin-lin! ŜT! ŜT! ŜT!“ (testo de la vaporkrano).

Tom farbis la barilon plu – li tute ne atentis la vaporŝipon. Ben gapis dum momento kaj poste diris:

„Heho! Vi estas fiksita kiel bolardo, ĉu ne?“

Neniu repondo. Tom kontrolis sian lastan penikstrion per la kritikaj okuloj de artisto, poste li ankoraŭfoje iom viŝadis per la peniko trans ĝin kaj rigardis la rezulton kiel antaŭe. Ben starigis sin apud

li. La pomo plenigis la buŝon de Tom per salivo sed li restis ĉe sia laboro. Ben diris:

„Saluton, maljuna knabo, vi devas labori, ĉu?“

Tom surprize turniĝis kaj diris:

„Ha, vi estas, Ben! Mi tute ne rimarkis vin.“

„Aŭdu, mi iros naĝi. Ĉu vi ne pensas, ke vi kunvolus? Sed, kompreneble, vi prefere LABORAS, ĉu ne? Kompreneble.“

Tom rigardis la knabon dum certa tempo kaj diris:

„Kion vi nomas laboro?“

„Kial? Ĉu TIO ne estas laboro?“

Tom denove ekfarbis kaj diris indifere:

„Eble jes, eble ne. Ĉion, kion mi scias, estas, ke ĝi

estas precize la ĝusta por Tom Sawyer.“

„He, vi ja eble ne eĉ opinias, ke vi ŜATAS tion?“

La peniko moviĝadis plu.

„Ĉu mi ŝatas? En ordo, mi ne komprenas, kial mi ne ŝatu ĝin. Ĉu knabo havas bonŝancon farbi barilon ĉiutage?“

Tio metis la aferon en novan lumon. Ben finis prironĝi sian pomon. Tom svingis sian penikon artplene antaŭen kaj malantaŭen – tiam li retroiris paŝon por kontroli la efikon – aldonis tuŝplenon tie kaj tie – kritike rigardis la efekton denove – kaj Ben observis ĉiun movon kaj pli kaj pli interesiĝis pri la farbado, pli kaj pli fascinite. Subite li diris:

„He, Tom, lasu iom farbi MIN.“

Tom konsideris la demandon, konsentonte, sed ankoraŭ ŝanĝis la opinion.

„Ne, tute ne, mi pensas, ke tio ne eblas, Ben. Sciu, ke onjo Polly estas tre skrupulema pri la barilo, des pli ĉi tie ĉe la strato, komprenu. Se ĝi estus la malantaŭa barilo, tiukaze tio ne estus problemo, ankaŭ ne por ŜI. Jes ja, ŝi estas terure skrupulema pri tiu ĉi barilo; necesas farbi ĝin tre atenteme. Mi supozas ke inter mil knaboj, eble eĉ inter du mil, ne estas unu knabo, kiu kapablus tion fari tiel, kiel necesas.“

„Ĉu vere?“ Ho, permesu al mi – lasu min provi, nur iomete. MI permesus al vi, se mi estus vi, Tom.“

„Ben, volonte mi farus, fidu min, sed onjo Polly – ankaŭ Jim ja volis farbi, sed ŝi ne permesis. Sid volis farbi, sed ankaŭ al tiu ŝi ne permesis. Ĉu vi nun povas imagi, en kia kaptilo mi firmsidas? Se vi nun farbos la barilon, kaj io misokazos...“

„Stultaĵo! Mi ja estos atentema! Do, lasu min provi ĝin. Mi eĉ donos al vi mian pomkernon.“

„Nu, en ordo, jen ... Sed ne, Ben, prefere ne. Mi ja tiom timas...“

„Mi donos al vi la tutan pomon!“

Tom transdonis la penikon, kun kontraŭstaremo sur la vizaĝo, kaj kun kontentiĝo en la koro. Kaj dum la iama vaporŝipo „Granda Misurio“ laboris kaj ŝvitis en la suno, sidis la retiriĝinta artisto sur lignobarelo en la ombro proksime, svingetis la gambojn antaŭen kaj malantaŭen, plenbuŝe manĝis sian pomon kaj planis la buĉadon de pliaj senkulpaj viktimoj. Ne mankis materialo; knaboj aperadis post mallongaj momentoj; ili venis por pikmoki, sed restis por farbi. Kiam la fortoj de Ben elĉerpiĝis, Tom komerce vendis la sekvan bonŝancon al Billy Fisher por ties ankoraŭ bone konservata drako. Kaj kiam Billy finis la farbadon, aĉetis Johnny Miller la bonŝancon por morta rato kun la ŝnuro, per kiu ĝi svingeblis – kaj tiel plu kaj tiel plu, horon post horo. Kaj kiam venis la mezo de la posttagmezo, Tom, kiu matene ankoraŭ estis povrulo, kvazaŭ diboĉis en riĉo. Krom la aĵoj jam menciitaj, li havis dek du vitroglobetojn, pecon de judoharpo, eron de blua boteloglaso por trarigardo, bobenokanonon, ŝlosilon ne adapteblan al seruro, kreteron, la vitroŝtopilon de karafo, stanan soldaton, paron da ranidoj, ses petardojn, unuokulan katon, latunan pordopomelon, hundokolbendon sen hundo, la tenilon de tranĉilo, kvar pecojn da oranĝoŝelo kaj kadukan fenestrokradon.

Li pasigis agrablan, bonan tempon sen fari ion dum la tuta tempo, kun multnombra societo – kaj la barilo surhavis tri tavolojn da farbo! Se la farbo ne estus foruzita, li estus bankrotiginta ĉiun knabon en la vilaĝo.

Tom trovis, ke la mondo tamen ne estas tiom trista, post konsidero. Sen scii ĝin, li malkovris gravan leĝon de la homa konduto – ke oni devas fari ion nur tre malfacile atingebla por vekti la posedan deziron de viro aŭ de knabo. Se li estus granda kaj saĝa filozofa, kiel la verkisto de tiu ĉi libro, li tiumomente ekkomprenus, ke LABORO estas tio, kio estas DEVIGITA al homo, kaj LUDO tio, kion oni ne devigas al iu. Kaj tio helpus al li kompreni, kial la produktado de artifikaj floroj aŭ la kurado en hamstrorado estas laboroj, kaj kial kontraŭe al tio estas pura plezuro ruligi kuglon al naŭ kegloj aŭ boŭlĝobon aŭ grimpi sur Blank-Monton. En Britlando ekzistas riĉaj ĝentlemanoj, kiuj somere ĉiutage veturigas kvarĉevalajn pasaĝerajn kaleŝojn je distanco de dudek aŭ tridek mejloj dum regula trafiko, ĉar tiu privilegio kostas al ili konsiderindajn sumetojn da mono. Sed, se oni ofertus al ili salajrojn por tiu servo, tio transformigus tion al laboro kaj ili rezignus pri ĝi.

La knabo pripensis dum certa tempo la renversigan ŝanĝon, kiu okazis je liaj cirkonstancoj en la mondo kaj poste survojiĝis al la komandocentralo por raporti.

Ĉapitro 03

Tom prezentiĝis antaŭ sia onklino Polly, kiu sidis ĉe la malfermita fenestro en agrabla, malantaŭe situanta ĉambro, kiu estis kombino el dormoĉambro, matenmanĝ-kaj tagmanĝĉambro kaj biblioteko. La balzama somera aero, la ripoziga trankvilo, laodoro de la floroj kaj la endormiga zumado de la abeloj havis sian efikan rezulton, ŝi endormiĝis dum la trikado. Ŝi havis nur la katon ĉe si, kaj tiu dormis sur ŝia sino. La okulvitrojn ŝi ŝovis supren en sian grizan hararon por protekti ĝin tiel. Ŝi pensis kompreneble, ke Tom jam delonge dizertis, kaj nun ŝi miris, ke li reiris en ŝian potencsferon tiom sen-time. Li diris:

„Ĉu mi nun rajtas eliri denove kaj ludi, onjo?“

„Kiel? Ĉu jam nun? Kiom vi farbis?“

„Farite la far', onjo.“

„Tom, ne mensogu – tion mi ne eltenas.“

„Mi ne mensogas, onjo – ĉio ESTAS farbita.“

Onklino Polly ne multe fidis tiun eldiron. Ŝi iris por rigardi mem. Kaj ŝi estus kontenta, se nur dudek procentoj el la aserto de Tom estus efektive vera. Kiam ŝi trovis, ke la tuta barilo estas farbita kaj ne nur farbita, sed ricevinta eĉ zorgeme metitajn farbtavolojn duan kaj trian, kaj aldone eĉ trian strion sur la trotuaro, ŝia mirego apenaŭ estis priskribebla. Ŝi diris:

„Nu, tio apenaŭ kapteblas mense! Tio ne estas kontestebla, *labori* vi povas, se vi emas, Tom.“ Poste ŝi malfortigis sian komplimenton, aldonante: „Sed tio estas tre tre rara afero, ke vi emas labori, tion mi bedaŭrinde devas diri. En ordo, foriru kaj ludu, sed pripensu, ke mi tanos vian felon, se vi ne revenos iam interne de semajno.“

Ŝi estis tiom forte impresita de la grandioza rezulto de Tom, ke ŝi kunprenis lin en la manĝokameron kaj elserĉis por li precipe belan pomon, kiun ŝi transdonis kun instrua prelego pri la aldona valoro kaj dolĉo de pago, se ĝi estis atingita sen peko kaj per virta streĉo. Kaj dum ŝi finis la parolon per edifa biblioverso, li „surhokigis“ sekrete ŝmalckringon.

Poste li elsaltis, kaj vidis, kiel la knabo Sid grimpas supren sur ekstera ŝtuparo, kiu kondukis al la malantaŭaj ĉambroj en la unua etaĝo. Terbuloj kuŝis manprete, kaj tuj la aero plenigis sin de ili. Ili falis sur la knabon Sid kiel hajloŝtormo, kaj antaŭ ol onklino Polly povis reordigi siajn surprizitajn pensojn kaj ekkuri por savi lin, ses aŭ sep terbuloj jam atingis sian personan celon kaj Tom grimpinta super la barilon estis for. Kvankam ekzistis pordego, Tom kutime tro rapidis por uzi ĝin. Nun la animo de Tom estis repacigita, ĉar li repagis al Sid la aferon rilate la atentigon pri la nigra fadeno, kio estis kaŭzinta malfacilaĵojn al li.

Tom preterkuris la domvicon kaj deturniĝis en polvoplenan strateton, kiu preterkondukis malantaŭe de la bovinejo de lia onklino. Iom poste li estis ekstere de la danĝerzono, kie arestigo kaj puno ankoraŭ povis trafi lin, kaj li hastis al la vilaĝa placo,

kie du „armeoj“ da knaboj havis rendevuan kunvenon por batalo. Tom estis la generalo de unu el la armeoj, Joe Harper, (koramiko), generalo de la alia. Tiuj du grandaj batalestroj ne degnis batali persone – tio estis la afero de la knaba infanterio – ili sidis kune sur altigita posteno kaj gvidis la militecajn operaciojn per komandoj perigitaj de heroldoj. La armeo de Tom post longa kaj dura batalo gajnis grandan venkon. Poste oni kalkulis la mortintojn, interŝanĝis la kaptitojn, interkonsentiĝis pri la kondiĉoj por la sekva kverelo kaj fiksis la tagon por plia neevitebla batalo, poste la armeoj ordigite laŭvice formarŝis kaj Tom ekiris sola hejmen.

Kiam li preteriris la domon, en kiu loĝis Jeff Thatcher, li vidis novan knabinon en la ĝardeno, dolĉan bluokulan estaĵeton, kies blonda hararo estis kunligita al plektaĵo, kun blanka somerjupo kaj ĝisgenua pantalono ornamita per brodaĵo. La ĵus kronita heroo falis sen eĉ povi pafi antaŭe. Certa Amy Lawrence malaperis el lia koro kaj eĉ ne postlasis memoron. Antaŭe li pensis, ke li amas ŝin ĝis frenezo, li rigardis sian pasion kiel adoradon; sed efektive estis nur aĉa malgranda supraĵa ŝato. Li bezonis monatojn por gajni ŝin, kaj ŝi konfesis sian amon nur antaŭ malpli ol semajno. Li estis la plej feliĉa kaj plej fiera knabo en la mondo, sed nur dum

sep tagoj, kaj nun ŝi malaperis dum unu momento el lia koro kiel hazarda fremdulino, kies vizito estas finita.

Li preĝis al sia nova anĝelo per kaŝema rigardo, ĝis kiam li vidis, ke ŝi malkovris lin. Tiam li kondukis tiel, kvazaŭ li ne rimarkus ŝian ĉeeston, kaj komencis „paradi“ per diversaj absurdaj knabaj kondukmanieroj, por gajni ŝian admiradon. Dum certa tempo Tom daŭrigis la groteskajn stultaĵojn, sed baldaŭ, meze de danĝeraj gimnastikaj prezentoj, li ĵetis rapidan rigardon flanken kaj vidis, ke la knabineto troviĝas jam sur la vojo hejmen. Tom venis al la barilo kaj apogis sin sur ĝi, profunde afliktita, kaj li esperis, ke ŝi ankoraŭ restos iomete. Sur la ŝtupoj ŝi iom hezitis kaj poste proksimiĝis al la pordo. Tom ĝemis profunde, kiam ŝi metis piedon sur la sojlon. Sed baldaŭ lia vizaĝo heliĝis, ĉar ŝi ĵetis trikoloretan super la barilon, momenton antaŭ ol ŝi malaperis.

La knabo kuris rapide tien, sed haltis paŝon aŭ du antaŭ la floro. Permane li surmetis ombron al siaj okuloj kaj rigardis sur la straton, kvazaŭ li ekvidus tie ion interesan, kio okazas en tiu direkto. Poste li levis pajlotigon kaj kun tre remetita kapo provis balancadi ĝin sur sia nazo. Kaj dum li ŝanceliĝadis ĉe tiu

artifikaĵo, li pli kaj proksimiĝis al la trikoloreto. Laste li tuŝis la floron per nuda piedo, liaj flekseblaj piedfingroj ĉirkaŭprenis ĝin. Sur unu kruro li forsaltis kun la trezoro kaj malaperis post angulo. Sed nur dum minuto – tiom longe, kiom daŭris meti la floron en sian jakon, proksime de la koro – aŭ proksime de la stomako, eble li ne estis tre instruita pri anatomio, kaj tiurilate li tute ne estis tre kritikema.

Poste li returnis sin kaj restadis ĉe la barilo ĝis la vespera krepusko kaj „paradis“ kiel antaŭe, sed la knabino denove ne montriĝis. Tom iom konsoliĝis per la espero, ke intertempe ŝi estas proksime de iu fenestro kaj konstatas liajn atentigojn. Lastfine li iris malvoleme hejmen, kun streĉita kapo plena de vizioj.

Dum la tuta vespermanĝo lia spirito estis tiel ekscitita, ke lia onklino miris pri tio, kio „ekobsedis la infanon“. Li akceptis ampleksan skoldon pro la bulopriĵetado de Sid kaj ŝajne eĉ ne iomete ĉagreniĝis pri tio. Li provis ŝteli sukeron rekte sub la nazo de sia onklino kaj tial ricevis frapeton sur la fingrojn. Li diris:

„Onjo, sed Sidon vi neniam batas, se li ŝtelas

sukeron.“

„Jes, sed Sid ne turmentas iun tiel, kiel vi. Vi metus vian manon al sukero ĉiam, se mi ne observus vin.“

Baldaŭ ŝi iris en la kuirejon kaj Sid, feliĉa pri sia imuneco, metis manon al la sukero – jen speco de triumfo kontraŭ Tom, kiu apenaŭ estis eltenebla. Sed la sukero deglitis de la fingroj de Sid, falis planken kaj disrompiĝis. Tom ekstaziĝis, eĉ tiom, ke li kontrolis sian langon kaj silentis. Li diris al si mem, ke li parolos eĉ ne vorton, eĉ, se la onklino envenos, sed li sidos perfekte silenta, se ŝi demandos, kiu faris la misagon; kaj tiam li ekparolos, kaj estos nenio tiom bona en la mondo krom vidi kiel la „modelo de knabo“ kaptas vangofrapon. Li estis tiom plena de jubilo, ke li apenaŭ povis regi sin, kiam la maljuna damo revenis kaj staris antaŭ la rompitaĵoj kaj ĵetis fulmojn de kolero super siajn okulvitrojn. Li pensis: „Tuj ĝi komenciĝos!“ Kaj en la sekva momento li kuŝis sur la planko! Forta mano estas jam levita por ekbati denove, kiam Tom kriis:

„Haltu, onklino, kial vi min batas? Sid disrompis ĝin!“

Perpleksigite onklino Polly haltis kaj Tom atendis nun ŝian konsoligan kompaton. Sed retrovinte sian lingvon, ŝi diris nur:

„Nu! En ordo, sed vi ne ricevis vane la baton, mi supozas. Vi certe estis faronta alian stultaĵon, kiam mi forestis, same punindan.“

Sed poste ŝi tamen ekhavis konscienciproĉojn, kaj ŝi volonte dirus ion afablan kaj amplenan, sed ŝi juĝis, ke tio eble estus miskomprenata kiel konfeso de eraro. Kaj tion malpermesis la disciplino. Tial ŝi diris nenion kaj ekokupiĝis pri siaj aferoj, kun afliktita koro. Tom paŭtis sidante en angulo kaj banis sin en siaj vejoj. Li sciis, ke la onklino interne surgenuas antaŭ li, kaj tiu konscio plenigis lin per morna kontenteco. Li ne donos signalon kaj li ne notos iun. Li sciis, ke de tempo al tempo sopirega rigardo falas sur lin, tra vualo de larmoj, sed li rifuzis konstati tion. Li bildigis al si, kiel li kuŝos ĝismorte malsana kaj lia onklino kliniĝos super lin kaj petos pri eta vorto de pardono, sed li turnos sian vizaĝon al la muro kaj mortos sen tia dirita vorto. Ha, kiajn sentojn ŝi tiukaze havus? Kaj li bildigis al si, kiel li estos portata de la rivero hejmen, morta, kun ĉiuj siaj malsekaj bukloj, kaj lia vundita koro en eterna paco. Kiel ŝi ĵetus sin sur lin, ŝiaj larmoj falus kiel pluvo kaj

ŝiaj lipoj preĝus al Dio, ke li redonu la knabon al ŝi kaj, ke ŝi neniam denove fitraktos lin! Sed li tie kuŝus frida kaj pala sen doni iun signon – kompatinda eta suferulo, kies aflikteco havus finon. Per la patoso de tiuj revoj, li tiom ekscitis siajn sentojn, ke li devis gluti ĉiam denove kiel iu, kiu sufokiĝas. Kaj liaj okuloj naĝis en malklaraĵo el larmoj, kiuj ĉiufoje superfluis, kiam la okuloj palpebrumis, kaj liaj larmoj gutis de la nazpinto. Li dorlotis sian afliktecon per tioma volupto, ke li ne povis elteni, se tiu estis ĝenata per trudiĝanta monduma gajeco aŭ brua plezuro, lia aflikteco estis tro sankta por tiaj aferoj. Kaj kiam lia kuzino Maria subite endancis, tre tre feliĉa pri tio, post senfine longa vizito en la kamparo, ke ŝi estas denove hejme, li ekstaris kaj forlasis la ĉambron, de nuboj kaj tenebro ornamata, tra unu el la pordoj, dum ŝi enportis kantadon kaj sunbrilon tra la alia.

Li migradis for de la plej ŝatataj lokoj de la knaboj kaj serĉis solecajn lokojn, kiuj estis en akordo kun lia anima stato. Floso el arbotrunkoj aspektis invitema. Li sidiĝis sur ties randon kaj kontemplis la tristan vaston de la riverego kaj deziris nur, ke li dronu, per unu fojo kaj sen konscio, sen la malagrablaj cirkonstancoj, kiujn la naturo tenas preta por tiaj okazoj. Tiam li rememoris la floron. Li elprenis ĝin

dispremita kaj velkinta, kaj ĝi potence plifortigis la ĝuon de lia morna feliĉego. Li demandis sin, ĉu ŝi kompatas lin, se ŝi scius tion. Ĉu ŝi plorus kaj dezirus rajti meti la brakojn cirkaŭ lian nukon kaj konsoli lin? Ĉu ŝi fride deturniĝus kiel la restaĵo de la aĉa mondo? La imagata bildo vekis tiom grandan plezurigan mortbatalecan suferadon en li, ke li ĉiam denove turnis ĝin en siaj pensoj kaj prezentis la bildon al si en pli kaj pli novaj variaĵoj, ĝis kiam ĝi estis tute trivita. Laste li ĝemante leviĝis kaj foriris en la tenebro.

Je la dudekunua kaj duono aŭ je la dudekdua li iris sur la forlasita strato, kie loĝis la Adorata Nekonatino. Li haltis dum momento. Neniu sono penetris al liaj aŭskultantaj oreloj. Kandelajo ĵetis obtuzan lumon sur la kurtenojn de fenestro en la unua etaĝo. Ĉu la Sankta Aperoj tie troviĝas? Li grimpis trans la barilon, ŝteliris tra la bedoj, ĝis kiam li staris sub la fenestro; emociigite li rigardis longe supren, poste li kuŝiĝis sin tie sur la teron, kun la mizera, velkinta floro en la falditaj manoj super la brusto. Kaj tiel li volis morti – ekstere, en la frida mondo, sen hejmo kaj sen protekto super lia senhejma kapo, sen afabla mano, kiu forviŝas la mortoŝviton de lia frunto, sen afabla vizaĝo, kiu kunsenteme kliniĝos super li, kiam komenciĝos lia

granda mortobatalo. Kaj tiel ŝi vidus lin, kiam ŝi rigardos eksteren en la gajan matenon, kaj ve! Ĉu gutos malgranda ploro sur la kompatindan senvivan figuron de Tom? Ĉu ŝi eligos suspiron, se ŝi vidos tiel kruele detruita esperplenan junan vivon pereigita antaŭtempe?

La fenestro malfermiĝis, la kruda voĉo de servistino malsanktigis la sanktan kvieton kaj torento da akvo elverŝiĝis super la sternitajn membrojn de la martiro.

La heroo, kies gorĝo ankoraŭ estis kunpremita, saltis supren kun plifaciligita snufo. Aŭdeblis siblado kiel de pafaĵo, miksitaj kun mallaŭta sakro, sekvis sono kiel tintanta glaso kaj malgranda ombreca figuro ĵetiĝis super la barilon kaj malaperis fulmrapide en la tenebro.

Ne longe poste Tom rigardis, jam senvestite por la lito, siajn malsekajn vestojn per la lumo de kandelostumpo. Sid vekiĝis, sed se Sid havis eventuale eĉ nur delikatan tenton fari „iujn aludojn“, li tuj havis pli bonan penson kaj tenis fermita la buŝon – ĉar en la okuloj de Tom embuskis danĝero.

Tom sen la aldona plago de preĝo enlitiĝis, kaj Sid enkapo notis tiun neglektopekon.

Ĉapitro 04

La suno leviĝis super kvieta mondo kaj sendis siajn radiojn sur la vilaĝon kiel ĉiela beno. Post la matenmanĝo onklino Polly ordonis familan diservon. Ĝi komenciĝis per preĝo, kiu ripozis sur solida fundamento de citaĵoj el la Skribo, kuntenitaj de mortero el maldika tavolo de originalaj pensoj. De la pinto de tiu konstruaĵo ŝi portis kvazaŭ de la Sinaj-Montaro severan alineon el la Leĝo de Moseo malsupren.

Poste Tom surmetis zonon ĉirkaŭ la lumboj, por diri tiel, kaj foriris por „enkapigi la bibliajn tekstojn“. Sid lernis siajn jam antaŭ kelkaj tagoj. Tom uzis sian tutan energion por parkerigi kvin tekstojn. Li elektis parton el la Prediko sur la monto, ĉar li ne povis trovi pli mallongajn liniojn. Post duono de horo Tom havis svagan ĝeneralan divenon pri sia biblia teksto, sed ne pli, ĉar lia menso traplugis la tutan kampon de la homara pensado, dum liaj manoj okupiĝis pri diversaj deflankiĝantaj distroj. Mia prenis lian libron

por aŭskulti liajn recitaĵojn kaj li provis trovi sian
vojon tra la nebulo:

„Feliĉaj estas la ... do... “

„... malriĉaj...“

Jes... la malriĉaj... feliĉaj estas la malriĉaj... do ... “

„... en spirito...“

„... en spirito... Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar
ili... ili...“

„ILIA...“

„... ĉar ILIA. Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar
ilia estas la regno de la ĉielo. Feliĉaj estas la
plorantaj... ĉar ili ... ili...“

„Fe...“

„Ĉar ili... do ...“

H...L... T...“

„Ĉar ili H...L...T, mi ne scias, kio tio estas!“

„HEREDOS...!“

„Ho, HEREDOS! Ĉar ili – ĉar ili ... do ... estas plorantaj, kiuj ... kiuj ... plorantaj... ĉar ili ... do ... kio? Kial vi ne diras tion al mi, Maria? Kial vi estas tiel malica!“

„Ve, Tom, kompatinda ŝtipkapuleto, mi ne ĉagrenas vin, mi ne farus tion. Vi devas foriri kaj parkerigi la tekstojn denove. Ne malkuraĝiĝu! Tom, vi atingos la celon en gloro – kaj se vi estos atinginta la celon, mi donacos mirindaĵon al vi. Foriru, estu bona knabo!“

„Konsentite, sed kio ĝi estas? Maria, diru tion al mi.“

„Ne afliktiĝu pri tio, Tom. Vi scias, se mi diras, ke ĝi estas bela, ĝi efektive belas.“

„Pri tio mi vetus! Maria. En ordo, mi ankoraŭfoje provos ĝin.“

Kaj li „provis ĝin denove“ – kaj sub la duoblaj streĉiĝoj de scivolo kaj la atendebla gajno, li faris tion kun tia spirito, ke li glorie sukcesis. Maria donacis al li tute novan „*Barlow*“-tranĉilon, ĝi certe valoris dekdu kaj duonon da cendoj. Lin kaptis ĝoja ekstazo, kiu traskuis lin ĝis la ostoj. Kvankam la tranĉilo ne taŭgis por tranĉi ion per ĝi, ĝi ja estis „aŭtentika“ *Barlow*, kaj tio estis neimageble grandioza – sed de kie la okcidentaj knaboj iam havis la ideon, ke tia armilo iam ajn povus esti falsigita je ies domaĝo, estas unu el la misteraj, eble neniam solveblaj enigmoj de la homaro. Tom iel sukcesis tranĉi grateton en la bufedan ŝrankon kaj ĝuste volis eklabori je la ŝranko kun la faldebla skribtablo, kiam li estis forvokita por vesti sin por la dimanĉa lernejo.

Maria donis al li la ladan lavopelvon plenan de akvo kaj pecon da sapo, kaj li iris tra la pordo eksteren kaj metis la pelvon sur benketon, poste li trempis la sapon en la akvon kaj metis ĝin flanken, kuspis la manikojn, elverŝis la akvon iom post iom sur la teron kaj reiris en la kuirejon, tie li frotsekigis sian vizaĝon

diligente per la mantuko super la pordo. Sed Maria forprenis lian mantukon kaj diris:

„He, ĉu vi ne hontas? Tom. Vi ne devas esti tiom malbonkondata. Akvo ne damaĝos al vi!“

Tom estis iom embarasita. Ŝi plenigis la lavpelvon denove, kaj ĉifoje li staris dum certa tempo kliniĝinte super ĝi kaj decidiĝis ekagi, li unufoje forte enspiris kaj komencis lavi sin. Kiam li poste enpaŝis la kuirejon, kun firmpinĉitaj okuloj kaj palpis por trovi la mantukon, gutis sapa akvo de lia vizaĝo – honorinda atesto de lia aŭdaco. Sed kiam li aperis el post la mantuko, li ankoraŭ tiam ne aspektis sufiĉe kontentiga, ĉar la pura regiono finiĝis rekte ĉe lia mentono kaj liaj makzeloj, kiel ĉe masko. Sub kaj post tiu linio estis malhela arealo de neakvumita tereno, kiu etendiĝis malsupren en la fronto kaj malantaŭe ĉirkaŭ lia kolo. Tial Maria metis siajn manojn al li, kaj kiam ŝi estis preta, li estis „viro kaj frato“ sen diferenco de la haŭtkoloro, kaj lia saturita hararo estis bonorde brositita. Liaj mallongaj bukloj estis briditaj belaspekte simetriaĵoj. (Li sekrete glatigadis siajn buklojn kun granda peno kaj kvazaŭ gladis ilin al sia kapo, ĉar li trovis buklojn ineca, tial amarigis liaj propraj lian vivon.) Poste Maria kunserĉis por li vestojn, kiujn li uzadis nur la du

lastajn jarojn dum dimanĉoj – oni simple nomis ilin „liajn aliajn vestojn“ – kaj per tio ni jam scias la amplekson de lia vestaro. La knabino donis al li „la lastan fasonon“. Post kiam li vestis sin, ŝi kunbutonumis lian belaspektan jakon ĝis la mentono, faldis la grandegan blankan ĉemizokolumon super liajn ŝultrojn malsupren, brosis kaj kronis lin per lia punktita pajloĉapelo. Li aspektis nun tute ĉirkaŭe treege beligita kaj rigida. Li aspektis tute tiel malkomforta kiel li sentis sin, ĉar liaj nedifektitaj vestoj kaj ties pureco estis ligitaj kun limigo, kiu ekscitigis lian galon. Li esperis, ke Maria almenaŭ forgesos liajn ŝuojn, sed tiu espero estis seniluziigita, ŝi priŝmiris la ŝuojn detale per sebo, kiel kutime, kaj portis ilin al li. Li ne plu povis regi sin mem kaj diris, ke li ĉiam estas devigita fari multajn aferojn, kiujn li tute ne volas fari. Sed Maria konvinkis lin:

„Bonvolu Tom – estu bonkonduta, Tom.“

Tial li li grumble surmetis la ŝuojn. Maria baldaŭ estis preta kaj la tri infanoj ekiris al la dimanĉa lernejo – loko, kiun Tom malamegis per sia tuta koro, dum Sid kaj Maria tute volonte frekventis ĝin.

La dimanĉa lerneja instruado daŭris de la naŭa ĝis la deka kaj tridek. Kaj poste ili iris en la preĝejon. Du el la infanoj restis ĉiam libervole por la prediko en la preĝejo, la alia same restis, sed pro pli fortaj motivoj. Sur la sidbenkoj kun altaj apogiloj sen remburajo povis sidi pli ol tricent personoj. La konstruaĵo mem estis nur malgranda simpla preĝejo kun speco de pinarba skatolo el tabuloj sur ĝi, kiel tureto. Antaŭ la pordo Tom postrestis paŝon kaj alparolis same dimanĉveste plibeligitan kamaradon:

„Diru foje, Bill, ĉu vi havas flavan notfolion?“

„Jes.“

„Kion vi volus havi por li?“

„Kion vi ofertas?“

„Pecon da glicirizo kaj fiŝhokon.“

„Montru ilin.“

„Tom montris la aĵojn. Ili estis kontentigaj kaj ŝanĝis la posedanton. Poste Tom komercis du blankajn vitroglobetojn kontraŭ tri ruĝaj biletoj kaj tiun aŭ tiun bagatelon kontraŭ kelkajn bluajn. Li embuskis ankoraŭ dum dek aŭ dek kvin minutoj aliajn alvenintajn knabojn kaj aĉetis pliajn biletojn en diversaj koloroj. Poste li enpaŝis la preĝejon kun svarmo da bruantaj knaboj kaj knabinoj, iris al sia loko kaj tuj komencis kverelon kun la unua knabo, kiu proksimis. La instruisto, digna, ne plu juna viro, intervenis, poste li turnis la dorson kaj Tom tiris la hararon de knabo en la antaŭa benko, sed kiam la knabo turniĝis malantaŭen, li sidis mediteme enprofundiĝinta en sian libron, kaj tuj poste li pikis alian knabon per pinglo por baldaŭ aŭdi la dolorkrion „aj!“ Tial li ricevis plian riproĉon de la instruisto. La tuta klaso de Tom estis de simila speco: maltrankvila, laŭta, apenaŭ bridebla. Kiam ili devis deklamii siajn tekstojn, neniu el ili sciis perfekte la tekstojn, sed oni devis seninterrompe suflori ilin. Tamen ili trabaraktiĝis iel, kaj ĉiu ricevis sian rekompencon en formo de malgrandaj bluaj biletoj, sur kiuj legeblis bibliaj diroj. Blua bileto estis pagita por du recititaj tekstoj. Dek bluaj biletoj estis samvaloraj al unu ruĝa kaj estis ŝanĝeblaj por ĝi. Dek ruĝaj biletoj estis samaj al flava. Por dek flavaj biletoj ricevis lernanto de la lernejestro tre simple binditan biblion (kiu valoris ne pli ol kvardek cendojn en tiuj

feliĉaj tempoj). Kiom el miaj legantoj povus havigi la diligenton kaj sindonemon por parkerigi du mil tekstojn, eĉ por Doré-biblio? Kaj Maria akiris eĉ du bibliojn tielmaniere – tio estis la pacienca laboro de du jaroj, kaj knabo kun germanaj parencoj gajnis kvar aŭ kvin da ili. Iam li deklamis tri mil tekstojn sen interrompo, sed tio estis tro por lia mensa forto, kaj li ne estis multe pli ol idioto ekde tiu tago – tio estis doloriga malfeliĉo por la lernejo, ĉar je grandaj eventoj kun fremdaj gastoj la lernejestro vokis ĉiam lin antaŭen (por ke li, kiel Tom tion priskribis) povis fanfaroni per li. Nur la pli maljunaj lernantoj kapablis kunteni siajn biletojn kaj sufiĉe longe elteni la enuan penon por ricevi biblion. Tial la transdono de tia premio estis rara kaj memorinda okazaĵo. La sukcesa lernanto ĝojis je tia tago pri tiom da respekto kaj gloro, ke tuj en la brusto de ĉiu alia lernanto ekflamis nova gloravido, kiu ne malofte daŭris kelkajn semajnojn. Povas esti, ke la spirita stomako de Tom neniam malsatis atingi tian premion, sed sendube sia tuta estado jam ne malmultajn tagojn konsumiĝis pri la honoro kaj la spektaklo, kiuj estis ligitaj al tia ricevo de premio.

Je la laŭa tempo la lernejestro starigis sin antaŭ la pupitro kun fermita kantolibro ĉemane, kun montrofigro inter la paĝoj kaj komandis atentemon.

Kiam lernejestro en dimanĉa lernejo parolas sian nemalhaveblan parolon, estas kantolibro ĉemane same tiom nemalhavebla kiel la neevitebla notfolio enmane de kantisto, kiu staras antaŭe sur la scenejo kaj kantas sola en koncerto, tial ĝi estas por neniu mistero, ke nek la kantolibro nek la notfolio estas iam honorataj per rigardo. La lernejestro estis svelta figuro, tridek kvin jarojn maljuna, kun sablokolora kapreca pintbarbo kaj mallonga sabla hararo. Li surhavis rigidan altan kolumon, kies supra rando preskaŭ atingis la orelojn, kaj kies pintoj en la alto de liaj buŝanguloj kurbiĝis antaŭen – jen barilo, kiu eldevis rigidan rigardon antaŭen kaj turniĝon de la tuta korpo, kiam rigardo antaŭen fariĝis necesa. Lia mentono apogis sin sur bankravato, kiu estis tiom longa kaj larĝa kiel monbileto kaj havis torditajn finaĵojn. Liaj botopintoj laŭ la modo de la tempo estis krute kurbigitaj supren, kiel la glitiloj de sledo – efekto, kiun la junaj viroj produktis kun pacienco kaj diligento per tio, ke ili premis dum horoj siajn piedfingrojn kontraŭ muro. Sinjoro Valters rigarde mienis tre serioze kaj estis honesta kaj sincera viro. Sanktajn aĵojn kaj lokojn li honorigis tiom kaj tenis ilin tiel for de ĉiuj profane mondaj aferoj, ke, nekonscie al li mem, lia dimanĉa lerneja voĉo alprenis strangan paroltonon, kiu tute mankis al li dum semajnaj tagoj. Li komencis la parolon tiel:

„Nu, infanoj, mi volas, ke vi ĉiuj tiel sincere, rekte kaj plaĉe sidiĝu, kiel vi povas, kaj ke vi turnu dum unu aŭ du minutoj vian tutan atentemon al mi. Jes – tiel estas bone. Ĝuste tiel bonaj malgrandaj geknaboj faru tion. Mi vidas malgrandan knabinon, kiu rigardas el la fenestro – mi timas, ke ŝi supozas, ke mi estas tie ekstere, eble supre sur iu arbo – kaj faras parolon al la birdoj. (Aplaŭda subridado.) Mi volas diri al vi, kian bonan senton donas vidi kolektiĝintaj tiom da helaj, puraj, malgrandaj vizaĝoj sur unu loko, kiel ĉi tiun, kie ili lernas fari la ĝustan kaj esti bonaj.“ Kaj tiel plu kaj plu tiel. Ne necesas meti la restaĵon de tiu prediko. Li sekvis modelon, kiu ŝanĝiĝas neniam, kaj kiun ni tial ĉiuj konas sufiĉe.

La lasta triono de la parolado estis ĝenata per tio, ke certaj malbonaj knaboj rekomencis sian kvereladojn kaj aliajn plezurojn, krome ili baraktis kaj interflustradis, tio etendiĝis tre vaste, kaj tial tio eĉ tuŝis tiajn solecajn kaj nemoveblajn rokojn kiel Sid kaj Maria. Sed subite, kiam sinjoro Valters mallevis sian voĉon, silentiĝis ĉiu sono kaj la fino de la parolado estis akceptata kun esprimo de profunda dankemo.

Grandan parton de la flustrado incitis malofta okazaĵo – la enpaŝo de vizitantoj: advokato Thatcher

akompanata de vere malforte aspektanta, mezaĝa, korpulenta kaj nobla ĝentlemano kun ferogriza hararo kaj eleganta damo, kiu kondukis infanon ĉemane, sendube la edzino de la viro. Tom antaŭe estis maltrankvila, plena de enuo kaj plendemo. Ankaŭ konscienciproĉoj turmentis lin. Li ne povis rigardi al la okuloj de Amy Lawrence, kaj elteni ŝiajn karesemajn rigardojn. Sed kiam li nun vidis enveni la malgrandan novalvenintan Amy, lia koro ekflamiĝis pro beateco. Kaj tuj li komencis paradi per sia tuta forto – li disdonis ripopuŝojn al knaboj, tiris hararojn, montris grimacojn, koncize dirate, li ne lasis nefarita iun artifaĵon, kiu povus eksciti la admiron de knabino kaj ŝian aplaŭdon. Lia ekstazo estis iom obtuzigita eble nur per la humiligo en la ĝardeno de la anĝelo, sed tio solviĝis rapide en nenion kiel skribaĵo en sablo, kiu estas forinundita de ondoj de beateco.

La vizitantoj ricevis la plej bonajn honorsidlokojn, kaj kiam sinjoro Valters finis sian paroladon, li prezentis ilin al la lernejo. La mezaĝa viro montriĝis kiel tute elstara persono – li estis neniu malpli grava ol la gubernia juĝisto mem – entute la plej eminenta figuro, kiun tiuj infanoj iam ajn rigardis – kaj ili demandis sin, el kiu materialo li estas farita – kaj parte ili deziris, ke li foje tondre krii, kaj parte ili

ankaŭ timis tion. Li venis el Konstantinopolo, dek du mejlojn malproksime – per tio li granddistance vojaĝis kaj vidis la mondon – liaj okuloj tute mem vidis la gubernian domon de la distrikta juĝejo, kiu, kiel oni diris, havas ladotegmenton. La respektegon, kiun inspiris tiaj pripensoj, atestis la impesa silento en la vicoj de miregantaj okuloj. Jen la granda juĝisto Thatcher, frato de la samnoma advokato de la loko. Jeff Thatcher tuj iris antaŭen por montri sian intimecon kun la granda viro kaj por enviigi la lernejon. Ĝi estus muziko por li, se li povus aŭdi la flustradon.

„Rigardu lin foje, Jim! Li grimpas tie supren. Diru foje – rigardu! Li estas komenconta skui liajn manojn – li SKUAS liajn manojn! Fulmotondro, ĉu vi ne deziras esti Jeff?“

Sinjoro Valters paradis kun ĉiuj specoj de oficiala movopleneco kaj aktiveco, seninterrompe disdonante riproĉojn kaj instrukciojn, tie kaj tie kaj ĉie, kie li trovis bonŝancon. La librodisdonanto paradis – li kuradis kun la libroj subbrake tien kaj tien kaj estigis tiun imponan bruon kaj kirloŝtormon, kiu tiom beatigas subrangajn oficistojn. La junaj instruistinoj paradis per tio, ke ili kareseme kliniĝis al siaj gelernantoj, kiujn ili mallonge antaŭe ankoraŭ

kapfrapetis, dum ili levis averte montrofringrojn al malicaj knaboj kaj karese frapetis la bonajn. La junaj ĝentlemano-instruistoj paradis per riproĉetoj kaj aliaj pruvoj de sia aŭtoritateco kaj atenta kontrolo de la disciplino – kaj la plej multaj el la instruistoj el ambaŭ genroj seninterrompe okupiĝis supre ĉe la predika pupitro pri libroj, kaj tiu farado estis du- aŭ trifoje ripetenda (ŝajne tre malvoleme). La malgrandaj knabinoj paradis diversmaniere kaj la malgrandaj knaboj tiom fervore paradis, ke la aero estis plena de paperbuloj kaj la murmurado de interbataletoj. Kaj super ĉio tronis la eminenta viro kaj elradiis majeste juĝistan rideton al la tuta preĝejo kaj varmigis sin mem en la brilo de sia propra granda – ĉar ankaŭ li „paradis“.

Por la perfektigo de la beateco de sinjoro Valters mankis nun nur unu afero: kaj tio estis la eblo transdoni bibliopremion kaj prezenti miraklo-infanon. Kelkaj lernantoj havis flavan biletan, sed neniuj havis sufiĉan kvanton – sinjoro Valters jam informis sin pri tio ĉe siaj modelaj lernantoj. Li estus doninta ĉion en la mondo, se la germana knabo denove havus sian klaran menson je dispono.

Sed nun, en tiu momento, kiam ĉiu espero perdiĝis, Tom Sawyer venis antaŭen. Li havis naŭ flavajn

biletojn, naŭ ruĝajn kaj dek blujn kaj pretendis Biblion. Por sinjoro Valters tio estis fulmotondro el blua ĉielo. De tiu flanko la instruisto ne atendis pretendon dum la estontecaj dek jaroj. Sed elturniĝo de tiu afero ne eblis – jen la atestigaj biletoj, ili aspektis aŭtentikaj. Sekve tion la juĝisto kaj la aliaj honorinduloj vokis la knabon Tom supren, kaj la granda novaĵo estis sciigata de la plej alta instanco. Estis la plej grandega perpleksiga surprizo de la lasta jardeko, kaj estis tia surprizo, ke ĝi levis la novan heroon sur la saman ebenon kiel la juĝiston, pro kio la lernejoj personoj nun povis gapi al du mirakloj anstataŭ al unu. La knaboj preskaŭ krevis pro envio, sed tiuj, kiuj suferis plej dolore, estis tiuj, kiuj ekkonis tro malfrue, ke ili mem kontribuis al tiu malamata honoriga pompo, ĉar ili komercis kun Tom per biletoj, por la riĉoj, kiujn li suramasigis pro la vendo de privilegioj pri la kalkfarbado de la barilo. Ili malestimis sin mem, ke ili estis la ŝtipkapulaj viktimoj de ruza trompo, de insida serpentulo surherbeje.

La premion Tom transdonis al Tom la lernejestro kun tiom da entuziasmo, kiom li povis vekti en si sub tiaj cirkonstancoj. Sed la vera entuziasmo ja mankis, ĉar la instinkto diris al la kompatinda homo, ke tiurilate temas pri mistero, kiu bone ne povus elteni

la lumon de hela tago. Estis simple neimageble, ke ĝuste tiu knabo povis stokigi du mil bibliajn faskaĵojn de la Skribo kaj enkapigi ilin. Jam dek du sendube estus tro por li.

Amy Lawrence estis fiera kaj feliĉa, kaj ŝi provis montri tion al Tom per sia vizaĝesprimoj – sed li ne rigardis al ŝi. Ŝi miris, ĉar ŝi ĝuste estis iom afliktita, poste ŝi ekhavis supekteton, kiu venis kaj foriris – kaj revenis. Ŝi observis lin atenteme. Kaŝema rigardo malkaŝis al ŝi mondojn – kaj poste rompiĝis ŝia koro, kaj ŝi estis ĵaluza kaj kolera, kaj ekploris kaj malamegis ĉiujn, kaj plej multe la knabon Tom (tion ŝi pensis).

Tom estis prezentata al la juĝisto, sed la knabo eĉ ne kapablis eligi vorton, li apenaŭ povis spiri, lia koro tremis – parte pro la timiga grandeco de la viro, sed antaŭ ĉio pro tio, ĉar li estis patro ŝia. Plej prefere li surgenuiĝus kaj glorus lin, se estus malhele. La juĝisto metis manon sur la kapon de Tom kaj nomis lin fajna malgranda viro, kaj demandis, kiel li nomiĝas. La knabo, haste enspiris, balbutis kaj eligis:

„Tom.“

„Ho ne, ne Tom, sed...”

„Tomaso.”

„Tiel estas en ordo. Mi ja jam pensis, ke pri la antaŭnomo ankoraŭ io mankis. Tio estas tre bona. Sed vi havas ja ankoraŭ plian nomon, mi permesas al mi diri, kaj vi diros ĝin al mi, ĉu?”

„Diru al la ĝentlemano vian familian nomon, Tomaso“, diris sinjoro Valters, kaj bonvolu diri Siro. Ne forgesu vian bonan konduton.”

„Tom Sawyer, Siro.”

„Tiel estas, bona knabo. Grandioza knabo, grandioza malgranda viro. Du mil tekstojn, tio estas granda kvanto – tre tre granda. Kaj vi neniam bedaŭros, ke vi ŝarĝis vin per la peno lerni ilin, ĉar scioj valoras pli ol io alia en la mondo. Estas tio, kio faras virojn grandajn kaj virojn bonajn, vi iam estos mem viro granda kaj bona, Tomaso. Kaj tiam vi rerigardos kaj povos diri: Ĉion tion mi dankas al la mirinda dimanĉa lernejo, kiun viziti mi havis la privilegion –

tion mi dankas al miaj karaj instruistoj, kiuj instigis min diligente lerni. Mi dankas tion al mia bona lernejestro, kiu kuraĝigis min kaj gardis min kaj donacis mirindan biblion al mi, eksterordinare luksan biblion, kiun mi rajtas posedi dum la tuta vivo – ĉion tion mi dankas al ĝusta edukado! Tio estas, kion vi diros, Tomaso. Kaj por neniu mono en la mondo vi fordonus tiujn du mil tekstojn – vere ne, tute ne! Kaj nun vi certe ne havas ion kontraŭ tio deklami al mi kaj al tiu ĉi damo ĉi tie kelkajn tekstojn, kiujn vi lernis – jes, mi scias, ke vi ne havas ion kontraŭ tio, ĉar ni estas fieraj pri malgrandaj knaboj, kiuj lernas diligente. Nu, sen dubo vi scias la nomojn de la dek du apostoloj. Bonvolu diri al ni la nomojn de la du unue menciitaj.“

Tom tordadis sian jakan butonon kaj mienis stultvizaĝe. Poste li ruĝiĝis kaj turnis la rigardon supren. La animo de sinjoro Valters sinkis pro malkuraĝiĝo en la pantalonon. Li diris al si, estas tute ne eble, ke tiu knabo povas respondi eĉ la plej simplan demandon. Kial *la juĝisto* demandis lin? Kaj tamen li sentis sin devigita diri:

„Respondu al la ĝentlemano, Tomaso – ne timu.“

Tom ankoraŭ nun kvazaŭ sidis sur pingloj.

„Nu, al mi vi ja diros tion, ĉu ne?“ diris la damo. „La nomoj de la du unuaj apostoloj estas ...“

„DAVIDO KAJ GOLJATO!“

Ni sternu la vualon de l' kompatemo pri la restaĵo de la scenaro.

Ĉapitro 05

Je la deka kaj duono komencis sonori la malgranda preĝeja sonorilo, kaj baldaŭ kolektiĝis la enloĝantoj por la matena prediko. La dimanĉaj lernejoj lernantoj dispartigis sin en la preĝejo kaj sidiĝis apud siaj gepatroj en la benkaj vicoj, por ke ili estu sub kontrolo. Onklino Polly venis, kaj Tom, Sid kaj Maria sidiĝis apud ŝi – Tom estis lokigita apud la meza trairejo, por ke li estu kiel eble malproksime de la malfermita fenestro kaj la tentaj someraj impresoj ekstere. La homoj ŝoviĝis tra la meza irejo: la maljuna kaj mizere stata poŝtejestro, kiu jam vidis pli

bonajn tagojn, la urbestro kun edzino – ĉar ili havis eĉ urbestron krom aliaj superfluaĵoj – la paciga juĝisto, la vidvino Douglas: bela, eleganta kaj kvardek jarojn aĝa, grandanima kaj bonkora kaj krome eĉ tre bonstata, ŝia vilao sur la monto estis la ununura palaco en la urbo kaj aldone eĉ la plej gastafabla kaj plej malavara domo, kie okazis la plej pompaj festetoj, kiujn povis oferti Sankt-Peterburgo. Venis la honorinda kaj korpe klinita majoro Ward kun sia edzino, advokato Riverson, nova honorindulo ĵus transloĝinta el malproksime en la lokon, krome la vilaĝa belulino sekvata de trupo de fajne vestitaj kaj rubande ornamitaj korrompuloj. Aldone ĉiuj junaj oficistoj de la loko kune, ĉar ili staris antaŭe en la antaŭĉambro kaj suĉis siajn promenbastonajn pomelojn, jen mura duoncirklo el pomade priŝmiritaj kaj sopiregaj admirantoj, ĝis kiam la lasta knabino trapasis la vergojn, kaj kiel la lasta el ĉiuj venis la modela knabo Willie Mufferson, kiu tiel atente cirklis ĉirkaŭ sia patrino, kvazaŭ ŝi estus el vitro. Li ĉiam kondukis sian patrinon al la preĝejo kaj estis la fiero de ĉiuj pli aĝaj damoj. La knaboj ĉiuj malamamis lin, ĉar li estis tiel bonkondata. Kaj krome li estis jam ofte uzita kiel bona ekzemplo kontraŭ ili. Lia blanka naztuko pendis el lia malantaŭa pantalonpoŝo, kiel ofte dimanĉe – tute hazarde. Tom ne havis naztukon kaj malestimis knabojn, kiuj havas iun, kiel snobojn.

Post kiam la paroĥaro nun estis kolektiĝinta, la sonorilo ankoraŭfoje sonoris por averti malfruiĝantojn kaj trotvagantojn. Kaj poste malleviĝis sankta kvieto sur la preĝejon, kiun ĝenis nur la subridado kaj frustrado de la ĥoro sur la galerio. La ĥoro ĉiam subridis kaj flustris dum la tuta diservo. Laŭdire iam ekzistis ie preĝeja ĥoro, kiu ne miskondutis, sed mi forgesis, kie tio estis. Estis certe antaŭ tre tre multaj jaroj, kaj mi preskaŭ tute ne plu memoras pri la afero. Sed mi supozas, ke ĝi estis ie eksterlande.

La pastoro anoncis la preĝejan himnon kaj antaŭlegis la tekston kun pasio kaj stranga stilo, kiu estis tre admirata en tiu parto de la lando. Lia voĉo komenciĝis en meza alto kaj leviĝis poste seninterrompe, ĝis kiam ĝi atingis certan kulminpunkton, kie ĝi emfazis la plej altan vorton kaj poste saltis malsupren kiel de plonĝotabulo.

Ĉu mi do flugu al ĉiel' sur flora LIT' sen far'?

Dum la aliaj por batal' velas tra SANGA mar'?

Oni rigardis lin kiel mirindan deklamiston. Ĉe societaj kunvenoj de la paroĥaro oni ĉiam urĝis lin antaŭlegi poeziaĵojn. Kaj se li finis recitadon, la

damoj levis la manojn kaj lasis ilin poste senhelpe fali sur la sinon, kovris siajn okulojn kaj skuis la kapojn, kvazaŭ ili volus diri: „Vortoj ne povas esprimi tion, estas tiom bele, *tro* bele por tiu ĉi mortema mondo.“

Post kiam oni kantis la preĝejan himnon, pastoro Sprague transformiĝis en eventkalendaron kaj prelegis noticojn de renkontiĝoj kaj societoj kaj diversaj aferoj, ĝis kiam ekestis la impresoj, ke la listo sufiĉos ĝis la Lasta Juĝo – stranga moro, kiu ĝis nun konserviĝis en Usono, eĉ en grandaj urboj kaj en la erao de abundaj gazetoj. Ju malpli tradicio rajtigitas, des pli komplike estas liberigi sin de ĝi.

Kaj poste la pastoro preĝis. Estis bona kaj grandanima propeta prediko, kiu apenaŭ ellasis detalojn: li popetis por la preĝejo kaj malgrandaj infanoj de la preĝejo, por la aliaj preĝejoj en la urbeto, por la vilaĝo mem, por la distrikto, por la ŝtato, por la ŝtatservistoj, por la Unuiĝintaj Ŝtatoj, por la preĝejoj de Usono, por la kongreso, por la prezidento, por la registaranoj; por la povraj maristoj skuataj en la ŝtormoj sur alta maro, por la subigitaj milionoj da homoj ĝemantaj sub la knuto de eŭropaj monarkioj kaj orientaj despotoj, por tiuj, kiuj ricevis la lumon kaj la Ĝojigan Mesaĝon kaj tamen ne havis

okulojn kaj orelojn por ĉio tio, por la paganoj sur la foraj insuloj meze de la maroj. La preĝo finiĝis kun la insista petego, ke la vortoj parolataj ĉi tie trovu gracon kaj favoron kaj kiel semoj estu semitaj sur fekunda grundo kaj estigu kun la paso de la tempo riĉan rikolton de l' bono. Amen!

La vestoj susuris. Kaj la paroĥaro residiĝis. La knabo, kies historio en tiu ĉi libro estas rakontata, ne ĝojis pri la preĝo, li nur eltenis ĝin – aŭ eĉ ne tion. Li estis dum la tuta tempo maltrankvila kaj senkonscie markis per hoketo la detalojn de la preĝo – ĉar li ne aŭskultis ĝin, sed li konis sufiĉe la terenon, tra kiu la pastoro iradas ĉiam la samajn vojojn – kaj se io nova estis enmetita, liaj oreloj tuj rimarkis tion kaj lia tuta animo kontraŭis al tio, li rigardis aldonojn kiel nejustaj kaj friponaj. Meze de la preĝado sidiĝis muŝo sur la apogilon de la benkvico antaŭ Tom kaj torturis lian spiriton per tio, ke ĝi fride sange frotadis reciproke siajn kruretojn kaj ĉirkaŭbrakis sian kapon per la antaŭkruroj, kaj tiom forte poluris la kapon, ke ĝi preskaŭ perdis la ligan kun la restaĵo de la korpo kaj ekvideblis la maldika fadeneto de la kolo. Ĝi gratis per la malantaŭaj kruretoj siajn flugilojn kaj glatigis ilin laŭ la korpo, kvazaŭ ili estus baskoj de frako. Ŝi faris sian kosmetikon tiel stoike, kvazaŭ ĝi sciis, ke tute neniun danĝero minacas ĝin, kio efektive

tiel estis, ĉar, kiom ajn jukis la fingroj de Tom, li ne kuraĝis etendi ilin, li pensis, ke lia animo per unu fojo estus detruita, se li farus ion tian meze de prediko. Sed dum la lasta frazo volbiĝis liaj manoj kaj palpis sin ŝteleme antaŭen, kaj en tiu momento, kiam la „amen“ estis parolita, la muŝo estis jam kvazaŭ militkaptito. Lia onklino malkovris la agon kaj devigis lin enliberigi la muŝon.

La pastoro sciigis la biblian tekston kaj poste monotone kaj tede predikis senfine, tiel, ke iom post iom kliniĝis multaj kapoj – kvankam tio estis prediko, kiu temis pri senlima fajro kaj sulfuro, kiu malpliigis la aron de elektitoj tiom draste, ke apenaŭ valoris la penon savi la postrestintojn. Tom nombris la paĝojn de la prediko. Post la diservo li ĉiam sciis, kiom da paĝoj estis. Sed li sciis preskaŭ neniam ion pri la enhavo. Sed ĉifoje li efektive aŭskultis dum certa tempo kun intereso. La pastoro pentris grandan kaj animskuigan bildon, kiel kolektiĝas la gastoj de l' tero ĉe la komenco de la Jarmila Regno, kiam la leono kaj la ŝafido pace kunkuŝas kaj infaneto kondukas ilin per ŝnuro. Sed la patoso, la instruo, la moralo de la granda spektaklo estis disipita pri la knabo. Li pensis nur pri tio kiel la ĉeffiguro okulfrape prezentas sin antaŭ la spektantaj nacioj. Lia vizaĝo heliĝis kun la penso, ke li dezirus volonte esti mem la

infano, sub la antaŭkondiĉo, ke la leono estas bridita.

Poste li falis denove en obtuzan suferadon, dum la seka interpretado estis daŭrigata. Baldaŭ li memoris pri trezoro, kiun li havas ĉe si kaj li elprenis ĝin. Estis granda nigra skarabo en prajma skatoletto kun monstraj mordiloj, li nomis ĝin „pinĉskarabo“. Unue la skarabo pinĉis fingron de Tom. Sekvis impulsa klakmovo de la fingro kaj la skarabo ŝvebis en la mezan irejon kaj tie falis sur la dorson. Kaj la doloranta fingro moviĝis en la buŝon de la knabo. La skarabo kuŝis surdorse kaj baraktis senhelpe per la kruretoj, senkapable turniĝi la korpon. Tom observis ĝin kaj etendis la manojn al ĝi, sed ĝi estis ekstere de lia agada radiuso. Aliaj, kiuj same ne interesiĝis pri la prediko, rigardis la skarabon bonvena interrompo, kaj tial same observis ĝin. Poste altrotis pigre promenanta hundo, malgaja anime, laca pro la premsufoka somera varmo kaj kvieto, sata pri la kaptiteco kaj sopiranta distron. Ĝi ekvidis la skarabon, ĝia vosto malsupren pendata starigis sin kaj svingiĝadis. Ĝi taksis la predon, ĉirkaŭiris ĝin, ĝin priflaris el sekura distanco, ĉirkaŭcirkulis la skarabon denove, fariĝis pli aŭdaca kaj priflaris ĝin tute proksime. Poste ĝi montris la dentojn kaj ekmordis atenteme, sed iomete mistrafis la skarabon, ĝi ankoraŭfoje ekmordis ĝin, kaj ankoraŭfoje, ĝi trovis

iom post iom plezuron je la distro, sternis sin sur la ventro, kun la skarabo inter la piedetoj kaj daŭrigis siajn eksperimentojn. Laste ĝi ekenuis, ĝi fariĝis indiferenta kaj mense malĉeestis. Ĝia kapo fariĝis peza, iom post iom descendis ĝia mentono, ĝis kiam ĝi tuŝis la malamikon, kiu pinĉis ĝin. Jen ekis kriĉa ekhurlado, skuado de la kapo, kaj la skarabo flugis kelkajn metrojn for kaj denove falis sur la dorson. La najbaraj spektantoj tremis pro mallaŭta gajo, kelkaj vizaĝoj malaperis malantaŭ ventumiloj kaj naztukoj kaj Tom estis tute beata. La hundo aspektis ŝtipkapula kaj supozeble ankaŭ tiel sentiĝis. Sed en ĝia koro estis sento de amareco kaj ĝi avidis venĝon. Tial ĝi kuris al la skarabo kaj komencis denove heziteman atakon. Ĝi saltis de diversaj punktoj de cirklo al ĝi kaj ĉiufoje surplankiĝis per la piedoj nur malmultajn centimetrojn for de la besto, per sia mordanta dentaro ĝi pli kaj pli proksimiĝis kaj skuis la kapon, ĝis kiam ĝiaj oreloj flugis tien kaj tien. Sed post certa tempo ĝi denove enuis kaj provis pasigi la tempon per muŝo, sed tio ne kontentigis ĝin. Ĝi persekutis pernaze surplanke formikon kaj rapide lasis tion. Ĝi oscedis, ĝemadis, forgesis la skarabon tute kaj – sidiĝis sur ĝi! Eksonis sovaĝa dolorhurlado kaj la pudelo sagis tra la navo antaŭen. La hurlado kaj la hundo ne bremseblis; ĝi rapidegis tra la preĝejo preter la altaron kaj sur la alia irejo rekuregis preter la pordoj kaj brue rapidegis tra la cellinio. Ĝia

dolorego kreskis kun la trairsta distanco, ĝis kiam ĝi cirkulis kiel lanobula kometo sur sia orbito kun glima lumrapideco. Laste la dolorturmentata besto deflankiĝis de sia orbito kaj saltis sur la sinon de sia mastro. Tiu ĵetis ĝin tra la fenestro, kaj la plorsingulta voĉo rapide fariĝis pli kaj pli mallaŭta kaj silentiĝis en la foro.

Intertempe ĉiuj preĝejoj vizitantoj havis ruĝajn vizaĝojn kaj preskaŭ sufokiĝis pro retenita ridado. La prediko tute haltis. Kvankam la parolo baldaŭ rekomenciĝis, sed nur helike lante kaj heziteme. Ĉiu eblo ankoraŭ impresi iun estis perdita. Eĉ la plej solenajn pensojn oni akceptis kun sufokiga eksplodo de malsankta gajeco el la protekto de pli malproksimaj benkvicoj, kvazaŭ la kompatinda pastoro dirus komikajn ŝercojn. Estis plifaciligite por la tuta ĉeestantaro, kiam la tuta martireco estis finita kaj la beno parolata.

Tom iris hejmen tute gaja. Li trovis, ke diservoj povas esti tute kontentigaj, se estas iom da distro en ili. Li havis nur unu ĝenan penson. Li havis nenion kontraŭ tio, ke la hundo ludis kun la pinĉskarabo, sed ĝi kontraŭis al lia jura kompreno, ke ĝi simple forportis ĝin.

Ĉapitro 06

Lunde matene Tom sentis sin mizere. Lunde matene li sentis sin ĉiam tiel, ĉar denove komenciĝis semajno da sufero en la lernejo. Kutime li komencis tiun tagon per tio, ke li deziris, ke ne okazu la interrompo per tiu ĉi semajnfino. Ĉar ĝi faris la revenon de kaptiteco kaj kateniteco eĉ pli abomena.

Tom kuŝis enlite kaj enpenŝiĝis. Subite li ekhavis la ideon, ke li plej prefere estu malsana. Tiukaze li povus resti hejme. Tio estus delikata radieto de espero. Li ekzamenis sian korpon de supre ĝis malsupre. Neniu sufero troviĝis kaj li esploris denove. Ĉifoje ŝajnis al li, ke eblus senti aludon de kolikaj simptomoj, kaj li komencis subteni ilin, kun konsiderinda espero. Sed ili baldaŭ fariĝis apenaŭ plu senteblaj kaj malaperis fine tute. Li pripensis la aferon plu. Jen li malkovris ion novan. Unu el liaj tranĉodontoj malfirmiĝis. Kia feliĉo! Li ĵus volis komenci ĝemi, por ensentiĝo, kiel li nomis tion, kiam venis kapen al li, ke lia onklino, se li rakontus tion al ŝi, simple elŝirus la denton kaj tio estus doloriga. Li do decidis teni la denton en rezervo kaj serĉis plu. Dum certa tempo ofertiĝis nenio, sed poste li

memoris, ke la kuracisto rakontis pri certa afero, kiu iun el liaj klientoj katenis du aŭ tri semajnojn al lito, io, kio malbonŝance kostus eĉ fingron. Tial li fervore aperigis sian vunditan piedfingron el la litkovrilo kaj tenis ĝin alte por inspekti ĝin. Bedaŭrinde li ne konis la necesajn simptomojn, sed provo ja indus la penon, kaj li komencis ĝemi kun sindonemo.

Sed Sid dormis neimpresite plu.

Tom ĝemis pli laŭte kaj imagis jam senti doloron en la piedfingro.

Neniu reago de Sid.

Tom baldaŭ laŭte elspiris pro streĉiĝo. Li paŭzis, kolektis ĉiujn siajn fortojn kaj eligis tutan serion da admirindaj dolorsonoj.

Sid ronkis plu.

Tom indigniĝis. Li diris: „Sid, Sid!“ kaj skuis lin. Tio funkciis pli bone kaj Tom komencis ĝemi denove. Sid oscedis, etendis la membrojn, poste li leviĝis

spirblove per apogo sur la kubutoj kaj komencis gapi al Tom. Tom daŭrigis la ĝemadon. Sid diris:

„Tom! Diru, Tom!“ (Neniu respondo.) „He, Tom! Tohom! Pri kio temas, Tom?!“ Li skuis lin kaj rigardis zorgeme lian vizaĝon.

Tom eligis pene:

„Ne, Sid, lasu nur. Ne tiom skuu min.“

„Pri kio temas, Tom? Mi devos voki Onjon.“

„Ne, ne zorgu vin. Eble ĝi pasos iom post iom. Ne voku iun.“

„Sed mi devas, ne ĝemu tiom, Tom, estas terure. Kiom longe vi tion jam havas?“

„Horojn, ve! Ne tiom skuu min, vi min ja mortigos.“

„Tom, kial vi ne jam pli frue vekis min? Ho, Tom, NE

FARU TION! Fariĝas tute strange en mi, se mi aŭskultas ĝemi vin tiel. Kion vi havas, Tom?“

„Mi pardonas al vi ĉion, Sid, (Ĝemado.) Ĉion, kion vi iam ajn faris al mi. Se mi ne plu vivos....“

„Ve, Tom, vi eble eĉ ne mortos, ĉu? Aŭskultu, Tom – ho, finu tion. Eble....“

„Mi pardonas al ĉiuj, Sid. (Ĝemado.) Diru tion al ili. Kaj Sid, donu mian fenestrokradon kaj mian katon kun unu okulo al la nova knabino, kiu transloĝiĝis en la urbon, kaj diru al ŝi...“

Sed Sid prenis siajn vestojn kaj tuj foriĝis. Tom nun suferis efektive, tiom konvinke laboris lia imagoforto, kaj tial lia ĝemado sonis mirige aŭtentike.

Sid kvazaŭ flugis malsupren sur la ŝtuparo kaj vokis:

„Ho ve, onjo Polly, venu rapide, Tom mortas!“

„Mortas, ĉu?“

„Jes, venu, venu rapide!“

„Stultaĵo! Tion mi ne povas imagi.“

Tamen ŝi kuris sur la ŝtuparo supren, kun Sid kaj Maria ĉe siaj kalkanoj. Ŝia vizaĝo paliĝis kaj ŝiaj lipoj tremis. Kiam ŝi atingis la liton, ŝi spirkraĉis:

„Tom! Tom, kion vi havas?“

„Ho, onjo, mi...“

„Kion vi havas? Kion vi havas? Tom?“

„Ve, onjo, mia vundita piedfingro mortiĝis.“

La maljuna damo sidiĝis plifaciligite sur seĝon, ridis iom, poste iom ploris, kaj poste ŝi ridis kaj ploris samtempe. Tio rebalancigis ŝin kaj ŝi diris:

„Tom, kiom vi timigis min. Sed nun lasu tiun sensencaĵon kaj ellitiĝu.“

La ĝemado ĉesis kaj la doloro retiriĝis el la piedfingro. La knabo sentis sin iom kiel ŝtipkapulo, kaj li diris:

„Onjo Polly, la piedfingro SENTIĜIS tiel, kvazaŭ li estus morta, kaj ĝi tiom doloris, ke mi tute forgesis la denton.“

„Ankaŭ via dento, ĉu? Pri kio temas rilate la denton?“

„Unu el ili malfirmiĝis, kaj ĝi doloras terure.“

„Nu, estas ja en ordo, sed ne ekĝemu denove. Malfermu foje la buŝon. Jes, efektive, la dento moviĝas tien kaj tien. Sed vi ne mortos pro tio. Maria, ekiru kaj alportu silkofadenon kaj ardantan ŝtipon el la kuirejo.“

Tom diris:

„Aĥ, mi petas, onjo ne elŝiru ĝin. Mi jam ne plu havas dentedoloron. Mi volas fali morta planken, se mi plu

havas dentdoloron, onjo, mi ja tute ne volas preterlasi la lernejon.“

„Tiel do, tion vi ne volas! La tuta tumulto sekve temis nur pri tio, ke vi pensis, ke vi povus preterlasi la lernejon por fiŝhokado! Tom, Tom, mi vere amas vin, sed vi ŝajne lasas nenion nefarita por rompi mian maljunan koron per viaj sovaĝaj friponaĵoj.“

Intertempe la dentkuracista ilaro estis je dispono. La maljuna damo faris je finaĵo de la silkofadeno nodon kaj firmtiris ĝin ĉirkaŭ la dento de Tom, kaj la alian finaĵon ŝi fiksis al litfosto. Poste ŝi prenis la ardantan ŝtipon kaj subite moviĝis tiel, kvazaŭ ŝi volus ĵeti ĝin al la vizaĝo de Tom. Poste la dento pendis pendole svingiĝante je la litfosto.

Sed ĉiu ekzameno havas ankaŭ sian rekompencan. Kiam Tom post la matenmanĝo survojiĝis por iri al la lernejo, ĉiuj knaboj, kiuj renkontis lin, enviis lin pro la dentobreĉo, ĉar ĝi permesis al li kraĉi per tute nekonata kaj admirinda metodo. Li kolektigis ĉe si konsiderindan sekvantaron el knaboj, kiuj interesiĝis pri prezentado. Kaj unu el ili, kiu tranĉis iun el siaj fingroj, kaj tial ĝis tiam troviĝis en la mezpunkto de fascino kaj omaĝo, retroviĝis nun sen adeptoj kaj

prirabata de sia gloro. Li estis deprimita, kaj tial li diris kun malŝato, kiun li mem ne sentis, ke estas fakte nenio kraĉi kiel Tom. Sed alia diris nur: „La vinberoj tro acidas, ĉu?“ Kaj tiel li foriris kiel forgesita heroo.

Mallonge poste Tom renkontis la junulan parion de la urbeto, Huckleberry Finn, la filon de urbe konata drinkulo. Huckleberry elkore estis malamata kaj timata de ĉiuj patrinoj, ĉar li estis kaj pigra kaj senleĝa kaj vulgara kaj malica – kaj ĉar iliaj infanoj lin admiris kaj avidis lian malpermesitan societon kaj deziris, ke ili estu tiel kuraĝaj, kiel li. Tom pri tio similis al la aliaj bonkonduktaj knaboj, li enviis tiun Huckleberry pro ties aventurema vivo kiel eksterulo. Li havis rigoran malpermeson ludi kun li. Tial li ludis kun li tiom ofte, kiom li havis bonŝancon.

Huckleberry ĉiam estis vestita per trivitaj vestoj de plenkreskuloj, kaj la vestoj estis en eterna florstato de flirtantaj vestaĉoj. Lia ĉapelo estis vasta ruino kun lunarka truo en ties larĝa rando. Lia jako, se li vestis sin per ĝi, pendis preskaŭ ĝis la kalkanoj, kaj la lastaj malsupraj butonoj troviĝis sub la dorsofinaĵo. Nur unu ŝelko portis lian pantalonon, la postaĵparto de la pantalono havis du ŝveltuberojn, kiuj estis vakaj. Kaj la fibriĝintaj gambopartoj de la pantalono treniĝis en la koto, se li ne suprenfaldis ilin.

Huckleberry venis kaj foriris, kiel plaĉis al li. Dum plaĉa vetero li dormis en domenirejoj kaj dum aĉa vetero en vakaj bareloj. Li ne devis frekventi lernejon aŭ preĝejon, neniu povis komandi lin kaj li devis obei neniun. Li povis fiŝhoki, kiam kaj kie li volis kaj tiom longe restadi, kiel plaĉis al li. Neniu al li malpermesis lukti kun iu. Vespere li povis enlitiĝi tiom malfrue, kiom li ŝatis. Li estis ĉiam la unua knabo, kiu iris nudpiede printempe, kaj la lasta, kiu aŭtune surhavis ŝuojn. Li nek devis lavi sin nek vesti sin per puraj vestoj. Li povis sakri mirinde. Per unu frazo, ĉio, kion la vivon faras vivinda, havis tiu knabo. Tion sentis ĉiu plagata, limigata, honorinda knabo en Sankt-Peterburgo.

Tom salutis la romantikan eksterulon:

„Saluton, Huckleberry!“

„Saluton mem, kaj rigardu, kiel ĝi plaĉas al vi.“

„Kion vi havas?“

„Mortan katon.“

„Montru foje al mi, Huck. Hehe, ĝi ja estas tute rigida. De kie vi havas ĝin?“

„Aĉetite de knabo.“

„Kiom vi pagis?“

„Bluan biletan kaj vezikon de porko el buĉejo.“

„Kaj de kie vi havis la bluan biletan?“

„Mi aĉetis ĝin antaŭ du semajnoj de Ben Rogers por bastono por rulringo.“

„Cetere, diru, por kio taŭgas mortaj katoj, Huck?“

„Por kio? Por forigo de verukoj.“

„Ĉu vere? Jen mi scias ion pli bonan.“

„Mi vetas, ke vi ne scias. Kio estu tio?“

„Nu, pluvakvo en trunko.“

„Kial pluvakvo?! Mi donus eĉ ne duoncendon por pluvakvo.“

„Ĉu efektive ne? Ĉu vi jam foje provis?“

„Ne mi, sed Bob Tanner.“

„Kiu rakontis tion al vi?“

„Nu, li rakontis tion al Jeff Thatcher, kaj Jeff rakontis al Johnny Baker, kaj Johnny rakontis al Jim Hollis, kaj Jim rakontis al Ben Rodger, kaj Ben al negro, kaj tiu rakontis tion al mi. Tiel do!“

„Nu, kaj kion pruvas tio? Ili ĉiuj mensogas. Almenaŭ ĉiu krom la negro. Mi ne konas LIN. Sed mi neniam vidis negron, kiu NE mensogas. Feko. Nun foje rakontu al mi, kiel Bob Tanner faris tion, Huck.“

„Nu. Li levis sian manon kaj metis ĝin en putran arbotrunkon, kie enestis pluvakvo.“

„Ĉu dum la hela tago?“

„Kompreneble.“

„Kun sia vizaĝo al arbotrunko, ĉu?“

„Jes, almenaŭ mi supozas tion.“

„Ĉu li diris ion?“

„Mi supozas, ke ne. Mi ne scias tion.“

„Aha! Diri, ke oni provas forigi verukojn per trunkakvo tiel, estas tute damnita idiota maniero. Kiel tio havu kontentigan rezulton? Vi devas iri tute sola en la mezon de arbaro, kie vi konas arbotrunkon kun pluvakvo, se estas noktomeze, vi devas iri kun la dorso antaŭen al la arbotrunko, enmeti vian manon kaj diri:

Hordeograjn', hordeograjn', indiĝenmanĝet',
trunkakvo, trunkakvo, glutu la verukon laŭ pet'!

Kaj tiam rapide retiriĝu, dek du paŝojn kun fermitaj okuloj, poste turniĝu trifoje plencirke ĉirkaŭ vi mem, iru hejmen kaj kun neniuj parolu pri tio. Ĉar tiukaze, se vi parolus, la sorĉo estus fuŝita.“

„Vi pravas, tio sonas kiel ĝusta vojo. Sed tiel Bob Tanner ne faris tion.“

„No, Siro, vi povas veti pri tio, ĉar li estas la knabo kun la plej multaj verukoj en la tuta urbo; kaj li havas ja eĉ ne unu verukon, se li scius, kiel tio funkcias kun la akvo en trunko. Mi forigis tiel milojn da verukoj de miaj manoj, Huck. Mi ludas tiom ofte kun ranoj, ke mi havas ĉiam konsiderindan kvanton da verukoj. Kelkfoje mi forigas ilin ankaŭ per fazeolo.“

„Jes, fazeoloj estas bonaj. Tion ankaŭ mi jam faris tiel.“

„Ĉu vere? Kiel vi faras?“

„Mi prenas fazeolon, tratanças ĝin kaj tranças en la verukon, ĝis kiam elvenos iom da sango, poste mi metas la sanĝon sur la pecon de la fazeolo, kaj tiun mi enfosas en tenebro sub luno en truo sur vojdisvojiĝo, kaj la alian pecon mi forbruligas. Jen la peco kun sango komencas tiri kaj tiri, ĝi volas havi la alian pecon, kaj tio helpas al la sango fortiri la verukon, kaj poste ĝi baldaŭ deĝas.“

„Jes ja, Huck, tute precize. Tamen, se vi enfosas ĝin kaj diras:

'Fazeol' malsupren, veruk' estu for,
min ne plu ĝenu, je kiu ajn hor'.'

Tiukaze ĝi estas ankoraŭ pli bona. Tiel faris tion Joe Harper, kaj li jam iam estis preskaŭ en Coonville kaj preskaŭ ĉie. Sed diru foje, kiel oni kuracas ilin per mortaj katoj?“

„Nu, oni kaptas katon kaj iras kun ĝi sur tombejon ĉirkaŭ noktomezo, se iu, kiu estis fisorĉita, estas entombigita, kaj se estas noktomeze venos diablo, aŭ eĉ du aŭ tri, sed oni ne povas vidi ilin, oni nur povas aŭdi ion kiel venton aŭ ion similan, aŭ eble povas

aŭskulti ilin, kiel ili interparolas. Kaj se ili forportas la ulon de tie, oni levas sian katon al ili kaj diras: Diablo, sekvu la kadavron, kato sekvu la diablon, verukoj sekvu la katon, kaj tiel forlasu min. Tio forigas ĉiun verukon.“

„Tio sonas konvinka. Ĉu vi jam foje provis tion, Huck?“

„Tute ne, sed la maljuna patrino Hopkins rakontis tion al mi.“

„Nu, en tiu okazo, mi supozas, ke ĝi estas ĝusta. Ĉar la homoj ja diras, ke ŝi estas sorĉistino.“

„Oni diras, ĉu? He, Tom, mi SCIAS, ke ŝi estas sorĉistino. Ŝi ensorĉis paĉjon. Paĉjo mem diris tion. Li foje preteriris ŝin kaj vidis, ke ŝi volas ensorĉi lin, sekve li prenis ŝtonon, kaj se ŝi ne estus kliniĝinta, li estus trafinta ŝin. Kaj ĝuste je tiu vespero li ruliĝis malsupren de ŝedo, kie li volis fordormi sian ebrion, kaj rompis brakon.“

„Ho, tio estas ja terura. Kaj kiel li rimarkis, ke ŝi

ensorĉas lin?“

„Lordo mia, paĉjo povas, facile. Paĉjo diras, ke tiukaze, se ili longe kaj fikse rigardas vin, ili vin ensorĉas. Speciale en tiu okazo, se ili dum tio ion grumble murmuris. Ĉar, se ili grumblas, ili diras la „Patronia-n“ de malantaŭe antaŭen.“

„Diru foje, Huck-ĉjo, kiam vi volas provi tion kun la kato?“

„Ĉinokte. Mi supozas, ke ili hodiaŭ nokte forportos la ulon Hoss Williams.“

„Sed ili entombis lin jam je sabato, Huck. Ĉu ili ne forportis lin jam sabate?“

„He, kiel vi parolas! Kiel ili sorĉu jam antaŭ noktomezo? – Kaj tiam estos ja dimanĉo. Diabloj ne tiom ofte vagadas je dimanĉo, mi foje supozas.“

„Tion mi ne pripensis, vi pravas. Lasu min kuniri.“

„Kompreneble, se vi ne timas.“

„Timi, ĉu? Tio ne estas verŝajna. Ĉu vi miaŭos?“

„Jes – kaj vi responde miaŭos, se vi povos. Ĉe la lasta fojo mi miaŭis, ĝis kiam la maljuna Hays ĵetis ŝtonojn al mi kaj kriegis 'fibesto'. Kaj tial mi ĵetis brikon tra la fenestro – sed ne diru tion al iu.“

„Ne, kompreneble. Tiam mi ne povis miaŭi, ĉar mia onjo observis min. Sed ĉifoje mi povas. Diru foje, Huck, kio estas tio?“

„Estas nur iksodo.“

„De kie vi havas ĝin?“

„El la arbaro.“

„Kion vi volus havi por ĝi?“

„Mi ne scias. Mi ne volas vendi ĝin.“

„En ordo, cetere, ĝi estas tre malgranda.“

„Ĉiu povas parolmalbonigi iksodon, kiu ne apartenas al li. Mi estas pri ĝi kontenta. Laŭ mi ĝi estas sufiĉe granda.“

„Nu, ekzistas amaso da iksodoj. Mi povus havi mil da ili, se mi emus tion.“

„En ordo, kaj kial vi ne emas? Ĉar vi damne bone scias, ke vi ne povus havigi ĝin. Mi supozas, ke ĝi estas sufiĉe frutempa iksodo. Jen la unua, kiun mi vidis ĉijare.“

„Atentu, Huck, mi donos al vi denton por ĝi.“

„Montru ĝin.“

Tom eligis pecon da papero kaj zorgeme elvolvis la iksodon. Huck taksis ĝin pripenseme. La tento estis tre granda. Laste li diris:

„Ĉu ĝi estas aŭdendika?“

Tom tiris la supran lipon supren kaj montris la dentobreĉon.“

„Bone, en ordo“, diris Huckleberry. „Mi konsentas la komercon.“

Tom metis la iksodon en la prajmskatoleton, kiu laste estis la prizonĉelo de la pinĉskarabo. La knaboj disiĝis, ambaŭ kun la sento esti pli riĉaj ol antaŭe.“

Atinginte la malgrandan izolitan lernejon, Tom enpaŝis rapide kaj tiel, kiel iu, kiu rapidas honeste. Li pendigis sian ĉapelon al vestohoko kaj ĵetiĝis kun negocema entuziasmo sur sian sidlokon. La instruisto, kiu tronis sur sia alta kanseĝo kun brakapogiloj, dormetis en la endormiga murmurado de la lernantaj knaboj. La interrompo rektigis lin:

„Tomaso Sawyer!“

Tom sciis, ke tiukaze, se lia nomo estas dirita komplete, minacas ĉagreno.

„Siro!“

„Venu al mi. Nun, Tomaso Sawyer, kial vi denove venis tro malfrue, kiel kutime?“

Tom ĝuste volis elturniĝi per mensogo, kiam li ekvidis du blondajn pendantajn hararplektaĵojn sur knabina dorso, kiun li rekonis kun la elektriga simpatio de amanto, kaj ĉe tiu figuro estis la *unura vaka sidloko* de knabina flanko en la lernejo. Li diris tuj:

„MI RENKONTIĜIS POR INTERPAROLO KUN HUCKLEBERRY FINN!“

La pulso de la instruisto haltis kaj li gapis senhelpe. La murmurado de la lernantaro ĉesiĝis. La lernantoj demandis sin, ĉu tiu aŭdacega bubo perdis sian prudenton. La instruisto diris:

„Vi diris – kion?“

„Mi haltis por interparoli kun Huckleberry Finn.“

Ne eblis miskompreni la vortojn.

„Tomaso Sawyer, tio estas la plej perpleksiga konfeso, kiun mi iam ajn aŭskultis. Por tiu impertinenteco liniilo ne sufiĉos. Demetu vian jakon.“

La instruista brako agadis tiom longe, ĝis kiam la brako laciĝis kaj la provizo je virgoj malpliigis konsiderinde. Poste sekvis la komando:

„Do, kaj nun sidiĝu al la knabinoj! Kaj komprenu tion kiel averton.“

La subridado, kiu plenigis la ejon, ŝajne embarasigis la knabon, sed efektive la rezulto estis unuavice sekvo de la adorplena timemo, kiun li sentis antaŭ sia nekonata idolo kaj la necerta ĝojo, kiun lia neimageble granda beato nun havigis al li. Li sidiĝis sur finaĵon de la lignobenko, kaj la knabino kun rapida kapmovo transsidigis sin kiel eble plej malproksime de li. Kubutpuŝoj, palpebrumoj kaj frustrado zigzagadis en la lernejo, sed Tom sidis senmove, li sidis kviete kun siaj brakoj sur la longa

malalta skribtablo antaŭ si, kaj ŝajne enprofundiĝinte en la libron.

Iom post iom la atento malproksimiĝis de li kaj la kutima lerneja murmurado leviĝis denove en la nefreŝa aero. Baldaŭ la knabo ĵetis sekretajn rigardojn al la knabino. Ŝi rimarkis tion, tordis la buŝon kaj montris al li dum minuto sian malantaŭan kapoparton. Kiam ŝi zorgeme turnis sian vizaĝon denove al li, kuŝis persiko antaŭ ŝi. Ŝi forpuŝis ĝin. Tom kun softa animo ŝovis ĝin reen. Ŝi forpuŝis ĝin denove, sed ĉifoje malpli malvoleme. Tom pacience reŝovis ĝin al la antaŭa loko. Ĉifoje ŝi lasis ĝin tie. Tom skribaĉis sur sian ardezotabulon: „Bonvolu preni ĝin – mi havas ankoraŭ pli multe da ili.“ La knabino ĵetis rigardon sur ĝin, sed ne reagis. Nun la knabo desegnis ion sur la tabulon, kovrante sian verkon kun la maldekstra mano. Dum certa tempo la knabino ne atentis tion, sed poste en ŝi la homa scivolo komencis efiki kun apenaŭ rimarkeblaj signoj. La knabo desegnis plu, evidente profundiĝinte en sian verkon. La knabino provis vidi ion sen kompromiti sin, sed la knabo ne evidentigis, ke li rimarkis tion. Fine ŝi rezignis pri rezisto kaj flustris heziteme:

„Nu, foje montru ĝin.“

Tom parte senkovrigis neestetikan karikaturon pri domo kun du gabloj je la finaĵoj kaj fumkolono, kiu leviĝis kiel korktirilo el kamentubo.

Jen la knabino de la verko fariĝis tiom fascinita, ke ŝi forgesis ĉion alian. Kiam ĝi estis pretigita, ŝi rigardis dum momento sur ĝin kaj diris mallaŭte:

„Tio estas bela – desegnu viron.“

La artisto starigis en la antaŭĝardeno grandegan viron, kiu aspektis kiel naftoturo. Li kapablus grimpi super la domon. Sed la knabino ne estis tro kritikema. Ŝi estis kontenta pri la monstro kaj flustris:

„Li estas tre bela viro – kaj nun desegnu min preteriranta.“

Tom desegnis sablohorloĝon kun plenluna vizaĝo sur ĝi kaj kun pajlotigaj membroj, kies etenditaj fingroj estis armitaj kun malbonaŭgura ventumilo.

„Tre bele! Mi dezirus, ke ankaŭ mi povus desegni.“

„Tio estas simpla“, flustris Tom, „mi instruos tion al vi.“

„Ĉu efektive? Kiam?“

„Tagmeze. Ĉu vi iros hejmen por manĝi?“

„Mi restados ĉi tie, se vi volas.“

„Bone, tute konsentite. Kiel vi nomiĝas?“

„Becky Thatcher. Kaj vi? Ha, mi scias: Tomaso Sawyer.“

„Tiel oni nomas min nur, se mi ricevos batojn. Mi nomiĝas Tom, se mi estas bonulo. Vi nomos min Tom, ĉu?“

„Jes.“

Nun Tom komencis ion skribaĉi sur la tabulon, kovrante la vortojn kontraŭ la knabino. Sed ĉifoje ŝi ne hezitis. Ŝi petis vidi ĝin. Tom diris:

„Ho, tio estas nenio.“

„Io ĝi estas.“

„Ne, estas nenio, tio vin certe ne interesos.“

„Tamen, kaj nun eĉ pli. Bonvolu, lasu min vidi ĝin.“

„Vi rakontos tion al aliaj.“

Ne, tion mi ne faros, mi ĵuras.“

„Vi diros tion efektive al neniuj, ĉu? Ne dum via tuta vivo, ĉu?“

„Ne, mi diros tion al neniuj. Nun montru ĝin al mi.“

„Ho, tio ja tute ne interesas VIN.“

„Ĉar vi traktas min tiel, mi nepre volas vidi ĝin.“ Kaj ŝi metis malgrandan manon sur lian kovran, sekvis bataleto inter ili. Tom kondukis tiel, kvazaŭ li serioze pretendus defendi sin, sed li lasis iom post iom forŝovi sian kovromanon ĝis kiam aperis la vortoj: „MI AMAS VIN.“

„Ho, aĉa kanajlo!“ Ŝi batis emfaze sur lian kovromanon, sed ruĝiĝis kaj tamen aspektis ĝojigite.

Ĝuste en tiu konekta momento la knabo sentis konstantan fatalan pinĉadon je orelo, kaj daŭran neeviteblan moviĝon supren. Tiel li estis tirata de la instruisto antaŭen – akompanate de fi-ridado fare de ĉiuj lernantoj – al sia propra sidloko, kie la instruisto deŝarĝis lin. Poste la instruisto dum kelkaj teruraj momentoj alte kliniĝis super li antaŭ ol li lastfine formoviĝis senvorte al sia trono. Sed kvankam la orelo de Tom doloris, lia koro estis plena de jubilo.

Kiam revenis kvieto al la lernejo, Tom honeste provis lerni, sed la tumulto en li estis tro granda. Kiam li estis en la vico por laŭtlegi ion, li denove kaj denove mislegis, kaj en la instruhoro pri geografio li faris el lagoj montojn, el montoj riverojn kaj el riveroj

kontinentojn, ĝis ĉielo, akvo kaj tero reestigis la kaoson. Ĉe la literumado li devis rezigni pri sia supra rango en la listo pro tute simplaj vortoj, ĝis kiam li fariĝis la lasta en ĝi kaj perdis la stanmedalon, kiun li portis fanfarone dum monatoj.

Ĉapitro 07

Ju pli Tom provis koncentriĝi al sia libro des pli vagadis liaj pensoj. Fine li kun suspiro kaj ĝemado rezignis pri tio. Ŝajnis al li, ke la tagmeza paŭzo tute ne venos. La aero estis tute sen freŝo. Neniu bloveto moviĝis. Ĝi estis la plej dormema tago el ĉiuj dormemaj. La monotona murmurado de la dudek kvin lernantoj endormigis la animojn kiel abela zumado. Malproksime la monto Cardiff etendis siajn delikate verdajn deklivojn supren al la flamantaj sunradioj, kovrate de arda varmegovualo, kiu brilis kiel glimo tra la purpura foro. Aro da birdoj ŝvebis pigre alte supre en la ĉielo. Neniu alia vivestaĵo estis videbla krom kelkaj bovinoj, kaj tiuj dormis.

La koro de Tom avidis liberon aŭ havi ion interesan por pasigi la tristan tempon. Nun unu el liaj manoj migris en poŝon kaj lia vizaĝo eklumis pro dankemo

kiel en preĝo, eĉ, se li ne sciis tion. Poste kaŝeme aperis la prajmskatoleto. Li liberigis la iksodon el ties prizono kaj metis ĝin sur la vastan glatan skribtablon. La besteto verŝajne same ekardis pro dankemo, kiu similis al preĝo, sed tio estis tro frue, ĉar tiumomente, kiam ĝi startis dankplene por formarŝi, Tom puŝis ĝin flanken per pinglo kaj devigis ĝin iri en nova direkto.

Apud Tom sidis lia koramiko, kiu suferis tiel, kiel Tom, sed nun li observis kun profunda dankemo kaj intereso la prezentadon. Tiu koramiko estis Joe Harper. La du knaboj estis ĵuramikoj dum la tuta semajno kaj nur sabate konfliktaĵaj batakontraŭuloj. Joe tiris pinglon el sia jakreverso kaj komencis partopreni je la fizika ekzercigo de la kaptita besto. Evidente la intereso pri la sporto pliiĝis. Tom diris baldaŭ, ke ili malhelpas sin reciproke kaj, ke tiel neniu povus tiri la plej grandan ĝuon el la iksodo. Tial li metis la ardezotabulon de Joe sur la skribtablon kaj desegnis tra ties mezo linion.

„Do, tiom longe, kiom ĝi estos sur via flanko, vi povos ĝeni ĝin, kaj mi lasos vin en paco. Sed, kiam ĝi fuĝos de vi kaj venos sur mian flankon, vi devos lasi ĝin dum tiom da tempo neĝenata, ĝis kiam mi ne plu malhelpos, ke ĝi transiru al vi.“

En ordo, ek do! Vi komenciĝas.“

La iksodo baldaŭ eskapis de Tom kaj transiris la ekvatoron. Joe mistifikis ĝin dum certa tempo, sed poste ĝi liberiĝis kaj reiris al la transflanko. Tiu tien-kaj-tien-irado okazis ofte. Dum unu el la knaboj turmentis ĝin kun granda intereso, la alia, ne malpli fascinite, observis tion. Ambaŭ kapoj kliniĝis super la tabulo kaj ambaŭ animoj ne plu ekzistis por kio ajn alia. Fine ŝajne la bonŝanco por ĉiam emis setli ĉe Joe. La iksodo provis ĉiujn eblajn vojojn kaj fariĝis tiom ekscitita kaj streĉita kiel la knaboj mem, sed ĉiam denove, se la venko kvazaŭ preskaŭ estis mankaptebla kaj la fingroj de Tom jam komencis etendiĝi, la pinglo de Joe direktigis la iksodon en alia direkto, kaj retenis ĝin en lia posedo. Iam Tom ne plu eltenis tion. La tento estis tro granda. Tial li etendis sian manon kaj subtenis ĝin per pinglo. Joe fariĝis tuj kolera kaj kriis:

„Tom, lasu ĝin en paco.“

„Mi nur volas rapidigi ĝin iomete, Joe.“

„Ne, Siro, tio ne estas honesta.“

„Damne, mi ja apenaŭ tuŝas ĝin.“

„Lasu ĝin en paco, mi diras al vi.“

„Mi ne volas.“

„Vi devas – ĝi estas sur mia flanko.“

„Aŭskultu foje, Joe Harper, kiu posedas tiun ĉi iksodon?

„Tio min ne interesas, kiu estas la posedanto – ĝi estas sur mia flanko de la linio, kaj tial vi ne rajtas tuŝi ĝin.“

„En ordo, mi tamen vetus, ke mi faros tion. Ĝi estas mia iksodo, fulmotondro, kaj mi laŭplaĉe faros kun ĝi tion, kion mi volas, aŭ mi mortu!“

Giganta bato kiel fulmo trafis ŝultron de Tom, kaj

dua ŝultron de Joe. Dum du minutoj la polvo flugadis sen interrompo de la du knabojakoj, plezurigante la lernantojn. Ambaŭ knaboj estis tro okupitaj por rimarki la kvieton, kiu dum certa tempo kaŝe disvastiĝis en la lernejo, dum la instruisto alŝteliĝis kvazaŭ sur piedfingroj kaj kliniĝis super ilin. Li observis grandan parton de la prezento, antaŭ ol li kontribuis ĝin per iom da variaĵo.

Kiam la lernejo tagmeze finiĝis, Tom fuĝis al Becky Thatcher kaj flustris al ŝi orelen:

„Surmetu vian ĉapelon kaj konduku tiel, kvazaŭ vi irus hejmen, kaj kiam vi estos preter la angulo, forŝteliĝu kaj revenu tra la alia strateto. Mi foriros sur la alia vojo kaj deskuos ilin sammaniere. Tial unu el ili iris kun unu el la grupoj kaj la alia kun alia. Post certa tempo ambaŭ renkontiĝis je la komenco de la strateto, kaj kiam ili atingis la lernejon, ili havis ĝin tute por si mem. Ili sidiĝis unu apud la alia, kun ardezotabulo antaŭ si kaj Tom donis al Becky la krajonon kaj tenis ŝian desegnomanon per propra mano kaj desegnis plian mirigan domon. Kiam la intereso pri arto komencis malpliigi, ambaŭ ekkonversaciis. Tom kvazaŭ naĝis en beateco. Li diris:

„Ĉu vi ŝatas ratojn?“

„Ne! Mi malŝategas ilin!“

„En ordo, ankaŭ mi – sed nur VIVANTAĴN. Mi celas la mortajn, kiujn oni povas cirkligi per ŝnuro ĉirkaŭ sia kapo.“

„Ne, mi ne tre interesiĝas pri ratoj, sciu. Kion ŝatas mi, tio estas maĉgumo.“

„Ho, tion povus diri ankaŭ mi! Mi dezirus nun havi iun.“

„Ĉu vere? Mi havas maĉgumon. Mi lasos vin maĉi ĝin dum certa tempo, sed poste vi devos redoni ĝin al mi.“

Tio estis konsentebla, tial ili maĉis ĝin dum certe tempo reciproke kaj svingis ekstreme kontente enaeren siajn tibiojn sur la sidbenko.

„Ĉu vi jam iam estis en cirko?“ demandis Tom.

„Jes, kaj mia paĉjco ankoraŭfoje volas kunpreni min al tie, se mi estos bonulino.“

„Mi estis jam en cirko tri- aŭ kvarfoje – tute ofte. Preĝejo estas feko kontraŭ cirko. En la cirko ĉiam io okazas. Mi fariĝos iam cirkoklaŭno, kiam mi estos plenkreskulo.“

„Ho, ĉu vere? Tio estos plezuro. Ili estas tiel dolĉaj kun siaj punktoj sur la tuta korpo.“

„Jes, vi pravas. Kaj ili enspezas plenajn sitelojn da mono – preskaŭ dolaron ĉiutage, diras Ben Rogers. Diru, Becky, ĉu vi jam gefianĉiĝis?“

„Kio estas tio?“

„Nu, gefianĉiĝi por geedziĝi.“

„Ne.“

„Ĉu vi ŝatus?“

„Mi supozas, ke jes. Mi ne scias. Kiel tio estas?“

„Kiel? Tio tute ne estas iel. Vi simple diras al knabo, ke vi volas havi neniun alian krom li, ĉiam, ĉiam, ĉiam, kaj poste vi kisos lin kaj tio estos ĉio. Tion povas fari ĉiu.“

„Kisi? Por kio kisi reciproke?“

„Nu, tio estas, sciu, estas por, nu, ĉar oni simple faras tion.“

„Ĉiuj, ĉu?“

„Jes, ĉiuj, kiuj enamiĝis. Ĉu vi memoras, kion mi skribis sur la tabulon?“

„J...jes.“

„Kion vi skribis?“

„Mi ne diras.“

„Ĉu diru MI tion?“

„J...jes, sed alian fojon.“

„Ne, nun.“

„Ne, ne nun, mo-morgaŭ.“

„Ho ne, NUN. Bonvolu, Becky, mi flustros, mi flustros la direndan tute mallaŭte.“

Becky hezitis. Tom rigardis la silenton kiel konsenton, metis brakon ĉirkaŭ ŝian talion kaj flustris al ŝi la direndan tute mallaŭte proksime orelen.

Poste li diris:

„Nun flustru vi tion al mi, tute la saman.“

Dum certa tempo ŝi rezistis al li kaj tiam diris:

„Turnu vian vizaĝon flanken, por ke vi ne vidu min, kaj tiam mi faros. Sed vi ne rajtas diri tion al iu alia. Ĉu vi PROMESOS tion, Tom? Vi ne diros tion al alia, ĈU?“

„Kompreneble ne. Tute ne. Do, Becky?“

Li tenis sian vizaĝon flanken. Ŝi kliniĝis timeme al li, ĝis kiam ŝia spiro movis liajn buklojn, kaj ŝi flustris: „Mi –amas – vin!“

Poste ŝi forsaltis kaj kuradis ĉirkaŭ la tablojn kaj benkojn kaj Tom ĉiam postkuris ŝin. Fine ŝi fuĝis al angulo kaj tenis sian blankan antaŭtuketon antaŭ la vizaĝo. Tom ĉirkaŭbrakis ŝian nukon kaj petegis:

„Nun ĉio estas farita – ĉio krom la kiso. Ne timu, tio estas fakte nenio. Bonvolu, Becky.“ Kaj li tiradis ŝian antaŭtuketon kaj ŝiajn manojn.

Iom post iom ŝi rezignis pri rezisto kaj mallevis la manojn; ŝia vizaĝo, de la luktado tute ruĝa, aperis kaj ŝi cedis. Tom kisis ŝiajn ruĝajn lipojn kaj diris: „Nun ĉio estas farita, Becky. Kaj de nun, sciu, vi ne rajtas ami iun alian krom mi, kaj vi ne rajtas edziĝi al iu alia, neniam, neniam, dum eterneco. Ĉu vi faros tion?“

„Jes. Mi neniam iun alian amos krom vi, kaj mi neniam edziniĝos al iu alia ol al vi. – Kaj ankaŭ vi ne rajtas edziĝi al iu alia krom mi.“

„Certe, kompreneble. Tio estas parto de la afero. Kaj, kiam ni iros al la lernejo aŭ hejmen, vi iros kun mi, se neniu alia vidas tion. Kaj vi elektos min kaj mi vin, ĉe festetoj, ĉar oni kutime faras tion tiel, se oni gefianĉiĝis.“

„Tio estas ja superba. Pri tio mi ankoraŭ neniam aŭdis ion.“

„Ha, estas ĉiam tiel gaje. Kiam mi kaj Amy Lawrence...“

La grandaj okuloj montris al Tom lian miskonduton, konfuzite li ĉesis paroli.

„Ve, Tom, tiukaze mi do ne estas la unua knabino, kun kiu vi gefianĉiĝis!“

La infano komencis plori. Tom diris: „He, ne ploru, Becky, mi ja tute ne plu interesiĝas pri ŝi.“

„Vi tamen faras tion – vi scias, ke vi faras, Tom.“

Tom provis brakumi ŝin, sed ŝi forpuŝis lin kaj turnis la vizaĝon al la muro kaj ploris plu. Tom provis denove kaj per seninterrompaj kvietigaj vortoj, sed ŝi forpuŝis lin denove. Jen leviĝis lia fiero kaj li trotis eksteren. Li staradis dum iom da tempo maltrankvile kaj senkomforte. Dum certa tempo, foje foje rigardante al la pordo, li esperis, ke ŝi pentos kaj elvenos por serĉi lin. Sed ŝi ne faris tion. Jen li komencis senti sin aĉa kaj timis, ke li agis malĝuste. Li devis dure lukti kun si por ankoraŭfoje proksimiĝi al ŝi. Fine li superis sian fieron kaj denove enpaŝis. Ŝi staris ankoraŭ malantaŭe en la angulo, plorsingultis, kun la vizaĝo turnita al la muro.

La koro de Tom frapis. Li iris al ŝi kaj haltis dum momento, ne precize sciante kiel agi plu. Poste li diris heziteme:

„Becky, mi interesiĝas pri neniuj krom vi.“

Neniuj respondo, nur plorsingulto.

„Becky“, li petegis: „Becky, ĉu vi diros ion?“

Pli da plorsingultado.

Tom elprenis sian plej valoran trezoron, latunan tenilon de kamena fajrohundo, tiun li montris de malantaŭe antaŭ ŝia vizaĝo, tiel, ke ŝi povis vidi ĝin, kaj li diris:

„Bonvolu, Becky, ĉu vi volas havi ĝin?“

Ŝi batis la tenilon planken. Jen Tom iris el la domo trans la montetojn malproksimen por ne plu reveni je tiu tago al la lernejo. Baldaŭ Becky ekhavis suspekton. Ŝi kuris al la pordo, sed li ne videblis, ŝi

kuris ĉirkaŭ la domon al la ludejo; sed li ne estis tie.
Tiam ŝi vokis:

„Tom! Revenu, Tom!“

Ŝi aŭskultis streĉe, sed ne estis respondo. Ŝia ununura akompano estis kvieto kaj soleco. Tial ŝi sidiĝis denove por plori kaj riproĉis sin mem. Sed jen la lernantoj denove kunvenis, kaj ŝi devis nun kaŝi sian doloron kaj trankviligi sian rompitan koron kaj surmeti denove la krucon de turmentoplena longa posttagmezo, kaj neniu troviĝis inter la fremduloj, kiu povus partopreni ŝian malĝojon.

Ĉapitro 08

Tom vagis eviteme tien kaj tien tra stratetojn, ĝis kiam li ne plu povis renkonti revenantajn lernantojn kaj poste li ektrotis mishumore plu. Li transiris du-aŭ trifoje malgrandan rojon, pro la junula superstiĉo, ke la krucado de fluanta akvo eble konfuzigos persekutantojn. Duonon de horo poste li malaperis malantaŭ la mastra domo de vidvino Douglas supre sur la monteto Cardiff kaj la lerneja konstruaĵo

apenaŭ plu videblis en la malproksimo de la valo malantaŭ li. Li paŝis en densan arbaron kaj sen iu pado trabaraktiĝis ĝis ties mezo, kie li sidiĝis sur muska maldensejo sub vaste branĉa kverko. Tie moviĝis eĉ ne zefiro. La sufokiga posttagmeza varmego eĉ silentigis la kantadon de la birdoj. La naturo troviĝis kvazaŭ en tranco, ne interrompata de sono, krom ĉeokaza frapado de pego, kiu ŝajne eĉ emfazis la trudiĝeman silenton kaj la senton de soleco. La animo de la knabo estis plenigita per sentimentaleco. Liaj perceptoj tute akordis kun la ĉirkaŭo. Dum longa tempo li sidis tie kun la kubutoj sur la genuoj kaj la mentono apogita sur la manoj kaj meditis. Ŝajnis al li, ke la vivo estas nenio alia krom plago, en la plej bona okazo, kaj li enviis tiun Jimmy Hodges, kiu antaŭ mallonga tempo estis liberigita de la vivo. Devas esti tre pace, li pensis, por ĉiam kuŝi kaj dormi kaj revii eterne, kiam la vento flustras en la arboj kaj delikate karesas la herbojn kaj la florojn sur la tombo, kaj oni ne devas plu ĉagreniĝi kaj afliktiĝi pri io ajn. Se li havus nur bonajn rezultojn en la dimanĉa lernejo, li eble estus preta iri en la transmondon kaj ĉion lasi post si. Sed tio, kio koncernis la knabinon, kion li deliktis? Nenion. Li celis la plej bonan en la mondo kaj estis traktata kiel hundo – kiel efektiva hundo. Iutage ŝi pentus tion – eble, kiam estus tro malfrue. Ve, se li povus morti foje **DUM LIMIGITA TEMPO!**

Sed la elasta koro de la junularo ne permesas dum longa tempo esti kaptita en ĉagreno kaj aflikteco. Baldaŭ Tom, sen rimarki tion, reglitis en la bezonojn de ĉi-tiea vivo. Kio estus, se li nun turnus al ĉiuj sian dorson kaj malaperus mistere? Kio estus, se li forirus en la vastan mondon, en nekonatajn landojn transe de la maroj kaj neniam plu revenus? Kiel ŝi sentus sin en tiu okazo? La ideo fariĝi klaŭno revenis nun al li, sed nur por plenigi lin per naŭzo. Ĉar supraĵa gajeco kaj ŝercoj, kaj vestaj punktoj estis ofendo por spirito, kiu diboĉas en la svaga majesto de romantikaj aventuroj. Ne, li fariĝus soldato kaj revenus post multaj jaroj, lacigita de militoj kaj kiel famulo. Ne, ankoraŭ pli bone estus aliĝi al la indiĝenoj kaj ĉasi bizonojn, iri sur militpadoj en la montaraj intervaloj kaj la grandaj ebenaĵoj de la fora sovaĝa okcidento, poste reveni en la estonteco kiel granda tribestro kun giganta hirta plumriĉa ornamaĵo kaj terure militkolorita en la dimanĉan lernejon, dum dormetiga somera mateno, kun sangon ŝokiga milithurlado, brogante la okulojn de siaj kamaradoj pro nekontentigebla envio. Sed ne, jen io, kio estus ankoraŭ pli grandioza. Li fariĝus pirato! Jen la definitiva solvo! NUN la estonteco troviĝis tute klare antaŭ liaj okuloj kaj ekradiis en neimagebla pompo. Kiel lia nomo plenigos la mondon kaj ekstremigos la homojn pro respekto. Kiel

sago li traplugos gloriĉe sur sia longa, malalta, nigre ŝela velboato „Spirito de l' Ŝtormoj“ la dancantajn marojn, kun harstiriga flago sur la pruo! Kaj sur la kulmina punkto de sia famo, li subite kaj surprize aperos en la malnova urbo kaj paŝos en la kuirejon, brunhaŭta de la suno kaj veterbatita, en nigre velura kamizolo kaj kuloto, kun altaj botoj, malhele ruĝa skarpo, zono ekipita per grandegaj pistoloj, kun sangokovrita ataktranĉilo je la flanko kaj kun mola ĉapelo kun flirtantaj plumoj kaj lia malruligita nigra flago kun la kranio de mortinto kaj la krucitaj ostoj, kaj lia brusto ŝvelos, se li aŭdos la flustradon: „Tio estas Tom Sawyer, la pirato! – La nigra venĝinto de la hispana militŝiparo!“

Tiel ĉio estis decidita, lia speco de kariero estis difinita. Li forkuros de hejme kaj dediĉos al sia kariero. Jam je la sekva mateno ĉi tio komenciĝos. Tial li devis komenci la antaŭpreparojn kaj kungratisian posedon. Li iris al proksima falinta arbotrunko kaj komencis fosi sub unu el ĝiaj finaĵoj per sia Barlow-tranĉilo. Baldaŭ li puŝis kontraŭ vake sonantan pecon da ligno. Li etendis manon al ĝi kaj parolis insistan ĵurformulon:

„Kio ĉi tie ne estis, tio aperu! Kio estas ĉi tie, tio restu!“

Poste li deskrapis la koton kaj ekvideblis ligna ŝindo. Li levis ĝin kaj ekmontriĝis belaspekta malgranda trezorkesteto, kies planko kaj flankoj same konsistis el ŝindoj. En ĝi kuŝis vitroglobeto. La mirego de Tom ne havis limojn! Poste li gratis perpleksigite sian kapon kaj diris: „Tio superas ĉion je strangeco!“

Poste li forĵetis fihumure la vitroglobeton, kaj starante cerbumis dum certa tempo. La vero estis, ke ne funkciis lia superstiĉo, kiun li kaj liaj kamaradoj ĉiam rigardis kiel absolute sekuran aferon. Se oni enfosis certan vitroglobeton kun la necesa sorĉformulo kaj poste lasis ĝin dum du semajnoj sentuŝita kaj elfosis ĝin kun la ĵus uzita sorĉformulo, tiukaze ĉiufoje intertempe kolektiĝis ĉiu vitroglobeto, kiun oni perdis iam ajn, egale, kiom granddistance ĝi malproksimis. Sed la tuto ĉifoje efektive kaj nepridubeble misfunkciis. La tuta konstruaĵo de superstiĉa fido de Tom en tiu momento detruigis ĝis la fundamentoj. Multajn fojojn antaŭe li aŭdis, ke la afero funkciis bonorde, sed neniam, ke ĝi iam missukcesis. Li forgesis en tiu momento, ke li kelkfoje mem jam provis tion, sed poste ne plu trovis la kaŝejojn. Kelkfoje li ankoraŭ cerbumis pri la sorĉo kaj fine konkludis, ke iu sorĉistino enmiksiĝis la aferon kaj fuŝis la sorĉon. Li volis havi kontentigan

pruvon pri tio, kaj tial li serĉis tiom longe, ĝis kiam li trovis malgrandan sablomakulon, kiu havis tunelforman truon. Li surgenuiĝis, metis sian buŝon al la truo kaj diris laŭte:

„Mirmeleono, mirmeleono, diru tion, kion devas scii mi, mirmeleono, mirmeleono, diru tion, kion devas scii mi!“

La sablo moviĝis, kaj dum sekundo aperis malgranda nigra skarabo, kiu tuj foriĝis timeme.

„Ĝi ne kuraĝas diri ion! Sekve estis fisorĉistino, kiu faris tion, kion mi jam supozis.“

Li sciis tre bone, ke estas vane defii sorĉistinojn, tial li cedis senkuraĝigite. Sed venis en lian kapon, ke li almenaŭ serĉu la vitroglobeton, kiun li ĵus forĵetis, kaj tial li ekiris kaj pacience serĉis ĝin. Sed li ne povis trovi la globeton. Tial li reiris al sia trezorkesteto kaj zorgeme starigis sin tie, kie li staris antaŭe, kiam li estis forĵetinta la vitroglobeton. Poste li prenis alian vitroglobeton el poŝo kaj forĵetis ĝin sammaniere, dirante:

„Frato, ekiru, trovu vian fraton!“

Li observis, kie ĝi haltas kaj iris tien kaj rigardis. Sed la alia globeto aŭ falis en tro malgranda aŭ tro granda distanco. Tial li provis tion je dua fojo, kaj laste li sukcesis. Ambaŭ vitroglobetoj kuŝis nur en futlonga distanco.

En tiu momento eksonis mallaŭte la bloveto de stana infantrumpeto tra la verdaj koridoroj de la arbaro. Tom rapide liberigis sin de sia jako kaj pantalono kaj faris el pantalona tenilo zonon, rastis la vepron malantaŭ la putra arbotrunko, malkovris krudan arkon kaj sagon, latan glavon kaj stanan trumpeton kaj apenaŭ li estis levinta la aĵojn, li jam forsaltis, nude piede, kun flirtanta ĉemizo. Baldaŭ li haltis sub granda ulmo, blovis respondan sonon sur la trumpeto, kaj poste li ŝteliris antaŭen kaj ĉirkaŭrigardis memgarde. Li diris atente al imagata akompanaro:

„Haltu, gajaj viroj miaj, tenu vin kaŝitaj, ĝis kiam mi donos la signalon.“

Tiumomente aperis Joe Harper same facile vestite

kaj amplekse armite kiel Tom. Tom vokis: „Haltu, kiu venas ĉi tie en la Sherwood-arbaron sen mia permeso?“

„Guy de Gisborne ne bezonas la permeson de iu viro. Kiu vi estas, ke vi, ke...“

„...vi eĉ nun kuraĝas paroli tiel al mi?“ diris Tom tuj – ĉar ili parolis 'laŭ la libro', laŭ memoro.

„Kiu vi estas, ke vi kuraĝas paroli tiel al mi?“

„Mi estas efektive Robin Hood, kiel via senlavita kadavro baldaŭ ekscios.“

„Tiukaze vi do estas la fama eksterleĝulo. Kun granda plezuro mi volas disputi kun vi pri la vojojrajto de tiu bela arbaro. Estu atentema!“

Ili prenis siajn latajn glavojn, ĵetis siajn aliajn aĵojn surteren, starigis sin en la maniero de skermistoj, piedo ĉe piedo kaj komencis seriozan, atenteman batalon, „du supre, du malsupre“, laŭ ĉiuj reguloj de la skerma arto. Baldaŭ diris Tom:

„Nu, se vi ekdormemas, provu esti iom pli vigla!“

Tiel ili 'provis ĝin kiel eble plej vigle', ili forte elspiradis kaj ŝvitis. Ripete Tom vokis:

„Falu, falu! Kial vi ne falas?“

„Kial? Falu mem! Vi ricevis la plej aĉajn vundojn.“

„Tij grataĵetoj estas nenio. Mi ne povas fali, ĉar tio ne estas skribita en la libro. En la libro legeblas: 'Poste li mortigis per unu mandorsa bato la kompatindan Guy de Gisborne.' Vi devas turniĝi, por ke mi povu trafi vin en la dorson.“

Ne eblis ĉirkaŭiri la aŭtoritatojn, tial Joe turniĝis, ricevis sian baton kaj mortis.

„Nun“, Joe diris leviĝante, nun devas vi permesi, ke mi mortigos vin, tio estas honesta.“

„He, mi ne povas fari tion, tio ne legeblas en la libro.“

„Nu, tio estas damne malica – jen ĉio.“

„Bone do, Joe, vi povos esti frato Tuck aŭ Much, la filo de la muelisto, kaj traktadi min per bastono aŭ mi estos dum certa tempo la ŝerifo de Nottingham kaj vi estos Robin Hood dum certa tempo kaj mortigos min.“

Tio estis kontentiga. Kaj tiel ili enscenigis tiujn aventurojn. Poste Tom denove estis Robin Hood, kaj la insida monaĥino, anstataŭ helpi al li, pro ties vundo, ne malhelpis, ke lia sango malfortige elfluis, ĝis kiam li estis morta. Kaj laste Joe, kiu prezentis tutan bandon da plorantaj eksterleĝuloj, fortrenis lin malĝoje, metis la arkon en ties malfortajn manojn kaj Tom diris: „Kie tiu ĉi sago falos teren, tie sub la verda arbora arbo, vi entombigu la kompatindan Robin Hood.“

Poste li pafis la sagon kaj sternis sin malantaŭen kaj estus mortinta, sed li falis sur urtikon kaj kiel kadavro li saltis tro vigle supren.

La knaboj surmetis siajn vestojn, kaŝis siajn rekvizitojn kaj foriris en la doloriga konscio, ke ne plu ekzistas eksterleĝuloj. Kion povas oferti la moderna civilizacio kiel rekompenco por ilia perdo? Ili interkonsentiĝis, ke ili prefere dum unu jaro volus vivi kiel eksterleĝuloj en la arbaro de Sherwood anstataŭ esti dum tuta vivo la prezidento de Usono.

Ĉapitro 09

Je la oka kaj tridek vespere Tom kaj Sid estis senditaj en la liton, kiel ĉiam. Ili diris siajn preĝvortojn, kaj baldaŭ Sid endormiĝis. Tom kuŝis maldormeme kaj atendis plena de senpacienco. Kiam ŝajnis al li, ke la taglumo baldaŭ komenciĝos, li aŭskultis, kiel la horloĝo sonoris la dudekduan! Tio estis desperiga. Li volonte baraktiĝus tien kaj tien enlite, kiel postulis tion lia nervoza streĉiteco, sed li timis, ke Sid vekigiĝos per tio. Tial li kuŝis senmove kaj gapis en la tenebron. Estis malagrabla kviete. Iom post iom en la kvieto ekaŭdeblis apenaŭ aŭskulteblaj sonoj. La tiktako de la murhorloĝo komencis atentigi pri si. La malnova trabaro komencis kraketi mistere. La ŝtupoj knaris mallaŭte. Evidente fantomoj estis survoje.

Regula obtuza ronkado penetris el la ĉambro de onklino Polly. Kaj nun ekaŭdeblis la monotona ĉirpado de grilo, kiun neniu homa estaĵo povus lokigi. Poste la terura frapado de lignovermo en la muro malantaŭ Tom timtremigis lin – tio signifis, ke ies lastaj tagoj surtere estas venintaj. Tiam leviĝis la fora hurlado de hundo en la nokta aero, kiu trovis respondon de ankoraŭ pli mallaŭta hurlado el eĉ pli granda distanco. Tom suferis mortotimon. Laste li estis kontenta, ke la tempo ĉesis ekzisti, kaj ke komenciĝis la eterneco. Kontraŭ sia volo li endormiĝis. La murhorloĝo sonoris la dudektrian, sed li ne aŭdis tion. Kaj poste miksiĝis en liajn parte formitajn sonĝojn, tute melankolia katmiaŭado. La suprensaltado de fenestro en la najbara domo ĝenis lian dormeton. Krio – „Damnita katdiablo!“ kaj la knalo de malplena botelo post la kunpuŝiĝo kun la malantaŭa flanko de la ligna ŝedo de Polly vekis lin tute. Nur minuton poste li estis tute vestita, iris eksteren tra la fenestro, rampis per kubutoj kaj genuoj trans la apudan alkonstruaĵan tegmenton. Dum tio li unu- aŭ dufoje mallaŭte miaŭis. Poste li saltis sur la tegmenton de la ŝedo kaj de tie surteren. Huckleberry Finn jam atendis tie kun sia morta kato. La knaboj moviĝis malproksimen kaj malaperis en la tenebro. Post duono de horo ili kvazaŭ vadis tra la altaj herboj de la tombejo.

Estis tombejo laŭ la malnova speco de la okcidento. Ĝi troviĝis sur monteto en proksimuma distanco, unu kaj duonon da mejloj malproksime de la urbeto. La tombejo estis ĉirkaŭata de freneze aspektanta latbarilo, kiu je certaj lokoj etendiĝis oblikve internen, kaj je aliaj lokoj eksteren, sed sur neniu loko ĝi staris vertikale. La tuta tombejo estis prikreskata per herboj kaj fiherboj. Ĉiuj malnovaj tomboj sinkis en la teron. Estis videbla eĉ ne unu tombŝtono, nur ronde tegmentitaj vermboritaj lignokrucoj kvazaŭ ŝanceliĝis super la tomboj kaj vane provis trovi ie apogon. „Konsekrite je la memoro de tiu aŭ tiu...“ oni pentris iam sur ilin, sed tio plu ne estis legebla sur la plej multaj el ili, eĉ dum taglumo.

Zefiro ĝemis en la arboj kaj Tom timis, ke tio povus esti la spiritoj de la mortintoj, kiuj plendis pri la ĝenoj. La knaboj parolis malofte, kaj nur kun retenita spirado, ĉar la tempo, loko kaj morna soleno ŝargis iliajn animojn. Ili trovis la freŝe surŝutitan termonteton, kiun ili serĉis kaj kaŝiĝis kelkajn paŝojn for de la tombo en la protekto de tri grandaj ulmoj, kiuj kreskis tie dense kunstarante.

Poste ili atendis, kiel ŝajnis dum tre longa tempo. La fora ululado de strigo estis la solaj sonoj, kiuj

interrompis la absolutan kvieton. La pensoj de Tom pli kaj pli morniĝis. Li devis interparoli kun Huck. Tial li flustris:

„Huckĉjo, ĉu vi pensas, ke la mortintoj konsentas, ke ni troviĝas ĉi tie?“

Huckleberry respondis frustrante:

„Tion mi volonte scius mem, estas danne timige ĉi tie, ĉu?“

„Tute certe.“

Sekvis pli longa silentado, dum la knaboj interne provis digesti la aferon. Poste flustris Tom:

„Huckĉjo – ĉu vi supozas, ke Hoss Williams povas aŭdi, kiel ni interparolas?“

„Kompreneble li povas tion. Almenaŭ lia spirito.“

Tom post paŭzo:

„Se mi nur estus dirinta sinjoro Williams. Sed mi tute ne volis ofendi lin. Ĉiuj vokas lin Hoss.“

„Kadavro povas esti tre tikla pri la afero, kiel oni parolu al mortinto, Tom.“

Tio obtuzigis ilin, la konversacio denove finiĝis.

Subite Tom tuŝis lian kamaradon je brako kaj diris:

„ŜŜ!“

„Kio estas tio, Tom?“ Kun frapantaj koroj ili kroĉiĝis unu al la alia.

„ŜŜ! Jen ĝi denove! Ĉu vi ne aŭdas tion?“

„Mi...“

„Jen, nun vi devas aŭdi tion.“

„Lordo mia, Tom! Ili venas ĉi tien! Ili venas ĉi tien, tute certe. Kion ni faru nun?“

„Mi ne scias. Ĉu ili vidos nin?“

„Ve, Tom, ili povas rigardi en la tenebro, kiel katoj. Mi dezirus, ke mi ne estus veninta ĉi tien.“

„Ho, ne timu. Mi supozas, ke ili ne ĝenos nin. Ni ja ne faras ion malican. Se ni tute silentos, povas esti, ke ili tute ne rimarkos nin.“

„Mi provos, Tom, sed mi tremas je la tuta korpo.“

„Aŭskultu!“

La knaboj kunklinigis siajn kapojn kaj apenaŭ spiris. Murmurado de voĉoj penetris de la alia finaĵo de la tombejo al ili.

„Rigardu tien!“ flustris Tom. „Kio tio estas?“

„Tio estas inferfajro. Ve, Tom, tio estas terura.“

Kelkaj svagaj konturoj proksimiĝis tra la tenebro kaj svingis antikvan ladolanternon, kiu reflektis nenombreble multajn lumpunktojn sur la grundon. Tuj Huckleberry flustris tremante:

„Tio estas aŭtentikaj diabloj, triopo, Jesuĉjo kaj Marinjo! Tom! Ni estas perditaj. Ĉu vi povas preĝi?“

„Mi provos noktopreĝon, sed ne timu. Ili ne volas fari ion malican al ni.“ 'Lacas mi je l' taga fin', la okuloj fermas sin...“

„Ŝŝ!“

„Kio estas, Huck?“

„Tio estas HOMOJ! Unu el ili certe, unu el la voĉoj estas tiu de Muff Potter.“

„Tion vi ne diras serioze, ĉu?“

„Mi vetas, ke mi konas la voĉon. Nek moviĝu nek retiriĝu. Li ne rimarkos, ke ni estas ĉi tie, li certe estas ebria, kiel ĉiam – damnita kanajlo!“

„En ordo, mi diros nenion. Nun ili haltas, ili ne povas trovi ion. Nun ili denove pli proksimiĝas. Nun ili proksimas, nun multe malpli proksimas. Proksimas denove. Tute proksimas! Ĉifoje la direkto ĝustas. He, Huck, mi rekonas voĉon, estas tiu de Indiĝen-Joe.“

„Vi pravas – estas la murdista bastardo! En tiu okazo mi eĉ preferus la diablojn. Kion malbonan ili intencas?“

La frustrado nun tute ĉesis, ĉar la tri viroj venis al la tombo kaj staris nur kelkajn paŝojn malproksime de la kaŝejo de la knaboj.

„Ĉi tie ĝi estas“, diris la tria voĉo. Ĝia posedanto tenis alte la lanternon kaj malkaŝis la vizaĝon de D-ro Robinson.

Potter kaj Indiĝen-Joe portis brankardon, sur kiu kuŝis ŝnuro kaj du ŝpatoj. Ili demetis sian ŝarĝon kaj komencis malfermi la tombon. La kuracisto metis la lanternon al la kapoflanka finaĵo de la tombo, proksimiĝis al la ulmoj, sidiĝis kaj apogis sin per la dorso al unu el la arboj. Li estis tiom proksima al la knaboj, ke ili povus tuŝi lin.

„Rapide fosu, viroj!“ li diris per mallaŭta voĉo, „la luno ĉiumomente povas ekmontriĝi.“

Ili grumble murmuris respondon kaj fosis plu. Dum certa tempo tie estis aŭdebla nur la grincado de la ŝpatoj kaj la forigado de la ŝarĝo konsistanta el tero kaj gravelo. La afero estis tre monotona. Fine ŝpato puŝis kun obtuza ligneca sono kontraŭ la ĉerko, kaj dum unu aŭ du minutoj la viroj levis ĝin supren. Ili disrompis per ŝpato la kovrilon, elprenis la kadavron kaj krude ĵetis ĝin sur la teron. La luno venis el la nuboj kaj montris sian palan vizaĝon. La brankardo estis pretigita kaj la kadravro metita sur ĝin, kovrita per litkovrilo kaj firmligita per ŝnuro. Potter aperigis klaktranĉilon, fortranĉis la tro longan finaĵon de la ŝnuro kaj diris:

„Do, nun la blasfema aĵo estas pretigita, ostosegulo,

kaj nun ankoraŭ donu kvin pliajn dolarojn aŭ ĝi restos ĉi tie.“

„Tiel estas!“ diris Indiĝen-Joe.

„Hehe, aŭskultu, kion tio signifas?“ diris la kuracisto.
„Vi jam antaŭe postulis vian pagon kaj mi pagis ĝin al vi.“

„Jes, kaj vi faris eĉ pli ol tion“, diris Indiĝen-Joe, proksimiĝante al la kuracisto. „Antaŭ kvin jaroj vi forpelis min iunokte el la kuirejo de via patro, kiam mi venis tien kaj petis pri iom da manĝo, kaj vi diris, ke mi estas tie ne por fari ion bonan, kaj kiam mi ĵuris al vi, ke mi rekompencos tion iam al vi, eĉ, se tio estus post cent jaroj, via patro zorgis, ke oni poste enprizonigis min pro vagabondeco. Ĉu vi pensas, ke mi forĝis tion? Por nenio ne fluas indiĝensango en mi. Kaj nun mi HAVAS vin je dispono, kaj vi PAGOS por tio, ĉu vi komprenas tion?“

Li minacis la kuraciston per pugno antaŭ ties vizaĝo. La kuracisto subite elsagis pugnon al li, kaj sternigis la mestizon. Potter lasis fali sian tranĉilon kaj vokis:

„He, lasu mian partneron!“ Kaj en la sekva momento li ĵetiĝis al la kuracisto kaj ambaŭ kune batalis obstine. Ili distretis la herbojn kaj plugis kun siaj kalkanumoj la grundon. Indiĝen-Joe saltis supren, lia okulo flamis pasie. Li prenis la tranĉilon de Potter de la tero, ŝteliris kiel kato kelkfoje ĉirkaŭ la du batalantojn kaj embuskis por havi favoran okazon. Per unu movo la kuracisto liberigis sin, prenis la pezan kapotabulon de la tombo de Williams kaj batis teren Potter-on. Kaj en la sama momento la mestizo vidis sian bonŝancon kaj puŝis la tranĉilon ĝis la tenilo en la bruston de la juna viro. Tiu ekŝanceliĝis, falis sur Potter-on kaj makuligis lin per sia sango. En tiu ĉi momento kaŝis la nuboj la teruran okazaĵon, kaj la du knaboj forkuris rapidege en la tenebron.

Kiam la luno denove montriĝis, Indiĝen-Joe staris super la du korpoj, kaj inspekte rigardis ilin. La kuracisto murmuris nekompreneblajn vortojn, longe elspiris unu- aŭ dufoje kaj poste eksilentis. La mestizo murmuris:

„Nun ni estas kvitaj, damnita hundo!“

Li prirabis la kadavron, poste metis la fatalan murdilon en la malfermitan dekstran manon de

Potter kaj sidiĝis sur la kaputan ĉerkkovrilon. Tri – kvar – kvin minutoj pasis kaj Potter komencis moviĝi kaj ĝemi. Lia dekstra mano ĉirkaŭprenis la tranĉilon, li levis ĝin, rigardis ĝin kaj tremante lasis ĝin fali. Poste li sidiĝis, puŝis la kadavron for de si, gapis al ĝi kaj poste ĉirkaŭrigardis konfuzite. Lia rigardo trafis tiun de Joe.

„Lordo, kion signifas tio, Joe?“

„Estas fia afero“, diris Joe senemocie. „Kial vi faris tion?“

„Mi, mi tion ne faris!“

„Jen, rigardu! Via babilaĉo ne forlavos tion.“

Potter tremis kaj paliĝis.

„Mi pensis, ke mi estas sobra, mi ja ne drinkis ion hodiaŭ nokte. Sed en mia kapo ĝi ankoraŭ estas. Eĉ pli terure ol tiam, kiam ni ekiris. Mia kapo turniĝas kiel karuselo, mi apenaŭ povas memori pri io. Diru al mi, Joe, HONESTE, kaj nun, longjara kamarado, ĉu

faris mi tion, Joe? Mi celis neniam – ĉe mia animo kaj honoro, mi celis tion neniam, Joe. Rakontu al mi, kio okazis, Joe. Ve, estas terure – li estis tiom juna kaj promesplena.“

„Nu jes, vi interbatiĝis, kaj li draŝis per la tabulo sur vian kapon kaj vi sternis vin sur la tero. Kaj poste vi saltis supren, ŝanceliĝis tien kaj tien, prenis la tranĉilon kaj puŝis ĝin en lian bruston, ĝuste kiam li ankoraŭfoje alkroĉis teruran baton je vi – kaj poste vi kuŝis kvazaŭ morta kiel ligna kojnoŝtipo, ĝis nun.“

„Ve, mi ne sciis, kion mi faras. Mi volas tuj morti, se mi faris tion intence. Ĉio estis ĉio sekvo de la viskio kaj de la ekscito, mi pensas, ke mi en mia tuta vivo ne uzis armilon, neniam, ĝis nun, Joe. Mi interbatiĝis ĉeokaze, sed neniam kun armilo. Tion povas konfirmi ĉiuj. Joe, NE rakontu tion al iu, ĉu en ordo, Joe?“ Kaj la kompatinda ulo surgenuiĝis antaŭ la flegma murdisto.

„Ne, vi estis ĉiam honesta kaj senkaŝa al mi, Muff Potter, kaj tial mi ne perfidos vin.“

„Ho, Joe, vi estas anĝelo. Estu benata de mi eterne,

dum mia tuta vivo.“ Potter komencis plori.

„Lasu tion, finu plori. Nun ne estas la ĝusta tempo por plorsingulti. Vi foriĝu sur tiu vojo, kaj mi sur tiu ĉi. Ek do, kaj ne lasu iujn spurojn malantaŭ vi.“

Potter ektritis kaj baldaŭ komencis kuri. La mestizo plu staris kaj postrigardis lin. Li murmuris:

„Se li estas konfuzita per la bato kaj ebria pro la viskio tiel, kiel li aspektas, li ne ekpensos pri la tranĉilo, ĝis kiam li ne estos tiom malproksima, ke li ne plu havos la kuraĝon iri sola ĉi tien, tiu timleporulo!“

Du aŭ tri minutojn poste kuŝis la murdita viro, la kovrita kadavro, la disrompita ĉerko kaj la malfermita tombo forlasitaj sub la observo de la luno. Regis denove absoluta kvieto.

Ĉapitro 10

AMBAŬ KNABOJ kuris kaj kuris al la vilaĝo, pro teruriĝo tute senparolaj. De tempo al tempo ili rigardis malantaŭen trans siajn ŝultrojn, maltrankvile, kvazaŭ ili timus persekuton. Ĉiu pli granda trunkrestaĵo, kiu aperis ĉe la vojrandoj, ŝajne estis viro kaj malamiko, kaj retenigis ilian spiradon. Kaj kiam ili rapidis ĉe kelkaj dometoj troviĝantaj ekstere de la vilaĝo, la levata bojado de la protektaj hundoj flugiligis iliajn piedojn.

„Se ni nur venus ĝis la malnova tinkturejo antaŭ ol ni renversiĝos!“ flustris Tom inter mallongaj enspiroj.
„Mi ne povos pli longe elteni tion.“

Huckleberry respondis nur per laŭta anhelado. Kaj la knaboj fikse rigardis la celon de siaj esperoj kaj streĉis siajn fortojn por atingi la celon. Ili pli kaj pli proksimiĝis al ĝi kaj fine enĵetiĝis tra la malfermita pordo kaj falis dankeme kaj lacigite en la protektantaj ombrojn malantaŭ ĝi. Iom post iom trankviliĝis iliaj pulsobatoj kaj Tom flustris:

„Huckleberry, kion vi supozas, sekvos el tio?“

„Se d-ro Robinson mortos, sekvos iu pendumito je galgo el tio, mi pensas.“

„Ĉu vi imagas tion efektive?“

„Mi scias tion, Tom.“

Tom pripensis la aferon dum iom da tempo kaj poste diris:

„Kaj kiu rakontos pri tio, ĉu ni?“

„Pri kio vi parolas? Imagu, ke io okazos kaj Indiĝen-Joe ne estos pendumita. Tiukaze li iam transmondigos nin, tio estas tiel certa, kiel ni kuŝadas ĉi tie.“

„Tio estas ĝuste tio, kion pensas ankaŭ mi, Huck.“

„Se iu dirus, ke Muff Potter rakontu tion, li estus

sufiĉe stulta por tio. Li estas ankaŭ plej ofte sufiĉe ebria.“

Tom diris nenion, li pripensis la aferon plu. Poste li flustris:

„Huck, Muff Potter ne scias ion. Do, kiel li povus rakonti pri tio?“

„Kial li ne scias ion?“

„Ĉar li ĵus ricevis baton sur la kranion, kiam Indiĝen-Joe faris tion. Ĉu vi supozas, ke li povis vidi ion? Ĉu vi pensas, ke li scias ion?“

Neverŝajne, vi pravas, Tom!“

„Kaj krome, rigardu ĉi tie, eble la bato ankaŭ LIN finigis.“

„Tio ne verŝajnas, Tom. Li havis fortan alkoholon en si. Tion mi vidis, kaj krome li estas ĉiam ebria. Se paĉjo drinkis tro, oni povus preni zonon kun preĝejo

ligita al ĝi, kaj draŝi tiun sur lian melonkapon kaj oni tamen ne povus mortbati lin. Tiel li diris tion mem. Sekve estas la sama afero pri Muff Potter. Sed, se iu viro estas tute sobra, mi supozas, povus esti, ke tio transmondigus lin. Mi ne scias.“

Post plia pripensado kaj plia silento, diris Tom:

„Huckĉjo, ĉu vi estas certa, ke vi povus teni vian langon en la buŝo?“

„Tom, ni ja DEVOS teni ĝin tie. Vi ja scias. Tiu diablo Indiĝen-Joe, dronigus nin ambaŭ kiel du katojn, se ni nur pepus ion pri tio, kaj se ili ne estus pendumintaj lin. Nu, atentu, Tom, ni ĵuru reciproke – tion ni devos fari – ni devas ĵuri, ke ĉiu el ni tenos sian langon en la buŝo.“

„Mi konsentas, tio estas la plej bona. Ĉu vi etendus manon al mi –kaj ĵurus, ke ni...“

„Ho ne, tio en tiu okazo ne sufiĉus. Tio estas sufiĉe bona pri bagatelaj kutimaj aferoj, speciale pri inoj, kiuj perfidas vin en ĉiu okazo kaj ekklaĉas, se iu

ofendis ilin. Sed ĉe tia granda afero tio devas esti skribita. Kaj per sango.“

La animo de Tom tute aplaŭdis tiun ideon. La propono estis profunda, mistera kaj terura. La horo, la cirkonstancoj kaj la loko akordis kun ili. Li prenis puran pinoŝindon, kuŝintan en la lunlumo, elprenis fragmenton da ruĝa briko elpoŝe, serĉis lunlumon por sia laboro kaj pene skribaĉis la sekvajn liniojn, emfazante ĉiun malleviĝantan linioparton per tio, ke li ŝovis la langopinton tra la dentoj kaj li malpliigis la langopremon ĉe ĉiu leviĝanta linioparto.

„Huck Finn kaj Tom Sawyer ĵuras, ke ili tenos la langojn pri tio enbuŝe, kaj ke ILI deziras tuj fali mortaj en SIAJ SPUROJ, tiukaze, se ILI iam ion PERFIDOS, kaj putriĝu.“

Huckleberry estis plena de admiro pri la skribarto de Tom kaj pri lia nobla esprimmaniero. Li tuj tiris pinglon el jakoreverso kaj volis piki sin en la karnon, sed Tom diris:

„Haltu! Ne faru tion. Pingloj ja estas el latuno, povus estis verdigro sur ĝi.“

„Kio estas verdigro?“

„Veneno. Jen tio, kio ĝi estas. Vi devas nur foje iom gluti de ĝi, tiam vi vidos – kio okazos.“

Dirinte tion, Tom malvolvis fadenon de unu el siaj pingloj kaj ĉiu el la knaboj pikis en sian dikfingran supraĵon kaj elpremis guton da sango. Iom post iom kaj post sufiĉe da premado Tom kapablis skribi siajn inicialojn, kion li faris per tio, ke li uzis la pinton de malgranda fingro kiel krajonon. Poste li montris al Huckleberry, kiel oni skribas la literojn F kaj H. Kaj nun la ĵuro estis kompleta. Ili entombigis la ŝindon proksime de la muro, kun kelkaj mornaj ceremonioj kaj sorĉkantoj, kaj la katenoj, kiuj ligis iliajn langojn, estis rigardataj fermitaj ĉiam kaj la ŝlosilo forĵetita.

Tra fendo en la alia finaĵo de la ruinigita konstruaĵo enŝteligis figuro, sed ili ne rimarkis tion.

„Tom“, flustris Huckleberry, „ĉu la ĵuro detenos nin paroli pri tio ETERNE, do ĈIAM.“

„Kompreneble, egale, kio okazos, ni devos teni la langon en la buŝo. Aliokaze ni morte renversiĝus, tion VI ja scias, ĉu ne?“

„Jes, tiel certe estas.“

Ili ankoraŭ flustris dum certa tempo. Poste ekstere hundo komencis mizere hurleti, ne pli ol kvin paŝojn proksime de ili. La knaboj subite firmtenis sin recipoke permane, pro mortotimo.

„Kiun el ni ĝi celas?“

„Mi ne scias, rigardu foje tra la fendo, rapide!“

„Ne, Tom, rigardu mem!“

„Mi ne povas, ne kapablas FARI tion, Huck!“

„Bonvolu, Tom! Jen tie, denove.“

„Lordo mia, mi estas dankema, Tom. Mi konas la

voĉon, tio estas Bull Harbison.“

„Ha, kia feliĉo!“ flustris Tom. Mi jam mortotimis. Mi estus vetinta, ke tio estas vaganta hundo.“

La hundo bojis denove. La kuraĝo de la knaboj plian fojon.

„Ho Jesuo! Tio ne estas Bull Harbison!“ flustris Huck. „RIGARDU DO“, Tom!“

Tom, kiu tremis pro timo, cedis, kaj metis okulon al la fendo. Lia flustrado apenaŭ aŭdeblis, kiam li diris:

„Oh, Huck, estas vaganta hundo!“

„Rapide, Tom, rapide! Kiun ĝi celas?“

„Huck, ĝi certe celas nin ambaŭ – ni estas ja ambaŭ tute proksimaj unu al la alia.“

„Oh, Tom, mi pensas, ke ni estas finitaj. Mi supozas,

ke ne eblas erari pri tio, kien mi iros. Mi estis tiom fia.“

„Tio klarigas ĝin! Tio venas de tio, se oni intence forestas de la lernejo kaj faras ĉiujn tiujn fiaĵojn, pri kiuj oni instruas la ulojn, ke oni NE faru ilin. Mi povus esti tiel brava kiel Sid, se mi estus provinta tion – sed, kompreneble mi ne volis esti kiel li. Sed, se mi iam efektive povus elturniĝi el ĉio ĉi kun sana haŭto, mi certas, ke mi VOLONTE frekventos la dimanĉan lernejon!“ Kaj Tom emociigite komencis snufi.

„Vi estas fia, ĉu?“ Kaj nun eksnufis ankaŭ Huckleberry. „Damne, Tom, vi estas senkulpa orfo en komparo al tio, kio estas mi. Ho, Lordo, Lordo, Lordo, mi dezirus, ke mi havus nur duonon de la bonŝanco, kiun havis vi.“

La gorĝo de Tom kunpremiĝis kaj li flustris:

„He, Huck, li turnas la dorson al ni!“

Huck rigardis ĝojigite.

„En ordo, aha! Ĉu ankaŭ jam antaŭe?“

„Jes, certe, sed mi kiel stultulo, tute ne pensis pri tio. Ho, tio estas ja bonŝancego. Sed kiun ĝi celas?“

La hurlado ĉesis. Tom akriĝis la orelojn.

„Ŝŝ! Kio estas tio? Ĝi sonas kiel la gruntado de porko. Ne, tie iu ronkas, Tom.“

„ESTAS tiel! De kie tio venas, Huck?“

„Mi supozas, ke ĝi venas de transe, de la alia finaĵo. Almenaŭ ĝi sonas tiel. Paĉjo dormis tie de tempo al tempo, kun la porkoj, sed la leĝo benu vin, la aĵoj eĉ leviĝas, se ronkas li. Krome, mi supozas, ke li revenus en tiu ĉi urbon neniam.“

En la animoj de la knaboj moviĝis denove aventuremo.

„Huck, ĉu vi havus la kuraĝon iri kun mi, se mi estus

la gvidanto?“

„Prefere ne, Tom, imagu, ke li tie estas Indiĝen-Joe?“

Tom tremis. Sed baldaŭ la tento fariĝis denove forta kaj la knaboj interkonsentiĝis provi ĝin, sed ankaŭ, ke ili eskapus, se la ronkado finiĝus. Tiel ili ŝteliris sur siaj piedfingroj antaŭen, unu post la alia. Kiam ili proksimiĝis ĝis kvin paŝoj al la ronkanto, Tom tretis sur bastonon kaj ĝi disrompiĝis kun akra laŭta sono. La viro ĝemis, turniĝis iom flanken kaj lia vizaĝo aperis en la lunlumo. Estis Muff Potter. La koroj de la knaboj haltis kaj ankaŭ iliaj esperoj, kiam la viro ekmoviĝis, sed iliaj timoj foriĝis nun. Ili glitis eksteren tra la fendo de rompita lignoŝelaĵo kaj haltis en iom pli granda distanco de la garbejo por interŝanĝi adiaŭajn vortojn. Jen leviĝis denove la longe sonanta malgaja hurlado en la nokta aero! Ili turniĝis malantaŭen kaj ekvidis nur malmultajn futojn de tie, kie kuŝas Potter, la fremdan hundon, kiu RIGARDIS al Potter, kun nazo, kiun ĝi metis ĉielen.

„Sankta bovino! LIN ĝi opiniis“, klarigis ambaŭ knaboj samtempe.

„Aŭskultu foje, Tom – ili diras, ke antaŭ du semajnoj hurladis vaganta hundo antaŭ la domo de Johnny Miller, noktomeze. Kaprimulgo alflugis, sidiĝis sur la verandan balustradon kaj kantis je la sama vespero, sed ankoraŭ neniuj estas morta tie.“

„Jes, mi scias tion. Kaj eĉ, se ne. Ĉu Gracie Miller ne je la sekva tago, je sabato, falis en la kuirejan fajron kaj terure brulvundigis sin?“

„Jes, sed ŝi ne estas MORTA. Kaj krome, ŝi eĉ fartas jam pli bone.“

„Atendu ankoraŭ, vi ja vidos, kio okazos. Ŝi estas forironto, same tiel certe, kiel Muff Potter estas forironto. Jen tio, kion diras la negroj, kaj tiuj scias ĉion pri tiaj aferoj, Huck.“

Poste ili disiĝis pripenseme. Kiam Tom grimpis en sian dormĉambran fenestron, la nokto preskaŭ pasis. Li senvestigis sin kun eksterordinara atentemo kaj endormiĝis, gratulante sin, ke neniuj ion eksciis pri lia eskapado. Li ne rimarkis, ke la softe ronkanta Sid vekigis, kaj tio jam antaŭ horo.

Kiam Tom vekigis, Sid estis jam vestita kaj foririnta. La lumo aspektis malfrutempa kaj sentiĝis malfrueco ankaŭ en la aero. Li estis perpleksa. Kial neniu vokis lin – persekutite, ĝis kiam li vekigas, kiel kutime? La penso plenigis lin per malicaj antaŭdivenaj. Interne de kvin minutoj li estis vestinta sin, kaj malsuprenirinta sur la ŝtuparo, ankoraŭ plena de doloro kaj dormemo. La familio estis ankoraŭ ĉe la tablo, sed la matenmanĝo estis finita. Neniu diris riproĉvorton, sed la okuloj forturniĝis de li. Jen tia silento kaj tia soleneco, ke frido atakis la koron de la sentaŭgulo. Li sidiĝis kaj provis aspekti gaja, sed tio estis tre peniga, ĝi ne levis rideton, respondon, kaj tial li eksilentis kaj lia koro sinkis profunden.

Post la matenmanĝo lia onklino tiris lin flanken, kaj Tom, preskaŭ faciligite, esperis, ke li ricevos batojn. Sed ne estis tiel. Lia onklino ploris ĉe li kaj demandis lin, kiel li kapablas tiel rompi ŝian maljunan koron. Fine ŝi diris, ke li trankvile agu plu tiel, ke li ruinigu sin mem, kaj ŝarĝu ŝian grizan hararon per zorgoj kaj entombigu ŝin, ĉar por ŝi ne plu havas sencon pli longe provi ion pri li. Tio estis pli teruriga ol mil batoj per vergo. La koro de Tom nun pli doloris ol lia korpo. Li ploris, li petis pri pardono, promesis, ke li plibonigos sin pli kaj pli. Sed ŝi forsendis lin. Kaj li

havis la senton, ke li ricevis ne pli ol neperfektan pardonon kaj regajnis nur tre limigitan konfidon.

Li forlasis tro mizere la pridemandadon por senti eĉ venĝemon al Sid, kaj tial la retiriĝo de tiu tra la malantaŭa pordo ne estis necesa.

Morne kaj malgaje trotis Tom al la lernejo kaj – kun Joe Harper – akceptis apatie la batojn por la hieraŭa intenca foresto en la lernejo, kiel iu, kies koro estas tro ŝargata de multe pli dolorigaj veoj, kaj kiu tial estas tute dikhaŭta pri bagateloj. Poste li riskis iri al sia sidloko, apogis la kubutojn sur la skribtablon kaj sian mentonon en la manojn kaj rigardis al la muro kun la ŝtona vizaĝo de suferanto, kiu atingis la kulminon de sia sufero kaj tial ne povas suferi eĉ pli. Unu el liaj kubutoj puŝis kontraŭ iu malmola substanco. Post certa tempo li ŝanĝis lante kaj malgaje sian pozicion kaj levis la objekton kun suspiro. Ĝi estis kaŝita en paperon. Li elvolvis ĝin. Longedaŭra kolosa suspiro sekvis, kaj lia kroo rompiĝis. Estis lia latuna tenilo de la fajrohundo.

Tio lastfine estis tro.

Ĉapitro 11

Ĉirkaŭ tagmeze la tuta vilaĝo subite estis kvazaŭ elektrizita de la terura novaĵo. Tute ne necesis la ankoraŭ eĉ ne revata – telegrafo. La sciigo flugis de buŝo al buŝo, de grupo al grupo, de domo al domo, preskaŭ tiom rapide, kiom telegramo. Kompreneble la lernejestro ordonis, ke la lernejo je tiu posttagmezo estu fermita. En la urbo oni rigardus lin oblikve, se li ne estus farinta tion.

Oni trovis tre sangan tranĉilon proksime de la murdito, kaj iu ekkonis, ke la posedanto estas Muff Potter – tiel kuris la onidiro. Kaj oni asertis, ke iu malfrua hejmirinto vidis Potteron, kiu lavis sin en „branĉo“ de la rivero je la unua aŭ dua matene, kaj ke Potter tuj skuis la polvon de la piedoj – jen suspektaj cirkonstancoj, speciale la lavado, kio ne estis kutima ĉe Potter. Oni ankaŭ diris, ke oni rastis la tutan urbeton pro la „murdisto“ (la publiko ne malrapidas, se temas pri tio kribri pruvojn kaj diri verdikton), sed li ne troveblis. Rajdistoj svarmis sur ĉiuj stratoj en ĉiuj direktoj kaj la ŝerifo estis plena de optimismo, ke oni kaptos lin jam antaŭ noktomezo.

La tuta urbeto loĝantaro marŝis eksteren al la tombejo. Tom forĝis sian rompitan koron kaj aliĝis al la procesio, ne tial, ĉar li ne estus irinta milfoje pli prefere al iu alia loko, sed ĉar pelis lin terura, neesplorable fascino tien. Alveninte je la timiga loko, li glitis kiel vermo kun sia malgranda korpo tra la vicoj kaj vidis abomenindan spektaklon. Ŝajnis al li, ke pasis eterneco, de kiam li estis lastfoje tie. Iu pinĉis lin ĉebrake. Li turnis sin al la dorso kaj ekvidis la vizaĝon de Huckleberry. Ambaŭ rigardis tuj samtempe al aliaj lokoj kaj demandis sin, ĉu iu alia eble estas vidinta ilian senmortan interŝanĝon de rigardoj. Sed ĉiuj interparolis kaj estis katenitaj de la harhirtiga spektaklo antaŭ ili.

„Kompatinda viro!“ „Kompatinda juna viro!“ „Tio estu instruo al la priŝtelantoj de tomboj!“ „Pro tio oni pendumos Potter-on je la galgo, se ili kaptos lin!“ Tiel tekstis proksimume la ĥoro de la parolantoj, kaj la pastro diris: „Tio estis puno, ĉeestanta mano de Dio.“

Tom subite tremis de la kapo ĝis la piedfingroj, ĉar lia rigardo trafis la rigidan vizaĝon de Indiĝen-Joe. En tiu ĉi momento iris moviĝanta ondo tra la amaso de homoj kaj voĉoj vokis: „Li venas! Jen li! Li venas mem!“

„Kiu? Kiu?“ vokis dudek voĉoj.

„Muff Potter!“

„Ha, li haltas! – Rigardu, li turniĝas dorsen! Ne lasu eskapi lin!“

Homoj troviĝantaj en la branĉoj super la kapo de Tom diris, ke li ne provas fuĝi – ke li aspektas nur dubema kaj perpleksa.

„Kia infera impertinenteco!“ diris unu el la ĉirkaŭstarantoj, „li volis veni kaj foje trankvile rigardi sian laboron. Mi supozas – li ne atendis iujn akompanantojn.“

La aro de homoj nun dispartiĝis kaj lasis trairi la ŝerifon, kiu fanfarone gvidis Potteron ĉebrake. La vizaĝo de la kompatindulo estis maltrankvila, kaj je liaj okuloj legeblis la timo. Kiam li staris antaŭ la murdita viro, li tremis kiel paralizulo kaj kaŝis sian vizaĝon per la manoj kaj ekploris.

„Mi ne faris tion, amikoj“, li diris plorsingulte. „je mia honoro kaj konscienco, mi tute ne faris tion.“

„Kiu akuzis vin?“ vokis voĉo.

Tiu pafita demando ŝajne trafis la celon. Potter levis sian vizaĝon kaj ĉirkaŭrigardis kun patosa senespero. Li vidis la ulon Indiĝen-Joe kaj klarigis:

„Ve, Indiĝen-Joe, vi promesis al mi, ke vi neniam...“

„Ĉu tio estas via tranĉilo?“ demandis la ŝerifo, kiu ĵetis ĝin en tiu momento antaŭ liajn piedojn.

Potter falus, se oni ne apogus kaj mole sidigus lin surteren. Poste li diris:

„Io flustris al mi, ke tiukaze, se mi ne revenus kaj la tranĉilon...“ Li ektremis kaj poste li faris nervozan movon kun gesto de venkito kaj diris:

„Rakontu ĝin al ili, Joe, diru al ili – havas ja neniun sencon plu prisilentigi la okazon.“

Huckleberry kaj Tom staris kvazaŭ mute kaj blinde kaj gape miris, kiel la ŝtonkora mensoganto sciigis preĝrade sian serenan deklaron. Ili atendis ke la sennuba ĉielo tuj sendos fulmojn de Dio sur lian kapon, kaj ili miris kiom longe la fulmbato estas retirata. Kaj kiam li finis sian paroladon kaj ankoraŭ tiam staris vivanta kaj nelezita, ilia dummomenta impulso, rompi sian ĵuron kaj savi la vivon de la kompatinda trompita arestito, malpliiĝis kaj poste tute perdiĝis, ĉar la fiulo vendigis sin al Satano kaj estus fatale, se oni defius la proprajon de tia potenco.

„Kial vi ne fuĝis? Kial vi ankoraŭfoje venis ĉi tien?“ iu diris.

„Mi ne povis agi alie, mi ne povis agi alie“, plendis Potter. „Mi ja volis forkuri, sed tio ne eblis. Iel mi povis iri nur ĉi tien.“ Kaj li denove komencis plorsingulti.

Indiĝen-Joe ripetis sian deklaron kvin minutojn poste ĉe la pridemandado same fridanime sub ĵuro. Kaj kiam la knaboj vidis, ke la fulmoj ankoraŭ tiumomente estis retenataj, konfirmiĝis ilia supozo, ke Joe sin vendis al la diablo. Li estis nun por ili la plej interesa sinistra subjekto, kiun ili iam ajn vidis,

kaj tial ili ne povis deturni siajn fascinitajn vizaĝojn de li. Interne ili decidis observi lin nokte, kiam okazo ofertiĝus pri tio. Por eble povi ekkapti mallongan rigardon al ties timiga mastro.

Indiĝen-Joe helpis levi la kadavron kaj ŝargi sur ĉaron por ties fortransporto. Jen ondadis flustrado tra la tremanta aro de homoj, ke la vundo ankoraŭ iom sangis! La knaboj pensis, ke tiu bonŝanca cirkonstanco kondukus la suspekton ĝuste, sed ili seniluziiĝis, ĉar diris pli ol nur unu vilaĝano:

„Muff Porter estis ja nur tri futojn malproksima, kiam la sango denove ekfluis...”

La terura sekreto de Tom kaj lia ronĝanta konscio rabis lian dormon preskaŭ dum tuta semajno. Iumatene diris Sid dum la matenmanĝo:

„Tom, vi turnadas vin enlite kaj parolas endorme tiom ofte, ke vi tenas min vekiginta preskaŭ dum duono de la nokto.”

Tom paliĝis kaj rigardis malsupren.

„Tio estas malbona signo“, diris onklino Polly serioze. „Pri kio vi pensas, Tom?“

„Pri nenio, pri nenio, kion mi scius.“ Sed la kafotaso de Tom tiom tremis permane, ke li misverŝis kafon.

„Kaj vi parolas galimation“, diris Sid. „Lastan nokton vi diris: 'Estas sango, estas sango, jen tio, kio ĝi estas!' Tion vi ripetis ofte. Kaj vi diris: 'Ne turmentu min tiom, mi perfidos ĝin.' Perfidi KION? Kion vi perfidos?“

Antaŭ la okuloj de Tom ĉio komencis turniĝi. Ne estis imageble, kio ĉio povus nun okazi. Sed bonŝance la aflikteco el la vizaĝo de onklino Polly malaperis kaj ŝi fariĝis helpanto de Tom sen scii tion. Ŝi diris:

„Certe! Estas tiu terura murdo. Mi sonĝas pri ĝi dum granda parto de mia dormo. Kelfoje mi sonĝis, ke faris mi tion.“

Maria diris, ke ŝi spertis ion tute similan. Sid tiel ŝajne estis kontentigita. Tom foriĝis tiom rapide,

kiom tio eblis, sen vekki suspekton. Poste li plendis dum semajno pri dentodoloroj kaj ĉiuvespere firmligis sian makzelon per bandaĝo. Li tute ne sciis, ke Sid nokte rigardis embuske kaj kelkfoje tiris la bandaĝon de la lipoj de Tom kaj poste ĉiufoje apogis sin sur siajn kubutojn, aŭskultis dum sufiĉe longa tempo, kaj poste ĉiufoje denove reŝovadis la bandaĝon al ties antaŭa loko. La ŝarĝiteco de Tom iom post iom malpliiĝis, kaj la dentodoloroj fariĝis ĝenaj, kaj tial li rezignis pri ili. Se Sid efektive ion eksciis pri la dirita dormbabilado de Tom, tiukaze li ne perfidis tion.

Ŝajnis al Tom, ke liaj lernejoj kamaradoj ne povis sufiĉe kvazaŭ prokurore pridemandi pri mortaj katoj, kaj tial lia aflikto ĉiam restis aktuala. Sid notis, ke Tom neniam estis la prokurora pridemandanto en tiaj okazoj, kvankam estis lia kutima maniero en tiaj novaj entreprenoj transpreni la gvidadon. Li krome notis, ke Tom neniam aperis kiel atestanto, kaj tio estis stranga. Kaj Sid ne pretervidis la fakton, ke Tom eĉ montris eksplicitan antipation kontraŭ tiaj pridemandadoj kaj evitis ilin, tiom ofte, kiom tio eblis. Sid miris, sed diris nenion. Tamen, eĉ tiuj pridemandoj malaktualiĝis fine kaj ĉesis torturi la konsciencan de Tom.

En tiu ĉi zorgoplena tempo Tom ĉiutage aŭ almenaŭ ĉiun duan tagon provis aperi antaŭ la malgranda enkadrigita prizonfenestro de la murdisto kaj kontrabandi al li tiajn bagatelaĵojn, kiajn li ie povis firmteni. La prizono estis aĉa malgranda brikodomo, kiu staris en marĉa loko ĉe la vilaĝorando. Neniuj gardistoj necesis. Okupis ĝin nur malofte iu. Tiuj ofertitaj aĵoj tre helpis plifaciligi la konsciencan de Tom.

Rilate al Indiĝen-Joe, la enloĝantoj de la vilaĝo tre deziris gudri kaj kovri lin per plumoj kaj meti sur relon, ke li estu tie ĝismorte trenata, pro lia rabo de la kadavro, sed lia karaktero estis tiel danĝera, ke troveblis neniu, kiu kuraĝis transpreni la gvidadon en la afero, tial oni lasis tion ĉi-momente. Li estis tre atentinta, ke ambaŭ liaj eldiroj komencis kun la batalo, sen konfesi la tomban prirabon, kiu okazis antaŭe. Tial oni pensis, ke estas plej saĝe momente ne transdoni la deliktinton al la juĝisto.

Ĉapitro 12

Unu el la kaŭzoj, kial la pensoj de Tom iom post iom deturniĝis de lia sekreta aflikto, estis, ke okupis lin nova grava temo, kiu interesis lin. Becky Thatcher ne plu frekventis la lernejon. Tom batalis kontraŭ sia fiero dum kelkaj tagoj kaj provis forigi la temon el sia kapo, sed sen sukceso. Tom rimarkis, ke li komencis vagadi sencele ĉirkaŭ ŝia patra domo vespere, kaj li sentis sin tre malfeliĉa. Ŝi estis malsana. Kio, se ŝi mortus? La penso fariĝis obsedo. Li ne plu interesiĝis pri milito aŭ pirata vivo. La ĉarmo de la vivo estis perdita, kaj restis nenio plu krom tristo. La rulrington kun la bastono li metis flanken, ili tute ne plu ĝojigis lin. Lia onklino maltrankviliĝis pro li. Ŝi provis ĉiujn eblajn rimedojn je la knabo. Ŝi apartenis al la homoj, kiuj admiras kuracmetodojn por sanigo kaj senkritikeme mendas patentmedicinojn. Pri tiaj aferoj ŝi estis obstina provanto. Se io nova pri io tia estis je dispono, ŝi tuj devis provi ĝin, ne je si mem, ĉar ŝi ĉiam estis tre sana, sed je iu ajn, kiu hazarde troviĝis. Ŝi estis abonanto de ĉiaj ajn sanecrevuoj kaj frenologiaj trompgazetoj. Kaj la solena ŝtipkapuleco, kiu tie estis celebrata, estis ŝia viveliksiro. La tuta galimatio, kiun ili entenas, ekzemple pri tio, kiel oni ĝuste aerumu, kiel oni ĝuste en- kaj ellitiĝu, kion oni

manĝu kaj kion oni trinku, kiom da korpekzercoj estas helpemaj al oni, kaj en kia stato oni tenu sian menson, kaj per kio oni vestu sin, ĉio tio estis kvazaŭ evangelio por ŝi. Kaj ŝi ne rimarkis, ke la sanecĵurnaloj de la aktuala monato, kutime neas ĉion tion, kion ili rekomendis en la antaŭa periodaĵo. Ŝi estis simplanima kaj honesta tiom, kiom la tago estis longa, kaj tial facile kaptebla viktimo. Ŝi kolektis fervore fuŝkuracistajn gazetojn kaj fuŝmedicinojn, kaj tiel armite per la morto, rajdadis sur sia pala ĉevalo, metafore dirite, kun „la infero, kiu sekvas ŝin“. Sed ŝi neniam ekhavis la suspekton, ke ŝi povus esti por siaj suferantaj kunhomoj io alia krom anĝelo pri saneco aŭ enkorpiĝo de la Balzamo de Gileado.

La traktado per akvo estis nova kuracmetodo, kaj la malbona sanstato de Tom estis kvazaŭ vokita por ŝi. Ŝi ellitigis lin ĉiumatene dum sunleviĝo, metis lin en la lignoŝedon kaj preskaŭ dronigis lin per torentoj da frida akvo, poste ŝi frotetis lin per mantuko, kiu sentiĝis kiel kruda fajlilo kaj tiel rekonsciigis lin, poste ŝi lin volvis en malsekan littukon kaj metis lin sub litkovrilon, ĝis kiam li elŝvitis la animon el sia korpo, „kiu flavmakule penetris el liaj poroj“ – kiel li diris mem.

Sed sendepende de ĉio ĉi la knabo fariĝis pli kaj pli

melankolia kaj pala kaj depremita kore. Onklino Polly provis je li aldone varmegajn banojn kaj sidbanojn, duŝojn kaj banojn per trempado. La knabo restis tiel morna kiel ĉerkĉareto. Ŝi komencis subteni la akvokuracadon per dietmanĝo el avenflokaj kaj per haŭtvezikaj plastroj. Ŝi kalkuladis lian kapaciton, kiel tiun de kruĉo kaj ŝi plenigis lin ĉiutage tute per fi-kuracistaj rimedoj sanigantaj ĉion.

Tom fariĝis indiferenta pri ĉiu tortura traktado. Tio plenigis la koron de la maljuna damo per zorgoj. Tiu indiferenteco nepre, egale, kiom tio kostos, devos malaperi. Tiutempe ŝi aŭdis je la unua fojo ion pri „dolorforigilo“. Ŝi mendis grandan kvanton je unu fojo. Ŝi gustumis la rimedon kaj tuj estis konvinkita. Estis fakte fajro en likva formo. Ŝi rezignis pri la traktado per akvo kaj ĉio alia kaj metis sian tutan konfidon en la dolorforigilon. Ŝi donis al Tom kulereton da ĝi kaj atendis kun tre granda timema atendo la rezulton. Ĉiuj duboj tuj per unu fojo forlasis ŝin, kaj ŝia animtrankvilo ĉeestis denove, ĉar la indiferento de Tom foriĝis subite. La knabo ne povis montri pli sovaĝan, viglan reagon ol en tiu okazo, se ŝi bruligus fajron sub li.

Tom trovis, ke venis la tempo forlasi la liton. Tiu maniero vivi dum lia mizera stato eble estis sufiĉe

romantika, sed ĝi fariĝis baldaŭ apenaŭ sentebla kaj tro devojiga. Tial li cerbumis pri diversaj planoj por distro. Kaj fine li ekhavis la ideon ŝajnigi sin entuziasma adepto de la dolorforigilo. Li demandis tiom ofte pro ĝi, ke li fariĝis molesta. Kaj fine lia onklino diris, ke li priservu sin mem kaj lasu ŝin en paco. Se estus Sid, neniuj suspektoj retenus ŝian ravitecon, sed, ĉar estis Tom, ŝi kaŝe kontrolis la botelon. Ŝi vidis, ke la medicino efektive malpliigis, sed ŝi ne divenis, ke li verŝadis la medicinon en fendon de la loĝoĉambro, por sanigi ĝin per tio.

Iutage Tom okupiĝis per tio verŝi certan dozon de la medicino en la fendon, kiam proksimiĝis la flava iktera virkato de onklino Polly, ĝi ronronis, avide rigardis la kulerplenon de Tom kaj petis gusti ĝin. Tom diris:

„Ne petu pri ĝi, se vi ne vere deziras ĝin, Peter.“

Sed Peter gestis, ke ĝi volas gusti ĝin.

„Prefere montru, ke vi certas.“

Peter montris certon.

„Nu, en ordo, se vi nepre volas havi ĝin, mi donos ĝin al vi, ĉar mi tute ne estas fia, sed se ĝi ne gustos al vi, riproĉu neniun alian ol vin mem.“

Peter konsentis. Tial Tom malfermis ĝian buŝon kaj enverŝis la dolor-forigan likvaĵon. Peter saltis du metrojn alten, poste elpuŝis militkrion kaj rapidegis kelkfoje cirkle en la ĉambro, puŝiĝis je mebloj, renversigis florpotojn kaj kaŭzis ĝeneralan kaoson. Poste ĝi starigis sin sur la malantaŭajn kruojn kaj dancadis pro ĝoja ekfrenezigo, kun la kapo surŝultre kaj ĝia voĉo sciigis ne preteraŭskulteble ĝian nesatigeblan vivoĝojon. Poste ĝi kuregis ĉirkaŭ la domon kaj ĉie survoje kaŭzis kaoson kaj detruon. Onklino Polly venis ankoraŭ ĝustatempe por vidi kiel ĝi duoble cirklosaltis kaj kun forta lasta hurao ŝvebis tra la malfermita fenestro kaj kunprenis la florpotojn, kiuj ankoraŭ ne estis rompitaĵ. La maljuna damo staris kvazaŭ ŝtonigita pro mirego kaj rigardis super siajn okulvitrojn. Tom kuŝis sur la planko kaj brue ridadis.

„Tom, je Dio en la ĉielo, pro kio suferas la virkato?“

„Mi ne scias, onjo“, diris Tom ĝeme elspirante.

„Ĉe Dio, ion tian mi ankoraŭ neniam vidis. Kio kaŭzis ĝin agi tiel?“

„Tion mi efektive ne scias, onjo Polly, katoj ĉiam tiel agas, se ili ĝojas pri io.“

„Ili agas tiel, ĉu vere?“ Io estis en la voĉo de Polly, kio faris lin timema.

„Jes, onjo, tio estas, mi supozas, ke ili agas tiel.“

„Vi SUPOZAS tion?“

„Jes, onjo.“

La maljuna damo kliniĝis. Tom rigardis ŝin kun intereso, kiun emfazis timemo. Tro malfrue li antaŭdivenis ŝian intencon. La tenilo de la perfidema kulero videblis ĉe la rando de la litkurteno. Onklino Polly tenis ĝin alte kaj rigardis ĝin. Tom ekskuiĝis

timeme kaj rigardis malsupren. Onklino tiris lin je lia kutima „prenilo“ – je orelo supren – kaj klake frapetis lian kapon per sia fingroĉapeleto.

„Nu, siro, kial vi traktis la mutan kompatindan beston tiel fie?“

„Mi faris tion pro kompatato – ĉar ĝi ne havas onklinon.“

„Ne havas onklinon! – Ŝtipkapulo. Kiun rilaton ĝi havu al tio?“

„Multajn. Se ĝi havus onklinon, ŝi mem bruligus liajn intestojn! Ŝi rostus lian stomakon kaj dum tio ne havus pli da kunsento ol tiukaze, se ĝi estus homo!“

Onklino Polly subite havis konscienciproĉojn. Tio montris la aferon en alia lumo. Kio estis kruela al kato, tio POVUS esti kruela ankaŭ al knabo. Ŝi fariĝis pli milda kaj ekhavis kompaton. Ŝiaj okuloj fariĝis iom malsekaj. Ŝi metis manon sur lian kapon kaj diris mole:

„Mi celis ja nur la plej bonan, Tom. Kaj, Tom, ĝi bonfartigis vin.“

Tom vidis supren al ŝia vizaĝo, kun apenaŭ rimarkebla okulumo, kiu hastis tra lia seriozeco.

„Mi vidas, ke vi celis la plej bonan, onjo, kaj tute tiel estis pri mi kaj la virkato. Ankaŭ ĜIN ĝi bonfartigis. Mi ankoraŭ neniam vidis ĝin tiel kuregi, kiel nun...“

„Nu, foriĝu nun, antaŭ ol vi indignigos min denove. Kaj provu, ĉu vi povos esti bona knabo, almenaŭ unufoje, kaj vi ne devos preni denove iun medicinon.“

Tom antaŭ la komenco de la instruhoroj alvenis en la lernejo. Tiu stranga konduto de tiam estis observebla ĉiutage. Kaj simile de tiam li havis la kutimon vagadi ĉe la pordego de la lerneja korto anstataŭ ludi kun siaj kamaradoj. Li diris, ke li estas malsana, kaj li ankaŭ tiel aspektis. Li provis aspekti, kvazaŭ li rigardas ĉien, sed kien li efektive rigardis estis – la strato. Jen ekaperis Jeff Thatcher, kaj la vizaĝo de Tom heliĝis. Li rigardis momenton al li, sed poste li deturniĝis kun zorgoplena mieno. Kiam Jeff alvenis,

Tom salutis lin kaj spione interparolis kun li pri aferoj, kiuj havas ligan al Becky, sed la rigida knabo, ŝajne tute ne rimarkis la prezentitan logaĵon. Tom observis plu la straton, ĉiufoje kun espero, kiam ekaperis kapriola jupo kaj li ekmalamegis ĉiun jupinon, kiam li ekvidis, ke ŝi ne estas la ĝusta. Fine la lastaj jupoj jam aperis kaj Tom trotis en la malplenan lernejon kaj sidiĝis sur sia loko por suferi tie. Sed tiam ankoraŭ aperis plia jupo kaj la depremita koro de Tom laŭte ekfrapis. En la sekva momento li denove estis ekstere kaj kondutis kiel sovaĝa indiĝeno, li kriis, ridis, ĉasis knabojn, saltis trans la latbarilon, riskis siajn membrojn kaj la vivon, li transkape saltis, staris surkape – li do faris ĉiujn artifaĵojn konatajn al li, kaj dum tio li kaŝeme rigardis perokule, ĉu Becky Thatcher rimarkas lian agadon. Sed ŝi ŝajne tute ne rimarkis ion, ŝi ne rigardis al li. Ĉu povas esti, ke ŝi tute ne rimarkas, ke li ĉeestas? Li translokigis siajn heroaĵojn en ŝian proksimecon, militkrie ĉirkaŭis ŝin, kaptis la ĉapon de knabo, ĵetegis ĝin sur la tegmenton de la lernejo, li baraktiĝis tra grupo de knaboj, tiel, ke ili preskaŭ renversiĝis dekstre kaj maldekstre kaj li falis antaŭ ŝi rekte sur sian nazon, tiel, ke li preskaŭ renversigis ŝin. Sed ŝi deturniĝis malŝate, kun la nazo supren, kaj li aŭdis, kiel ŝi diris: „Fi, kelkaj homoj supozas sin neimageble superaj – tial ili ĉiam devas fanfaroni!“

La vangoj de Tom ruĝigite ekbrulis. Li leviĝis pene kaj ŝtelire foriĝis, tute detruita.

Ĉapitro 13

Tom nun fine decidiĝis. Ke li estas deprimita kaj despera, ke li estas forlasita knabo, li konstatis, kaj ke neniu amas lin; se ili eltrovus, al kio ili pelis lin, ili eble lin ekkompatus. Li ja provis konduti bone kaj repaciĝi kun la aliaj, sed ili tute ne permesis tion al li, ĉar ili estus nur tiukaze kontentaj, se ili estus liberigitaj de li, do, estu tiel. Kaj ili trankvile kulpigu LIN pro la konsekvencoj – ja kial ne? Kiun rajton plendi havas malĝojigito? Jes ja, ili fine pelis lin ĝis tiu punkto: li vivos la vivon de krimulo. Li ne havas alian elektan eblon.

Li jam iris sufiĉe longan distancon sur la *Meadow Lane*, la lerneja sonorilo por la „Ekstaru“ sonadis jam tre mallaŭte al liaj oreloj. Li ploris nun, pensante pri tio, ke li neniam plu aŭdos tiun intiman malnovan sonon, neniam – ĝi estis tre ŝokiga, sed oni devigis tion al li, ĉar li estis forpuŝita en la fridan mondon, li devis submeti sin – sed li pardonis al ili. Poste la larmado superfortis lin.

Ĝuste en tiu momento renkonte venis al li lia konspire ligita anima amiko Joe Harper, kun morna vizaĝo kaj evidente kun granda kaj malluma intenco. Sendube tie estis 'du animoj kun unu sama penso'. Tom viŝis siajn okulojn permanike kaj plorsingulte ekmurmuris ion pri tio eskapi pro maljusta severa traktado kaj pro mankanta simpatio hejme, pri vagado eksterlande tutmonde sen reiri hejmen, kaj la grumblado finiĝis per la espero, ke Joe ne forgesu lin.

Sed montriĝis, ke Joe havis similan deziron rilate al Tom, kaj ke tial li serĉis lin. Lia patrino traktis lin per vergo pro kremo, kiun li tute ne trinkis, ĉar li tute ne sciis ion pri ĝia ekzisto. Per tio fariĝis senduba al Joe, ke ŝi „satis“ pri li kaj volis, ke li foriĝu. Se ŝi sentas tiel, ne restos io krom submetiĝi al ŝia deziro. Li esperis, ke ŝi fariĝu feliĉa kaj neniam bedaŭru, ke ŝi sendis sian kompatindan knabon en la fridan kruelan mondon, kie restos nenio alia al li krom suferi kaj morti.

Kiam la knaboj tiel promenadis plenaj de zorgoj, ili konfirmigis plian kontrakton: ili reciproke volis subteni sin dumeterne kaj esti fratoj kaj neniam apartiĝi ĝis la morto liberigos ilin de ĉiuj turmentoj.

Poste ili interparolis pri siaj planoj. Joe havis la ideon fariĝi ermito kaj vivi de panrandoj en soleca kaverno kaj iam pereji pro frido, mizero kaj aflikteco. Sed aŭskultinte la kamaradon Tom, li devis koncedi, ke la vivo de krimulo ofertas okulfrapajn avantaĝojn, kaj tiel li deklaris, ke li estas preta fariĝi pirato.

Tri mejlojn sude de Sankt-Peterburgo, je loko, kie la Misisipo estis pli ol mejlon larĝa, estis longa, malvasta, arbare priskreskata insulo kun malalta sablobenka je la pinto, kiu taŭgis bonege kiel rendevua albordiĝejo. Ĝi estis sen loĝantoj kaj troviĝis proksime de la alia bordo, kontraŭe al densa, preskaŭ tute ne loĝata arbaro. Tial ili elektis la Insulon de Jackson. Kiu fariĝu la viktimoj de iliaj pirataj entreprenoj, tiuj demando ne leviĝis. Poste ili serĉis la kamaradon Huckleberry Finn, kaj li aliĝis ilin tuj, ĉar por li ĉiu kariero estis samranga, tio ne interesis lin. Ili disiĝis por renkontiĝi je soleca loko norde de la urbeto je la favorata horo – kiu estis noktomezo. Tie troviĝis malgranda floso el arbotrunkoj, kiun ili intencis kaperi. Ĉiu el ili volis kunpreni hokojn kaj fiŝkaptajn ŝnurojn kaj similajn provizaĵojn, kiujn li kapablos ŝteli, kiel eble plej kaŝe kaj mistere, tute tiel, kiel tio decas por laŭorda pirato. Kaj antaŭ ol la posttagmezo pasis, ili ĝissate ĝuis sian estontecan famon per tio, ke ili diskonigis,

ke la urbo sufiĉe baldaŭ „ekaŭdos ion“. Ĉiun el tiuj, kiu ricevis tiun neprecizan sciigon, ili avertis, ke tiu tenu fermita la buŝon kiel mumio kaj atendu.

Ĉirkaŭ noktomezo Tom aperis kun kuirita ŝinko kaj kelkaj bagatelaĵoj kaj haltis en la densa vepro sur malgranda plataĵo de krutaĵo apud la riverego, de kie la renkontiĝejo observeblis bone. Estis stelhela nokto kaj profunda kvieto. La granda rivero ripozis kiel oceano. Tom aŭskultis dum certa tempo, sed neniu sono ĝenis la kvieton. Poste li eksonigis mallaŭtan akran fajfon. Iu malsupre respondis. Tom fajfis ankoraŭ dufoje, kaj denove eksonis la sama respondo. Poste diris mallaŭta voĉo:

„Kiu tie?“

„Tom, Nigra Venĝulo de la hispana mararmeo. Sciigu viajn nomojn.“

„Huck Finn, Sangomano, kaj Joe Harper, Teroro de l' Maroj.“ Tom prenis la nomojn el siaj plej preferataj libroj.

„En ordo, diru la kontraŭvorton.“

Du raŭkaj frustrantaj voĉoj sendis la teruran vorton samtempe en la sombran nokton.

„Sango!“

Tom de la plataĵo lasis fali sian ŝinkon sur la krutaĵon kaj poste glitante sekvis, damaĝante per tio kaj al siaj vestoj kaj al sia haŭto. Estis oportuna vojo malsupre de la krutaĵo, sed mankis al ĝi malfacilaĵoj kaj danĝeroj, kiujn pirato tiom ŝatas, tial ĝi estis ekster ĉia konsidero.

Teroro de l' Maroj kunprenis tutan lardo flankon kaj dum la alportado preskaŭ tute elĉerpiĝis. Finn, nomata Sangomano, ŝtelis paton kaj krome porcion da duone maturita foliotabako kaj kelkajn maizospadikojn, el kiuj oni povas fari pipojn. Krom li neniu el la piratoj fumis aŭ „maĉis“ tabakon. Nigra Venĝulo de la hispana mararmeo diris, ke ne havas sencon komenci la aferon sen fajro. Tio estis saĝa penso, en tiu tempo alumetoj estis preskaŭ tute nekonataj. Sur granda floso troviĝanta laŭflue en distanco de cent metroj, ili vidis glimantan fajron, ili

ŝteliris tien kaj havigis ŝtipon. Ili faris el tio impresan aventuron, diris denove kaj denove „Ŝŝ! kaj subite haltis, kun fingro metata sur la buŝon, svingante tien kaj tien imagatan ponardon kaj flustris timigajn ordonojn, ke tiukaze, se la „malamiko“ ekmoviĝos, li sentu ĝin ĝis la tenilo, ĉar mortuloj ne parolas“. Ili sciis tre bone, ke ĉiuj flosistoj estas en la urbeto por aĉeti aŭ drinki ion.

Poste ili depuŝiĝis. Tom komandis ilin. Huck staris je la malantaŭa rudro kaj Joe ĉe la antaŭa rudro. Tom staris en la mezo de la flosa, kun grumbla mieno kaj krucitaj brakoj kaj donis kun sevcera flustrotono siajn komandojn:

„Lofu!“

„En ordo, en ordo, Siro!“

„Tenu nun la kurson, te-e-e-nu!“

“Kurso tenate, Siro!“

„Ŝanĝu kurson je unu streketo malpli!“

„Streketo malpli farite, Siro!“

Kiam la knaboj drivigis la floson konstante kaj sekure al la riveromezo, ne estis dubo, ke Tom donis la komandojn nur pro „stilaj kaŭzoj“, kaj ke li ne celis ion specialan.

„Kiuĵ veloj estas hisitaj?“

„Antaŭ- kaj topvelo kaj la ekstera ĵibo, Siro.“

„Hisu la reĝvelojn. Ek, malrefu ilin supre, ses da viroj – kaj ek al la antaŭtopmastflankveloj, viglu do!“

„En ordo, en ordo, Siro!“

„La grandan bramvelon enventigu, ŝnurojn kaj brasojn! Ek, koramikoj!“

„En ordo, en ordo, Siro!“

„Tenu vin lee, tute baborde! Baborde! Baborde! Kaj

atentu, tenu vin bone, se ĝi venos! Baborde!
Baborde! NUN, viroj! Streĉu vin! „Tenu nun la
kurson!“

“Kurso tenate, Siro!“

La flosa drivis al la mezo de la rivero. La knaboj rektigis la pinton de la flosa en la ĝusta direkto kaj poste entiris siajn remilojn. La rivero ne havis altan nivelon, tiel ke la fluo ne estis pli rapida ol du ĝis tri mejloj dumhoro. Dum la sekvaj tri kvaronoj de horo apenaŭ vorto estis parolata. Tiam la flosa preterdrivis laŭ la sufiĉe fora urbeto. Du aŭ tri glimantaj lumoj montris, kie ĝi troviĝas, pace dormanta, transe de la svaga ondado de la stelornamita akvo, kies enloĝantoj ne sciis ion pri la kolosa afero, kiu okazas. Nigra Venĝulo ankoraŭ tiumomente staris kun krucitaj brakoj, „rigardante lastan fojon“ sur la scenejon de siaj iamaj ĝojoj kaj de la lasttempaj suferoj, kaj li deziris, ke ŝi povus vidi lin tiumomente, eksterlande sur sovaĝa maro fronte de danĝero kaj morto, renkonte irante kun sentima koro kaj sinistra rideto al sia perejo. Estis nur malgranda streĉo por li ŝovi en la imago la Insulon de Jackson ekster la vidddistancon de la urbeto, kaj tial li „rigardis lastan fojon“ malantaŭen kun rompita kaj kontentigita koro. Ankaŭ la aliaj „rigardis lastan

fojon“. Kaj ili ĉiuj rigardis tiom longe, ĝis kiam la fluo preskaŭ forpelis ilin el la viddistanco de la insulo. Sed ili ekkonis la danĝeron ĝustatempe kaj deturniĝis por eviti tion. Je la dua matene la flosa albordiĝis sur la sablejo ducent jardojn super la insulopinto, kaj ili vadis tien kaj reen, ĝis kiam ili havis sian frajton sur la insulo. Al la malgranda flosa apartenis ankaŭ malnova velo, kaj tiun ili metis super breĉon de arbustoj tiel, ke ili havis tendon por la provizaĵoj. Ili mem volis dum favora vetero dormi sub la libera ĉielo, kiel tio decas por eksterleĝuloj.

Ili ekbruligis fajron apud granda arbotrunko, kiu troviĝis dudek aŭ tridek paŝojn malproksime de la tenebra interno de la arbaro. Kaj ili fritis en pato iom da lardo kaj manĝis duonon de la kunportitaj maizspadikoj, kiujn ili kunportis. Estis granda plezuro tiel sovaĝe kaj libere aranĝi festetan manĝon en la netuŝita arbaro de neesplorita kaj neposedata insulo, malproksime de la trudiĝemo de la homoj, kaj ili diris, ke ili neniam reiros al la civilizita mondo. La alten grimpanta fajro prilumis iliajn vizaĝojn kaj ĵetis sian ruĝan brilegon sur la kolonarbojn de ilia arbartemplo kaj sur la lakece rebrilantan foliaron kaj la festetajn grimplantajn girlandojn.

Kiam estis manĝitaj la lasta krispa lardopeceto kaj la

lasta rostita maizspadiko, ili sternis sin sur la herboj, tute kontentaj. Ili estus povintaj serĉi pli fridgetan lokon, sed ili ne volis rezigni pri tia romantika specialaĵo, kia estas bivakfajro.

„Ĉu tio ne estas gaja?“ diris Joe.

„Tio estas frenezo!“ diris Tom. „Kion la knaboj dirus, se ili povus vidi nin?“

„Diri, ĉu? Nu, ili estus pretaj morti por esti ĉi tie – he, Huckĉjo!“

„Mi konsentas“, diris Huckleberry, „ĉiukaze tio plaĉas al mi. Mi pensas, ke nenio estas pli bona ol tio. Mi neniam ricevas sufiĉe da manĝo, kutime. Kaj ĉi tien neniu povas veni por ĉikani kaj tirani iun.“

„Tiel la vivo plaĉas al mi“, diris Tom. „Matene oni ne devas ellitiĝi, kaj oni ne devas frekventi lernejon kaj lavi sin kaj fari ĉiujn tiujn damnitajn stultaĵojn. Sciuj, pirato devas fari NENION AJN, Joe, kiam li estas sur firma tero. Sed tia ermito devas preĝi konsiderinde, kaj krome li tute ne havas iun plezuron, ĉar li ĉiam

estas sola laŭ sia maniero.“

„Jes, vi pravas, estas tiel“, diris Joe, sed pri tio mi ne cerbumis multe. Komprenu. Ankaŭ mi multe pli volonte volas esti pirato, nun, kiam mi provis tion.“

„Nu“, diris Tom, „homoj nun ne plu tiom entuziasmas pri ermitoj, kiel ili faris tion en malnovaj tempoj. Sed piraton oni respektas ĉiam. Kaj ermito devas dormi sur la plej dura loko, kiun li povas trovi kaj vesti sin per sako kaj meti cindron sur sian kapon kaj ekstere stari en la pluvo, kaj...“

„Kial li vestas sin per sako kaj metas cindron sur sian kapon?“ pridemandis lin Huck.

„Mi ne scias. Sed ili DEVAS fari tion. Ermitoj faras tion ĉiam tiel. Ankaŭ vi devus fari tion, se vi estus ermito.“

„La diablo forportu min, se mi farus tion!“ diris Huck.

„Nu, kion farus vi?“

„Mi ne scias, sed ne tion...”

„Sed Huck, se vi DEVUS fari tion, kiel vi elturniĝus?”

„Nu, mi simple ne akceptus tion, mi forkurus.”

„Forkuri, ĉu?” Nu, vi ja eble estus vera fuŝversio de ermito. Vi estus malhonorindulo.”

Sangomano ne respondis, ĉar li havis pli bonan okupon. Li ĵus malplenigis maizspadikon kaj nun adaptis kanotigon al ĝi. Li plenigis ĝin per tabako kaj premis pecon de la bivaka ardaĵo al ĝi kaj elpuŝis aroman fumnubon. Li troviĝis en la kulminopunkto de luksa kontenteco: Ambaŭ aliaj piratoj enviis lin pri tiu majesta malvirto kaj decidis sekrete, baldaŭ mem fumi tiel. Post certa tempo diris Huck:

„Kiujn okupojn havas piratoj?”

Tom respondis:

„Ho, ili havas ĝuste drastan tempon – ili kaperas ŝipojn kaj bruligas ilin kaj alpropriigas monon kaj enfosas ĝin en mornaj lokoj sur sia insulo, kie estas fantomoj, kiuj gardas la trezorejojn, kaj ili pikmortigas ĉiun sur la kaperitaj ŝipoj kaj ŝovas la kadavrojn sur planko maren.“

„Kaj ili kunprenas la inojn al la insulo“, diris Joe, „la inojn ili ne pikmortigas.“

„Ne“, konfirmis Tom, „ili ne mortigas inojn. Ili estas tro noblaj por io tia. Kaj la inoj estas ĉiam belaj.“

„Kaj kiajn grandiozajn vestojn ili surhavas! Kun amaso da oro kaj arĝento kaj brilantoj“, diris Joe, kun entuziasmo.

„Kiu?“ demandis Huck.

„Nu, la piratoj.“

„Huck raste rigardis kiel desperulo siajn proprajn vestojn.“

„Mi supozas, ke mi ne havas decajn vestojn kiel pirato, sed mi havas neniujn aliajn, krom tiuj“, li diris kun bedaŭra patoso.

Sed la aliaj knaboj, rakontis, ke li sufiĉe baldaŭ ricevos la ĝustajn vestojn, post kiam ili estos komenciĝintaj iliajn aventurojn. Ili klarigis al li, ke liaj trivitaj vestoj komence estas sufiĉaj, kvankam estas la kutimo por riĉaj piratoj komenci kun taŭgaj vestoj.

Iom post iom ilia interparolado silentiĝis kaj laco metis sin sur la palpebrojn de la junaj senhejmuloj. La pipo malsuprenglitis de la manoj de Sangomano kaj li dormis la dormon de la senkonsciuloj kaj laculoj. Teroro de la Maroj kaj Nigra Venĝulo de la hispana mararmeo ne tiel facile endormiĝis. Ili diris siajn preĝojn interne kaj kuŝante, ĉar tie estis neniu, kiu aŭtoritate surgenuigis ilin kaj recitigis ilin laŭte. Plej prefere ili tute ne volis preĝi, sed ili tamen timis troigi la aferon, ĉar ilin eble trafus kolera fulmo el la ĉielo. Poste ili subite preskaŭ endormiĝis, sed tiam aperis entrudulo, kiu ne lasis „subigi“ sin. Estis ilia konscienco. Ili eksentis nekonkretan timon, ke ili agis malĝuste, ĉar ili forkuris, kaj poste ili pensis pri

la ŝtelita manĝo kaj per tio komenciĝis la efektivaj torturoj. Ili provis argumenti kontraŭ la konscio, ke ili ŝtelis dolĉaĵojn kaj pomojn ofte. Sed la konscio ne estis pacigebla per tiaj pretekstaj elturniĝoj. Fine ŝajnis al ili, ke ne estas eble ĉirkaŭiri la obstinan fakton, ke alproprigi dolĉaĵojn estas simple ŝteli ilin. Kaj la kunprenado de lardo kaj ŝinko kaj de similaj valoraĵoj estis tute simple ŝtelado – kaj kontraŭ tio ekzistas ordono de Dio en la Biblio. Tial ili interne decidis, ke tiom longe, kiom ili estos en la negoco, ilia pirata vivo ne estu ankoraŭfoje makulita per krimo de ŝtelado. Poste la konscienco permesis provizoran militpaŭzon, kaj la strange ŝanceliĝemaj piratoj endormiĝis pace.

Ĉapitro 14

Kiam Tom vekiĝis matene, li miris, kie li estas. Li sidiĝis, frotis la okulojn kaj ĉirkaŭrigardis. Poste li ekkomprenis. Estis frida griza sunleviĝo. Kaj en la naturo troviĝis delikata sorĉo pri ripozo kaj paco, kiu penetris tra la kvieto kaj la silento de la arbaro. Neniu folieto moviĝis, neniu sono ĝenis la grandan meditado de la naturo. Je la folioj kaj herboj pendis rosogutoj. Blanka cindrotavolo kovris la fajron kaj svelta blueca fumfadeni leviĝis rekte en la aeron. Joe

kaj Huck ankoraŭ dormis.

Tiumomente malproksime en la arboj vokis birdo, alia respondis. Baldaŭ aŭdeblis la frapado de pego. Iom post iom heliĝis la frida profunda grizo de la mateno, kaj simile multiĝis la sonoj kaj vivo prezentis sin. La mirinda naturo deskuis la dormon kaj komencis disfaldi sin mem al la kontempla knabo. Malgranda raŭpo proksimiĝis rampante sur rosfolio, levis de tempo al tempo sian korpon je du trionoj kaj „flaradis“. Poste ĝi moviĝis plu, ĉar ĝi mezuris ion, kiel trovis Tom. Kiam la raŭpo proksimiĝis propravole, Tom sidis senmove, kiel ŝtono. Lia espero alterne pliiĝis aŭ malpliiĝis, kiam la besto aŭ proksimiĝis al li aŭ ŝajne iris ien ajn. Sed kiam laste la besto cerbumis pri la afero, pendante per kurbiĝanta korpo en la aero, dum dolorplena momento, kaj poste rampis decidite sur gambon de Tom kaj komencis vojaĝon sur ĝi, la tuta animo de Tom estis beata – ĉar tio signifis, ke li ricevos novan veston – tute sendube – luksan piratan uniformon. Jen aperis de ie procesio de formikoj kaj okupiĝis pri sia laboro. Unu el ili trenis per siaj brakoj kuraĝe mortan araneon, kiu estis kvinoble pli granda ol ĝi mem kaj tiris ĝin sur arbotrunkon. Brune makulita kokcinelo grimpis sur la kapturnigan alton de tranĉe akra rando de herbo, kaj Tom kliniĝis al ĝi kaj diris:

„Kokcinel', kokcinel', flugu ĝis hejme, via domo
brulas, infanoj solas ene.“

Kaj la insekto ekflugis por certigi sin pri tio, kio ne estis surprizo por la knabo, ĉar li sciis, ke kokcino facile fidus al onidiroj pri incendioj. Kaj li uzis tiun simplanimecon pli ol nur unufoje. Sterkoskarabo venis poste, kuraĝe ĝi levadis sian kuglon. Tom tuŝis la beston por vidi kiel ĝi almetos la krurojn kaj pretendas esti morta. La birdoj bruadis tiumomente jam sufiĉe laŭte. Mokturdo sidiĝis en arbo super la kapo de Tom kaj imite triladis entuziasme ebrie siajn najbarojn. Poste kun kriĉa krio ĵetiĝis garolo malsupren, kiel blua fulmo, kaj haltis en branĉo en kaptodistanco de la knabo, turnis sian kapon flanken kaj rigardis la fremdulojn kun grandega scivolo. Alkuris griza sciuro kaj ties granda sciurkamarado, kiu estis ruĝa kiel vulpo, sed ili ĉiam denove haltis por inspekti la knabojn kaj por paroli al ili, ĉar la sovaĝaj bestoj ŝajne neniam vidis homon kaj apenaŭ sciis, ĉu oni timu aŭ ne timu ilin. La tuta naturo estis tiam tute vekiginta; proksime kaj malproksime longaj lancoj el sunlumo penetris tra la densa foliaro kaj alflirtis kelkaj papilioj.

Tom vekis la aliajn piratojn kaj kun brua kriad
forkuris, kaj post unu aŭ du minutoj ili estis nudaj
kaj petoladis reciproke stumbligante sin en la
malprofunda klara akvo sur la sablejo. Ili ne sopiris
la malgrandan urbeton, kiu dormis transe de la
majesta vasto de akvo. Neregula fluo aŭ facila leviĝo
de la akvo fordrivigis ilian flosan, sed tio kontentigis
ilin, ĉar per tio la lasta ponto inter ili kaj la civilizita
mondo estis kvazaŭ forbruligita.

Ili revenis mirinde refreŝigitaj kaj manĝegemaj al la
kampadejo; kaj baldaŭ la fajro denove ekflamiĝis.
Huck trovis fonton kun klara frida akvo. La knaboj
faris el kverkaj kaj hikoriaj folioj trinkujojn, kaj la
akvo dolĉigita de la sorĉo de la arbara sovaĝo, ŝajnis
al ili sufiĉe bona anstataŭaĵo por kafo. Kiam Joe
detranĉis lardopecojn, Tom kaj Huck petis lin atendi
dum minuto, ili iris al multpromesa niĉo ĉe la bordo
kaj elĵetis siajn fiŝhokajn ŝnurojn. Preskaŭ tuj ili
ricevis siajn rekompencojn. Joe ne havis tempon
fariĝi senpacienca, ĉar ili jam revenis kun kelkaj
laŭordaj riveroperkoj kaj malgranda katfiŝo – sufiĉe
da manĝo por tuta familio. Ili fritis la fiŝojn kun lardo
kaj miris, ĉar neniam antaŭe iu fiŝo gustis tiom
delikatege. Ili ne sciis, ke fiŝoj el dolĉa akvo gustas ju
pli bone, des pli rapide ili retroviĝas post kaptiĝo sur
fajro; kaj ili pensis apenaŭ pri tio, kian spicon donas

– dormado sub libera aero –petolado enaere, naĝado kaj ankaŭ granda ingredienco da malsato.

Post la matenmanĝo ili sternis sin en la ombro, dum Huck fumis pipon, kaj poste ili foriris en la arbaron por entrepreni esploran ekspedicion. Ili trotis gaje antaŭen, trans putrajn arbojn, tra interkroĉita subbarajaĵo, preter gravmienaj monarkaj arboj de la arbaro, kiuj estis pripendataj de la kronoj ĝis la tero per insignaro el vitoj. Tie kaj tie ili ekvidis komfortajn niĉojn kovritajn de herbotapiŝoj kaj ornamitajn per juveloj el blankaj floroj.

Ili trovis multajn aĵojn, kiuj ĝojigis ilin, sed nenion, kio ilin miregigis. Ili malkovris, ke la insulo estas ĉirkaŭ tri mejlojn longa kaj kvaronon de mejlo larĝa, kaj, ke ĝi estas disigita de la pli proksime situanta bordo nur per malvasta kanalo, kiu apenaŭ ducent jardojn larĝas. Ili naĝis unufoje ĉiuhore, kaj tial ili revenis al la kampadejo nur posttagmeze. Ili estis tro lacaj por kapti fiŝojn, sed ĝuis luksan festetomanĝon el frida ŝinko kaj sidiĝis enombre por interparoli. Baldaŭ la interparolado fariĝis pli kaj pli tenaca, kaj fine ĝi tute haltis. La kvieto, la soleno, kiuj ŝarĝis la arbaron, kaj la sento pri soleco, komencis influi la animojn de la knaboj. Ili fariĝis pripensemaj. Necerta sopiro ekkupis ilin kaj baldaŭ alprenis ombrecan

formon – estis komenciĝanta hejmsopiro. Eĉ Finn, Sangomano, ekrevis pri domenirejoj kaj vakaj bareloj. Sed ili ĉiuj hontis pri siaj malfortecoj, kaj neniu el ili estis sufiĉe kuraĝa paroli pri siaj pensoj.

Jam dum certa tempo la knaboj nur parte konscie perceptis bizarajn sonojn en la foro, ĝuste tiel, kiel oni aŭdas de tempo al tempo la tiktakon de horloĝo, kiun oni apenaŭ rimarkas. Sed iom post iom la misteraj sonoj fariĝis pli kaj pli laŭtaj kaj devigis ilian rekonon. La knaboj leviĝis, rigardis sin reciproke, kaj tiam ĉiu ekaŭskultis, kio montriĝis je pozoj. Sekvis longa neinterrompita silento kaj poste aŭdeblis obtuza tondrobato veninta el la foro, kiu iris trans la akvon.

„Kio estas tio?“ Joe vokis nelaŭte.

„Ankaŭ mi scivolas“, flustris Tom.

„Tio ne estas tondro“, Huckleberry diris timeme, ĉar tondro...“

„Aŭskultu!“ diris Tom. „Aŭskultu, ne parolu!“

Ili atendis dum tempo, kiu ŝajne estis vivolonga, kaj tiam la sama obtuzigita tondrobato ripetiĝis kaj denove ĝenis la solenan kvieton.

„Kunvenu, por rigardi tion.“

Ili saltis sur la piedojn kaj rapide kuris al la bordo ĉe la urbetoflanko. Ili disŝovis la arbustojn kaj fikse rigardis trans la akvon. La malgranda vaporpramŝipo drivis ĉirkaŭ mejlon antaŭ la urbeto kun la fluo. Ĝia larĝa ferdeko ŝajne plenis de homoj.

Proksime de la pramŝipo estis multaj remboatetoj sur la rivero kaj drivis kun la fluo en la najbareco de la pramŝipo, sed la knaboj ne povis ekkoni, kion la viroj faras en ĝi. Subite pafiĝis blanka fumkolono el flanko de la pramŝipo, kaj kiam ĝi disvastiĝis kaj grimpis en pigreca nubo lante supren, penetris denove la sama obtuza tondrobato al iliaj oreloj.

„Nun mi scias, pri kio temas!“ ekkriis Tom. „Iu dronis.“

„Vi pravas!“ diris Huck. „Tion ili faris ankaŭ en la lasta somero, kiam Bill Turner dronis; ili pafis kanonon trans la akvon kaj tio kondukis lin al la akvosurfaco. Jes, kaj ili prenis panojn kaj enmetis hidrargon kaj drivigis ilin. Kaj kie estis droninto, tien ili moviĝis kaj haltis ĉe tiu loko.“

„Jes, mi aŭdis pri tio“, diris Joe. „Mi demandas min kiel la panoj trovas ion tian.“

„Nu, mi pensas, ke ne estas tiom la pano“, diris Tom, „mi supozas, ke estas antaŭ ĉio tio, kion ili DIRIS al la pano, antaŭ ol ili ekdrivigis ĝin.“

„Sed ili diris nenion al la pano“, diris Huck, „mi vidis ilin, ili diris nenion.“

„Tio estas ja gaja“, diris Tom. „Sed eble ili murmuris mallaŭte ion al si mem. KOMPREENBLE ili faris tion. Tion scias ja ĉiu.“

La aliaj knaboj konsentis, ke la argumento de Tom estas konvinka, ĉar nescianta peco da pano sen gvidado de sorĉdiro apenaŭ sufiĉe inteligentas por

plenumi tian gravan taskon.

„Ho, mi volonte estus tie“, diris Joe.

„Ankaŭ mi“, konsentis Huck. „Mi donus multon por ekscii, kiu estas la droninto.“

La knaboj aŭskultis kaj observis plu. Subite Tom havis kaplumigan ideon kaj vokis:

„Kamaradoj, mi scias, kiu dronis...ni!“

Per unu fojo ili sentis sin kvazaŭ herooj. Kia mirinda triumfo! Oni sentas ilian foreston; oni funebras pro ilia foresto, koroj rompiĝas pro ili, ploroj estas verŝitaj, leviĝas akuzantaj riproĉaj memoroj pri la malafableco al tiuj kompatindaj perditaj buboj, kaj oni sindonis al vanaj bedaŭroj kaj pentoj; sed la plej bona el ĉio estis, ke la foririntoj estis la temo de la interparoladoj en la tuta urbo, kaj ĉiuj knaboj enviis ilin, kiam la temo estis ties rava renomo. Tio estis bonega. Indis do tamen la penon esti pirato.

Kiam la krepusko proksimiĝis pli kaj pli, la pramŝipo

denove komencis sian kutiman negocon kaj la remboatetoj malaperis. La piratoj reiris al la kampadejo. Ili jubilis vante pri sia nova moŝteco kaj la enormajn klopodojn, kiujn ili kaŭzis. Ili kaptis fiŝojn, kuiris la vespermanĝon kaj manĝis. Poste ili sindonis al supozoj, pri kio pensas la urbetaj loĝantoj, kaj kion ili diras; la bildoj pri la ĝenerala aflikteco pro ili, kiujn ili pentris en siaj imagoj, estis kontentigaj – laŭ iliaj vidpunktoj. Sed kiam la noktaj ombroj ekkovris ilin, iom post iom silentiĝis ilia interparolado. Ili sidis ĉe la bivakfajro kaj fikse rigardis la flamojn. Sed iliaj pensoj evidente migris en ĉiuj direktoj. La ekscito estis pasinta, kaj Tom kaj Joe devis pensi pri certaj personoj hejme, al kiuj la grandega petola plezuro ne tiom plaĉas, kiom al ili. Duboj leviĝis, ili fariĝis afliktitaj kaj malfeliĉaj; ĝemo aŭ du eskapis ilin, sed ili ne rimarkis tion. Post iom da tempo riskis Joe timeme etendi „la palpilojn“, kion la aliaj pensus pri eventuala reveno en la civilizitan mondon – kompreneble ne tuj, sed...

Tom kvazaŭ ŝrumpigis lin per mokokaskado! Huck, kiu ĝis tiu momento ankoraŭ ne decidiĝis, aliĝis la partion de Tom. Kaj la ŝanceliĝemulo rapide donis „klarigojn“, li ĝojis, ke li povas elturniĝi sen tio, ke tro kroĉos sin la manko de kokidkora hejmsopirulo al liaj vestoj.

La ribelo efektive estis subigita momente.

Kiam la vespero fariĝis malhela, Huck ekdormis kaj baldaŭ ronkis. Joe sekvis lin. Tom senmove kuŝis apogite sur la kubutoj dum certa tempo, observante intense la du aliajn. Laste li leviĝis atenteme sur la genuojn kaj komencis serĉi ion ĉe la flagranta lumo de la bivakfajro. Li levis supren kaj inspektis kelkajn duoncilindrojn el la svelta blanka ŝelo de platano kaj elektis du, kiuj ŝajnis taŭgaj. Poste li surgenuigis sin ĉe la fajro kaj pene skribis per sia „ruĝa plumo“, do per sia fragmento de briko sur ĝi. Iun el la ŝelopecoj li kunruligis kaj metis ĝin en sian jakopoŝon, kaj la alian li metis en la ĉapon de Joe kaj forŝovis ĝin iom de ĝia posedanto. Kaj krome li metis al ĝi ankoraŭ kelkajn lernejknaĵajn trezoraĵojn, kies valoroj preskaŭ estis tro karaj por povi taksi ilin — inter ili peco da kreto, barata kaŭĉukpilko, tri fiŝhokoj, kaj unu el tiaj virtrokugletoj, kiaj preskaŭ tute certe estas el „aŭtentika kristalo“. Poste li atenteme forŝteliĝis inter la arboj, ĝis kiam li sentis sin ekster aŭdodistanco, kaj ekkuris al la sablejo.

Ĉapitro 15

KELKAJN minutojn poste Tom estis en la neprofunda akvo de la sablobenko kaj vadis en la direkto de la Ilinojo-bordo. Antaŭ ol la akvo pro la profundo atingis liajn koksojn, li jam estis irinta duonon de la distanco. La fluo tiam komencis malebligi la vadadon, kaj tial li mergiĝis konfide en la flulon por naĝi la restintajn sepdek kvin metrojn. Li naĝis kontraŭ la fluo, sed la fluo drivigis lin je pli da distanco ol li atendis. Fine li atingis la bordon kaj lasis kunpreni sin de la fluo, ĝis kiam li trovis neprofundan lokon, kie li tiris sin sur la bordon. Li pripalpis sian jakopoŝon, la ŝelopeco ankoraŭ enestis sekure. Poste li marŝis tra la arbaro, sekvante la bordon, kun malsekaj gutantaj vestoj. Iom antaŭ la dudekdua li venis al senarbejo kontraŭe al la urbeto kaj ekvidis la pramŝipon troviĝantan en la ombroj de la arboj kaj enombre de la alta riverbordo. Ĉio estis kvieta sub la brilaj steloj. Li rampis malsupren de la bordo, ĉirkaŭrigardis atenteme, glitis en la akvon, naĝis tri aŭ kvar brakmovojn kaj grimpis pobe de la pramŝipo en la fiksitan remboateton, kiu estis uzata por „jolo“-servo. Li sternis sin sub remista benko kaj atendis, senspire.

Baldaŭ klake ekfrapetis la fendohava sonorilo, voĉo donis la komandon: „Debordiĝu!“ Unu aŭ du minutojn poste la pruo de la remboateto kvazaŭ baŭmis kontraŭ la poba ondego kaj la vojaĝo komenciĝis. Tom ĝojis pri sia sukceso, ĉar li sciis, ke tio estas la lasta ŝipveturo je tiu vespero. Post longaj dek du aŭ dek kvin minutoj la ŝovelilradoj haltis, kaj Tom glitis el la boateto kaj naĝis en la malhelo al la bordo. Li surbordiĝis laŭflue kvindek jardojn pli poste, ekster la danĝero renkonti eventuale iujn eblajn postrestintojn.

Li kvazaŭ flugis tra senhomaj ŝoseoj kaj baldaŭ troviĝis antaŭ la latbarilo malantaŭ la domo de sia onklino. Li transgrimpis ĝin kaj proksimiĝis al la L-forma angulo de la domo kaj la alkonstruaĵo kaj rigardis internen al la loĝoĉambra fenestro, ĉar tie lumis lumo. Tie kunsidis onklino Polly, Sid, Maria kaj la patrino de Joe Harper kaj interparolis. Ili sidis ĉe la lito kaj tiu estis inter ili kaj la pordo. Tom iris al tiu pordo kaj levis atenteme la riglon. Poste li premis softe la pordon ĝis kiam ĝi malfermiĝis je fendeto, li daŭrigis softe puŝi la pordon kaj tremis dum ĉiu knarado, ĝis kiam li pensis, ke li povas trarampi surgenue. Li ŝovis sian kapon internen kaj rampis atenteme malrapide antaŭen.

„Kial la kandelo tiom flagras?“ demandis onklino Polly.

Tom rapidis. „Nu, la pordo ŝajne malfermiĝis. Jes, kompreneble. La strangaj aferoj ne finiĝas momente. Ekiru kaj fermu ĝin, Sid.“

Tom malaperis sub la lito ankoraŭ ĝustatempe. Li kuŝis tie dum certa tempo kaj „aerumis“ sin mem per spirado, kaj poste li rampis tiom proksime al onklino Polly, ke li preskaŭ povis tuŝi ŝiajn piedojn.

„Sed, kiel mi diris“, diris onklino Polly, „li ne estis MALBONA, por diri tion foje tiel, nur pet---O---la. Nur frivola, kaj plena de stultaĵoj encape, li ne havis pli da komprenemo ol ĉevalido. Li neniam celis ion malican, kaj li estis la plej bonkora knabo, kiu iam ajn ekzistis.“ — ŝi komencis plori.

„Estis simile pri mia Joe – li estis ĉiam plena de diablaĵoj, kaj preta por ĉiu petolaĵo, sed li estis tiom neegoisma kaj karega, kiom povis esti nur li – kaj, dio mia, jen mi iris al li, ĉar li prenis la kremon, kaj vangofrapis lin, tute ne rememorante, ke mi mem

forĵetis ĝin, ĉar ĝi estis acida, kaj nun mi neniam denove revidos lin en tiu ĉi mondo, neniam, neniam, neniam, mi ne revidos mian kompatindan fi-traktitan knabon!“ Kaj sinjorino Harper tiom plorsingultis kvazaŭ ŝia koro disrompiĝus.

„Mi esperas, ke Tom fartas pli bone tie, kie li estas nun“, diris Sid, „sed, se li iel estus estinta iom pli bona...“

„SID!“ Tom fakte sentis la brilegon en la okuloj de la maljuna damo tiel, kvazaŭ li vidus ĝin. „Neniu vorto kontraŭ Tom, nun, kiam li estas forpasinta! Dio zorgos pri LI, pri tio ne afliktiĝu, SIRO! Ve, sinjorino Harper, mi ne scias, kiel mi povus rezigni pri li! Li tiom konsolis min, kvankam li tiom ofte turmentis mian maljunan koron.“

„La Eternulo donas, kaj la Eternulo prenas, la nomo de la Eternulo estu benata! Sed ĝi estas tiel malfacile eltenebla – ve, estas tiel malfacile! Nur je la lasta sabato mia Joe diskrevigis petardon rekte sub mia nazo, kaj mi vangofrapis lin tiel, ke li tuj sternis sin. Mi apenaŭ povis scii, kiel rapide – Aĥ, se li farus tion ankoraŭfoje, mi brakumus kaj benus lin pro tio.“

„Jes, jes, jes, mi pensas tiel, kiel vi sentas tion, sinjorino Harper. Mi scias tute precize, kion vi sentas. Nur hieraŭ tagmeze Tom tute plenigis la virkaton per dolorforigilo, kaj mi pensis, ke la besto detruos la tutan domon. Dio, pardonu al mi, mi frapetis la kapon de Tom per fingroĉapeleto, kompatinda knabo, kompatinda morta knabo. Sed nun li estas trans ĉiuj turmentoj, sed la lastajn vortojn, kiujn mi aŭdis de li, estis lia riproĉo...”

Sed tiu memoro estis tro multe por la maljuna damo, kaj ŝi kvazaŭ kunrompiĝis. Tom tiumomente mem devis plorgemi – eĉ pli pro kompatato pri si mem ol pri iu alia. Li povis aŭdi kiel Maria ploras kaj de tempo al tempo diras ion favoran pri li. Tial li ekhavis pli noblan opinion pri si ol li iam havis antaŭe. Tamen li estis sufiĉe tuŝita pri la malĝojo de la onklino, ke li plej prefere saltus kiel sago el sub la lito kaj superŝutus ĝin per ĝojo – la teatra grandiozeco de la afero estis pro lia karaktero forta defio por li, sed li rezistis kaj kuŝis senmove.

Li aŭskultis plu kaj kunigis el probablecoj kaj faktoj, ke oni komence konjektis, ke la knaboj dronis dum ili naĝis. Poste oni trovis, ke la floseto mankas. Poste diris kelkaj knaboj, ke la perditoj promesis, ke la urbo sufiĉe baldaŭ „ekaŭdos ion“. La ruzuloj

„kunmetis tion kaj tion“ kaj decidis, ke la knaboj foriris sur tiu flosa kaj baldaŭ aperos en la sekva posta urbo. Sed ĉirkaŭ tagmezo oni trovis la flosan, ĝi firmopinĉiĝis je la Misurio-bordo, kvin aŭ ses mejlon sude de la urbeto – kaj poste la espero mortis; ili devis esti dronintaj, aliokaze la malsato estus pelinta ilin hejmen plej malfrue ĉe la komenco de la malhelo, se ne eĉ pli frue.

Oni supozis, ke ili malsukcesis pri la serĉado de la knaboj nur tial, ĉar ilia dronado okazis en la mezfluo de la rivero, ĉar la knaboj kiel bonaj naĝantoj aliokaze certe estus eskapintaj borden. Tio estis la aktuala situacio merkrede matene. Se la kadavroj ne troviĝus ĝis dimanĉo, oni rezignus pri ĉiu espero, kaj la funebraj ceremonioj inklude de la preĝoj okazos je tiu mateno. Tom ekstremis. Sinjorino Harper diris plorĝeme: „Bonan nokton“ kaj turnis sin por foriri. Ambaŭ senknabigitaj damoj je komuna impulso ankoraŭfoje brakumis sin reciproke kaj elkore plorante konsolis sin reciproke, kaj poste ili dispartiĝis. Onklino Polly diris al Sid kaj Maria pli tenere ol ŝi intencis: „Bonan nokton.“ Sid iom snufis kaj Maria foriris elkore plorante.

Onklino Polly surgenuiĝis kaj preĝis tiel kortuŝe por Tom, tiom petegante kaj kun tioma senmezura amo

en siaj vortoj kaj per maljuna tremanta voĉo, ke li banis sin denove en larmoj, longe antaŭ ol ŝi finis sian preĝadon.

Li devis esti kvieta ankoraŭ dum certa tempo, post kiam ŝi enlitiĝis, ĉar ŝi ĉiam denove eligis elkorajn ĝemojn kaj maltrankvile turniĝadis tien kaj tien. Sed laste ŝi estis kvieta, nur iom ĝemanta dum la dormado. Nun la knabo elrampis el sub la lito, leviĝis iom post iom ĉe la litorando, kovris la kandelan lumon permane, kaj starante rigardis ŝin. Lia koro estis plena de kompatato pri ŝi. Li eltiris sian platanan kunrulaĵon kaj lokigis ĝin ĉe la kandelo. Sed venis ideo al li, tial li prokrastiĝis dum konsidero. Lia vizaĝo pli heliĝis, kiam li trovis bonan solvon en sia penso, li metis la kunrulitan ŝelopecon rapide en la poŝon. Poste li kliniĝis antaŭen kaj kisis ŝiajn palajn lipojn kaj rekte, sen pli heziti, li ŝteliris eksteren kaj riglis la pordon post si.

Li kuris al la albordiĝejo de la pramo, kaj ĉar li trovis tie neniun, li grimpis aŭdace sur la remboateton, ĉar li sciis, ke la pramo estas neokupita escepte de la gardisto, kiu ĉiam enlitiĝas surŝipe kaj dormas kiel skulptura figuro. Li malligis la boaton je la pobo, glitis en ĝin kaj baldaŭ remis atenteme kontraŭ la fluo. Mejlone supre de la urbeto, li komencis transiri

la riveron kaj okupiĝis intense pri tiu laboro. Li precize trafis la albordiĝejon sur la alia flanko, ĉar tio estis por li laboro tre intima. Li volonte volis kaperi la boateton, kun la argumento, ke oni povas rigardi ĝin ŝipo kaj tial kiel legitiman predon por pirato, sed li sciis, ke oni zorgeme serĉus ĝin, kaj tio povus konduki al neagrablaj malkovroj. Tial li albordiĝis kaj iris en la arbaron.

Li sidiĝis tie kaj ripozis dum longa tempo, li preskaŭ torturis sin por resti vekiĝinta, kaj poste li surpadiĝis memgardeme kampadejen. La nokto estis preskaŭ pasinta. Estis jam hela tago, kiam li retroviĝis preskaŭ flanko ĉe flanko kun la sablobenko. Li ripozis denove, ĝis kiam la suno staris sufiĉe alte kaj origis la torenton per sia brilego. Poste li saltis en la fluon. Iom pli poste li haltis, gutante je la sojlo de la kampadejo kaj aŭdis, kiel Joe diris:

„Ne, Tom estas tute fidela, Huck, li revenos. Li ne dizertos. Li scias, ke tio estas malhonoriga por pirato, kaj Tom estas tro fiero por tia speco de fiago. Li forestas pro io alia. Mi scivolas nur, pro kio?“

„Sed la aĵoj apartenas al ni, ĉiuokaze, ĉu ne?“

„Preskaŭ, sed ankoraŭ ne tute, Huck. La skribaĵo diras, ke ili estas niaj, se li ne revenos ĝis la matenmanĝo.“

„Kio nun okazas!“ ekkriis Tom, paŝante kun fajna drameca efiko grandsinjore en la kampadejon.

Abunda matenmanĝo konsistanta el lardo kaj fiŝoj estis rapide havigita, kaj kiam la knaboj okupiĝis pri la preparado, Tom rakontis (kaj ornamis) siajn aventurojn. Ili fariĝis vanta fanfaronema societo el herooj, tuj kiam la rakonto estis finita. Poste Tom kaŝis sin en ombra niĉo kaj dormis ĝis tagmezo, kaj la aliaj piratoj pretigis sin por fiŝkapti kaj esplori plu la regionon.

Ĉapitro 16

Post la tagmanĝo la tuta bando ekiris por serĉi testudajn ovojn sur la sablejo. Ili pikadis per bastonoj en la sablo, kaj se ili trovis molan lokon, ili surgenuiĝis kaj fosis permane. Kelkfoje ili trovis kvindek aŭ sesdek ovojn en nur unu truo. La ovoj estis perfekte rondaj kaj blankaj kaj iom pli

malgrandaj ol juglando. Ili celebris gloran ovofritan festeton kaj plian vendrede matene.

Post la matenmanĝo ili iris brue kriante kaj kapriole sur la sablejon kaj ĉasadis sin reciproke en rondoj, forĵetante la vestojn dum la kurado, ĝis kiam ili estis nudaj kaj tiam ili petoladis plu sur la sableja akvo kontraŭ la forta fluo, kiu estis tiel forta, ke de tempo al tempo ili ne povis teni sin plu surpiede kaj tial renversiĝis, kio tre pliigis la plezuron. Ĉeokaze ili ĉiuj kliniĝis kaj ŝovelis reciproke akvon sur la vizaĝojn per la manplatoj, ili vadante proksimiĝis reciproke kun flankigitaj vizaĝoj por eviti la sufokigajn ŝprucaĵojn, ĝis kiam ili fine interkroĉiĝis kaj batalis reciproke kaj ĝis kiam la pli-fortulo mergis sian najbaron en la akvon, kaj poste ĉiuj enakviĝis implikite per blankaj gamboj kaj brakoj kaj poste samtempe revenis al la akvosurfaco, blovante, sputante, ridante kaj spiregante.

Kiam ili tute laciĝis, ili kuris el la akvo, sin sternis sur la seka, varmega sablo, kuŝadis tie kaj kovris sin per la sablo, ĝis kiam unu post la alia denove iris en la akvon kaj ili entreprenis la originan spektaklon denove. Fine ili rimarkis, ke ilia nuda haŭto aspektis simile tiel, kiel malvastaj viandokoloraj ŝtrumpopantalonoj; tial ili desegnis cirklon en la

sablon kaj kreis tiel cirkon – kun tri klaŭnoj en ĝi, ĉar neniu el ili pretis translasi tiun plej fierigan postenon al najbaro.

Poste ili alportis siajn vitrokugletojn kaj ludis „Entruigadon“, „Enringan tenadon“ kaj „kugletotrafadon“ ĝis kiam tio tedis ilin. Poste Joe kaj Huck denove naĝis, sed Tom ne kuraĝis fari tion, ĉar li forĵetis kun sia pantalono ankaŭ sian krotalan rasliloŝnuron de unu el la maleoloj. Li jam demandis sin, kial li tiom longe povas esti indulgata de kramfo sen la protekto de tiu mistera sorĉilo. Pli frue li ne kuraĝis reiri en la akvon, ĝis kiam li trovis ĝin, kaj je tiu tempo la aliaj knaboj jam estis lacaj kaj pretis ripozi. Ili iom post iom dispartiĝis kaj fariĝis deprimitaj kaj gapis sopirante trans la vastan riveregon al tiu flanko, kie tiumomente kuŝis la urbeto dormeme sub la suno. Tom ekkaptis sin mem kiel li skribis per pieda dikfingro la nomon „BECKY“ sur la sablon. Li forviŝis ĝin kaj ĉagreniĝis pri si mem pro sia malforto.

Sed tamen li skribis ĝin denove; li ne povis helpi sin. Li forviŝis ĝin je plia fojo kaj poste eskapis de denova tento per tio, ke li kunpelis la du aliajn knabojn kaj aliĝis al ili.

Sed la animstato de Joe preskaŭ malboniĝis tiom, ke ĝi preskaŭ ne reanimigeblis. Li havis tiom da hejmsopiro, ke li apenaŭ povis elteni la mizeron. Li tre proksimis ploradon. Ankaŭ Huck estis melankolia. Tom estis malgaja, sed despere penis ne montri tion. Li konis sekreton, kiun li ne volis malkaŝi, sed se tiu ribelema deprimiteco ne malaperus baldaŭ, li fine devus konatigi ĝin. Li diris kun granda pretekstata gajeco:

„Mi vetas, ke iam jam estis piratoj sur la insulo, buboj. Ni ankoraŭfoje esploros ĝin. Ie ĉi tie ili enfosis trezoron. Kiujn sentojn vi havus, se vi enlumigus malnovan keston plenan de oro kaj arĝento – nu?“

Sed tio vekis nur malmulte da entuziasmo, kiu paliĝis sen respondo. Tom provis ankoraŭ unu aŭ du delogojn, sed ankaŭ ili malsukcesis. Tio estis malkuraĝiga. Joe sidante pikadis la sablon per bastono kaj rigardis tre morne. Fine li diris:

„Ho, knaboj, ni rezignu pri ĉio ĉi. Mi volas iri hejmen. Estas tiom solece ĉi tie.“

„Ho ne, Joe, baldaŭ vi fartos pli bone, iom post iom“, diris Tom. Pensu nur pri la fiŝkaptado ĉi tie.“

„Min ne interesas la fiŝkaptado. Mi volas iri hejmen.“

„Sed, Joe, tia bonega naĝloko ekzistas nenie aliloke.“

„Naĝado estas enua, iel ĝi ne logas min, se neniuj ĉeestas, kiu malpermesas tion al mi. Mi volas iri hejmen, efektive.“

„Ho, feko, bebo! Mi supozas, ke vi volas vidi vian panjon, ĉu?“

„Jes, MI VOLAS vidi mian patrinon – kaj ankaŭ vi volus, se vi havus iun. Mi ne estas pli granda bebo ol vi“. Kaj Joe snufis iomete.

„Nu, ni lasu iri hejmen la kriantan bebeton, ĉu ne, Huck? La plorinda kompatindulo – ĉu ĝi volas vidi sian panjon? Do, estu tiel. Sed al vi plaĉas ĉi tie, Huck, ĉu? Ni restos ĉi tie, Huck, ĉu ne?“

Huck diris: „J–e–e–s“, sen iu emocio.

„Al vi mi ne parolos plu tiom longe, kiom mi vivos“, diris Joe, leviĝante. „Sciu tion!“ Li foriris fi-humure kaj komencis vesti sin.

„Tute egale al mi!“ diris Tom. „Neniu petis vin pri tio. Iru do hejmen kaj ridindigu vin. He, vi estas grandioza pirato! Huck kaj mi ne estas kriantaj beboj. Ni restadas, Huck, ĉu? Lasu trankvile iri lin, se li volas. Mi pensas, ke ni trovos la fadenon ankaŭ sen li.“

Tamen Tom ne fartis bone dum tio, maltrankviligis lin vidi, ke Joe grumble daŭrigis vesti sin. Krome ne plaĉis al li, kiel Huck sopireme observis la preparojn de Joe. Joe estis baldaŭ preta kaj vadis sen aŭdiaŭaj vortoj al la Ilinojo-bordo. La koro de Tom peziĝis. Li ekrigardis al Huck. Huck ne povis elteni la rigardon kaj gapis malsupren. Poste li diris:

„Ankaŭ mi foriros, Tom. Estis jam sen tio tiel solece, sed nun fariĝos tiel eĉ pli. Ankaŭ ni ekiru, Tom.“

„Mi ne volas! Foriru ĉiu el vi, se vi volas. Mi restos ĉi tie.“

„Tom, mi prefere foriros.“

„En ordo – neniuj retenos vin.“

Huck kunkolektis siajn diskuŝantajn vestojn. Li diris: „Tom, mi volus, ke vi kuniru. Ankoraŭfoje pripensu la aferon. Ni atendos vin, kiam ni atingos la bordon.“

„Pri tio vi povos atendi ĝis la tago de l' Sankta Neniamo!“

Huck fortrotis plena de zorgoj, kaj Tom staris kaj postrigardis ilin, kun forta deziro rezigni pri sia fiero kaj ankaŭ kuniri. Li esperis, ke la knaboj haltos, sed ili lante vadis plu. Subite Tom ekrimarkis, ke fariĝis tre solece kaj kviete ĉirkaŭ li. Li batalis lastan fojon kun sia fiero, kaj poste eksagis al la kamaradoj kaj kriis:

„Atendu, atendu! Mi volas rakonti ion al vi!“

Ili baldaŭ haltis kaj turniĝis al li. Kiam li atingis ilin, li komencis malkaŝi sian sekreton, kaj ili misfideme aŭskultis lin, ĝis kiam ili fine ekkomprenis, kion li celas, kaj poste ili elpuŝis entuziasman militkrion, spektakle aplaŭdis kaj diris, ke tio estas splendega, kaj ili aldonis ankoraŭ, ke tiukaze, se li estus dirinta tion tuj, ili neniam estus foririntaj. Li donis akceptindan senkulpigon por la reteno de la sekreto; sed reale li timis, ke eĉ ĝi ne povus reteni ilin dum konsiderinde longa tempo, kaj tial li havis la opinion prefere reteni la sekreton kiel lastan delogaĵon.

La knaboj gaje revenis kaj denove sindonis al siaj ludoj, babilante dum la tuta tempo pri la kolosa plano, plena de admiro pri ties genieco. Post delikata ovo- kaj fiŝmanĝo Tom diris, ke li nun havas la intencon lerni la fumadon. Joe tuj entuziasmiĝis pri la ideo kaj diris, ke ankaŭ li volas tion provi. Sekvetion Huck faris pipojn kaj ŝtopis ilin. Ambaŭ komencantoj fumis ĝis tiu momento nur cigarojn el vitofolioj, kiuj „mordis“ la langojn, sed tio ne estis rigardata vireca.

Nun ili sternis kaj apogis sin sur la kubutoj kaj

atenteme komencis fumi kun malmulte da memfido. La fumo havis malagrablan guston, ili tuis iomete, sed Tom diris:

„Kial ĝi estas tiom facila? Se mi estus sciinta, ke ĝi estas tiom facila, mi estus lerninta tion jam antaŭ longe.“

„Ankaŭ mi“, diris Joe. „Ĝi estas lude facila.“

„Kiom ofte mi jam vidis fumi homojn kaj pensis, nu, ankaŭ mi volonte volus fari tion, sed mi neniam pensis, ke mi mem kapablas fari tion“, diris Tom.

„Al mi okazis same, ĉu ne, Huck? Vi ja aŭdis, kiel mi diris tute similan, Huck, diru, se ne estas tiel.“

„Jes, tre ofte“, diris Huck.

„Ankaŭ mi, diris Tom, „ha, eĉ centfoje! Unufoje ĉe la buĉejo. Ĉu vi memoras tion, Huck? Bob Tanner ĉeestis, kaj Johnny Miller kaj Jeff Thatcher, kiam mi diris tion. Ĉu vi ne memoras pri tio, Huck, ke mi diris tion?“

„Jes, estas tiel“, diris Huck. „Jen la tago, kiam mi perdis la blankan domvitran kugleton. Ne, estis je la antaŭa tago.“

„Jen – kiel mi diris al vi“, diris Tom. Huck memoras tion.“

„Mi supozas, ke mi povus fumi pipon dum tuta tago“ diris Joe. „Mi ne sentas min malsana.“

„Ankaŭ ne mi“, diris Tom. Mi povus fumi tutan tagon. Sed mi vetas, ke Jeff Thatcher ne povus.“

„Jeff Thatcher, tiu, ĉu? Li renversiĝus jam post du enspiroj. Li foje provu, la rezulton LI sentos.“

„Mi vetas, ke li sternus sin, Kaj Johnny Miller – mi volonte volus vidi, kiel provas li fumi.“

„Ja mi eĉ pli!“ diris Joe. Nu, mi vetas, ke Johnny Miller povus fari tion tute ne tiel, kvazaŭ estus nenio. Nur ununura enspiro de fumo kaj LI

transmondiĝus.“

„Tute certe, Joe. Diru – mi dezirus, ke la urbetaj knaboj povus vidi nin en tiu ĉi momento.“

„Ankaŭ mi.“.

„Aŭskultu, uloj, ne diru eĉ vorton pri tio, kaj kiam ili iam estos kun ni, mi al vi venos kaj diros: 'Joe, ĉu vi havas pipon ĉe vi? Mi volas foje fumi pipon.' Kaj vi diros tute senzorge, kvazaŭ tio estus nenio: 'Jes mi kunhavas mian MALNOVAN pipon, kaj alian aldone, sed mia tabako ne estas tre bonkvalita.' Kaj mi diros: 'Tio estas en ordo, se ĝi estas sufiĉe forta.' Kaj tiam vi elprenos la pipojn, kaj ni tute trankvile ekbruligos ilin, kaj poste foje rigardu, kiel ili gapos nin!“

„Ha, tio fariĝos gaja, Tom! Mi dezirus, ke tio okazus nun.“

„Ankaŭ mi! Kaj se ni diros al ili, ke ni lernis tion dum malĉeesto, ĉar tiam ni estis piratoj, tiukaze ili certe ne estos ne enviaj, ĉar ili ne partoprenis, ĉu?“

„Ho, mi ne nur certas, sed eĉ vetas pri tio, ke ili envios nin!“

Tiel la babilado estis daŭrigata. Sed baldaŭ ĝi komencis iom hezitiĝi kaj fariĝis malpli kunteksta. La silentado strange kreskis. Ĉiu poro en la buŝoj de la knaboj similis al ŝprucanta fontano, ili apenaŭ sufiĉe rapide povis forpumpi la akvon el la keloj de siaj langoj por malhelpi inundon. Spite al ĉiuj penoj okazis diversaj trofluoĵ malsupren laŭ iliaj gorgoĵoj, kaj ĉiufoje sekvis subitaj vomemoj. Ambaŭ knaboj aspektis nun palaj kaj mizeraj. La pipo de Joe falis el ties timemaj fingroj. Tiu de Tom sekvis. Ambaŭ fontanoj furioziĝis, kaj ambaŭ pumpiloj seninterrompe kaj forte laboris. Joe diris deprimate:

„Mi perdis mian tranĉilon. Mi pensas, ke mi prefere foriru kaj serĉu ĝin.“

Tom diris kun tremantaj lipoj kaj haltema parolmaniero:

„Mi helpos al vi. Ekiru sur jena vojo kaj mi serĉados ĉe la fonto. Ne, Huck, vi ne devas akompani nin – ni trovos ĝin.“

Tial Huck residiĝis kaj atendis dum horo. Poste li eksentis sin sola kaj ekiris por serĉi siajn kamaradojn. Ili troviĝis vaste aparte en la arbaro, ambaŭ tre palaj kaj profunde endormaj. Sed certaj eligaĵoj diris al li, ke tiukaze, se ili havis iun ĉagrenon, ili liberigis sin de ĝi.

Ĉe la vespermanĝo ili ne estis tre parolemaj. Ili aspektis humilaj, kaj kiam Huck preparis sian pipon post la manĝo kaj estis preparonta iliajn, ili diris, ke ne, ke ili ne fartas bone – io, kion ili manĝis tagmeze, stomake ne estis akceptita.

Ĉirkaŭ noktomezo Joe vekiĝis kaj vokis la knabojn. La atmosfero estis sufoke humida, jen atendeblis aĉa vetero. La knaboj kuniĝis kaj proksimiĝis al la afableco de la fajro, kvankam la obtuze premega aero estis tre sufoka. Ili sidis senmove streĉite kaj atendis. La solena silentado daŭriĝis. Post la lumo de la fajro „la nigra malhelo“ glutis ĉion. Subite ekfulmis tremanta lumradio kaj dum momento neprecize prilumis foliaron kaj poste malaperis. Iom poste sekvis plia fulmo, sed iom pli forte. Poste malforta ĝemo penetris tra la arbobranĉoj, kaj la knaboj sentis fluantan spiron sur siaj vangoj, ili ekhavis

anserhaŭton pro la imago, ke la Spirito de l' Nokto preteriris. Post paŭzo bizara fulmo ŝanĝis la nokton en tagon kaj montris precize kaj klare ekkoneble ĉiun herberon ĉe iliaj piedoj. Kaj ĝi montris krome ankaŭ tri blankajn teruritajn vizaĝojn. Basa laŭta tondrado falante ruliĝis krake sonore tra la ĉielo kaj perdiĝis malproksime en grumbla tondrado. Freŝa aerblovo preterpasis, ĝi flustrigis ĉiujn foliojn kaj neĝflope dancigis la ekflugigitajn cindrerojn super la bivakfajro. Denova furioza brilego eklumigis la arbojn kaj tuj poste sekvis kolizio, kiu kvazaŭ disŝiris la arbokronojn rekte super la kapoj de la knaboj. Ili terurite kunkroĉiĝis en la sekva mallumo. Kelkaj grandaj pluvogutoj falis klake sur la foliojn.

„Rapide, knaboj! Ek al la tendo!“ ekkriis Tom.

Ili eksaltis, stumple moviĝis sur la radikoj kaj tra ĉiroj en la tenebro, ĉiu kvazaŭ en alia direkto. Furioza muĝanta blovado movis la arbojn, kaj faris kantanta ĉion, kion ĝi trairis. Denove kaj denove sekvis blindiga fulmo, sekvata de mutiga tondrado. Kaj tiam torentis la pluvo malsupren, kaj la plifortiĝanta hurikano pelis la vualigitan pluvon antaŭ si sur la grundo. La knaboj vokis sin reciproke kriante, sed la muĝanta vento kaj la eksplodantaj tondrobatoj tute subigis iliajn voĉojn. Kiel ajn tio

okazis, iom post iom ili retroviĝis sub la tegmento de la tendo, fridaj, timigitaj kaj tute malsekaj. Sed estis certe konsolo, ke ili havis akompanantojn en la mizero. Ili ne povis interparoli, ĉar la malnova velo flirtis furioze, eĉ, se la alia bruo estus permesinta interparoladon. La ŝtormo pli kaj pli fortiĝis kaj baldaŭ la velo estis ŝirita de siaj fiksaĵoj kaj forflugis per la blovego. La knaboj kaptis sin ĉe la manoj kaj fuĝis, stumblante kaj kontuziĝante sub la protekton de granda kverko, kiu staris ĉe la riverbordo. La batalo atingis nun sian kulminon. Sub la seninterrompaj fulmoj, kiuj flamigis la ĉielon, ĉio sube aperis en plej preciza senombra klareco: la kliniĝantaj arboj, la ondanta riverego kun blanka ŝaŭmo kaj ŝprucantaj ŝaŭmflokoj, la nebuleca reliefo de la kruta bordo sur la kontraŭa flanko, la ekvidaĵoj tra la preterflugantaj nubamasoj kaj la oblikva pluvovualo. Ĉiam denove giganta arbo rezignis pri la rezisto kaj falis krakante sur la pli junajn kreskaĵojn. La tondrobatoj, kiuj tute ne malfortiĝis, nun krevadis orelsurdige kiel eksplodoj, akre, akute kaj nedireble timige. La ŝtormo kulminis en nekomparebla fortostreĉo, kiu kvazaŭ disŝiris la insulon en pecojn, ĝi bruligis ĝin teren, dronigis ĝin ĝis la arbokronoj, forblovis ĝin kaj surdigis ĉiun estaĵon sur ĝi, ĉio tio en ununura sama momento. Ĝi estis sovaĝa nokto por senhejmaj knaboj, kiuj eksterdomis en ĝi.

Sed laste la batalo estis finita, kaj la militpartioj retiriĝis kun malpli kaj malpli da minacoj kaj grumbloj, kaj paco restarigis denove sian regnon. La knaboj reiris al sia kampadejo, sufiĉe terurite. Tie estis ankoraŭ io, pri kio ili povis esti dankemaj, ĉar la granda platano, la protekto de iliaj kuŝejoj, estis ruinigita, fendita de la fulmoj, kaj ili ne troviĝis malsupren de ĝi, kiam okazis la katastrofo.

Ĉio en la kampadejo estis malseka, ankaŭ la bivakfajro, ĉar ili estis nezorgemaj knaboj, kiel ĉiu en ilia generacio, kaj tial ili ne entreprenis ion por protekti la fajron kontraŭ pluvo. Jen la kaŭzo de konsterniĝo, ĉar ili estis malsekaj ĝis la ostoj kaj frostis. Elokvente ili sciigis sian ĉagrenon, sed baldaŭ ili malkovris, ke la ardo sub la granda trunko, kontraŭ kiu ĝi estis surtavoligita (tie, kie ĝi kurbiĝis supren kaj departiĝis de la grundo), eskapis de la malsekiĝo, jen areo proksimume tiel granda kiel manplato. Tial ili laboradis pacience, kolektis lignopecetojn kaj arboŝelojn el lokoj sub protektitaj trunkoj kaj delikate sukcesis reflamiĝi la fajron. Poste ili metis grandajn mortajn branĉojn sur ĝin, ĝis kiam ili havis muĝantan fajrejon kaj tial ili regajiĝis plian fojon. Ili sekigis sian kuiritan ŝinkon kaj manĝis kun plezuro. Post tio ili ankoraŭ sidis ĉe la bivakfajro kaj etendis kaj gloris sian meznoktan

aventuron ĝis la mateno, ĉar ne estis eĉ ununura seka loketo sur la tero ie ajn ĉirkaŭe, sur kiu ili povus dormi.

Kiam la suno komencis ŝtelire proksimiĝi al la knaboj, dormemo superfortis ilin, ili foriris al la sablejo kaj sternis sin por dormi. La suno bruligis ilin pli kaj pli tiel, ke ili morne komencis okupiĝi pri la havigado de la matenmanĝo. Post la manĝo ili sentis sin kvazaŭ rustigitaj kaj rigidmembraj, kaj denove iom hejmsopiraj. Tom ekkonis la signojn kaj regajigis la piratojn tiom bone, kiom eblis. Sed ili ne interesiĝis pri vitrokugletoj aŭ cirko aŭ naĝado aŭ io ajn. Li memorigis ilin pri la granda sekreto kaj levis tiel ĝojfajron en ili. Dum ĝi ankoraŭ konserviĝis, li povis interesigi ilin pri nova projekto. Pro tio ili devis rezigni dum certa tempo pri sia pirateco kaj fariĝi indiĝenoj. La ideo plaĉis al ili; tial ne daŭris longan tempon, ĝis kiam ili estis tute nudaj kaj ornamitaj de la kapo ĝis la piedoj per nigra ŝlimo, kiel tri zebroj – ĉiu el ili estis tribestro, kompreneble, kaj poste ili komencis vagi tra la arbaro por ataki anglan setlejon.

Iom post iom ili apartiĝis en tri malamikajn tribojn kaj ekde embuskejo impetis sin reciproke kun teruraj militkrioj kaj mortigis kaj skalpis unu la alian milope. Estis sangomakulita tago. Kaj sekve tion, ĝi estis

eksterordinare kontentiga.

Je la vespermanĝa tempo ili kolektiĝis malsataj kaj feliĉaj en la kampadejo, sed nun leviĝis obstaklo – malamikaj indiĝenoj ne povas disdividi kune la panon de la gastamikeco sen antaŭe interpaciĝi. Tio tute ne eblas sen fumi la pacopipon. Almenaŭ ili ankoraŭ neniam aŭdis ion pri alia ebلا maniero. Duopo el la sovaĝuloj preskaŭ deziris, ke ili estus ankoraŭ piratoj. Kiel ajn, ne estis alia elirvojo: kun tiom da preteksto pri gajeco, kiom eblis, ili petis pri la pipoj kaj enspiris sian fumdozon laŭvice en deca maniero.

Sed spite tion ili tamen fine ĝojis, ke ili fariĝis sovaĝuloj, ĉar ili gajnis novan sperton; ili trovis, ke ili nun povas fumi iom sen tuj devi serĉi perditan tranĉilon; ili ne fariĝis tiom malbonfartaj, ke ili devis vomu denove. Tiun grandan promeson ili ne volis stulte fuŝi per tio, ke ili ne ekzercadas sufiĉe. Post la manĝo ili ankoraŭfoje provis la fumadon kun konsiderinde granda sukceso, kaj tiel ili pasigis jubilan vesperon. Ili estis pli fieraj kaj pli feliĉaj pri sia nova kapablo ol ili estus, se ili estus skalpintaj ĉiujn ses naciojn de la irokeza federacio. Ni nun translasas ilin al ilia fumado, babilado kaj fanfaronado, ĉar ni momente ne plu bezonas ilin.

Ĉapitro 17

En la malgranda urbo ne estis videbla rideksplodo en la sama trankvila posttagmeza sabato. La familianoj de Harper kaj onklino Polly tre afliktiĝis kaj ploris, kiam oni metis ilin en funebrovestojn. Nekutima kvieto ŝarĝis la urbeton, kvankam, konsentite, kutime estis tie jam sufiĉe da kvieto. La urbetaj loĝantoj okupiĝis pri siaj aferoj nur kun malĉeesta animo. Ili parolis nur malmulte, sed ĝemis ofte. La libera sabato por la infanoj estis ŝarĝo. Al iliaj ludoj mankis la partoprenema vigleco, kaj iom post iom ili rezignis pri ili.

Posttagmeze Becky Thatcher troviĝis malgaje sur la malplena lerneja korto. Ŝi estis tre deprimita, sed ne trovis ion, kio povus konsoli ŝin. Ŝi parolis al si mem:

„Ho, se mi havus nur denove la latunan kamenan fajrohundon! Sed mi havas nun nenion, kio povus memori min pri li.“ Ŝi retenis singulteton.

Subite ŝi haltis kaj diris al si mem:

„Ĝuste ĉi tie estis, ve, se ĝi ankoraŭfoje okazus – mi ne dirus, ke... por nenio en la mondo mi dirus tion. Sed nun li foriris; mi neniam, neniam, neniam revidos lin.“

Tiu penso superfortis ŝin, kaj ŝi formigris kun malsupren ruliĝantaj ploroj sur la vangoj. Poste alvenis grupo el knaboj kaj knabinoj – ludamikoj de Tom kaj Joe, kaj haltante gapis sur la latbarilon kaj interparolis kun altestimaj voĉoj pri tio, kiel Tom kaj Joe faris tion kaj tion – kaj kiam ili lastfoje vidis ilin, kaj kiel Joe diris tiun aŭ tiun ĉi bagatelojn, plenajn de teruraj profetaĵoj, kiel oni nun facile povas ekkoni! – kaj ĉiu parolanto montrofinigris al precize la sama loko, kie la perditaj knaboj staris pasinttempe kaj poste aldonis ion tian, kian la sekvan: 'Mi staris ĝuste tie – tiel, kiel nun, kaj se vi estus li – mi staris tiel proksime al li – kaj li ridetis, ĝuste tiel – kaj tiam io iel rampis en min, io terura, sciu, kaj mi tute ne pripensis, kion tio signifas, kompreneble, sed nun mi scias!'

Poste ili disputis pri tio, kiu vidis la mortajn knabojn je la lasta fojo, kiam ili ankoraŭ vivis. Multaj pretendis la malgajigan distingon kaj ofertis pruvojn,

kiuj pli aŭ malpli estis subtenataj per fuŝaj atestantoj. Kaj kiam estis finfine decidite, kiu vidis la foririntojn je la lasta fojo kaj kiu interŝanĝis la lastajn vortojn kun ili, la feliĉaj koncernatoj ricevis specon de aŭreolo kaj la aliaj prigapis kaj enviis ilin. Iu kompatindulo, kiu ne povis oferti iujn aliajn grandsinjoraĵojn, diris memorante, evidente kun fiero:

„Nu, min Tom iam traktis per pugnoj.“

Sed tiu provo partopreni la famon estis malsukcesa. La plej multaj knaboj povis aserti tion, kaj tial la distingo konsiderinde triviĝis. La grupo retiriĝis, ankoraŭ tiam revokante sankte respekte memorojn pri la perditaj herooj.

Kiam sekvamaten la dimanĉa lerneja instruado estis finita, la sonoriloj komencis funebre sonori, anstataŭ tintadi kiel kutime. Estis tre kvieta sabato, kaj la funebra sonorado ŝajne akordiĝis kun la meditema silento, kiu ŝarĝis la naturon. La enloĝantoj kunvenis en la antaŭĉambro de la preĝejo, ili restadis dum iom da tempo por frustrante konversacii pri la malĝoja evento. Sed en la preĝejo mem neniu plu flustris, nur la susurado de la funebraj vestoj de la inoj sidantaj

sur siaj lokoj ĝenis tie la silenton. Neniu povis memori, kiam antaŭe la malgranda preĝejo estis tiom plena. Fine ekestis atendanta paŭzo, atentema silento, kaj onklino Polly enpaŝis sekvata de Sid kaj Maria kaj la familio Harper, ĉiuj kun profunde nigraj vestoj, kaj la tuta paroĥo, inklude de la maljuna pastro, leviĝis respektoplene kaj staris, ĝis kam la funebrantoj ĉiuj sidis sur la antaŭa vico de la sidbenkoj. Denove ekestis komunuma silento interrompita per sufokaj singultoj. Kaj poste la pastro etendis la brakojn kaj preĝis. Kortuŝanta himno estis kantata kaj sekvis la biblia teksto: „Mi estas la releviĝo kaj la vivo.“

Dum la plia daŭrigo de la dioservo, la ekleziulo tiom emfazis la ĉarmon, la plaĉan manieron, kiu vekis rarajn esperojn pri la perditaj knaboj, tiel, ke ĉiu el la ĉeestantoj, kiu akceptis tiujn karakterajn bildojn, sentis konscienciproĉojn en la koro, rememorante, ke oni estis ĉiam blinda pri tiuj ecoj, kaj ke oni vidis ĉiam nur la erarojn kaj mankojn de la knaboj. La pastro memorigis ankaŭ pri diversaj eventoj de la forpasintoj, kiuj ilustris iliajn afablajn kaj grandanimajn karakterojn, tiel ekkonis la homoj sen peno, kiel noblaj kaj belaj estas tiuj eventoj, kaj ili memoris kun bedaŭro kaj aflikteco, ke tiam, kiam la eventoj okazis, ili ŝajnis al ili nur friponaĵoj, kiuj

indus traktadon per skurĝo. La paroĥo estis pli kaj pli kortuŝita, dum la patosa rakonto estis daŭrigata, ĝis fine ĉiuj ĉeestantoj perdis la memregon kaj aliĝis al la larmantaj funebrantoj, al la ĥoro de angoraj plorsingultoj, kaj ankaŭ la pastron mem superfortis la sentoj kaj li eklarmis en la predikejo.

En la galerio aŭdeblis susurado, kiun rimarkis neniu. Momenton poste knaris la preĝeja pordo, la pastro levis siajn plorvualitajn okulojn super la mantuketon kaj staris kiel hipnotizita! Unue unu okulparo kaj poste plia sekvis lin, kaj tiam preskaŭ la tuta paroĥo kun unu impulso leviĝis kaj gapis senkomprene, dum la tri „mortaj knaboj“ enmarŝis sur la meza irejo. Tom kondukis ilin, Joe sekvis kaj Huck, ruinulo en malfreŝaj vestaĉoj, kiu ŝteliris malantaŭe. La triopo kaŝis sin antaŭe en la neuzata galerio por aŭskulti la propran funebran predikon!

Onklino Polly, Maria kaj la familio Harper ĵetiĝis sur siajn releviĝintojn, superŝutis ilin per kisoj kaj elpuŝis dankvortojn, dum la kompatinda Huck embarasite kaj malkomforte staris apude kaj ne sciis precize, kion fari aŭ kie kaŝi pro tiom da nebonvenigataj rigardoj. Li hezitis kaj komencis ĝuste forŝteliĝi, sed Tom kaptis lin kaj diris:

„Onklino Polly, tio ne estas justa. Iu devas ĝoji ankaŭ pri tio, ke denove ĉeestas Huck.“

„Tion ili faros. Mi ĝojas vidi lin, tiun senpatrinan estaĵon!“

La amplenan atenton, kiun onklino Polly abunde montris al Huck, estis la ununura afero, kiu kapablis pliigi lian malkomforton eĉ pli ol ĝi estis jam antaŭe.

Subite vokis la pastro, tiom laŭte kiom li kapablis: „Al Dio laŭdu tuta ter', / Lin laŭdu la ĉiela sfer' – Kantu! – kaj kantu elkore!“

Kaj tion ili faris. La malnova kristana himno ŝvelis ĝis triumfa eksplodo, kaj dum ĝi skuigis la trabaron de la tegmento, Tom Sawyer, la pirato, ĉirkaŭrigardis al la envia junularo kaj konfesis sin enkore, ke tio estas la plej fiera momento en la vivo.

Kiam la mistifikita paroĥo urĝis eksteren, oni diris, ke oni preskaŭ estus preta lasi ridindigi sin je plia fojo por ankoraŭfoje aŭskulti la kanton „Al Dio laŭdu

tuta ter'“

Tom ricevis pli da manfrapoj kaj kisoj tiutage – laŭ la variaj animstatoj de onklino Polly – ol li rikoltis dum la tuta jaro antaŭe, kaj li apenaŭ sciis, kio pli esprimis la grandan dankemon al Dio kaj la amo al li.

Ĉapitro 18

Tio do estis la granda sekreto de Tom – la plano reiri hejmen kun siaj fratopiratoj kaj atendi la propran funebron. Ili padelis sabate en la vespera krepusko per trunko al la Misurio-bordo kaj surbordiĝis kvin aŭ ses mejlojn sude de la urbeto; ili dormis en la arbaro ĉe la rando de la urbeto preskaŭ ĝis la taga heliĝo kaj poste ŝtelire moviĝis sur apudvojoj kaj stratetoj kaj finis sian dormadon sur la galerio de la preĝejo enmeze de kaosa fatraso da kaputaj vicbenkoj.

Dum la matenmanĝo lunde matene onklino Polly kaj Maria estis tre karaj al Tom kaj plenumis ĉiun deziron, kiun li havis. Oni parolis nekutime multe. Kaj iam dum la interparolado onklino Polly diris:

„Nu, mi ne volas aserti, ke tio ne estis sukcesa mistifiko, Tom, lasi suferi ĉiun el ni preskaŭ dum tuta semajno, por ke vi, buboj, havu vian ĝojon, sed estas malĝojige, ke vi povis esti tiel ŝtonkora lasi suferi eĉ min. Ĉar vi kune povis transveni sur trunko por partopreni vian entombigon, tiukaze vi mem povis veni ankaŭ al mi por doni iun signon, ke vi ne estas morta, sed nur forkurinta.“

„Jes, tion vi efektive povis fari, Tom“, diris Maria, „kaj mi supozas, ke vi farus tion, se vi pensus pri tio.“

„Mi... mi ne scias. Tio estus fuŝinta la tutan aferon.“

„Tom, mi esperis, ke vi tre amas min“, diris onklino Polly, kun malgaja paroltono, kiu malkomfortigis la knabon. Estus pli ol nenio, se vi estus almenaŭ PENSINTA afliktite pri ni, eĉ, kvankam vi ne FARIS tion.“

„Sed, onjo, tio ja ne estas damaĝo“, pledis Maria; „tio estas ja nur kaŭzita de la hasta maniero de Tom, li ĉiam tiom rapidas, ke li pensas tial pri nenio.“

„Des pli malgajiga ĝi estas. Sid estus pensinta pri mi. Kaj Sid ankaŭ estus FARINTA tion. Tom, iam vi retrorigardos, kiam estos tro malfrue, kaj tiam vi deziras, ke vi estus iom pli zorginta pri mi, kvankam tio estus kostinta tiom malmulte al vi.“

„Nu, onjo, vi ja scias, ke mi zorgas pri vi“, diris Tom.

„Mi scius tion pli bone, se vi pli agus tiel.“

„Mi deziras nun, ke mi estus pensinta pri vi“, Tom diris pentoplene

„Sed almenaŭ mi pri vi songis. Ankaŭ tio estas pli ol nenio, ĉu ne?“

„Tio ne estas multe – ankaŭ kato faras tion –sed estas pli bone ol nenio. Kion vi songis?“

„Nu, merkrede nokte mi songis, ke vi sidas tie transe ĉe la lito kaj Sid sidas ĉe la lignokesto kaj Maria apud li.“

„Jes, tion ni faris. Tion ni faras ja ĉiam tiel. Mi ĝojas, ke viaj songoj ŝarĝis sin kun tiom da ĉagreno pri ni.“

„Kaj krome mi songis, ke la patrino de Joe Harper estis ĉi tie.“

„Jes, efektive, ŝi estis ĉi tie! Ĉu vi songis ankoraŭ ion plian?“

„Ho, multon. Sed la memoro estas tre malklara.“

„Provu memori pri tio – ĉu vi povas?“

„Iel ŝajnas al mi, ke la vento – ke la vento blovis tiel, ke la – la...“

„Pli forte koncentriĝu, Tom! La vento blovis tiel, ke la... ek do!“

Tom maltrankvile premis la fingrojn dum minuto al sia frunto kaj poste diris:

„Nun mi vidas ĝin! Nun mi vidas ĝin! Ĝi blovis tiel,
ke la kandelo ekflagris!“

„Dio, kompatu nin! Parolu plu, Tom – parolu plu!“

„Kaj ŝajnas al mi, ke vi diris: 'Nu, la pordo ŝajne
malfermiĝis...'"

„Parolu plu, Tom!“

„Lasu min dum momento pripensi la aferon – nur
dum momento. „Ho jes – vi diris: 'Nu, la pordo ŝajne
malfermiĝis...'"

„Tiel, kiel mi sidas ĉi tie, mi diris tion! Ĉu ne, Maria?
Parolu plu, Tom.“

„Kaj tiam – kaj tiam – nu, mi ne estas tute certa, sed
ŝajnas al mi, ke vi diris poste al Sid, ke li iru al la
pordo kaj – kaj...“

„Kaj kion? Ĉu? Kion mi igis fari lin, Tom? Kion mi

igis fari lin?“

„Vi diris – vi – ho, vi diris, ke li malfermu ĝin.“

„En ordo, benata lando! Ion tian mi ne aŭdis dum mia tuta vivo! Neniu rakontu plu al mi, ke ne estas strangajoj pri sonĝoj. Sereny Harper eksciis tion antaŭ ol mi estos horon pli aĝa. Mi volus vidi, kiel ŝi klarigos TION per sia galimatia pri superstiĉo. Parolu plu, Tom!“

„Ha, nun ĉio fariĝas al mi tiel klara, kiel la hela tago. Poste vi diris, ke mi ne estis MALBONA, nur pet--- O---la kaj ne pli komprenema ol – mi pensas, ke ĝi estis ĉevalido, aŭ io tia.“

„Kaj tiel estis! Boneco kompata! Parolu plu, Tom!“

„Kaj poste vi komencis larmi.“

„Tion mi faris. Tion mi faris. Kaj ne je la unua fojo. Kaj poste...“

„Poste sinjorino Harper komencis plori kaj diris, ke Joe estis simila, kaj ŝi deziris, ke ŝi ne estus verginta lin, ĉar li prenis la kremon, kvankam ŝi forverŝis ĝin mem.“

„Tom! La Sankta Spirito plenigis vin! Vi profetis – tion vi faris! Promesita lando vivanta! Parolu plu!“

„Poste diris Sid – li diris...“

„Mi ne pensas, ke mi ion diris“, objëtis Sid.

„Jes, vi faris, Sid“, diris Maria.

„Fermu viajn buŝojn kaj lasu paroli Tom-on! Kion li diris, Tom?“

„Li diris, ke li esperas, ke mi fartas pli bone tie, kien mi iris, sed, se mi iel estus estinta iom pli bona ...“

„Jen, ĉu vi aŭskultis tion! Estis liaj precizaj vortoj!“

„Kaj vi severe riproĉis lin.“

Fidu pri tio, tion mi faris! Certe ie ĉi tie estis anĝelo.
Ĉi tie estis anĝelo, tute certe!“

„Kaj sinjorino Harper parolis pri tio, kiel Joe timigis
ŝin per petardo, kaj vi parolis pri Peter kaj la
dolorigilo...“

„Tio estas tiel certa, kiel la fakto, ke mi vivas.“

„Kaj poste vi multe parolis pri tio, ke oni traserĉas la
riveron pro ni, kaj pri tio, ke la funebro estos
dimanĉe. Kaj poste vi kaj la maljuna sinjorino
Harper brakumis sin reciproke kaj larmis, kaj ŝi
foriris.“

„Tiel okazis! Precize tiel okazis, tiel certe, kiel mi
sidas sur tiu ĉi lulseĝo. Tom, vi ne povus rakonti pri
tio pli bone, se vi estus ĉeestinta! Kaj kio poste?
Parolu plu, Tom!“

„Poste mi sonĝis, ke vi preĝis por mi – kaj mi povis vidi vin kaj aŭdi ĉiun vorton, kiun vi diris. Kaj vi enlitiĝis kaj mi kompatis vin tiom, ke mi skribis sur peco de platana ŝelo: 'Ni ne estas mortaj – ni nur forkuris por esti piratoj', kaj mi metis tion sur la tablon kun la kandelo, kaj tiam vi aspektis tiel kara, kiel vi tie kuŝis kaj dormis, ke mi pensis, ke mi iru transen al vi kaj kisu viajn lipojn.“

„Ĉu vere, Tom? Ĉu vi vere FARIS tion? Pro tio mi pardonas al vi ĉion!“ Kaj ŝi brakumis la knabon tiel premegante, ke li sentis sin la plej granda fripono, kiu ekzistas!

„Tio estis tre kara, eĉ, kvankam estis nur ... sonĝo“, diris Sid monologe, apenaŭ aŭdeble.

„Fermu la buŝon, Sid! Tion, kion oni faras en sonĝo, oni faras ankaŭ malsonĝante. Jen granda Milampomo, kiun mi retenis por vi, Tom, por tiu okazo, se oni retrovus vin – kaj nun, ek, al la lernejo. Mi estas dankema al la kara Dio kaj Patro, ke mi rehasas vin, Li, kiu estas jam tiom longe suferpreta kaj kompatema al tiuj, kiuj kredas je Li kaj sekvas Liajn vortojn, kvankam Lia boneco scias, ke mi ne indas tion, sed, se nur la indaj homoj ricevus Liajn benojn,

kaj havus Liajn manojn je dispono, por ke tiuj helpu al ili trairi la dornajn lokojn, povus rideti nur malmultaj homoj ĉi tie aŭ aŭ iam ajn paŝi en Lian eternan pacon, se komenciĝos la longa nokto. Ekiru do, Sid, Maria, Tom –foriĝu nun– vi sufiĉe longe detenis min de miaj taskoj.“

La infanoj ekmarŝis al la lernejo, kaj la maljuna damo ekiris por viziti sinjorinon Harper por venki ŝian realismon per la mirinda sonĝo de Tom. Sid estis sufiĉe prudenta ne laŭte diri la penson, kiun li havis dum la forlasado de la domo. Estis la sekva: „La tuto sufiĉe facile pridubeblas – tia longa sonĝo, kaj eĉ ne unu eraro en ĝi!“

Kia heroo Tom nun fariĝis! Li ne saltadis kaj ne kapriolis, sed moviĝis kun digna parademo, kiel fariĝas pirato, se li sentas, ke la okuloj de la publiko rigardas al li. Kaj efektive tiel estis; li provis kondukti tiel, kvazaŭ li ne vidas la rigardojn kaj ne aŭdas la rimarkojn, kiam li preterpasas, sed ili estis kiel manĝo kaj trinkaĵoj por li. Knaboj, kiuj estis eĉ pli malgrandaj ol li, sekvis lin en lia spuro, tute fieraj, ke oni vidas ilin kun li, kaj, ke li toleras ilin, kvazaŭ li estus la tamburisto-knabo je la pinto de procesio aŭ

la elefanto, kiu marŝas antaŭ menaĝerio en la urbon. Knaboj en lia aĝo pretendis ne scii, ke li forestis, sed ili tamen preskaŭ ne povis dormi pro envio. Ili estis preta doni ĉion ajn por havi lian sunbrunigitan haŭton aŭ lian brilan fifamon – kaj Tom eĉ ne fordonus ion el ambaŭ aferoj, eĉ ne kontraŭ tuta cirko.

En la lernejo la infanoj lin kaj Joe ĉirkaŭis tiel, kaj rigardis ilin kun tiom da evidenta admiro en la okuloj, ke ne daŭris longan tempon, ĝis kiam la du knaboj fariĝis neelteneble arogantaj. Ili komencis rakonti siajn aventurojn al la scivolegaj aŭskultantoj – sed ili ĉiam nur komencis tion; ne estis verŝajne atingi la finon kun tiaj riĉaj imagaj kapabloj, kiaj havis ili, se temas pri la liverado de ornamaĵoj. Kaj kiam ili fine elprenis la pipojn kaj ĉirkaŭiradis serene fumante, la kulmino de la gloro estis atingita.

Tom decidis, ke li povas esti nun sendependa de Becky Thatcher. La gloro sufiĉis al li. Li volis vivi plu nur por la gloro. Nun, ĉar li fariĝis elstara knabo, ŝi eble volus denove flirti kun li. En ordo, ŝi agu laŭplaĉe, ŝi vidus, ke li povas esti same tiel indiferenta kiel certaj aliaj homoj. Subite ŝi alvenis. Tom pretekstis ne vidi ŝin. Li moviĝis ĉirkaŭe kaj aliĝis al grupo de geknaboj kaj komencis interparoli.

Baldaŭ li observis, ke ŝi gracie trotetis rapide kaj gaje antaŭen kaj malantaŭen, kun tre ruĝa vizaĝo kaj vagemaj okuloj, ŝajnigante, ke ŝi lude ĉasadas lernejanojn, kaj ŝi kriis ridante, kiam ŝi kaptis iun; sed li rimarkis ankaŭ, ke ŝi faris siajn kaptojn ĉiam en lia proksimo, kaj ke ŝi ĵetis konsciajn rigardojn en lia direkto. Tio tiklis la malican arogantecon en li; kaj anstataŭ voli gajni ŝin, lia vanto instigis lin eĉ pli obstine kaŝi, ke li konscias ŝin ĉirkaŭ si. Baldaŭ ŝi rezignis pri sia alaŭdeca konduto kaj moviĝadis heziteme. Unu- aŭ dufoje ŝi ĝemis kaj ŝtelrigardis sopireme al Tom. Poste ŝi observis, ke Tom nun interparolas pli intense kun Amy Lawrence ol kun iu alia.

Ŝi sentis fortan korpikon kaj samtempe fariĝis pli kaj konfuzita kaj malkomforta. Ŝi provis foriri, sed la piedoj perfidis ŝin kaj portis ŝin anstataŭ tio al la grupo. Ŝi diris al knabino, kiu preskaŭ tuŝis kubuton de Tom, kun falsa vervo:

„Aĥ, Mary Austin! Maliculino, kial vi ne estis en la la dimanĉa lernejo?“

Mi ĉeestis – ĉu vi ne vidis min?“

„Ĉu vere? Vi ĉeestis, ĉu? Kie vi sidis?“

„Mi estis en la klaso de sinjorino Peters, kiun mi ĉiam frekventas. Mi VIN vidis.“

„Ĉu efektive? Nu, estas komika, ke mi ne vidis vin. Mi volis rakonti al vi pri la pikniko.“

„Ho, tio estas gajega. Kiu aranĝas ĝin?“

„Panjo mia permesas al mi la aranĝadon.“

„Ha, bonege, mi esperas, ke ŝi permesos partoprenon mian.“

„En ordo, ŝi faros. La pikniko estas por mi. Ŝi permesos la partoprenon al ĉiu, al kiu permesas tion mi.“

„Tio estas ja grandioza, kiam ĝi okazos?“

„Iam, baldaŭ. Eble dum la ferioj.“

„Ha, tio fariĝos gajega! Ĉu vi invitos ĉiujn knabinojn kaj knabojn?“

„Jes, ĉiun, kiu estas mia amiko – aŭ intencas fariĝi tio“, kaj ŝi rigardis sekrete al Tom. Sed Tom parolis plu al Amy Lawrence pri la terura ŝtormo kaj la insulo, kaj kiel fendis fulmoj la grandan platanon „en mil pecetojn“, dum li „staris tri futojn for de tio“.

„Ho, ĉu ankaŭ mi rajtos partopreni?“ diris Grace Miller.

„Jes.“

„Kaj mi, ĉu?“ diris Sally Rogers.

„Jes.“

„Ĉu ankaŭ mi?“ diris Susinjo Harper. „Kaj Joe, ĉu?“

Kaj tiel plu, kun aplaŭdo de ĝojplenaj manoj, ĝis kiam ĉiu el la grupo petis jam inviton, krom Tom kaj

Amy. Jen Tom deturniĝis sen paniko ankoraŭ parolante, kaj foriris kun Amy. La lipoj de Becky tremis kaj larmoj ekmontris sin en ŝiaj okuloj; ŝi kaŝis tiujn signojn kun plifortigita gajeco kaj babiladis plu. Sed la vigeleco de la pikniktemo nun forestis, tiel kiel ĉio alia. Ŝi foriris tiom rapide, kiom ŝi povis, ŝi kaŝis sin kaj, kiel ŝia genro tion priskribas, „elkore ploris.“ Poste ŝi sidis mishumure, kun „vundita“ fiero, ĝis eksonoris la lerneja sonorilo. Ŝi leviĝis nun, kun venĝema rigardo, ŝi skuigis ŝian harplektaĵon kaj diris, ke ŝi nun scias, kion ŜI DEVOS fari.

Je la paŭzo Tom daŭrigis sian flirtadon kun Amy, kun jubila memkontento. Li promenadis parade por trovi Becky-on kaj intencis dolorigi ŝin per sia prezento. Fine li elspionis ŝin, sed jen lia humortermometro subite falis. Ŝi sidis komforte sur malgranda benko post la lernejo, rigardante bildolibron kune kun Alfred Temple, kaj ili estis enprofundiĝintaj tiom, kaj iliaj kapoj apude preskaŭ tuŝis sin super la libro, tiel, ke ŝi ŝajne ne estis konscia pri io ajn kroma. Ruĝa ĵaluzo pafiĝis varmege tra liaj vejnoj. Li komencis malami sin, ĉar li forĵetis la ofertan de Becky pri repaciĝo. Li nomis sin stultulo kaj riproĉis sin per ĉiuj fiaj insultnomoj, kiujn li konis. Li emis larmi pro ĉagreno. Amy babiladis ĝoje

plu, dum ili migris, ĉar ŝia koro kantis pro beateco, sed la lango de Tom ĉesis funkcii. Li ne aŭdis tion, kion diris Amy, kaj ĉiam kiam ŝi atendante paŭzis, li povis balbuti nur iun mallertan konsenton, ĉu ĝi estis ĝusta aŭ ne. Denove kaj denove li retroviĝis sur la malantaŭa flanko de la lerneja domo por bruligi siajn okulajn globojn per la malamata spektaklo tie. Li ne povis agi alie. Kaj frenezigis lin – almenaŭ li supozis vidi tion – ke Becky Thatcher eĉ ne unufoje rimarkis, ke li vivas. Sed ŝi rimarkis lin tute certe, kaj ŝi sciis, ke ŝi gajnis la batalon, kaj ŝi estis feliĉa, ke li suferas tiel, kiel suferis ŝi.

La feliĉa babilado de Amy fariĝis neeltenebla. Tom aludis pri aferoj, kiuj atendas lin, kiujn li devas fari, ĉar ili ne prokrasteblas. Sed vane – la knabino pepadis plu. Tom pensis, ke ŝi foriĝu inferen, kaj li demandis sin, ĉu li neniam povos liberigi sin de ŝi. Fine li *devis* ĉeesti tiujn neprokrasteblajn aferojn, kiuj postulas lian ĉeeston – kaj ŝi diris senĝenite, ke ŝi estos „proksime“, kiam la lerneja instruado estos finita. Kaj li fortrotis haste, malamante ŝin pro tio.

„Ĉiu alia knabo...!“ pensis Tom, grincante per la dentoj. Ĉiu knabo en la urbo, sed ne tiu laŭmoda fanfaronulo el Sankta Luiso, kiu pensas, ke li estas tiom fajne vestita kaj tiom aristokrata! Nu, en ordo,

mi jam foje traktis vin per miaj pugnoj, je via unua tago en tiu ĉi urbo, sinjoro mia, kaj mi traktos vin tiel denove! Atendu nur, ĝis kiam mi kaptos vin! Tiam mi vin simple....“

Li traludis ĉiujn movojn, kvazaŭ li draste batadas imagatan knabon, li boksis en la aeron, tretis kaj ŝvitigis lin per sufokiga brakumo. „Nu, ĉu vi nun havas sufiĉe? Vi vokas, ke sufiĉas, ĉu? Nu, en ordo, tio estu instruo por vi!“ Kaj tiel la imagata batalo finiĝis kontentige por li mem.

Tagmeze Tom fuĝis hejmen. Lia konscio ne eltenis ion plian de la dankema beateco de Amy kaj lia ĵaluzo nenion plu de la alia ĉagreno. Becky daŭrigis sian bildospektadon kune kun Alfred, sed kiam la minutoj pli kaj pli longiĝis kaj neniu Tom alvenis por suferi, ŝia triumfo komencis retiriĝi malantaŭ nubojn kaj ŝi perdis la intereson. Sekvis ŝarganta seriozeco, malĉeesteco kaj melankolia perditeco; du- aŭ trifoje ŝi ekaŭskultis pro iu paŝo, sed estis falsa espero; Tom ne venis. Fine ŝi fariĝis pli kaj pli malbonfarta kaj deziris, ke ŝi ne estu pelinta la aferon ĝis la ekstremo. Kiam la kompatinda Alfred ekkonis, ke li perdas ŝin, sen kompreni kial, kaj seninterrompe plu ekkriis: „Ho, jen gajega bildo! Rigardu ĝin!“ ŝi perdis fine la paciencon kaj diris:

„He, lasu min en paco! Ili ne interesas min!“ kaj ŝi eklarmis, ekstaris kaj foriris.

Alfred iris apud ŝi kaj provis konsoli ŝin, sed ŝi diris: „Foriĝu kaj lasu min sola. Mi hatas vin!“

Tial la knabo haltis, kaj mirigite demandis sin, kion malĝustan li faris – ĉar ŝi diris antaŭe al li, ke ŝi rigardos bildojn kun li dum la tuta tagmeza paŭzo – kaj ŝi plorante foriris. Poste Alfred cerbumante paŝis en la lernejon. Li estis humiligita kaj kolera. Li facile divenis la vojon al la vero – la knabino simple eluzis lin por montri sian spiton al Tom. Lia malamo kontraŭ Tom pro tiu penso tamen tute ne fariĝis pli malgranda. Li deziris trovi ion, per kio li povus puŝi la knabon en malfacilaĵojn, sen granda risko por si mem. Jen li ekvidis la instrulibron de Tom. Estis do la bonŝanco. Dankeme li malfermis la lecionon por la posttagmezo kaj verŝis inkon sur la paĝon.

En tiu ĉi momento Becky ekrigardis tra fenestro internen, vidis, kion li faras, sed ŝi retiriĝis sen malkaŝi sin mem. Ŝi ekiris hejmen, nun por trovi Tomon kaj rakonti tion al li. Tom estus dankema al ŝi kaj ŝiaj malfacilaĵoj finiĝus. Sed antaŭ ol ŝi hejmiris duonon de la vojo, ŝi ŝanĝis sian opinion. La penso

pri tio, kiel fie Tom traktis ŝin, kiam ŝi parolis pri sia pikniko, revenis arde varmege en ŝian memoron kaj plenigis ŝin per honto. Ŝi decidis lasi vergi lin pro la difektita instrulibro kaj krome malami lin eterne.

Ĉapitro 19

TOM alvenis hejme en malĝoja stato, kaj la unua, kion diris lia onklino, montris al li, ke li portis siajn zorgojn al nepromesanta foirplaceto:

"Tom, mi emus detiri vian haŭton, dum vi ankoraŭ vivas!"

„Onjo, kion mi faris?“

„Nu, vi faris sufiĉe. Jen mi iras al Sereny Harper, kiel naiva olda ŝafo, atendante, ke mi povas konvinki ŝin pri la tuta sensencaĵo rilate la songon, sed jen vidu, ŝi jam eksciis de Joe, ke vi estis ĉe ni kaj aŭdis la tutan interparoladon el tiu nokto. Tom, mi ne scias, kio fariĝu el knabo, kiu agas tiel, kiel vi faris tion. Ĝi faras min tiom malbonfarta, ke vi lasis iri min al

Sereny Harper kaj tiel ridindigis min kaj tute ne diris eĉ unu veran vorton al mi.“

Tio estis nova aspekto de la afero. Lia matena ruzeco antaŭe ŝajnis al Tom bona ŝerco kaj vere genia. Sed nun ĝi montriĝis nur malica kaj sensprita. Li klinis sian kapon kaj en tiu momento eĉ ne povis pripensi, kion diri. Poste li diris:

„Onjo, mi dezirus, ke mi ne estus farinta tion — sed mi ne pripensis la aferon.“

„Ho, infano, vi pripensas neniam ion. Vi pensas nur pri via avantaĝo. Kvankam vi povis pensi pri tio, kiel transiri la longan vojon de la Insulo de Jackson en la nokto por ridi pri nia korpremitecoj, kaj kvankam vi povis elpensi, kiel mistifiki min per mensogo pri songo; vi neniel kapablis pensi pri tio kompati nin kaj savi nin el tiu situacio.

„Onklino, mi scias nun, ke mi estis malica, sed mi ne celis esti malica. Mi ne faris, tute honeste. Kaj krome, mi ne venis transen al vi por ridi pri vi en tiu nokto.“

„Kial vi do venis?“

„Por rakonti al vi, ke vi ne devas senti vin malkomforta pro ni, ĉar ni ne dronis.“

„Tom, Tom, mi estus la plej dankema homo en la mondo, se vi iam ajn havus tian penson, sed vi ja scias, ke vi tion pensis neniam, — kaj tion *scias mi*, Tom.“

„Tute male, tute male — mi tuj rigidiĝu kiel salkolono, se mi NE pensis tion.“

„Ho, Tom, ne mensogu— ne faru tion. Ĝi nur malbonigus la aferon centfoje.

„Tio ne estas mensogo, onjo; jen la vero. Mi volis deteni vin de suferado — jen ĉio, kio instigis min veni al vi.“

„Mi donus la tutan mondon por povi akcepti tion — tio kompensus tutan aron da pekoj, Tom. Mi estus eĉ feliĉa pri tio, ke vi forkuris kaj agis tiel fie. Sed tio ne estus prudenta; ĉar tio ne klarigus, kial vi ne diris

tion al mi, infano.“

„Nu, komprenu, kiam vi komencis paroli pri la funebro, tuj plenigis min la ideo pri nia reveno kaj nia antaŭa kaŝado en la preĝejo, kaj iel mi ne povis elteni la penson fuŝi la tutan aferon per miaj sciigoj. Tial mi remetis la ŝelon en mian poŝon kaj tenis mian buŝon fermita.“

„Kiun ŝelon?“

„La arboŝelo, sur kiun mi skribis, ke ni foriris por fariĝi piratoj. Mi dezirus, nun, ke vi estus vekiĝinta tiam, kiam mi kisis vin – mi faris tion, tute honeste.“

La severaj konturoj en la vizaĝo de la onklino malstreĉiĝis kaj subite vualigis tenero ŝiajn okulojn.

„Ĉu vi kisis min, Tom?“

„Jes ja, mi faris.“

„Ĉu vi certas, ke vi faris tion, Tom?“

„Jes, certe, mi kisis vin, onjo — centprocente.“

„Kaj kial vi donis al mi kison, Tom?“

„Ĉar mi volis esti karesema al vi, kaj vi kuŝis tie tiom ĝemanta kaj mi estis tiom malĝoja.“

La vortoj sonis fidinde. La maljuna damo, ne povis kaŝi tremadon en sia voĉo kaj diris:

„Kisu min denove, Tom! — kaj nun, ek al la lernejo, kaj neniam plu ĉagrenu min.“

Tuj, kiam li forestis, ŝi kuris al la necesejo kaj elprenis la trivitan jakon, per kiu Tom sin vestis kiel pirato. Poste ŝi haltis, kun la jako enmane, kaj ŝi diris al si mem:

„Ne, tion mi ne risku. Kompatinda knabo, mi supozas, ke li mensogis pri tio — sed estas benata mensogo, tre benata, tiom da konsolo estas en ĝi. Mi esperas, ke la Sinjoro — MI SCIAS, ke la Sinjoro

pardonos al li, ĉar ĝi estis tiel bonkora de Tom dirition. Mi prefere ne eltrovu, ĉu ĝi estas mensogo, ĉu ne. Mi ne rigardos.“

Ŝi metis la jakon flanken, kaj staris mediteme dum minuto. Je dua fojo ŝi etendis la manon por elpreni la jakon denove, kaj dufoje ŝi sin detenis. Ŝi faris la saman ankoraŭfoje, kaj ĉifoje ŝi subtenis sin per la penso: „Estas bonkora mensogo – estas bonkora mensogo – mi ne permesos ĉagreni min pri ĝi.“ Tial ŝi serĉis la jakopoŝon. Momenton poste ŝi legis la pecon da ŝelo tra larmoj kaj diris: „Mi povus pardoni al la knabo nun, eĉ tiukaze, se li estus pekinta eĉ milionope!“

Ĉapitro 20

Io en la konduto de Polly, kiam ŝi kisis lin, balais flanken lian mishumuron kaj faris lin facilanima kaj feliĉa denove. Li ekiris al la lernejo kaj bonŝancis renkonti la knabinon Becky je la fino de la Herbejostrateto. Kiel ĉiam decidis lia animstato pri lia konduto. Sen heziti dum momento, li kuris al ŝi kaj diris:

„Mi agis tre malice hodiaŭ, Becky, kaj mi tre bedaŭras tion. Mi faros tion neniam, neniam denove — tiom longe, kiom mi vivos, bonvolu, ĉu ni repaciĝu?“

La knabino haltis kaj rigardis arogante al lia vizaĝo:

„Mi estus dankema al vi, se vi ne molestus min, sinjoro Thomas Sawyer. Kun vi min neniam denove interparolos.“

Ŝi ĵetis la kapon malantaŭen kaj preterpasis lin.

Tom estis tiom surprizita, ke li eĉ ne havis sufiĉe da spiritpreteco por diri: 'Kiun tio interesas, sinjorino Superruz?' Ĝis la ĝusta momento estis pasinta. Tial li diris nenion. Sed li estis sufiĉe kolera, tamen. Li treniĝis en la lernejan korton, dezirante, ke ŝi estu knabo, kaj li imagis kiel li bategus ŝin, se ŝi estus knabo. Baldaŭ li atingis ŝin kaj preterirante kvazaŭ pinĉis per ofendiga rimarko. Ŝi hurlis ion alian kiel respondon, kaj tiel la kolerrompo estis kompleta. Pro sia indigno, ŝi apenaŭ povis atendi, ke la lerneja pordo malfermiĝu, ŝi estis tute avida vidi, kiel oni

vergis lin por la difektita instrulibro. Se ŝi iam eventuale havis la prokrastitan ideon perfidi la knabon Alfred Temple, tion tute forigis la atakema rimarko de Tom.

Kompatinda knabino. Kiel rapide ŝi mem estos en embarasa ĉagreno. La lernejestro sinjoro Dobbins, fariĝis jam mezaĝa kaj estis nekontenta rilate siajn profesiajn ambiciojn. Lia plej granda deziro estis fariĝi kuracisto, sed lia malriĉo kaŭzis, ke li ne fariĝis pli ol altranga lernejestro en urbeto. Ĉiutage li tiris misteran libron el sia pupitro kaj profundigis sin en ĝin, kiam ĉiuj klasaj niveloj ne recitis ion. Tiun libron li konservis serure fermita kaj la ŝlosilon li havis ĉe si. Ne estis eĉ unu bubo en la lernejo, kiu ne pretus morti por rigardi en ĝin, sed la bonŝanco ofertiĝis neniam. Ĉiu knabo kaj ĉiu knabino havis sian propran teorion pri tio, kion ĝi entenas, sed eĉ ne du teorioj estis samaj kaj faktoj en tiu afero ne estis je dispono. Kiam Becky preteriris la pupitron, kiu staris proksime de la pordo, ŝi rimarkis, ke la ŝlosilo estas en la seruro. Tio estis rara momento! Ŝi rigardis ĉirkaŭe kaj konstatis, ke ŝi estas sola, kaj en la sekva momento ŝi havis jam la libron enmane. La titola paĝo, „La anatomio de Profesoro Kaj-Tiel Plu“ – signifis nenion por ŝia menso; tial ŝi komencis foliumi la paĝojn kaj ekvidis bele gravuritan kaj

koloritan frontispicon – personon, tute nudan. En tiu momento falis ombro sur la paĝon kaj Tom Sawyer enpaŝis tra la pordo kaj kaptis vidaĵon de la bildo. Becky kaptis la libron por fermi ĝin, sed dum tio tute malbonŝancis, ĉar ŝi disŝiris la bildon vertikale ĝis la mezo. Ŝi ĵetis la volumon en la tirkeston de la pupitro kaj eklarmis pro honto kaj kolero.

„Tom Sawyer, vi estas ja malica tiom, kiom nur eblas, vi ŝtele proksimiĝas al persono kaj rigardas, kion rigardas tiu.“

„Kiel mi povis scii, ke vi rigardas ion?“

„Vi devus honti pri vi mem, Tom Sawyer, nun vi kompreneble tuj perfidos min, ho ve, kion mi do faru?! Kion mi do faru?! La instruisto vergos min, kaj oni neniam vergis min en la lernejo.“

Poste ŝi stamfis la plankon per malgranda piedo kaj diris:

„Estu tiel fia, se vi celas tion! Sed *mi scias* ion, kio poste okazos, atendu nur iom, kaj vi spertos ĝin! Mi

hatas vin, mi hatas vin, mi hatas vin!“ – kaj ŝi kuris el la domo, kun nova eksplodo de larmoj.

Tom staris silente, tute konfuzita pri tiu impeta kolero. Sed baldaŭ li diris al si mem:

„Kia stranga speco de stultulino povas esti knabino! Neniam oni vergis ŝin en lernejo! Feko! Kiom bagatela estas traktado per vergo! Sed tio estas tute laŭknabina – tiom ofendiĝema kaj kokidtimema. Komprenoble mi ne ekiros por elbabili tion ĉe la olda Dobbins, ĉar ekzistas aliaj ebloj por glatigi la aferon kun ŝi, kio ne estas tiom malica, sed kiu el ili? Oldulo Dobbins demandos, kiu disŝiris la libron. Neniu respondos. Tiam li faros tion, kion li ĉiam faras en tia situacio – li demandos ĉiujn laŭvice, kaj kiam li venos al la ĝusta knabino, li scios tion, sen iu elbabilado. La vizaĝoj de la knabinoj ĉiam parolas al li. Ili ne havas kuraĝon. Ŝi ricevos vergobatojn. Nu, jen Becky Thatcher estos en la kaĉo, ĉar ne estos savelirejo por ŝi. Tom ankoraŭ iom pli longe meditis pri tio kaj aldonis:

„En ordo, ŝi volonte vidus min en simila kaĉo – ŝi do eltenu tion!“

Tom aliĝis al la lernantoj, kiuj ludadis ekstere de la lernejo. Iom poste aperis la instruisto kaj la lernejo komenciĝis. Tom ne interesiĝis tre pri instruado. Ĉiam, kiam li rigardis al la knabina flanko, la vizaĝo de Becky maltrankviligis lin. Konsiderante ĉion entute, li ne volis kompati ŝin, sed tamen tio estis ĉio, kion li povis fari. Li ne povis estigi malican ĝojon en si, kiu meritis la priskribon. Baldaŭ okazis la malkovro pri la difektigo de la lego-libro, kaj poste dum certa tempo Tom estis okupata nur pri si mem. Becky leviĝis el sia letargio kaj montris grandan intereson pri la proceduro. Ŝi ne supozis, ke Tom povus eviti sian punon, se li kontestus, ke li verŝis inkon sur la libron; kaj ŝi pravis. La kontestado ŝajne faris la aferon nur pli malbona por Tom. Becky supozis, ke ŝi ĝojos pri tio, kaj ŝi provis akcepti, ke ŝi estas feliĉa pri tio, sed ŝi trovis, ke ŝi ne estas certa. Kiam la plej aĉa atingis sian kulminon, ŝi havis la impulson ekstarti kaj rakonti pri Alfred Temple, sed ŝi subigis la impulson kaj devigis sin silenti – „ĉar“, ŝi diris al si mem, „li tute certe perfidos, ke la bildon disŝiris mi. Mi eĉ ne dirus vorton, se mi povus savi lian vivon!“

Tom akceptis la vergadon kaj reiris al sia sidloko, sed ne tute deprimita, ĉar li pensis, ke eblas, ke li senkonscie renversis la inkon sur la legolibron dum

petolado, li neis tion nur pro formo kaj ĉar tio estis la kutimo, kaj li daŭrigis sian neadon pro principo.

Tuta horo pasis treniĝe. La lernejestro sidis kun klinita kapo dormeme sur sia trono, la aero estis plenigita de la lernanta murmurado.

De tempo al tempo sinjoro Dobbins rektiĝis, oscedis, tiam li malfermis la tirkeston de la pupitro kaj etendis manon al sia libro, sed ŝajnis, kvazaŭ li estus sendecida ĉu preni aŭ lasi ĝin. La plej multaj lernantoj rigardis apatie, sed estis inter ili du lernantoj, kiuj observis liajn movojn atente. Sinjoro Dobbins dum kelke da tempo palpadis malĉeeste, poste li elprenis la libron kaj apogis sin dorse sur la seĝo por legi! Tom rigardis rapide al Becky. Li iam vidis ĉasitan kaj senhelpan kuniklon, kun fusilo metita al ties kapo. La kuniklo aspektis kiel Becky. Tuj li forgesis la kverelon kun ŝi. Urĝis! Ion li devis entrepreni, kaj rapide kiel fulmo! Sed la tuj ekanta okazo paralizis lian eltroveman spiriton. Bone! – Li havis ideon! Li intencis ekkuri kaj kapti la libron, salti tra la pordo kaj fuĝi. Sed lia decidemo ŝanceliĝis dum momento, kaj tiel la bonŝanco estis perdita. La instruisto malfermis la libron. Se Tom nur ekhavis la bonŝancon denove! Tro malfrue. Ke helpo por Becky nun ne plu eblis, li murmuris al si. En la sekva

momento la estro komencis observi la klason. Ĉiuj okuloj kliniĝis fronte de tiu rigardo. Estis io en ĝi, kiu eĉ frapis senkulpulojn per ektimo. Jen silento, dum kiu oni povus kalkuli ĝis dek. La instruisto bridis lian koleron kaj poste diris: „Kiu disŝiris tiun libropaĝon?“

Aŭdeblis nenio. Oni povus aŭdi la falon de pinglo. La kvieto estis daŭrigata, la estro rastis vizaĝon post vizaĝo pri signo de kulpo.

„Benjamin Rogers, ĉu vi disŝiris tiun libropaĝon?“

Sekvis neado, poste plia paŭzo.

„Josefo Harper, ĉu faris tion vi?“

Denova neado. La malbonfarto de Tom pli kaj pli fortiĝis sub la malrapida turmento de tiu proceduro.

La estro rastis la vicojn de la knaboj – iom konsideris la aferon kaj poste turniĝis al la knabinoj:

„Amy Lawrence, ĉu?“

Kapneado.

„Gracie Miller, ĉu?“

La sama gesto.

„Susana Harper, ĉu tion faris vi?“

Denova neado. La sekva knabino estis Becky Thatcher. Tom tremis de la kapo ĝis la piedoj pro ekscitiĝo kaj pro sento de despero pri la situacio.

„Rebeka Thatcher“ (Tom rigardis ŝian vizaĝon— ĝi estis pala pro teruriĝo) „ĉu vi disŝiris — ne, rigardu al mia vizaĝo“ (ŝiaj manoj leviĝis petegante) — „Ĉu vi disŝiris la paĝon?“

Penso kiel fulmo eklumis en la cerbo de Tom. Li saltis sur la piedojn kaj vokis:

„Faris tion mi!“

La lernantoj reciproke gapis sin perpleksigite de tiu frenezaĵo. Tom restis staranta dum momento por kolekti fortojn, kaj kiam li paŝis antaŭen por ricevi la punon, la surprizo, la dankemo kaj adoro, kiuj radiis al li el la okuloj de la kompatinda Becky, ŝajne estis sufiĉe da pago por cent vergadoj. Inspirite de la grandiozeco de sia propra ago, li akceptis eĉ sen unu ekkrio la plej senpardoneman vergadon, kiun sinjoro Dobbins mem iam ajn disdonis. Kaj li ankaŭ akceptis indiferece la aldonitan kruelecon de la ordono devi areste restadi ankoraŭ du horojn en la lernejo, ĉar li sciis, kiu ekstere atendos lin, ĝis lia aresto estos finita, kaj kiu tiun enuan tempon same ne rigardus perdo.

Kiam Tom ĉivespere enlitiĝis, li planis venĝon al Alfred Temple, ĉar Becky plena de honto kaj pento ĉion rakontis al li, kaj ĉe tio ankaŭ ne prisilentigis sian propran malfidelecon. Sed eĉ la venĝovolutoj baldaŭ devis cedi lokon al pli amuza kontemplado, kaj li ekdormis fine kun la lastaj vortoj de Becky, kiuj sonĝece restadis en liaj oreloj:

„Tom, kiel vi povis esti tiel nobla?!“

Ĉapitro 21

La FERIOJ proksimiĝis. La lernejestro, kiu estis ĉiam severa, fariĝis eĉ pli severa kaj pli postulema ol iam ajn, ĉar li celis, ke la lernejo bone prezentiĝu je la ekzamena tago. Lia vergo kaj lia liniilo pigris nun malofte – almenaŭ ĉe la pli malgrandaj lernantoj. Nur la plej grandaj junuloj kaj junaj damoj, kiuj estis dekokaj aŭ pli aĝaj eskapis de la vergado. La vergobatoj de Dobbins estis tre fortaj, ĉar spite tion, ke li havis sub sia peruko perfekte kalvan kaj brilan kapon, li estis nur mezaĝa, kaj ne videblis signo pri malfortiĝo de liaj muskoloj. Kiam la granda tago proksimiĝis, la tuta tiraneco, kiu estis en li, aperis sur la surfaco. Li ŝajne havis venĝeman plezuron puni eĉ la plej etajn bagatelojn. La konsekvenco estis, ke la pli malgrandaj knaboj pasigis siajn tagojn en timo, teruriĝo kaj suferado, kaj ke ili nokte planis venĝojn. Ili ne ellasis okazon por fari iun malicaĵon al la lernejestro. La repago, kiu ĉiam sekvis al ĉiu sukcesa venĝo, estis tiel drasta kaj impona, ke la knaboj ĉiam retiriĝis de la kampo en la plej aĉa stato. Fine ili komplete konspiris kaj elkovis planon, kiu promesis brilan venkon. Ili incis la filon de la ŝildopentrismo, rakontis al li, kion ili planis kaj petis pri lia helpo. Li havis proprajn kialojn por esti ravita, ĉar la

lernejestro loĝis en la domo de la patra familio, kaj donis al la knabo abunde da kaŭzoj por hati lin. La edzino de la instruisto laŭdire vojaĝos post kelkaj tagoj kampadejen, kaj tiel ne plu estos obstaklo por la plano. La instruisto preparis sin ĉiam por grandaj okazoj per tio, ke li sufiĉe draste ebriigis sin, kaj la filo de la ŝildopentristo diris, ke li ja „aranĝos la aferon“ tiam, kiam la lernejestro atingos tiun necesan staton kaj jam dormos en la fotelo je la vespero antaŭ la ekzamentago, ke poste li vekigos lin je la ĝusta tempo, por ke la instruisto rapide kuru al la lernejo.

Finfine la tempo de la interesa okazaĵo alvenis. Je la oka vespere la lerneja domo estis brilege iluminata kaj ornamata per kronoj kaj girlandoj el folioj kaj floroj. La lernejestro tronis altigite per platformo en sia granda seĝo, kun la nigra tabulo malantaŭ si. Li aspektis tolereble ebria. Sur ambaŭ flankoj estis tri benkovicoj, kaj ses vicoj fronte de li, ilin ĉiujn okupis la honorinduloj de la urbeto kaj la gepatroj de la gelernantoj. Je lia dekstra flanko post la vicoj de la civitanoj, estis provizore starigita larĝa scenejo, sur kiu sidis la erudiciaj lernantoj, kiuj partoprenos la ekzamenadojn de la vespero. Tie antaŭe estis la vicoj de la malgrandaj knaboj, kiuj estis lavitaj kaj vestitaj ĝis netolerebla grado de malkomforto; malantaŭ ili

estis ankaŭ la vicoj de rigidaj grandaj knaboj kaj la vicoj de knabinoj kaj junaj damoj kvazaŭ neĝkovritaj en batisto kaj muslino, kiuj okulfrape konsciis pri siaj nudaj brakoj, pri la antikvaj strasoj de la avinoj, pri siaj rozkoloraj kaj bluaj rubandoj kaj la floroj en la hararoj. La tuta restaĵo de la domo estis plenigita per lernantoj, kiuj ne partoprenos la ekzamenadon.

La ekzamenado komenciĝis. Tre malgranda knabo ekstaris kaj recitis embarasite:

„Ja apenaŭ atendis vi de mi, knabet', reciti ion tie ĉi.“ ktp. – li akompanis sin mem per la samaj dolorige precizaj kaj spasmaj gestoj, kiujn uzus maŝino – se oni supozus, ke la maŝino iom misfunkcias. Sed li recitis ĝisfine senerare, tamen kruele streĉite, li ricevis viglan rondirantan aplaŭdon, kiam li faris sian ekzercitan kliniĝon kaj retiriĝis.

Malgranda hontvizaĝa knabino lispis: „Maria havis ŝafideton“, ktp., ŝi faris kompatindan riverencon, ricevis rekonan aplaŭdon kaj sidiĝis kun ruĝa kapo kaj feliĉis.

Tom Sawyer paŝis antaŭen kun vanta memfido kaj

alte fluge komencis reciti la neforgeseblan kaj nedetruieblan „Aŭ donu liberon aŭ la morton“-parolon, kun pasia furiozo kaj freneza gestado, sed li perdis la fadenon en la parolmezo. Abomena sursceneja timo kaptis lin kaj liaj piedoj ekstremis, li havis la senton, kvazaŭ li devus sufokiĝi. Estas vere, li havis la nekaŝitan simpatian de la aŭskultanta spektantaro, sed ankaŭ ties silenton, kio estis eble eĉ pli malbona ol ilia simpatio. La lernejestro tordis la vizaĝon; kaj tio kompletigis la katastrofon. Tom baraktis dum certa tempo kaj poste retiriĝis, tute venkita. Aŭdiĝis mallaŭta provo de aplaŭdo, sed ĝi baldaŭ silentiĝis.

Sekvis „Knab' staris sur brulanta ferdek“, ankaŭ „Asiri' atakis lupe“ kaj aliaj patosaj recitaj juveloj. Poste okazis legaj ekzercoj, kaj ortografia konkurso. La klaso por la „malgranda latino“ recitis honorinde. Kaj nun estis la vespera kulmino en la vico – originalaj tekstoj de la junaj damoj. Ĉiu el ili laŭvice paŝetis al la rando de la platformo, tusetis, tenis alte sian manuskripton (ligitan per beleta rubando) kaj komencis legi, kun speciala atento pri la „esprimo“ kaj la interpunkcio. La temoj estis la samaj, kiuj estis abunde uzataj jam antaŭe dum similaj eventoj de iliaj patrinoj, de la avinoj kaj sendube de ĉiuj iliaj antaŭirantoj en la ineca devenlinio ĝis la Krucmilitoj.

„Amikeco“ estis unu el la temoj, aliaj: „Memoroj el pasintaj tagoj“, „Religio en historio“, „Revolando“, „La avantaĝoj de la kulturo“, „Komparo kaj kontrastigo de diversaj formoj de politikaj registaroj“, „Melankolio“, „Infanamo“, „Sopiro de la koro“ ktp, ktp.

Elstara eco de tiuj tekstoj estis kareseme flegata kaj dorlotata melankolio, alia estis la disipema kaj abunda ŝprucaĵo de „fajna lingvo“, plia la tendenco altiri kvazaŭ je la oreloj precipe elektitajn vortojn kaj frazojn, ĝis kiam tiuj estis tute trivitaj. Kaj kroma specialaĵo, kiu konsiderinde markis kaj fuŝis la tekstojn, estis la neevitebla kaj netolerebla prediko pri moralo, kiu svingadis sian kriplitan voston je la fino de ĉiu el ili. Egale pri kio temis, ĝi estis en cerbotorturiga maniero tiel tordita pri tiu aŭ tiu aspekto, ke la moralo kaj la religia sento povis mediti kun edifo. La ĉielen krianta malsincero de tiuj predikoj estis tamen ne sufiĉa kaŭzo por ekzili tiun moron de la lernejoj – kaj la kaŭzo ne sufiĉas ĝis nun, ĝi neniam estos sufiĉa, dum la mondo ekzistos, eble. Ne estas iu lernejo en nia tuta lando, kie la junaj damoj ne sentas sin devigitaj fini siajn tekstojn per prediko; kaj oni devas konstati, ke la prediko de la plej frivola kaj malplej religia knabino ĉiam estas la plej longa kaj plej senkompate pia. Sed tio sufiĉu pri

tio. La simpla vero estas nedigestebla.

Ni reiru al la „ekzamenado“ mem. La unua teksto, kiu estis antaŭlegata, havis la titolon: „Ĉu tio do estas la vivo?“ Eble la leganto povas elteni parton el ĝi:

„Kun kia antaŭĝojo kutime junula spirito anticipas scenon de festa evento! La fantazio desegnas rozkolorajn bildojn de la ĝojo. En la imago la volupta adorantino de l' modo vidas sin mem jam kiel la mezpunkton de la festa societo. Ŝia rava figuro, vestita en neĝoblankan robon, kirladas tra labirintoj de ĝoja dancado; ŝiaj okuloj estas la plej brilaj, ŝiaj paŝoj la plej facilaj en la gaja societo.

En tiaj superbaj fantazioj la tempo glitas rapide antaŭen kaj la bonvenigata horo venos, kiam ŝi paŝos en la Elizean mondon, pri kiu ŝi havis tiajn beatigajn revojn. Kiel fabeleca aperas al ŝi ŝia ensorĉiga vizio! Ĉiu nova sceno estas pli plaĉa ol la antaŭa.

Sed post certa tempo ŝi ekkonas, ke sub la tuta brila surfaco troviĝas nur vanto. La flatado, kiu ĝojigis ŝian animon, nun kriaĉas dolorige en ŝiaj oreloj; la baldomo perdis sian raven; kaj kun fuŝita sano kaj

amarigita koro ŝi turnas sin flanken kun la konvinko,
ke surteraj plezuroj neniam povas kontentigi la
sopirojn de la animo!“

Kaj tiel plu kaj tiel plu. De tempo al tempo aŭdeblis
zumado de rekono dum la legado, akompanata de
flustritaj erupcioj: „Ho, kiel dolĉe.“ „Kiom
elokvente!“ Kiom vere!“ ktp. Kaj post la prezento, kiu
finiĝis per precipe afliktiga prediko, la aplaŭdo estis
entuziasma.

Poste leviĝis svelta, melankolia knabino, kiu havis
„interesan“ palecon, kiun kaŭzis piloloj kaj malbona
digesto. Ŝi antaŭlegis „poemon“.

Du strofoj sufiĉos:

ADIAŬO DE MISURIO-KNABINO DE ALABAMO

Alabamo, ĝis! Mi amas vin tre!

Sed aĥ, por moment' mi forlasas vin nun!

Malĝoj' de sent' dolorigas min, ve!

Bruligas memoroj min do, sed ne sun'!

Mi migris arbare sur flora ter';
Promenis ĉe l' *Tallapoosa* dum hor';
Aŭskultis mi vin, *Tallasee-river*;
Ĉe l' *Coosa* petis pri kis' de Aŭror'.

Nek kaŝas mi trosenton de la kor'
nek ruĝiĝas mi pro l' larma rigard'.
Ne de fremda land' ja iris mi for.
Ne fremdajn homojn lasis mi ĉe l' start'.
Bonvenan hejmon donis mia „*state*“.
Sed nun foriĝas valoj, preĝejtur'.
Sensenti devus okuloj, kor', „*tête*“,
se Alabamon, mi deturnus nur!

Nur malmutaj de la ĉeestantoj sciis, kion „*tête*“,
signifas, sed la poemo estis tamen tre kontentiga.

Poste aperis malhelkolora juna damo kun nigraj
okuloj, kiu enmetis impresan paŭzon kaj komencis
paroli kun adekvata solena tono:

VIZIO

Malhela kaj ŝtorma estis la nokto. Ĉirkaŭ la trono en la alto ne trembrilis eĉ unu stelo; sed la basa grumblado de la forta fulmotondro konstante vibris en la oreloj, dum la teruraj fulmoj kolere ĵetiĝis tra nubaj ĉambroj de la ĉielo, kvazaŭ ili volus malestimi la potencon aplikatan kontraŭ ilia teroro fare de la fama Franklin! Eĉ la fanfaronemaj ventoj unuanime venis el siaj mistikaj hejmoj kaj muĝis „kvazaŭ per ilia helpo la sovaĝeco de la sceno estu pliigita.

En tia horo, tiom tenebra kaj malgajiga por homo, mia vera spirito sopiris homan simpatian, sed anstataŭ tio

„Amik' de mi, konsilisto, konsolo
kaj gvid' – la ĝoj' dum morn', dua feliĉ'
en ĝoj', venis kun fid'.

Ŝi moviĝis kiel unu el tiuj feinoj, bildigitaj de la romantikuloj kaj junuloj dum la sunplenaj migroj en fantazia Edeno, reĝidino de la beleco, sen iu alia ornamo krom sia propra transcenda ĉarmo. Tiom

delikata estis ŝia paŝado, tiom mallaŭte, ke ŝi neperceptate kiel aliaj netrudemaj belulinoj forŝvebus, se ne estus la magia sorĉo perita de ŝia genia tuŝo. Stranga malĝojo restis sur ŝiaj trajtoj, kiel la glacigitaj larmoj sur la robo de la decembro, kiam ŝi gestis al la malamikaj elementoj kaj min petis kontempli la du estaĵojn, kiu estis prezentataj tie.“

Tiu inkubo plenigis ĉirkaŭ dek paĝojn kaj finiĝis per prediko tiom detruiga por la espero de ĉiuj nepresbiterianoj, ke ĝi estis premiita kiel la plej bona laboro de la vespero. La urbestro de la urbeto, kiam li transdonis la premion al la aŭtoro, faris afablan parolon, en kiu li asertis, ke tio estas la plej „elokventa“ teksto, kiun li iam ajn aŭskultis, kaj ke Daniel Webster mem povus esti fiera pri ĝi.

Preterire estu rimarkate, ke la nombro de la tekstoj, en kiuj la vorto „bela“ estis tro ofte uzita, kaj homa sperto priskribata kiel „folio en la libro de la vivo“, ne estis troigite, sed kutime averaĝe ofte uzitaj.

La instruisto milde akordita preskaŭ ĝis perfekteco, ŝovis sian seĝon flanken, turnis sian dorson al la publiko kaj desegnis mapon de Ameriko sur la tabulon por prepari la ekzamenadon de la geografi-

klaso. Sed li atingis nur malĝojigan rezulton pro sia maltrankvila mano. En la domo disvastiĝis retenita ondeca subridado. Li sciis la kaŭzon kaj korektis la rezulton. Li forviŝis per spongo liniojn kaj desegnis ilin denove, sed fakte li distordis ilin pli ol antaŭe, kaj la subridado fariĝis pli laŭta. Li uzis nun sian tutan atenton por la desegnado, kvazaŭ li decidis ne lasi subigi sin de la gajeco. Li sentis, ke ĉiuj okuloj estas fiksitaj al li; li imagis, ke li sukcesis, sed tamen la subridado estis daŭrigata, ĝi eĉ pliiĝis evidente. Kaj ĝi havis konvinkan kaŭzon. Supre, super lia kapo, estis luko, kiu kondukis al la subtegmento, kaj tra ĝi ŝvebis kato je ŝnuro, ligita ĉirkaŭ ĝia malsupra korpoparto, malsupren. Ŝia kapo estis ĉirkaŭligita kape kaj submakzele per ĉifono, por ke ĝi ne miaŭu. Dum ĝi lante sinkis malsupren, ĝi kurbiĝis supren por kapti la ŝnuron per la ungegoj; poste ĝi svingiĝis malsupren kaj serĉis firmteni sin en la aero. La subridado fariĝis pli kaj pli laŭta – la kato troviĝis je distanco de dek kvin centimetroj super la kapo de la enprofundiĝinta instruisto – eĉ pli malsupren ĝi sinkis, kaj eĉ pli kaj ankoraŭ iom pli, kaj ĝi kaptis despere lian perukon per la ungegoj, firmkroĉiĝis en ĝi, kaj poste per unu fojo estis suprentirata en la subtegmenton kun la trofeo, kiu troviĝis ankoraŭ en ĝia posedo! Kaj kiom nun brilis la lumo sur la kalva kapo de la lernejestro – ĉar la filo de la ŝildopentristo ORUMIS ĝin!

Tio kondukis al la ĉesigo de la evento. La knaboj tiel venĝis sin. La ferioj komenciĝis.

***RIMARKO :** La pretendataj tektoj cititaj en tiu ĉi ĉapitro estas neŝanĝite prenitaj el la volumo: „Prozo kaj Poezio de damo el la okcidento“ – sed ili sekvas precize la modelon de la lernejkabinaj tekstoj, kaj tial ili estas multe pli trafaj ol iu imitado povus esti. (M. Twain)*

Ĉapitro 22

TOM aliĝis al la nova ordeno de la Kadetoj de l' Sobreco, logita de la pompo de iliaj uniformoj. Li promesis deteni sin de tabako, de tabakmaĉado kaj de senpia sakrado, tiom longe kiom li estos membro. Nun li faris novan sperton – nome, se oni promesas deteni sin de io, tio estas la plej certa vojo en la mondo por instigi homon tamen fari ĝuste tion. Tom baldaŭ sopiris drinki kaj sakri. La sopiro pri tio fariĝis tiel intensa, ke nur la espero povi montri sin kun sia ruĝa skarpo, malhelpis lian ekŝiĝon de la ordeno. La kvara de julio proksimiĝis, sed baldaŭ li havis pli bonan ideon, tiun pli bonan ideon li havis antaŭ ol li portis la katenojn de l' sobreco dum pli ol

kvardek ok horoj kaj li turnis nun sian esperon al la maljuna juĝisto Frazer, juĝisto de la paco, kiu evidente kuŝis sur la mortolito kaj certe ricevos grandan publikan entombigon, ĉar li estas grava altrangulo. Dum tri tagoj Tom estis tre scivola pri la stato de la juĝisto kaj avidis ĉiujn novaĵojn pri ĝi. Kelkfoje li havis tre grandajn esperojn, tiom grandajn, ke li elprenis sian uniformon kaj elprovis ĝin antaŭ la spegulo. Sed la ŝanĝiĝema stato de la juĝisto estis tre malkuraĝiga. Laste oni anoncis, ke lia stato reboniĝis, kaj poste, ke li saniĝos. Tom ne estimis tion kaj ankaŭ sentis sin kvazaŭ vundita. Li tuj transdonis sian ekŝigdeklaron – kaj en tiu nokto la juĝisto remalsaniĝis kaj mortis. Tom decidis neniam denove fidi al tia viro.

La funebraĵoj estis pompaj. La kadetoj de la ordeno paradis laŭ stilo, kiu peris la impreson, kvazaŭ ili volus mortigi la ĵus ekŝigintan membron per ties propra envio. Tamen Tom estis denove libera knabo – ankaŭ tio havas sian valoron. Li nun povis drinki kaj sakri – sed li estis surprizita, ke li ne plu emis fari tion. La simpla fakto, ke li aktuale rajtas fari tion, prenis de li la deziron kaj la ĉarmon de la afero.

Tom baldaŭ miris, ke la sopiritaj ferioj komencis enuigi lin.

Li provi verki taglibron – sed dum tri tagoj okazis nenio, kaj tial li rezignis pri tio.

La unua el ĉiuj negrokantistaj prezentadoj enurbe okazantaj en la urbeto kaŭzis sensacion. Tom kaj Joe Harper kunkolektis la teamon de prezentistoj kaj ili estis feliĉaj dum du tagoj.

Eĉ la glora kvara julio estis en certa senco fiasko; tial, ĉar tre pluvis, ne okazis procesio, kaj la plej granda viro de l' mondo (kiel Tom supozis) sinjoroBenton, aŭtentika senatano de Usono, montriĝis grandega seniluziiĝo – ĉar li ne estis sep metrojn kaj duonon alta, kaj eĉ ne iomete simile alta.

Cirko venis en la urbon. La knaboj poste dum tri tagoj ludis cirkon en tendo el kunflikitaj ĉifontapiŝoj – enirkosto: tri pingloj por knaboj kaj du por knabinoj, kaj tiam oni rezignis ankaŭ pri la cirkludado.

Aperis frenologo kaj hipnotisto – kaj ili foriĝis, ili postlasis la urbeton pli monotona kaj pli trista ol iam ajn antaŭe.

Okazis kelkaj knab- kaj knabinfestetoj, sed ili estis tiom raraj kaj tiel ravaj, ke ili faris la dolorigajn breĉojn inter ili eĉ pli dolorigaj.

Becky Thatcher veturis al Konstaninopolo por pasigi la feriojn kun siaj gepatroj – tial nenie ajn ekzistis ĝoja flanko de la vivo.

La terura sekreto pri la murdo estis kronika mizero. Estis kvazaŭ daŭra kancero kun dolorgarantio.

Poste Tom malsaniĝis je morbilo.

Dum du semajnoj Tom kuŝis kiel kaptito, kvazaŭ morta por la mondo kaj ties okazoj. Li estis tre malsana kaj interesiĝis pri nenio. Kiam li fine povis surpiedi sin denove kaj ankoraŭ malforta entreprenis iradon en la urbo, jam metis sin neatendita melankolia ŝanĝo sur ĉion kaj ĉiun estulon. „Reviviĝo“ okazis, kaj ĉiuj iel „fariĝis religiaj“, ne nur la plenkreskuloj, ankaŭ la knaboj kaj knabinoj. Tom iradis kaj esperis spite al ĉiu atendo ie renkonti benatan pekulvizaĝon, sed ĉie li spertis seniluziigon. Li trovis la amikon Joe Harper, kiam li

studis la Novan Testamenton, kaj tial li deturnis sin de la deprimiga spektaklo. Li serĉis Ben Rogers-on, sed li trovis lin, dum Ben vizitis la povrulojn kun korbo da traktaĵoj. Li elspionis Jim Hollis-on, kiu atentigis lin pri tio, kia kara beno estas la morbilo, ĉar li komprenu ĝin kiel averton. Ĉiu knabo, kiun li renkontis, ŝarĝis plian depriman tunon sur lin, kaj kiam li nun jam despere fuĝis por trovi konsolon ĉe la brusto de Huckleberry Finn kaj estis salutata de li per biblia citaĵo, rompita lia koro kaj li kvazaŭ rampis hejmen kaj en la liton, ekkonante, ke nur li en la tuta urbeto estas perdita, kaj tion ĉiam kaj eterne.

En tiu nokto komenciĝis terura ŝtormo, kun vipanta pluvo, terura tondrado kaj blindige akraj fulmataĵoj. Li kaŝis sian kapon sub la littuko kaj atendis la pereon tremegante pro timo kaj necerto; ĉar li eĉ ne iomete dubis pri tio, ke la tuta tohuvo celis lin mem. Li supozis, ke li tro provokis la toleremon de la potencoj ĝis transe de la limo de la eltenebleco, kaj ke tio sekve estis la rezulto. Certe ŝajnis al li disipo de pompo kaj de municio murdi cimon per trupo da artilerio, sed tute ne ŝajnis al li bizara meriti tian multekostan fulmotondron kiel la aktualan por forŝiri la torfan grundon sub insekto tia, kia estas li.

Iom post iom la ŝtormo trankviliĝis kaj perdiĝis sen

atingi sian celon. La unua impulso de la knabo estis dankemo kaj li volis plibonigi sin mem. Lia dua estis atendi – ĉar povus esti, ke tute ne plu estos ŝtormoj.

Je la sekva tago revenis la kuracisto, ĉar Tom havis refalon. La tri semajnojn, kiujn li ĉifoje pasigis, ŝajnis al li tuta homa aĝo. Kiam li fine denove povis iri eksteren, li apenaŭ estis dankema pri tio, ke la puno ne trafis lin, ĉar li memoris, kiom soleca estas lia stato, kiom senkamarada kaj perdita li estas. Sen energio li trovis surstrate kaj trovis Jim Hollis-on, kiu agis kiel juĝisto de junulura tribunalo, kiu akuzas katon pro murdo dum ĉeesto de ĝia viktimo, birdo. Li trovis Joe-Harper-on kaj Huck Finn-on, kiuj en la fino de strateto manĝis ŝtelitan melonon. Kompatindaj knaboj! Ili – kiel Tom – suferis refalon.

Ĉapitro 23

Fine la dormema atmosfero estis ĝenata – kaj tre vigle: la murdoproceso estis ekstraktata de la tribunalo. Ĝi tuj fariĝis la plej fascina temo de la urbetaj interparoloj. Tom ne povis eviti tion. Dum ĉiu mencio de la murdo kuntiriĝis lia koro, ĉar liaj konsciencaj riproĉoj kaj timoj persvadis lin, ke tiuj

rimarkoj estas lanĉitaj nur por aŭskulti, kiel li reagas laŭsente; li ne povis imagi, kiel li povus esti suspektata scii ion pri la murdo, sed tamen li ne sentis sin komforta en la mezo de tiu klaĉo. Li ĉiam denove sentis frostotremojn dum la tuta tempo. Li instigis, ke Huck kaj li iru al soleca loko por interparoli pri tio. Tio iom plifaciligus lin povi interparoli dum iom da tempo malkaŝe kun amiko kaj disdividi la animan ŝarĝon kun alia suferanto. Krome li volis certigi al si, ke Huck ne perfidis ion.

„Huck, ĉu vi iam ajn interparolis kun iu – pri tio?“

„Pri kio?“

„Vi scias pri kio.“

„Aha, kompreneble mi ne faris.“

„Eĉ ne vorton, ĉu?“

„Eĉ ne unusolan vorton, sed diru al mi, kial vi demandas?“

„Nu, mi timis tion.“

„Sed, Tom Sawyer, ni eĉ ne du tagojn vivus plu, se tio fariĝus konata. VI scias tion.“

Tom sentis sin pli komforta. Post paŭzo li diris:

„Huck, vin neniujn povus paroligi, ĉu ne? Ĉu ili povus?“

„Paroligi min, ĉu? Kial? Se mi volus, ke la satana bastardo dronigu min, ili min povus paroligi. Alimaniere tio ne eblus.“

„Nu, tiukaze estas ĉio en ordo. Mi pensas, ke tiom longe, kiom ni tenos la buŝojn fermitaj, ni estos sekuraj. Sed ni prefere ĵuru tion ankoraŭfoje. Tiukaze ĝi estos pli sekura!“

„Mi konsentas.“

Tial ili ĵuris denove, kun timplena seriozeco.

„Pri kio oni interparolas en la urbeto, Huck? Mi aŭdis multege pri tio.“

„Interparolas, ĉu? En ordo, estas ĉiam Muff Potter, Muff Potter, Muff Potter dum la tuta tempo. Tio ŝvitigas min, seninterrompe, tiom, ke mi plej prefere kaŝiĝus ie ajn.“

„Mi sentas la saman, se ili estas ĉirkaŭ mi. Mi pensas, ke li estas forironto. Ĉu vi ne kompatas lin de tempo al tempo?“

„Plej ofte – plej ofte. Li ne estas elstara; sed li neniam agis malbone al alia. Li nur iom fiŝkaptas, por ke li havu monon por ebriigi sin kaj ofte li vagadas; sed, Lordo mia, ni ĉiuj faras tion – almenaŭ la plej multaj el ni – ankaŭ la pastroj kaj similaj uloj. Sed li estas speco de bonulo – li donis al mi iam duonon de fiŝo, kiam la fiŝo ne sufiĉis por du manĝoj; kaj multajn fojojn li estis tiel afabla resti ĉe mia flanko, se mi malbonŝancis.“

„Nu, kaj al mi li riparos kajtojn, Huck, kaj fiksos hokojn al mia ŝnuro. Mi dezirus, ke ni povus tiri lin el

la kaĉo.“

„Sinjoro mia! Ni ne povus eltiri lin, Tom. Kaj krome, tio ne havus sencon, ili kaptus lin denove.“

„Jes ja – ili farus tion. Sed mi hatas aŭdi, kiam ili tiom akuzas lin, kvazaŭ li estus la diablo mem, kvankam li ne faris ... tion.“

„Mi sentas la saman, Tom, Lordo mia, mi aŭdis diri ilin, ke li estas la plej sangosoife aspektanta kanajlo en tiu ĉi distrikto, kaj ke ili miras, kial oni ne pendumis lin jam antaŭe.“

„Jes, ili paroladas tiel, seninterrompe. Mi aŭdis, ke ili diris, ke tiukaze, se oni enliberigus lin, ili lin linĉus.“

„Kaj tion ili ankaŭ farus.“

La knaboj interparolis dum longa tempo, sed ili sentis sin apenaŭ pli komfortaj. Kiam la krespusko komenciĝis, ili troviĝis en la najbareco de la malgranda izolita prizono, eble kun la necerta espero, ke io povus okazi, kio forigus iliajn

malfacilaĵojn. Sed nenio okazis; ŝajne neniuj anĝeloj aŭ feinoj interesiĝis pri la malbonŝanca kaptito.

La knaboj faris tion, kion ili jam ofte faris antaŭe – ili iris al la fenestra kradaĵo de la ĉelo kaj donis al Potter iom da tabako kaj alumetojn. Li troviĝis en la teretaĝo kaj en la prizono ne estis gardistoj.

Lia dankemo por la donacoj jam pli frue frapis iliajn konsciojn, sed nun ĝi vundis ilin pli profunde ol iam ajn antaŭe. Ili sentis sin tute malkuraĝaj kaj perfidaj, kiam Potter diris:

„Vi estas ege bonkoraj al mi, buboj – multe pli ol iu alia en la urbo. Mi ne forgesos tion, neniam. Ofte mi diris al mi, nu, mi diris: 'Mi ofte riparos la drakojn kaj aliajn aĵojn de la knaboj, kaj mi montris al ili, kie estas bonaj fiŝkaptistaj lokoj, kaj mi estis ilia amiko, ĉiam, kiam tio eblis, kaj nun ili ĉiuj forgesis la maljunan Muff, kiam li estas en la kaĉo. Sed ne Huck kaj ne Tom – ILI ne forgesas min, jen tio, kion mi diras, kaj tial mi ne forgesos ilin. Nu, buboj, mi faris teruran aferon – ebrie kaj freneze je tiu tempo – nur tiel mi povas klarigi tion al mi, kaj nun mi devos svinge pendi sub la pendumilo pro tio, kaj estas tio en ordo, justa kaj LA PLEJ BONA, almenaŭ mi

supozas kaj esperas tion. Nu, ni prefere ne parolu pri tio. Mi ne volas, ke vi malbonfartu pro mi. Vi estas miaj amikoj. Sed tion, kion mi volas diri, tio estas, ke VI neniam ebrigu vin, tiukaze vi ankaŭ ne venos ĉi tien. Starigu vin foje iom pli maldekstren – tiel, ĝuste tiel, estas granda konsolo vidi tiajn afablajn vizaĝojn, kiam oni sidas tiom en la koto, kaj ĉi tien venas ja neniuj krom vi. Bonaj karaj vizaĝoj – karaj kaj bonaj vizaĝoj. Grimpu foje reciproke unu sur la alian kaj lasu min tuŝi viajn vizaĝojn. Jes, tiel. Etendu viajn manojn, viaj eniros tra la stangoj, sed miaj estas tro grandaj por tio. Jen malgrandaj manoj, kaj malfortaj, sed ili helpus al Muff Potter eĉ pli, se ili povus.“

Tom iris mizere afliktite hejmen, kaj liaj songoj en tiu nokto estis plenaj de hororoj. La sekvajn du tagojn li ŝtelire vagadis ĉirkaŭ la juĝejo. Preskaŭ nerezistebla impulso provis tiri lin internen, sed li devigis sin resti ekstere. Huck spertis la samon. Ili zorgeme evitis sin reciproke. De tempo al tempo ĉiu foriris, sed ĉiufoje baldaŭ la sama malagrabra fascino retroirigis ilin. Tom atente aŭskultis, kiam sentaŭguloj malrapide eltrotis de la juĝejo, sed li aŭskultis seninterrompe nur suferigajn sciigojn; la maŝo kuntiriĝis pli kaj pli rigore ĉirkaŭ la kolo de la kompatinda Potter. Je la fino de la dua tago la urbeto klaĉo temis pri tio, ke la atesto de Indiĝen-Joe estas firma kaj neskuebla, kaj

ke ne estas eĉ la plej eta dubo pri tio, kion verdiktos la ĵurio.

Tom tiuvespere ankoraŭ tre malfrue estis ekstere kaj tial li iris al la lito tra la fenestro. Li estis treege ekscitita. Li bezonis horojn, ĝis kiam li ekdormis. Je la sekva mateno la tuta urbeto amase venis al la juĝejo – ĉar tio estu la granda tago. Ambaŭ genroj prezentiĝis preskaŭ samkvante en la spektantaro. Post longa tempo la ĵurio envenis laŭvice kaj sidiĝis. Mallonge poste ankaŭ Potter, estante pala, maltrankvila, timema kaj senespera, li estis alkondukita katenite kaj metita sur sidlokon, kie ĉiuj scivolemaj okuloj povas gapi al li. Ne malpli okulfrapa estis Indiĝen-Joe, kiu, kiel ĉiam estis flegma. Sekvis plia paŭzo kaj poste alvenis la juĝisto kaj la ŝerifo deklaris la procesdebaton malfermita. Sekvis la kutima flustrado kaj la papera susurado de la advokatoj. Tiuj detaloj kaj la akompanantaj hezitigoj kreis preparan atmosferon, kiu estis kaj impresa kaj fascina.

Nun estis vokata atestanto, kiu atestis, ke li vdis la viron Muff Potter je roĝo frue je tiu mateno, kiam la murdo estis malkovrita, kaj poste rapide ŝtelire

foriĝis. Post kelkaj pliaj demandoj la prokuroro diris:

„Pridemandu la atestanton.“

La prizonulo levis la okulojn dum momento, sed denove mallevis ilin, kiam lia propra advokato diris:

„Mi ne havas demandojn al li.“

La sekva atestanto konfirmis, ke li trovis la tranĉilon proksime de la kadavro. La prokuroro diris:

„Pridemandu la atestanton.“

„Mi ne havas demandojn al li“, respondis la advokato de Potter.

Tria atestanto ĵuris, ke li ofte vidis la tranĉilon en la posedo de Potter.

„Pridemandu la atestanton.“

La advokato de Potter rifuzis pridemandi lin. La vizaĝoj en la publiko baldaŭ montris ĉagrenon. Ĉu la advokato opinias, ke li rajtas forĵeti la vivon de sia kliento sen rezisto? Kelkaj atestantoj parolis pir kulpkoscia konduto de Potter, kiu estis kondukita al la delikta loko. Ili ricevis la permeson foriri de la atestanta benko sen pridemandado fare de la prokuroro kaj la advokato.

Ĉiuj detaloj de la akuzaj cirkonstancoj, kiuj okazis en la tombejo je tiu mateno, pri kiuj ĉiuj memoris tiel bone, estis ankoraŭfoje prezentataj de fidindaj atestantoj, sed neniu el ili estis pridemandata fare de la advokato de Potter. La perpleksiĝo kaj la malkontentiĝo de la publiko esprimis sin per laŭta murmurado kaj provokis riproĉon de la prokurora benko. La prokuroro diris nun:

„Pro la ĵure certigitaj eldiroj de la kuncivitanoj, kies klaraj vortoj estas ekster ĉiu dubo, ni konviktis la malfeliĉan prizonulon sur la benko kiel deliktinton de la terura krimo. Ni nun finas tiun kazon.“

Ĝemo eskapis de la kompatinda Potter, kaj li metis siajn manojn al la vizaĝo, kaj malrapide iom movadis sian korpon antaŭen kaj malantaŭen – dum en la

juĝejo regis embarasa silento. Multaj viroj estis anime tuŝitaj, kaj multaj inoj montris sian animan tuŝitecon per larmoj. La advokato de Potter leviĝis kaj diris:

„Via moŝto, en niaj rimarkoj dum la malfermado de la proceso, ni esprimis nian intencon pruvi, ke nia kliento faris tiun timigan agon, dum li estis en stato de blindeco kaj tute influata de nerespondeca deliro kaŭzata de drinkado. Ni ŝanĝis nian opinion. Ni ne pledas por tio.“ [Poste al la juĝeja pedelo:] „Voku la atestanton Thomas Sawyer!“

Konfuzita mirego montriĝis en ĉiuj vizaĝoj, eĉ en tiu de Potter. Ĉiu okulo fiksiĝis kun scivolo al Tom, kiam li leviĝis kaj sidiĝis sur la atestanta benko. La knabo rigardis sufiĉe sovaĝe, ĉar li estis ege timigita. Li estis ligita per ĵuro.

„Thomas Sawyer, kie vi estis je la deksepa de junio noktomeze?“

Tom rigardis al la vizaĝo de Indiĝen-Joe kaj lia lango malobeis servi. La publiko aŭskultis senspire, sed la vortoj rifuzis aperi. Post kelkaj momentoj la knabo

tamen reakiris parton de siaj fortoj, kaj li sukcesis meti sufiĉe da ĝi en sian voĉon, tiel, ke parto de la domo aŭdis ĝin:

„En la tombejo!“

„Bonvolu, iom pli laŭte. Ne timu. Vi estis en...“

„En la tombejo.“

Malestima rikano hastis trans la vizaĝon de Indiĝen-Joe.

„Ĉu vi estis ie proksime de la Horse Williams-tombejo?“

„Jes, Sir.“

„Parolu pli laŭte – nur iomete pli laŭte. Kiom proksime vi estis?“

„Tiel proksime, kiom mi distancas de vi.“

„Ĉu vi kaŝiĝis aŭ ne?“

„Mi kaŝiĝis.“

„Kie?“

„Post la ulmo, kiu troviĝas ĉe la rando de la tombo.“

Indiĝen-Joe apenaŭ rimarkeble moviĝis.

„Ĉu iu estis kun vi?“

„Jes, Siro. Mi iris tien kun...“

„Atendu, atendu momenton. Ne gravas menciigi la nomon de via akompaninto. Ni vokos lin je la ĝusta tempo. Ĉu vi ion kunprenis tien?“

Tom hezitis kaj rigardis konfuzite.

„Parolu, knabo mia – ne estu pudora. La vero estas ĉiam honorinda. Kion vi kunprenis tien?“

„Nur ka-ka-katon mortan.“

Komenciĝis subridado, kiun la prokuroro tuj finis.

„Ni prezentos la skeleton de la kato. Nu, knabo mia, rakontu al ni tion, kio okazis – rakontu ĝin laŭ via maniero, ne lasu ion, kaj ne timu.“

Tom komencis paroli – unue heziteme, sed poste li fariĝis intima al la temo kaj liaj vortoj fluis pli kaj pli facile; post certa tempo silentiĝis ĉiuj sonoj krom voĉo lia. Ĉiuj rigardoj estis fiksitaj al li, kun malfermitaj buŝoj la publiko kroĉiĝis al liaj lipoj, neniun plu rimarkis la fluon de la tempo, tute kaptita de la fantomeca fascino de la rakonto. La streĉiĝo de la emocioj atingis la kulminon, kiam la knabo diris:

„– kaj kiam la kuracisto kaptis la proksiman tabulon kaj Muff Potter falis, Indiĝen-Joe saltis kun la tranĉilo kaj...“

„KraK!“ Rapide kiel fulmo Indiĝen-Joe, la bastardo, saltis por atingi la fenestron, li ŝovis ĉiujn flanken, kiuj volis reteni lin, kaj foriĝis!

Ĉapitro 24

Tom estis denove brilega heroo – dorlotata de la maljunuloj kaj enviata de la junularo. Lia nomo aperis eĉ eternigite en presita formo, ĉar ankaŭ la urbeta gazeto pligrandigis lian nomon. Jen troviĝis kelkaj, kiuj supozis, ke li fariĝos prezidento, se li ne finiĝos antaŭe kiel pendumito.

Kiel kutime, la nefidinda, nepripensema mondo premis la viron Muff Potter al la brusto kaj dorlotis lin tiel troigite, kiel ĝi antaŭe kondamnis lin. Sed tiu speco de konduto honorigas la mondon, tial ne estas en ordo trovi tion erara konduto.

La tagoj de Tom estis plenigitaj per honoro kaj ĝojego, sed liaj noktoj estis sezonoj de hororo. Indiĝen-Joe invadis kvazaŭ svarme liajn sonĝojn, kaj ĉiam trembrilis perejo en ties okulo. Apenaŭ iu tento kapablis logi la knabon forlasi la domon, kiam

komenciĝis la nokto. La kompatinda Huck estis en la samaj mizera stato kaj hororo, ĉar Tom nokton antaŭe rakontis la tutan aferon al la advokato je la vespero antaŭ la granda juĝeja procestago kaj Huck terure timis, ke lia partopreno en la afero povus fariĝi publika, kvankam la fuĝo de Indiĝen-Joe savis lin devi trasuferi lian atestadon antaŭ la tribunalo. La kompatinda knabo atingis, ke la advokato devis promesi, ke li ne mencios lian nomon, sed kiom certa estas tia devigo? De kiam Tom vespere estis pelita de konscienciproĉoj al la advokato kaj tie timplene, kvazaŭ tra la dentoj elbalbutis la teruran rakonton, kvankam liaj lipoj estis sigelitaj per plej morna kaj plej eksterordinara ĵuro, la konfido de Huck pri la homaro estis preskaŭ – se ne tute detruita. Dumtage la dankemo de Muff Potter feliĉigis Tom-on pri tio, ke li rakontis ĉion, sed nokte li deziris, ke li neniam estu malsigelinta la langon.

Dum duono de la tempo timis Tom, ke oni neniam kaptos la ulon Indiĝen-Joe kaj dum la alia duono de la tempo, ke oni tamen kaptos lin. Li estis firme konvinkita, ke li neniam denove libere povos enspiri aeron, ĝis kiam la viro estos morta kaj li estos vidinta lian kadavron.

Rekompencoj estis ofertitaj kaj la distrikto estis

rastita komplete, sed Indiĝen-Joe-on oni ne trovis. Unu el tiuj ĉiosciantaj kaj respekton postulantaj mirakluloj, detektivo, venis el Sankta Luiso en la urbeton, li spionadis la terenon, kapneis, rigardis saĝe, kaj mirige sukcesis tiel, kiel la membroj de tiu metio kutime sukcesas. Tio estas, li „trovis promesplenan spuron“. Sed promesplenan spuron oni ne povas pendumi pro murdo, kaj post kiam la detektivo estis persekutinta ĉiun indicon kaj poste veturinta hejmen, Tom sentis sin same tiel neseкура kiel antaŭe.

Senhaste la tagoj drivis plu, kaj post ĉiu pasinta tago fariĝis la ŝarĝo de la timo iom pli facila.

Ĉapitro 25

En ĉiu laŭorda knaba vivo venos iam la tempo, kiam li ekhavas la furiozan deziron iri ien por elfosi kaŝitan trezoron. Tiun deziron iutage subite ekhavis Tom. Li ekpaŝis por trovi la amikon Joe Harper, sed li ne sukcesis. Poste li serĉis la kamaradon Ben Rogers, sed li foriris por fiŝkapti. Jen li renkontis hazarde Sangomanon – Huck Finn. Ankaŭ Huck estus la ĝusta. Tom tiris lin al sekreta loko kaj inicis lin

konfidente. Huck pretis partopreni. Huck ĉiam estis preta partopreni je iu ajn entrepreno, kiu ne necesigis kapitalon, ĉar li havis molestan tro-abundon je tiu speco de tempo, kiu NE estas mono.

„Kie ni ekfosos?“ demandis Huck.

„Ha, preskaŭ ĉie.“

„Kial? Ĉu ĝi estas kaŝita ĉie ĉirkaŭe?“

„Ne, tiel tio ne estas. Ĝi estas kaŝita en tute apartaj lokoj, Huck – kelkfoje sur insuloj, kelkfoje en kadukaj kestoj sub la finaĵo de branĉo de maljuna morta arbo, ĝuste tie, kien nokte falas la ombro, sed plej ofte sub teretaĝa planko de hantata domo.“

„Kiu kaŝas ĝin?“

„Nu, rabistoj, kompreneble – kion pensas vi, he? Ĉu eble dimanĉaj lernejestroj?“

„Mi ne scias. Se estus trezoro mia, mi ne kaŝus ĝin,

sed elspezus ĝin kaj ĝuus la vivon.“

„Tion ankaŭ mi farus. Sed rabistoj tion ne faras tiel. Ili ĉiam ie kaŝas trezoron kaj lasas ĝin tie.“

„Ĉu ili ne revenos al ĝi kaj ne kunprenos ĝin?“

„Ne, ili pensas, ke ili faros tion, sed plej ofte ili forgesas la signojn aŭ ili mortas antaŭe. Ĉiukaze la trezoro tie dum longa tempo estas kaŝita kaj rustiĝas, kaj iom post iom iu trovas malnovan flaviĝintan paperon, kiu sciigas, kiel oni povas trovi la signojn – sed la paperon oni devas deĉifri dum tuta semajno, ĉar plej ofte estas signoj, hiroklifoj.“

„Hiro...Kio?“

„Hiroklifoj —bildoj kaj io simila, kiuj, sciu tion, aspektas kvazaŭ ili signifus nenion.“

„Ĉu vi havas iun el la paperoj, Tom?“

„Ne.“

„Kiel vi trovu en tiu kazo la signojn?“

„Mi ne bezonas signojn. Ili ĉiam enfosigas la trezoron sub hantata domo aŭ sur insulo, aŭ sub morta arbo, kiu havas elstaran branĉon. Nu, vi jam iomete provis la serĉadon sur la Insulo de Jackson, kaj ni povos rekomenci tion iam ankoraŭfoje; kaj jen ankoraŭ la malnova distilfabrikdomo, tie ĉe la riverbranĉo, kaj tie estas abunde da mortaj arbobranĉoj, granda amaso da ili.“

„Ĉu estas trezoro sub ĉiu el ili?“

„Kiel vi parolas! Ne!“

„Kial vi diras, ke ne?“

„Kiel vi tiukaze povas scii, al kiu ni iru?“

„Ni iros al ĉiuj!“

„Lordo mia, Tom, por tio ni bezonos la tutan

someron.“

„En ordo, kaj kial ne? Imagu, ke vi trovos latunan poton kun cent dolaroj en ĝi, ĉiuj rustigitaj kaj grizaj, aŭ kadukan keston kun diamantoj. Kion vi pensus pri tio?“

La okuloj de Huck eklumis.

„Tio estus grandioza, tiom grandioza, ke estus sufiĉe por mi. Donu al mi nur la cent dolarojn kaj mi ne plu volus havi la diamantojn.“

„Okej, sed mi vetas, ke mi ne estus tiel freneza forĵeti la brilŝtonojn. Kelkaj el ili valoras dudek dolarojn – nur tre malmultaj el ili valoras sespencan moneron aŭ dolaron.“

„Ĉu vere?“

„Certe – tion diros ĉiu al vi. Ĉu vi ankoraŭ neniam iun vidis, Huck?“

„Ne, laŭ mia memoro.“

„Ho, reĝoj havas montojn da ili.“

„Nu, mi ne konas reĝojn, Tom.“

„Mi scias kun certo, ke vi ne konas ilin. Sed, se vi irus al Eŭropo, vi vidus tutan gregon da ili, kiel ili petole hopadas tie.“

„Ĉu ili hopadas?“

„Hopi, ĉu? – ĉe via avino! Ne, kompreneble!“

„Sed kial vi tamen diris tion?“

„Fek! Mi ja opiniis nur, ke vi vidus ilin – ne hopantaj, kompreneble ne – kial ili hopadu? – Mi nur volis diri – ke vi simple vidus ilin apartigitaj sur la tuta tereno, sciu tion, kvazaŭ ĝenerale dirite. Kiel la maljuna Richard kun la ĝibo.“

„Richard, ĉu? Kiun postnomon li havis?“

„Li ne havis alian nomon. Reĝoj havas nur antaŭnomojn.“

„Tio ja ne eblas, ĉu?“

„Tamen tiel estas.“

„Nu, pro mi, se ili ŝatas tion, Tom, en ordo, sed mi ne volus esti reĝo kaj havi nur antaŭnomon, kiel negro. Sed diru – kie vi volas fosi unue?“

„Nu, mi ne scias. Sed mi supozas, ke ni marŝu unue al la maljuna arbo kun la morta branĉo sur la monteto, je la alia flanko malantaŭ la riverbranĉo ĉe la distilfabrika domo, ĉu?“

„Mi konsentas.“

Tial ili havigis kurbigitan pioĉon kaj ŝovelilon, kaj komencis iri sur sia tri mejlojn longa marŝvojo. Ili alvenis ŝvitante kaj anhelante kaj ĵetiĝis en la

ombron de najbara ulmo por ripozi kaj fumi pipon.

„Tio plaças al mi“, diris Tom.

„Ankaŭ al mi.“

„Diru foje, Huck, se ni trovas trezoron ĉi tie, kion vi farus kun via parto?“

„Nu jes, mi manĝus ĉiutage kukon kaj trinkus sodakvon, kaj mi vizitus ĉiun cirkon, kiu venas en la urbeton. Mi vetas, ke mi tre plezuriĝus.“

„Nu, ĉu vi ne volus konservi iom de ĝi?“

„Konservi, ĉu? Por kio?“

„Nu, por ke vi havu ion, de kio vi povus vivi iam.“

„Ah, tio ne havas sencon. Paĉjo ja iutage revenos en la urbeton kaj metus siajn ungegojn sur mian parton,

se mi ne estus sufiĉe rapida, kaj li disipus ĝin sufiĉe haste. Kion vi intencas fari per via mono, Tom?“

„Mi aĉetus al mi novan tamburon kaj glavon, kiu aspektas sufiĉe aŭtentika, kaj ruĝan kravaton kaj buldogan idon, kaj mi geedziĝus.“

„Vi geedziĝus! Ĉu?“

„Jes ja.“

„Tom – vi ne estas tute normala.“

„Atendu – vi vidos ĝin.“

„He, tio estus la plej stulta afero, kiun vi povus fari. Rigardu paĉjon kaj mian patrinon. Kverelado! Jes, ili kutime kverelis sen interrompo. Mi memoras tion tre bone.“

„Tio ne havas signifon. La knabino, kiun mi geedzinigos, ne kverelos.“

„Tom, mi supozas, ke ili ĉiuj estas similaj. Ili ĉiuj tiros la monon el via poŝo. Prefere ankoraŭfoje pripensu tion. Mi diras al vi, ke estus pli bone. Kiun nomon havas la damo?

„Ŝi tute ne estas damo – sed knabino.“

„Mi supozas, ke tio estas la sama, kelkaj diras damo, kelkaj knabino, ambaŭ vortoj estas ĝustaj, sufiĉe similaj. Egale, kiun nomon ŝi havas, Tom?“

„Iam mi rakontos tion al vi – sed ne nun.“

„Okej, estu tiel. Sed, se vi geeziĝus, mi estus eĉ pli soleca ol jam nun.“

„Ne, vi ne estus. Tiukaze vi transloĝiĝus al mi. Sed nun trankviliĝu pri tio, ni ekfosu.“

Ili laboris kaj ŝvitis dum duono de horo. Sen rezulto. Ili laboraĉis duan duonon de horo. Ankoraŭ tiam sen rezulto. Huck diris:

„Ĉu ili ĉiam enfosas la aĵojn tiom profunde, kiom ĉi tie?“

„Kelkfoje– sed ne ĉiam. Kutime ne. Mi pensas, ke ni ne elektis la ĝustan lokon.“

Tial ili serĉis novan lokon kaj komencis fosi denove. La laboro estis iom tenaca, sed ili tamen progresis.

Kelkan tempon ili laboris streĉe kaj silente plu. Fine Huck apogis sin je la ŝovelilo, viŝis per la manikoj la ŝvitogutojn de la brovoj kaj diris:

„Kie vi volas fosi la sekvan fojon, kiam ni pretos ĉi tie?“

„Mi pensas, ke ni traktos la maljunan arbon, kiu estas transe sur la Cardiff-monteto, malantaŭ la domo de la vidvino.“

„Mi pensas, ke ĝi estas bona elekto. Sed, ĉu la vidvino ne forprenos la trezoron de ni, Tom? La monteto

estas sur ŝia tereno.“

„Forprenu ĝin ŝi, ĉu?! Povus esti, ke ŝi provos tion iam. Sed kiu ajn trovas iun el tiuj kaŝitaj trezoroj, estas la posedanto. Tio estas egala, al kiu apartenas la terposedo.“

Tio estis kontentiga. Ili laboris plu. Post iom da tempo diris Huck:

„Damne, ni certe estas denove sur netaŭga loko. Kion vi pensas?“

„Tio estas tre kurioza, Huck. Mi ne komprenas tion. De tempo al tempo enmiksiĝas sorĉistinoj. Mi pensas, ke tio povus esti la tubero en la afero.“

„Stultaĵo! Sorĉistinoj ne havas potencon, kiam la tago estas hela.“

„Vi pravas, estas tiel. Mi ne pripensis tion. Aĥ, nun mi scias pri kiu tubero temas! Kia damnita grego de stultuloj ni estas! Oni devas eltrovi, kien falas la ombro je noktmezo, kaj tie oni devas fosi!“

„Kia surprizo, tiukaze ni, ŝtipkapuloj, faris ja la tutan laboron vane. Ekzekutisto, helpu nin! Ni devos reveni en la nokto. Ĝi estas terure longa vojo. Ĉu vi povos forŝteliĝi nokte?“

„Mi vetas, ke jes. Ni devos fari tion nokte, ĉar tiukaze, se iu vidus la truojn, ili scios jam post minuto, pri kio temas kaj tiukaze ili mem ekagos.“

„En ordo, mi revenos nokte kaj tiam mi miaŭos.“

„Okej, ni kaŝu la ilaron ĉi tie en la vepro.“

La knaboj revenis en la nokto, je la interkonsentita tempo. Ili sidis en la ombro kaj atendis. Estis soleca loko, kaj la horo faris ĝin eksterordinara, pro malnova tradicio. Fantomoj flustris en la susurantaj folioj, spiritoj kaŭris en tenebraj anguloj, obtuza bojado de hundo alŝvebis el la foro kaj strigo respondis kun eltomba voĉo. La knaboj estis embarasitaj de tiu seriozeco kaj interparolis malofte. Post certa tempo ili decidis, ke estas noktomezo. Ili signis la lokon, kien falis la ombro kaj komencis fosi. Ilia espero kreskis. La intereso fariĝis pli forta, kaj

ilia laborfervoro kreskis samgrade. La truo fariĝis pli profunda kaj ankoraŭ pli, sed ĉiufoje, kiam iliaj koroj eksaltis, post kiam ili aŭdis, ke la pioĉo puŝiĝis sur ion duran, ili trasuferis nur plian seniluziiĝon. Estis nur ŝtono aŭ radiko. Laste diris Tom:

„Tio ne plu havas sencon, Huck, ni eraris denove.“

„Sed ni ne POVAS erari. Ni markis la loketon precize ĝispunkte.“

„Mi scias, sed jen ankoraŭ alia cirkonstanco.“

„Kiu do?“

„Nu, ni nur konjektis la tempon. Tre verŝajne estis tro frue aŭ tro malfrue.“

Huck lasis fali la ŝovelilon.

„Vi pravas“, li diris. „Jen la vera problemo. Ni devos rezigni pri tiu ĉi loko. Ni neniam scias la precizan tempon, kaj krome tiu afero ĉi tie estas tro

abomeninda, ĉitempe nokte kun sorĉistinoj kaj fantomoj flirtantaj ĉirkaŭe. Mi havas la senton kvazaŭ io estus ĉirkaŭe dum la tuta tempo, kaj mi timas turniĝi malantaŭen, ĉar povas esti, ke aliaj estas fronte de mi kaj atendas nur la bonŝancon. Dum la tuta tempo io harhirtigas min, de kiam mi estas ĉi tie.“

„Jes, ankaŭ mi sentas ion tre similan, Huck. Plej ofte ili aldonas mortan viron, kiam ili enfosas trezoron sub arbo, por ke li gardu la trezoron.“

„Lordo mia!“

„Jes, ili faras tion. Tion mi aŭdis ĉiufoje.“

„Tom, mi ne vagadas volonte tie, kie estas mortintoj. Oni neeviteble havas ĉagrenon pro ili, certe.“

„Ankaŭ mi ne emas vekti ilin. Imagu nur foje, ke la kadavro ĉi tie elmetos sian kranion kaj diros ion!“

„Ĉesigu tion, Tom! Estas terure.“

„Jes, tiel estas. Huck, mi ne sentas min eĉ iomete komforta.“

„Tom, aŭskultu, ni forlasu tiun ĉi lokon kaj provu la aferon aliloke.“

„En ordo, mi supozas, ke tio estas preferinda.“

„Kaj kie?“

Tom konsideris la aferon dum iom da tempo; kaj poste li diris:

„En la hantata domo. Ĝi taŭgas!“

„Damne, mi ne ŝatas hantatajn domojn, Tom. Ili estas ankoraŭ multe pli aĉaj ol mortintoj. Mortaj homoj eble parolas, povas esti, sed neniu el ili aperas kaj glitadas ĉirkaŭe en mortkitelo, kiam vi tute ne rimarkas ĝin, kaj neniu gapas subite trans ŝultrojn de vi kaj neniu grincigas la dentojn tiel, kiel faras tion fantomo. Mi ne povus elteni ion tian, Tom – neniu

povus tion.“

„Jes, sed, Huck, fantomoj survojas nur nokte. Ili ne malhelpus nin fosi tie dum la tago estas.“

„Jes, vi pravas. Sed vi scias tre bone, ke homoj iras tien nek dum hela tago nek nokte.“

„Nu, estas tiel antaŭ ĉio pro tio, ĉar ili ne ŝatas iri tien, kie oni murdis homon. Sed tie oni vidis ankoraŭ neniam ion, krom nokte bluajn pasemajn lumojn – sed ne ĝustajn fantomojn.“

„Nu, Tom, kiam vi povas vidi iun el tiuj bluaj flagrantaj lumoj, vi povas veti, ke malantaŭ la lumo estas fantomo. Tio estas ja evidenta. Tion vi ja scias tute certe, ke neniu uzas ilin krom fantomoj.“

„Jes, tio estas ĝusta, sed neniukaze ili aperas, kiam tago estas, do, kiun sencon havu via timo?“

„Nu, en ordo, ni provu la hantatan domon, se vi diras tion – sed mi pensas, ke ĝi estas risko.“

Intertempe ili jam komencis descendi de la monteto. Jen malsupren de ili en la mezo de la valo prilumata de la luno, staris la „hantata“ domo, tute izolita, ĝiaj latbariloj jam delonge foriĝis, la sojloj de la pordoj estis prikreskataj de trudherboj, la kamentubo ruiniĝis, disfalinta en pecetojn, la fenestraj truoj estis vakaj, angulo de la tegmento enrompiĝis.

La knaboj rigardis momenton, preskaŭ ili atendis vidi flagrantan bluan lumon malantaŭ fenestro. Ili parolis mallaŭte, kiel necesigis tion la tempo kaj la cirkonstancoj, kiam ili iris dekstren por preteriri la hantatan domon en granda arko sur la vojo hejmen tra la arbaro, kiu ornamis la malantaŭan flankon de la Cardiff-monteto.

Ĉapitro 26

Je la sekva tago tagmeze la knaboj alvenis la mortan arbon, por preni sian ilaron. Tom estis senpacienca, ĉar li volis iri al la hantata domo. Ankaŭ Huck, sed malpli senpacienca – kaj subite li diris:

„Aŭskultu, Tom, ĉu vi scias, kiu tago estas hodiaŭ?“

Tom enpense trairis la semajnajn tagojn kaj subite rigardis ektimigite supren:

„Fulmotondro! Mi tute ne pensis pri tio, Huck!“

„Ankaŭ mi ne, sed subite frapis min, ke estas vendredo!“

„Damne, homo ne povas estis sufiĉe atentema, Huck. Ni povus fali en mi-ne-scias-kiom grandan kaptilon, se ni provus fosi je vendredo.“

„POVUS, ĉu? Prefere diru, ke ni falus en la kaptilon! Ekzistas kelkaj bonŝancaj tagoj, eble, sed vendredo ne apartenas al ili.“

„Tion scias ĉiu stultulo. Mi pensas, ke VI ne estis la unua, kiu eksciis tion, Huck. “

„Konsentite, mi ne asertis, ke mi estis la unua, ĉu ne? Kaj vendredo ankoraŭ ne estas ĉio. Mi havis terure

aĉan sonĝon lastnokte. Mi sonĝis pri ratoj.“

„Ĉu vere?! Jen signo pri fatalaĵo.Ĉu ili interbatalis?“

„Ne.“

„En ordo, tio estas bonega, Huck. Se ili ne batalas, estas nur signo pri tio, ke atendeblas ĉagreno, sciuition. Tiukaze ni devos nur esti damne atentemaj kaj memgardaj. Ni lasu la aferon hodiaŭ kaj ludu. Ĉu vi scias, kiu estas Robin Hood?“

„Ne. Kiu li estas?“

„Jen unu el la plej grandaj viroj, kiuj iam ajn ekzistis en Anglujo – kaj la plej bona el ili. Li estis rabisto.“

„Freneze, mi volonte estus mem rabisto. Kion li rabis?“

„Li prirabis nur la ŝerifojn kaj episkopojn kaj riĉulojn kaj reĝojn, kaj tiajn plu. Sed li neniam molestis la povrulojn. Li amis ilin. Li ĉiam disdividis la predon

perfekte egalparte kun ili.“

„Nu, li certe estis admirinda ulo.“

„Mi vetas, ke li estis, Huck. Ho, li estis la plej nobla viro, kiu iam ajn ekzistis. Nun tiaj uloj ne plu ekzistas, tion mi diras al vi. Li povis venki ĉiun ulon en Anglujo, kun unu mano ligite surdorse; kaj li povis preni sian taksusan arkon kaj trafi dekcendan moneron el distanco de unu kaj duono de mejloj.“

„Kio estas TAKSUSA arko?“

„Mi ne scias. Estas speco de arko, kompreneble. Kaj, se li trafus la moneron nur je la rando, li sidiĝus, larmus – kaj sakrus. Ek, ni ludu Robin-Hood-on. Estos pimpa plezuro. Mi instruos vin pri la ludo.“

„Mi konsentas.“

Tial ili ludis Robin-Hood-on dum la tuta posttagmezo. De tempo al tempo ili rigardis sopire al la hantata domo kaj interŝanĝis rimarkojn pri tio, kio tie atendos ilin, kiajn eblojn ili tie havos. Kiam la

suno komencis subiri okcidente, ili iris hejmen transe de la ombroj de la arboj kaj baldaŭ malaperis nevideble en la arbaro de Cardiff-monteto.

Je sabato, mallongan tempon post tagmezo, la knaboj denove estis ĉe la morta arbo. Ili fumis kaj babilis iom en la ombro kaj poste iom fosis plu en la lasta truo, ne kun granda espero, sed tial, ĉar Tom menciis, ke ekzistas tiom da okazaĵoj, kiam homoj rezignis fosi trezoron, kiam ili jam ĝis dek kvin centimetroj proksimis al ĝi, kaj poste alvenis tien iu alia ulo kaj aperigis la trezoron per la levado de unu ŝovelilpleno. Ĉifoje ili tamen ne sukcesis, tial la knaboj surŝultrigis la ilojn kaj foriris kun la konvinko, ke ili ne disipis facilanime sian bonŝancon, sed plenumis ĉiujn postulojn, kiuj apartenas al la negoco de la oroserĉado.

Kiam ili alvenis la hantatan domon, embuskis tie io tiom stranga kaj harhirtiga en la absoluta silento, reganta tie sub la bakforne ardanta suno, ke la loko estis tiom deprimiga, soleca kaj morna, ke ili timis dum momento eniri la domon. Poste ili ŝteliris al la pordo kaj enrigardis tremante timeme. Ili vidis ejon prikreskatan de fiherboj, sen plankoj kaj sen stuko sur la muroj, pramalnovan kamenon, fenestrojn sen framoj, rompiĝeman ŝtuparon, tie kaj tie, kaj ĉie

pendis disŝiritaj forlasitaj araneaj retoj. Baldaŭ ili ŝtelire eniris, kun plirapidigitaj pulsoj, frustrantaj kaj kun atentegaj oreloj por aŭdi la plej mallaŭtan sonon kaj pretaj kun streĉitaj muskoloj tuj retiriĝi.

Post certa tempo ili kutimiĝis pri la loko, kio malpliigis iliajn timojn, kaj ili kritikeme kaj kun intereso ekzamenis la ejon, ili ekadmiris sian propran aŭdacon kaj ankaŭ miris pri la aŭdaco mem. Poste ili volis iri supren sur la ŝtuparo. Tio estis fakte la sama kiel la malhelpo de ebla retiriĝo, sed ili reciproke defiis sin, kaj kompreneble estis nur unu rezulto ebla – ili forĵetis siajn ilojn en angulon kaj iris supren. Supre estis la samaj signoj de ruiniĝo. En angulo ili trovis ŝrankon, kiu kvazaŭ promesis misteron, sed la promeso estis trompo – ĉar estis en ĝi nenio. Intertempe ili fariĝis jam denove kuraĝaj. Ili intencis ĝuste iri malsupren kaj komenci sian laboron, kiam...

„Ŝŝ!“ siblis Tom.

„Kio estas?“ flustris Huck kaj paliĝis pro timo.

„Ŝŝ!“ ... Jen! ... Ĉu vi aŭdas tion?“

„Jes!... Ho, ve! Ni forkuru!“

„Silentu. Tute ne moviĝu! Ili rekte venas al la pordo.“

La knaboj sternis sin rekte sur la plankoj kaj rigardis tra la lignotruoj en la planko kaj atendis kuŝante en terura timo.

„Ili haltis.... Ne – proksimiĝas... Ili estas ĉi tie. Ne flustru eĉ vorton, Huck. Dio mia, mi dezirus, ke mi estus for de ĉi tie!“

Du viroj envenis. Ambaŭ knaboj diris al si mem:
„Estas la maljuna muta hispano, kiu antaŭ nelonge estis unu- aŭ dufoje proksime de la urbo – la alian mi vidis ankoraŭ neniam.“

La alia estis ĉifonita, nekombita ulo sen afableco en la vizaĝo. La hispano estis kovrita de ponĉo kaj havis densan blankan vangobarbon; longa hararo fluis el lia sombrero, li surhavis verdajn okulvitrojn. Kiam ili envenis, „la alia“ parolis kun mallaŭta voĉo; ili sidiĝis sur la teron; kun la vizaĝoj al la pordo kaj la dorsoj al

la muro.

Kaj la parolanto parolis plu. Lia konduto fariĝis malpli memgardema kaj liaj vortoj estis pli bone kompreneblaj, kiam li daŭrigis paroli:

„Ne“, li diris, „mi pripensis la aferon kaj ĝi ne plaĉas al mi. Ĝi estas danĝera.“

„Danĝera, ĉu?!“ kvazaŭ gruntis la „surdmuta“ hispano – kiu tiel tute surprizis la knabojn.
„Timemulo!“

La voĉo prenis la spiron de ili kaj tremigis ilin. Estis tiu de Indiĝen-Joe! Sekvis silentado dum momento. Poste diris Joe:

„Kio povus esti pli danĝera ol tio, kion ni faris tie transe – sed konatiĝis rilate tion nenio.“

„Tio estas alia temo. Tio estis rilate la riveron longa distanco pli norde kaj neniu domo estis proksime. Tion ĉiukaze neniu iam ekscios, ke ni provis, kvankam ni eĉ malsukcesis.“

„Nu, kaj kio estis pli danĝera ol veni ĉi tien je la hela tago?! – tio estas ja por ĉiu suspekta, kiu vidas nin.“

„Tion mi scias. Sed simple ne estis pli bona loko post tiu katastrofo. Mi volas forlasi tiun domaĉon, tion mi volis fari jam hieraŭ, sed ja ne havis sencon foriĝi de ĉi tie, dum tiuj inferaj buboj ludis tie supre sur la monteto, en plena viddistanco.“

„La inferaj buboj“ tremis denove pro la instigo de tiu rimarko, kaj ili memoris kiel bonŝancaj ili estis, ĉar ili memoris, ke estis vendredo, kaj ke ili konkludis atendi ĝis la sekva tago. Ili deziris elkore, ke ili atendu tutan jaron.“

Ambaŭ viroj elprenis iom da nutraĵoj kaj ekmanĝis. Post longa pensoplena paŭzo diris Indiĝen-Joe:

„Aŭskultu, kamarado – vi reiru riveren, kaj laŭflue antaŭen, tien, kien vi apartenas. Atendu tie, ĝis vi aŭdos ion pri mi. Mi uzos la okazon kaj iros en la urbeton, ankoraŭ plian fojon, por observi, kiel ĝi statas tie. Kiam mi iom estos spioninta, kaj se la cirkonstancoj estos favoraj, ni plenumos la danĝeran

taskon. Kaj poste ek al Teksaso! Ni forkuros kune.“

Tio estis akceptebla. Ambaŭ viroj ekoscedis kaj Indiĝen-Joe diris:

„Mi estas lacega! Estas via vico gardi.“

Li kunruliĝis sur la fiherboj kaj nun komencis ronki. Lia kamarado skuis lin dufoje kaj kvietiĝis. Baldaŭ la gardisto komencis klini la kapon; ĝi kliniĝis pli kaj pli, kaj nun ambaŭ viroj komencis ronki.

La knaboj enspiregis dankeme. Tom flustris:

„Jen nia bonŝanco – ek do!“

Huck diris:

„Mi mortus pro timo, se ili vekiĝus.“

Tom urĝis lin. Huck hezitis. Fine Tom leviĝis mallaŭte kaj startis sola. Sed la unua paŝo, kiun li

faris, estigis tiom laŭtan teruran knaradon de oblikva planko, ke li sternis sin mortotime. Duan fojon li ne provis tion. La knaboj kuŝis tie kaj nombris la treniĝantajn minutojn, ĝis ili havis la impreson, ke la tempo estis je la fino kaj la eterneco pli kaj pli griza; kaj poste ili estis dankemaj, kiam ili rimarkis, ke almenaŭ subiris la suno.

Nun unu el la ronkbruoj ĉesis. Indiĝen-Joe sidiĝis, ĉirkaŭrigardis –ridetis inside al sia kamarado, kies kapo jam sinkis sur la genuojn – li vekis lin perpiede kaj diris:

„He! Vi estas ja bonega gardisto! Nu, en ordo – okazis ja nenio malbona.“

„Ĉe l' diablo, ĉu mi ekdormis?“

„Nur parte, parte. Venis la tempo skui la polvon de la piedoj, kunulo. Kion ni faru kun la restaĵeto de la predo?“

„Mi ne scias – ni lasu ĝin ĉi tie, tiel, kiel ni ĉiam faris, supozeble. Ne havus sencon forporti ĝin antaŭ ol ni

startos en la suda direkto. Sescent kaj kvindek kiel arĝento, tio estas konsiderinda ŝarĝo, se oni devas porti tion.“

„Nu, en ordo, okej – tio ne estos malfacila ankoraŭfoje veni ĉi tien.“

„Ne, sed mi diru, ke nokte, kiel kutime – tio preferindas.“

„Jes, sed pripensu, ke povus pasi sufiĉe da tempo, ĝis ni bonŝancos plenumi la taskon, io tia, kia akcidento povus okazi ĉiam, kaj ĝi ne kuŝas je tre taŭga loko; prefere ni enfosu ĝin, kaj ni enfosu ĝin profunde.“

„Bona ideo“, diris la kamarado. Li iris tra la ejo, surgenuiĝis, levis certan el la malantaŭaj kamenŝtonoj kaj elprenis saketon, kiu agrable tintadis. Li elprenis dudek aŭ tridek dolarojn por si mem kaj same tiom por Indiĝen-Joe, kiu jam surgenuis en angulo kaj fosis truon per sia *Bowie*-tranĉilo.

Tuj la knaboj forgesis la timon, sian tutan ĝistiaman misŝancecon. Per ardantaj okuloj ili rigardis ĉiun momenton. Kia bonŝanco! La grandioza momento superatutis ĉiun imagon! Sescent dolaroj estis sumo, kiu sufiĉus riĉigi dekon da knaboj. Jen trezorserĉado kun la plej promesplena perspektivo – ne estos eĉ la plej eta necerteco, kie oni devos fosi. Ili interpuŝiĝis reciproke ĉiam denove – estis elokventaj puŝetoj kaj facila komprenebleco, ĉar ili simple signifis: 'Ĉu vi estas feliĉa, ke ni NUN estas ĉi tie?'

La tranĉilo de Joe kunpuŝiĝis kun io.

„Hoho!“ li diris.

„Kio estas tie?“ demandis lia kamarado.

„Kaduka planko – ne, estas kesto, mi supozas. Helpu al mi, por ke ni vidu, por kio ĝi estas ĉi tie. Ne afliktiĝu, mi jam elrompis pecon.“

Li ŝovis manon en la truon kaj eltiris ĝin...

„Viro, tio estas mono!“

Ambaŭ viroj rigardis la manplendon da moneroj. Ili estis el oro. La knaboj supre estis same tiel ekcitantaj kaj ravitaj, kiel la viroj.

La kamarado de Joe diris:

„Tiun laboron ni finos baldaŭ. Tie transe sur la alia flanko de la kameno estas malnova rusta pioĉo en la angulo, meze de la fiherboj – mi vidis ĝin antaŭ minuto.“

Li kuris tien kaj prenis la pioĉon kaj ŝovelilon de la knaboj. Indiĝen-Joe rigardis ilin kritikeme, kapneis, murmuris ion al si mem kaj poste li komencis uzi ilin. La kesto estis baldaŭ sen tero sur si. Ĝi ne estis tre larĝa, kuntenita per feraj bendoj kaj tre stabila antaŭ ol la dentoj de la jaroj damaĝis ĝin. La viroj beate kontemple rigardis la trezoron en silento.

„Partnero, tio ĉi tie estas ja miloj da dolaroj“, diris Indiĝen-Joe.

„Oni diris ĉiam, ke la bando de Murray dum somero vagadis en la regiono“, rimarkis la fremdulo.

„Mi scias tion“, diris Indiĝen-Joe, „kaj tio ĉi tie aspektas precize laŭ tio, mi foje diru.“

„Nun vi ne plu bezonos plenumi la taskon.“

La bastardo kuntiris la brovojn. Li diris:

„Vi ne konas min. Almenaŭ vi ne scias sufiĉe pri la afero. Tio entute ne estos rabatako – sed VENĜO“. Lia okulo ekflamis malice. „Mi bezonas vian kunhelpon. Se estos finite la far' – sekvos Teksaso. Iru hejmen al via Nance kaj al viaj infanoj kaj tenu vin preta, ĝis kiam vi aŭdos ion de mi.“

„En ordo, se vi diras tion; kion ni do faru kun ĉio tio ĉi tie? Ĉu enfosi ĝin?“

„Jes.“ (Ravita ĝojo supre.) „Ne, ĉe la granda tribestro Sachem, ne!“ (Profunda seniluziiĝo supre.) „Preskaŭ

mi forgesis ĝin, tiu pioĉo surhavis freŝan teron!“ (La knaboj sentis sin per unu fojo vomemaj pro timo.)
„Kiun utilon havas pioĉo kaj ŝovelilo ĉi tie? Kiu portis ilin ĉi tien? – Kaj kien ili iris? Ĉu vi aŭdis iun, ĉu vi vidis iun? Mi do enfosu tion ĉi tie, ĉu vere? Kaj poste ili revenu kaj vidu la freŝe trafositan grundon, ĉu? Mi ne konsentas, ne konsentas! Ni portos ĝin en mian kavernon.“

„Nu, kompreneble! Kial mi ne pripensis tion jam antaŭe? Vi celas numeron unu, ĉu?“

„Ne – numeron du sub la kruco. La alia loko estas tro aĉa – tro frekventata.“

„En ordo. Estas preskaŭ sufiĉe malhele por komenci la laboron.“

Indiĝen-Joe ekstaris kaj iris de fenestro al fenestro, atenteme rigardante eksteren. Baldaŭ li diris:

„Kiu portis tiujn ilojn ĉi tien? Ĉu vi pensas, ke ili iris supren sur la ŝtuparo?“

La spirado de la knaboj ĉesis funkcie. Indiĝen-Joe metis manon sur sian tranĉilon, li haltis dum momento, sendecidite, kaj poste li turniĝis al la ŝtuparo. La knaboj pensis pri la ŝranko, sed la kuraĝo jam forlasis ilin. La paŝoj proksimiĝis sur la ŝtuparo – la netolerebla streso de la situacio revekis la interrompitan decidecon de la knaboj – ili estis pretaj salti al la ŝranko – kiam subite krakis io kiel rompita trabo kaj Indiĝen-Joe falis sur la plankon enmeze de la ŝtuparaj rompitaĵoj. Li leviĝis barakte kaj sakris, kaj lia kamarado diris:

„Nu, kiun avantaĝon ni havu pro ĉio ĉi? Se tie efektive iuj estas, tiukaze simple lasu ilin tie – ja kiun intereso? Se ili nun intencus salti malsupren kaj volus havi ĉagrenon – kiu objekto ion kontraŭ tio? Post dek kvin minutoj estos tenebro, kaj tiam lasu ilin foje sekvi nin, se ili volas, estas egale al mi. Sed mi opinias, ke tiu, egale kiu ajn, kiu alportis tiujn ilojn, vidis nin kaj pensas, ke ni estas fantomoj aŭ diabloj aŭ io tia. Mi vetas, ke ili eĉ nun ankoraŭ forkuras pro ni.“

Joe ankoraŭ grumblis certan tempon, kaj poste li konsentis kun sia amiko, ke ili devos uzi la lastan haveblan tagan lumon por prepari la forlason. Mallongan tempon poste, kiam fariĝis tenebre, ili

elŝteliĝis de la domo kaj moviĝis kun sia rara trezoro al la rivero.

Tom kaj Huck ekstaris lacigite, sed tre malŝarĝite, kaj ili postgapis la virojn tra la fendoj de la traboj. Ĉu persekuti ilin? Ne ili. Ili estis kontentaj, ke ili reatingis la tersurfacon sen rompitaĵoj, ke ili povis iri sur la vojo al la urbo trans la monteton. Ili ne parolis multe. Ili estis tro okupitaj hati sin mem kaj sian misfortunon, kiu instigis ilin demeti la pioĉon kaj la ŝovelilon tie. Aliokaze Indiĝen-Joe neniam suspektus ion. Li lasus la tutan arĝenton kaj oron tie en la kaŝejo, ĝis kiam lia venĝo estus kontentigita, kaj poste li malbonŝance malkovrus, ke la tuta mono mankas. Estis amara, tre amara misfortuno, ke ili alportis la ilaron al tiu loko!

Ili decidis oberservi la hispanon, kiam li venos en la urbon, por spioni bonŝancojn rilate al la entrepreno de venĝo, kaj por ŝtelire postiri lin al „numero du“, kie ajn tio povus esti. Poste Tom havis abomenan penson.

„Venĝo, ĉu? Kion fari, se li celas NIN. Huck!“

„Ho ne!“ Huck preskaŭ svenis.

Ili preparolis tion detale, kaj kiam ili venis en la urbon, ili jam interkonsentiĝis, ke li eble celis iun alian, ke li celis almenaŭ nur Tom-on.

Estis tre eta konsolo por Tom, ke nur li troviĝas en danĝero! Esti tiurilate en komuneco kun alia homo, estus konsiderinda avantaĝo.

Ĉapitro 27

La aventuro de la tago tre turmentis Tom-on dum la sonĝoj en la nokto. Kvarfoje li havis la manojn sur tiu riĉa trezoro kaj kvarfoje ĝi malaperis en liaj fingroj, kiam li vekiĝis timigite el sia sonĝo kaj estis rekondukata en la krudan realecon de sia misfortuno. Kiam li kuŝis tie frue matene kaj memoris la okazaĵon de sia granda aventuro, li rimarkis, ke la sonĝoj ŝajne estis kurioze obtuzaj kaj foraj – iel tiel, kvazaŭ ili okazus en transa mondo aŭ en longe pasinta tempo. Tiam ŝajnis al li, ke la granda aventuro mem devas esti songo! Ekzistis tre konvinka argumento favore al tiu ideo – la kvanto de

la moneroj ŝajnis tro granda por esti reala. Li vidis neniam antaŭe pli ol kvindek dolarojn kunigitaj, kaj kiel ĉiuj aliaj knaboj en tiu aĝo, tempo kaj deveno, li imagis, ke ĉiuj referencoj al „centoj“ kaj „miloj“ estas nur puraj fantaziaj formoj de parolado, kaj ke tiaj sumoj reale ekzistas nenie en la mondo. Li eĉ ne dum momento fidis pri tio, ke tia sumo kiel cent dolaroj estas troveblaj kiel efektiva mono en ies ajn posedo. Se oni analizus liajn opiniojn pri trezoroj, oni trovus, ke ili konsistas el manpleno da realaj dekcendaj moneroj kaj el fasko da ne pli bone difineblaj nekapteblaj dolaroj.

Sed la detaloj de lia aventuro fariĝis pli kaj pli konturitaj kaj pli bone videblaj per streĉa cerbumado. Kaj baldaŭ li mem klinis sin al la impreso, ke la afero, se oni konsideras ĉion, supozeble ne estis sonĝo. Tiun necertecon li devis forbalai. Li kaptis al si ion por manĝi kaj foriris por trovi Huck-on. Huck sidis sur la rando de ŝarĝboato, senemocie moviĝante siajn gambojn antaŭen-malantaŭen kaj aspektis tre melankolia. Tom decidis atendi, ĝis kiam Huck parolos pri la temo. Se li ne farus tion, tiukaze estus la pruvo, ke la aventuro estis nur sonĝo.

„Saluton, Huck!“

„Resaluton.“

Silento dum minuto.

„Tom, se ni estus lasintaj la damnitan ilaron ĉe la morta arbo, tiukaze ni estus ricevintaj la monon. Oni povus freneziĝi pro tio!“

„Tiukaze ĝi do ne estis songo. Iel mi preskaŭ deziras, ke ĝi estu songo. Mi estu hundo, se tio ne pravas, Huck.“

„Kio ne estu songo?“

„Ho, la afero hieraŭ. Parte mi jam pensis, ke ĝi estis songo.“

„Songo, ĉu? Se la ŝtuparo ne estus rompita, vi estus spertinta, kiom da songo ĝi estis! Mi havis sufiĉe da songoj nokte – kun tiu hispana unuokula diablo, kiu persekutas min – li putriĝu!“

„Ne, ne putrigu lin. TROVU lin! Kaj trovu la vojon al la mono!“

„Tom, ni trovos lin neniam. Homo havas nur unufoje bonŝancon por tia monmonteto – kaj tiu estas fuŝita. Krome mi ekŝanceliĝus sveneme, se mi vidus lin denove.“

„Ankaŭ mi; sed mi volus vidi lin, ĉiukaze – por trovi la vojon al la trezoro – al lia numero du.“

„Numero du – jes, tio estus granda. Mi jam pripensis la aferon. Sed mi ne povas ekkoni ion el tio. Kion supozas vi?“

„Ankaŭ ne mi. Estas tro enigme. Diru, Huck, ĉu eble ĝi estas la numero de domo?!“

„Freneze! Ne, Tom, tio ĝi ne estas. Kaj se estas tiel, tiukaze ne en tiu vilaĝeto kun unu ĉevalo! Ili ne havas domnumerojn ĉi tie.“

„Vi pravas, lasu min pripensi tion dum momento. Jen – ĝi estas la numero de ĉambro – en taverno,

sciu tion!“

„Ho, jen la truko! Estas nur du tavernoj en la urbeto. Tiun ni trovos rapide.“

„Vi restu ĉi tie, ĝis kiam mi revenos.“

Tom foriĝis tuj. Li ne avidis esti rigardata kun Huck en publikejoj. Duonon de horo li forestis. Li trovis, ke en la pli bona taverno la ĉambro kun la n-ro 2 longe estis okupata de juna advokato. En la malpli alloga domo la ĉambro kun la n-ro 2 estis mistero. La juna filo de la tavernestro diris, ke ĝi estas ĉiam fermita. Kaj, ke li vidis neniam iun eniri aŭ eliri tie, escepte de nokte; ke li ne scias, ĉu ekzistas iu speciala kaŭzo por la stato de la afero, ke li estis iom scivola, sed ne tre, ke li faris la plej bonan el la mistero per tio, ke li kontentigis sin per la ideo, ke la ĉambro estas hantata, ĉar li rimarkis, ke tie nokte estis lumo.

„Jen tio, kion mi trovis, Huck. Mi pensas, ke tio estas la vera numero du, kiun ni serĉas.“

„Mi supozas, ke vi pravas, Tom. Kion vi nun volas

fari?“

„Lasu min pripensi tion.“

Tom cerbumis dum longa tempo. Poste li diris:

„Jen mia opinio. La malantaŭa pordo de tiu n-ro 2 estas la pordo, kiu kondukas eksteren al la malgranda strateto inter la taverno kaj la malnova fatrasa konstruendejo. Nun kaptu al vi ĉiujn pordoŝlosilojn, kiujn vi povas trovi, kaj mi prenpinĉos ĉiujn de la onklino, kaj en la unua nokto, kiam estos tute tenebre, ni iros tien kaj provos ilin. Kaj neniam forgesu Indiĝen'Joe-on, ĉar li diris, ke li ankoraŭfoje frekventos la urbeton kaj spionados pro bonŝanco por sia venĝo. Se vi lin vidus, simple sekvu lin; kaj se li ne iros al la ĉambro n-ro 2, ĝi ne estas la loko.“

„Lordo mia, mi mem ne volas sekvi lin!“

„Kial? Estos nokto, certe. Li ja tute ne vidus vin – kaj se jes, li tute ne pensus ion pro tio.“

„En ordo, se estos vere tenebre, mi supozas, ke mi sekvos lian spuron. Mi ne scias – mi ne scias. Mi provos.“

„Vi povas veti pri tio, ke *mi* sekvus lin, se estus tenebre, Huck. Nu, li ja povus trovi, ke li tute ne havas bonŝancon por sia venĝo kaj rekte iros al sia mono.“

„Estas tiel, Tom. Mi sekvos lin; mi volas, damne!“

„Nun vi denove parolas PRUDENTE! Sed neniam fariĝu malkuraĝa, Huck, tiukaze ankaŭ mi ne estos.“

Ĉapitro 28

Tiunokte Tom kaj Huck estis pretaj por sia aventuro. Ili vagadis ĝis post la dudekunua proksime de la taverno, unu el ili observis el granda distanco la strateton kaj la alia la pordon de la taverno. Neniu eniris la tavernon aŭ forlasis ĝin; neniu similis al la hispano, neniu eniris aŭ forlasis la tavernpordon. La nokto fariĝis hela. Tial Tom iris hejmen laŭ la

interkonsento, ke tiukaze, se estos sufiĉe tenebre, Huck venu kaj „miaŭ“. Post tio Tom elŝteliĝu kaj provu la ŝlosilojn. Sed la nokto restis klara, kaj Huck finis sian gardadon kaj retiriĝis ĉirkaŭ noktomezo al la dormloko en vaka sukerbarelo.

Marde la knaboj same malbonŝancis. Ankaŭ merkrede. Sed la ĵaŭda nokto estis pli promesplena. Tom ĝustatempe ŝtelire foriris de la domo, kun la malnova ladolanterno de la onklino kaj kun mantuko por kovri ĝin. Li kaŝis la lanternon en la sukerbarelo de Huck kaj la gardoservo komenciĝis. Horon antaŭ noktomezo la taverno estis fermita kaj la lumoj estingitaj (estis la ununuraj ĉirkaŭe). Hispanon ili ne vidis. Neniu iris sur la strateton kaj neniu eliris de la tavernpordo. Ĉio estis promesplena. Nigra tenebro regis, la perfektan silentadon interrompis nur ĉeokaza murmurado de fora tondrado.

Tom prenis sian lanternon, ekbruligis ĝin en la barelo, ĉirkaŭvualis ĝin zorgeme per la mantuko, kaj ambaŭ aventuristoj ŝteliris en la malhelo al la taverno. Huck estis la gardostaranto, dum Tom palpis sin tra la strateto. Poste sekvis tempo de timplena atendado, kiu ŝarĝis la spiriton de Huck kiel montaro. Li komencis deziri, ke li povu vidi radion de la lanterno – tio timigus lin, sed ĝi

almenaŭ sciigus, ke Tom ankoraŭ vivas. Ŝajne pasis horoj, de kiam Tom malaperis. Certe li svenis; eble li estas morta; eble lia koro krevis pro la ekscito kaj teruriĝo. Pro sia malkomforto Huck iris pli kaj pli proksime al la strateto; timante ĉiujn specojn de teruraj aĵoj kaj ĉiumomente li atendis, ke okazos iu katastrofo, kiu prenos lian spiron. Sed multe de ĝi ne plu estis je dispono, ĉar li jam sen tio enspiretis kvazaŭ nur fingringajn dozojn. Kaj lia koro baldaŭ per si mem ne plu funkcius, ĉar ĝi batadas tiom tumulte. Subite tie aperis lumradio kaj Tom tiris lin kun si:

„Ekkuru!“ li diris, „kuru por via vivo!“

Li ne devis diri tion ripete, unu fojo sufiĉis; Huck kuris po tridek aŭ kvardek mejlon en horo antaŭ ol la ripeto eblis. La knaboj ne haltis, ĝis kiam ili atingis la remizon de forlasita brutbuĉejo en la suda rando de la urbeto. Nur kiam ili atingis ties protekton, la ŝtormo komenciĝis kaj pluvis abunde. Kiam Tom kapablis spiri denove, li diris:

„Huck, estis abomene! Mi provis du ŝlosilojn, tiel mallaŭte, kiel tio eblis, sed ili estigis tiom da bruoj, ke mi apenaŭ plu povis enspiri, ĉar mi estis tiom

timigita. Ili ne turniĝis en la seruro. Nu, kaj sen rimarki tion, kion mi faras, mi tuŝis la tenilon, kaj la pordo malfermiĝis! Ĝi ne estis fermita! Mi ensaltis kaj forprenis la mantukon de la lanterno, kaj, GRANDA SPIRITO DE CEZARO!“

„Kion! – kion vi vidis, Tom?“

„Huck, mi preskaŭ tretis sur manon de Indiĝen-Joe!“

„Ne!“

„Jes! Li kuŝis tie, ronkante dormante sur la koridoro, kun sia malnova okulkovro kaj kun etenditaj brakoj.“

„Ho, Lordo, kion vi faris? Ĉu li vekigis?“

„Ne, li ne moviĝis, li ebriis, mi supozas. „Mi simple prenis la mantukon kaj forkuris.“

„Pri la mantuko mi tute ne pensus, mi vetas tion!“

„Nu, sed ja mi. Mia onklino farus mian vivon neeltenebla, se mi perdus ĝin.“

„Tom, ĉu vi vidis la keston?“

„Huck, mi tie ne staradis por ĉirkaŭrigardi. Mi ne vidis la keston, mi ne vidis la krucon. Mi vidis nenion krom botelo kaj latunan trinkujon sur la planko apud Indiĝen-Joe, jes, mi vidis du barelojn kaj amason da boteloj en la ĉambro. Ĉu vi komprenas nun, pri kio temas rilate la hantatan ĉambbron?“

„Kial?“

„Nu, ĝi estas hantata pro la viskio! Eble ĈIUJ abstinencaj tavernoj havas tian ĉambbron, he, Huck, ĉu?“

„En ordo, supozeble estas tiel. Tia aĵo apenaŭ imageblas, ĉu? Sed diru, Tom, nun estas damne bona momento por ricevi la keston, dum Indiĝen-Joe estas ebria.“

„Nepre! Do, provu foje!“

Huck hirtiĝis.

„Aĥ, ne – prefere ne.“

„Ankaŭ mi supozas, ke ne, Huck. Nur unu botelo apud Indiĝen-Joe ne sufiĉas. Se estus tri, li estus sufiĉe ebria kaj mi farus.“

Sekvis longa penspaŭzo, kaj tiam diris Tom:

„Aŭskultu foje, Huck, ni ne provu tion ankoraŭfoje, ĝis kiam ni scios, ke Indiĝen-Joe ne estas tie. Tio estos tro timiga. Se ni nun gardostaros ĉiunokte, ni tute certe iam vidos lin eliri, aŭ tiam aŭ tiam, kaj tiam ni kaptos fulmrapide la keston.“

„Jes, konsentite. Mi gardostaros dum la tuta nokto, kaj mi ankaŭ faros tion ĉiunokte, se vi transprenos la alian parton de la entrepreno.“

„Okej, tion mi faros. Vi nur venu al la Hooper-strato kaj miaŭu – kaj, se mi dormos, ĵetu simple kelkajn

ŝtonetojn kontraŭ la fenestro, tiukaze mi vekigis.“

„Konsentite, kaj ege bonege!“

„Nun la ŝtormo finiĝis, Huck, kaj mi iros hejmen. Post kelkaj horoj mateniĝos. Vi reiru kaj gardu tiom longe, ĉu en ordo tiel?“

„Mi diris, ke jes, Tom, kaj mi faros tion. Se necesos, mi hantos la tavernon dum tuta jaro! Mi dormos dumtage kaj gardostaros nokte.“

„Estas en ordo. Kaj kie vi dormos?“

„En la fojnejo de Ben Roger. Li konsentas, kaj tion akceptas ankaŭ onklo Jack, la negro de lia paĉjo. Mi ĉiam portas la akvon por onklo Jack, ĉiufoje, kiam li postulas tion de mi, kaj ĉiufoje, kiam mi petas lin, li donos al mi iom da manĝo, se li povas permesi tion al si. Jen damne bona negro, Tom. Li ŝatas min, ĉar mi neniam kondutas tiel, kvazaŭ mi estus io pli altranga ol li. Kelkfoje mi rekte sidiĝas kaj manĝas KUN li. Sed rakontu tion al neniuj. Foje oni faras ion, kion oni ne farus ĉiam, se oni ne tiom malsatus.“

„En ordo, se mi ne bezonos vin dumtage, Huck, mi lasos vin dormi. Mi ne ĝenos vin. Kaj tiukaze, se nokte io nekutima okazos, vi simple venu al mi kaj miaŭu.“

Ĉapitro 29

La unuan aferon, kiun Tom aŭdis vendrede matene, estis bona sciigo: La familio de juĝisto Thatcher revenis en la urbon en la antaŭa nokto. Kaj Indiĝen-Joe kaj la trezoro fariĝis momente duarangaj, ĉar Becky ekokupis la ĉeflokon en la intereso de la knabo. Li renkontis ŝin kaj ili havis kun aro de la kunlernantoj elĉerpige bonan tempon ĉe kaŝ- kaj kaptludo. La tago estis kompletigita kaj kronita je maniero, kiu estis precipe kontentiga: Becky ĉe sia patrino tiom longe almozpetadis fiksi la longe prokrastitan piknikon je la sekva tago, ĝis kiam ŝi konsentis. La beateco de la infano estis senfina; kaj tiu de Tom ne malpli. La invitoj estis forsenditaj antaŭ sunsubiro, kaj tuj la junularo de la urbeto estis ĵetita en febron de preparado kaj de plezuriga anticipo. Pro ekscitiĝo Tom kapablis ĝis malfrua horo resti vekiĝinta kaj li esperis rajtigite aŭdi la miaŭon de Huck, kaj havante la trezoron li volis mirigi la knabinon Becky kaj la aliajn piknikulojn per ĝi, je la

sekva tago, sed li seniluziĝis. Neniu siĝnalo eksonis tiunokte.

Mateniĝis, lastfine, kaj inter la deka kaj la dekunua gaja kaj petola societo kolektiĝis ĉe la domo de juĝisto Thatcher kaj ĉiu estis preta por starti. Ne estis la kutimo, ke pli aĝaj homoj ĝenu la piknikon per sia ĉeesto. Oni konsideris, ke la infanoj estas sufiĉe protektataj sub la flugiloj de kelkaj dekokjaraj junulinoj kaj kelkaj ĝentlemanoj, kiuj havas dudek tri jarojn aŭ proksimumajn aĝojn. La malnova vaporŝipo estis luita por la evento; kaj baldaŭ gaja aro laŭvice iris antaŭen sur la ĉefstrato ŝargita kun proviantkorboj. Sid estis malsana kaj devis malĉeesti la eventon, Maria restis hejme por subteni lin. La laste diritaj vortoj de sinjorino Thatcher al Beck estis:

„Vi revenos malfrue. Eble estos pli bone, se vi restos dumnokte ĉe unu el la knabinoj, kiuj loĝas ĉe la prama surteriĝejo, infano.“

„Tiukaze mi restos ĉe Susinjo Harper, panjo.“

„Tre bone, kaj ne forgesu kondukti bone kaj ne kaŭzu iun ĉagrenon.“

Apenaŭ ili survojis, Tom diris al Becky:

„Aŭskultu – mi diros al vi, kion ni faros. Anstataŭ iri al la hejmo de Joe Harper, ni grimpu rekte sur la monteton kaj haltu ĉe la vidvino Douglas. Ŝi havas glaciaĵon! Ŝi havas ĝin preskaŭ ĉiutage – amasajn kvantojn! Kaj ŝi tre tre ĝojus havi nin ĉe si.“

„Ha, tio fariĝos plezuro!“

Poste Becky iom pripensis la aferon kaj diris:

„Sed kion diros panjo?“

„Kiel ŝi eksciu tion?“

La knabino ankoraŭfoje cerbumis pri la ideo kaj diris heziteme:

„Mi pensas, ke tio estas malĝusta – sed...“

„Sensencaĵo! Via patrino ne ekscios, kaj kiun do damaĝus? Ĉio, kion ŝi volas, estas tio, ke vi estu sekura, kaj mi vetas, ke ŝi dirus, ke vi iru tien, se ŝi estus pensinta pri tio. Mi scias, ke ŝi dirus tion!“

La fama gastamikeco de la vidvino Douglas estis tenta allogaĵo. Tiu kaj la persvadoj de Tom baldaŭ gvidis la tagon. Tiel estis decidite diri al neniuj ion pri la nokta programo. Sed baldaŭ Tom rememoris, ke Huck povus veni ĝuste en tiu nokto kaj doni la signalon. La penso konsiderinde obtuzigis lian antaŭgoujon. Tamen li ne kapablis rezigni pri la plezuro ĉe vidvino Douglas. Kaj kial li rezignu pri tio, li meditis, la signalo ne eksonis tagon antaŭe, kial ĝi eksonu do ĝuste tiunokte? La certigita plezuro pesis pli ol necerta trezoro, kaj tute laŭ knaba maniero li decidis cedi al la pli forta inklino kaj ne permesi al si pensi plian fojon pri la monokesto.

Tri mejlojn sude de la urbo haltis la pramŝipo ĉe la komenco de arboriĉa golfeto kaj albordiĝis. La aro svarmis sur la firman teron, kaj baldaŭ la krutaj altoj reeĥis proksime kaj malproksime de voko kaj ridado. Ĉiuj diversaj manieroj varmegiĝi kaj laciĝi estis ekzercitaj, kaj poste iom post iom la migrantoj vagis reen al la kampadejo kun plifortigita laŭorda apetito kaj poste komenciĝis la neniigo de la bonaĵoj.

Post la festmanĝo sekvis refreŝiga paŭzo kaj babilado en la ombro de vaste etendiĝantaj kverkoj. Iom post iom kelkaj vokis:

„Kiu estas preta por la Douglas-kaverno?“

Ĉiu estis preta. Oni havis faskojn da kandeloj kaj baldaŭ komenciĝis trotado sur la monteton. La eniro de la kavernosistemo estis alte sur la montetflanko – la aperturo aspektis kiel A. Ĝia malfermita masiva kverka pordo ne estis barita. Malantaŭe troviĝis malgranda ĉambro, frida kiel glacidomo kaj de la naturo ekipita per solidaj kalkŝtonaj muroj, kiujn kovris malseka roso, kiu aspektis kiel frida ŝvito. Estis romantike kaj mistere stari tie kaj rigardi eksteren sur la verdan valon, kiu brilas en la suno. Sed la fascino baldaŭ triviĝis kaj la brua petolado komenciĝis denove. Tuj kiam kandelo ekflamis, ĉiuj urĝis la posedanton; sekvis batalo kaj brava defendo, sed la kandelo baldaŭ estis batita teren aŭ estingita. Kaj poste sekvis ĝoja bruo de ridado kaj nova ĉasado. Sed ĉiuj aferoj havas finon; Iom post iom la procesio marŝis antaŭen sur la krute malsupreniĝanta ĉefa irejo kaj la flagranta lumo malkovris nebule la altege leviĝantajn rokandojn preskaŭ ĝis la alto de dekok metroj, kie ili kunpuŝiĝis. La ĉefa irejo estis nur du aŭ tri metrojn larĝa. Ĉiufoje post kelkaj paŝoj

debranĉiĝis alia altega kaj ankoraŭ pli mallarĝa fendaĵo je ambaŭ flankoj – ĉar la McDougal- kaverno estis grandega labirinto de kurbigitaj koridoroj, kiuj estis ligitaj reciproke, kaj kiu havis elirejojn kondukantajn nenien. Oni diris, ke oni povas kune migri dum tagoj kaj noktoj tra komplika implikaĵo el fendoj kaj ravinoj, kaj ke oni neniam atingos la finon de la kavernsistemo, kaj ke oni povas iri pli kaj pli profunden en la teron, kaj ke estas tamen ĉiam simile – labirinto sub labirinto, kaj neniu finaĵo en unu el ili. Neniu „konis“ la kavernsistemon. Tio tute ne estis ebla. La plej multaj el la junaj viroj konis parton de ĝi, kaj estis nekutime aŭdaci esplori la terenon multe ekstere de la konata parto. Tom Sawyer konis tiom la kavernsistemon kiel iu ajn.

La procesio moviĝis laŭ la ĉefa irejo ĉirkaŭ tri kvaronojn de mejlo, kaj poste la grupoj kaj paroj komencis moviĝi en flankvojojn, ili rapidis tra la malagrablaj koridoroj kaj reciproke timigite kaptis manojn, se la koridoroj denove kuniĝis je certa punkto. Tiel unuopaj partoj povis eviti sin reciproke survoje dum duono de horo sen iri en la „nekonatan“ regionon.

Iom post iom unu grupo post la alia vagante revenis al la enirejo de la kaverno, anhelanta, kaŭzanta

grandan ĝojon kaj ridadon, ŝmirita de la kapo ĝis la piedoj per sebogutaĵo, kovrita de argilo, kaj entute ravita pri la sukcesa tago. Ili tre miris, ke ili tute forgesis la tempon, kaj ke la vespero estis komenciĝonta. La ŝipsonorilo sonoradis jam dum duono de horo. Tamen tiu speco de la tagfino estis romantika kaj tial kontentiga. Kiam la pramŝipo kun sia sovaĝa kargo depuŝiĝis en la riveron, neniue iomete afliktiĝis pri la disipita malfruigita tempo krom la ŝipkapitano mem.

Huck jam gardostaris, kiam la pramŝipo preterglitis la haltejon kun mallonga lumsignalo. Li aŭdis neniun bruon sur la ŝipo, ĉar la junuloj estis tiel elĉerpitaj kaj kvietaj, kiel kutime estas homoj, kiuj estas tute lacigitaj. Li miris, kia ŝipo tio estas, kaj kial ili ne haltas ĉe la surteriĝejo – kaj poste li forigis ĝin el sia kapo kaj koncentriĝis pri afero sia. La nokto fariĝis pli kaj pli nuba kaj malhela. La dudekdua komenciĝis kaj la bruo de la veturiloj finiĝis, distritaj lumoj estingiĝis, ĉiuj vagantaj piedirantoj malaperis, la urbeto endormiĝis kaj postlasis la malgrandan gardanton sola kun la kvieto kaj la fantomoj. La dudektria komenciĝis kaj oni estingis la lumojn en la taverno. Ĉie estis nun tenebro. Huck atendis, kiel ŝajnis al li, dum lacige longa tempo, sed okazis nenio. Lia optimismo malpliĝis. Ĉu tio havas iun sencon?

Ĉu tio entute havas sencon? Kial ne rezigni kaj reiri al la dormejo?

Bruo penetris al liaj oreloj. Per unu fojo li estis atentega. La pordo al la strateto estis fermita mole. Li saltis malantaŭ la angulon de la konstruvendejo. En la sekva momento preterrapidis du viroj, unu el ili ŝajne portis ion subbrake. Tio certe estis la kesto! Ili do translokigas la trezoron. Kial voki nun Tom-on? Tio estus absurda – la viroj eskapus kun la kesto kaj oni neniam trovus ilin denove. Ne, li persekutos ilian spuron kaj sekvos ilin; li fidos al la tenebro, tiel, ke li sekuros kontraŭ malkovro. Tiel komunikante kun si mem, Huck ekpaŝis kaj ŝteliris post ili kiel kato, kun nudaj piedoj, li permesis al ili antaŭe esti guŝte tiom malproksime, ke ili ankoraŭ ne ekmalaperas el lia viddistanco. Ili iris sur la strato, kiu kondukis al la rivero, laŭ tri domblokoj kaj post ili turniĝis maldekstren sur flankstraton, sur ĝi ili iris rekte antaŭen, ĝis ili venis al la vojo, kiu kondukas al Cardiff-monteto. Tiun ili ekuzis. Kiam ili preteriris la domon de la maljuna kimro, meze de la vojo supren, ili ne hezitis, sed daŭrigis sian marŝon al la supro. Okej, pensis Huck, ili volas enfosigi la trezoron en la malnova ŝtonrompejo. Sed ili ankaŭ ne haltis ĉe la malnova ŝtonrompejo. Ili iris plu ĝis la montetokapo. Poste ili iris en la malvastan padon inter la altaj

Sumach-arbustoj kaj subite malaperis en la malhelo. Huck proksimiĝis kaj malpliigis la distancon, ĉar nun tute ne plu eblis vidi lin. Li trotis ankoraŭ iom antaŭen, poste li hezitis sian paŝadon, timante, ke li tro proksimiĝos al la viroj, li moviĝis ankoraŭ iomete antaŭen kaj poste haltis por unu fojo, li aŭskultis, neniuj sonoj aŭdeblis, eĉ ne iu, se oni ne konsideras, ke li opiniis aŭskulti la batadon de sia propra koro. La ululado de strigo aŭdiĝis de la transa flanko de la monteto – malbonsignaj sonoj! Sed neniuj paŝoj. Damne, ĉu ĉio estis vane! Li jam volis eksalti kun flugilitaj paŝoj, kiam proksimume metron malproksime de li ternis viro! La koro de Huck kvazaŭ saltis en lian gorĝon, sed li glutis ĝin malsupren, poste li staris tie, kvazaŭ li subite estus skuata samtempe de ses febroj. Li sentis sin tiom malforta, ke li pensis, ke li falos kun certeco sur la tersurfaco. Li sciis, kie li estas. Li sciis, ke li estas kvin paŝojn proksime de la murŝtuparo, kiu kondukas en la terposedon de vidvino Douglas. Tre bone, ili enfosu la keston tie, ne estos malfacile trovi ĝin tie.

Nun eksonis voĉo – tre mallaŭta voĉo –tiu de Indiĝen-Joe:

„Ŝi estu damnita, povas esti, ke ŝi havas gastojn – jen

lumo, kvankam estas tiom malfrue.“

„Mi ne povas vidi iun.“

Tio estis la voĉo de la fremdulo – la strangulo de la hantata domo. Frosta frido ekkaptis la koron de Huck – tio do estis la „venĝo“-entrepreno! Lia unua penso estis fuĝi. Poste li memoris, ke la vidvino Douglas estis pli ol unufoje afabla al li, kaj tiuj viroj eble estas mortigonta ŝin. Li deziris havi la kuraĝon averti la vidvinon, sed li sciis, ke li ne havus la kuraĝon – ili povus veni kaj kapti lin. Ĉio tio venis en lian kapon, dum la momento, kiu pasis inter la rimarko de la fremdulo kaj la sekva rimarko de Indiĝen-Joe, kiu estis jena:

„Ĉar la arbusto kovras ĝin antaŭ vi. Jen – transiĝu tien – nun vi povas vidi ĝin, ĉu?“

„Jes. Konsentite, ŝi devas havi gastojn, mi supozas. Prefere rezignu pri la venĝo!“

„Rezigni pri la venĝo, ĉu? Kiam mi tuj forlasos la landon unufoje por ĉiam, ĉu! Mi rezignu kaj eble

neniam plu havu plian bonŝancon, ĉu? Mi diras al vi ankoraŭfoje, kiel mi diris tion jam antaŭe al vi, mi ne interesiĝas pri ŝia rabakiro – ĝi estu via. Sed ŝia edzo estis kruda al mi – multfoje li estis kruda al mi. Sed antaŭ ĉio li estis la paciga juĝisto, kiu enkarcerigis min pro vagisteco. Kaj tio ne estas ĉio. Tio estas eĉ ne milion-ono de la tuto! Li SKURĜIS min! Li skurĝis min kiel negron fronte de la karcero, kiel negron! – Kaj la tuta urbo observis tion! Li SKURĜIS min, ĉu vi komprenas? Li rapidis pli ol mi, ĉar li mortis. Sed ŝian vivon mi prenos.“

„Ho, ne mortigu ŝin! Ne faru tion!“

„Mortigi, kiu diris ion pri mortigi? Mi mortigus LIN, se li estus ĉi tie, sed ne ŝin. Se vi volas venĝi vin je ino, vi ne mortigu ŝin – feko! Vi ataku ŝian belon. Vi tratranĉu ŝiajn nazlobojn – vi tranĉu noĉojn en ŝiajn orelojn, kiel ĉe porkino!“

„Dio mia, tio estas...“

„Retenu vian opinion por vi mem! Tio estos por vi la plej sekura. Mi firmligos ŝin al la lito. Se ŝi elsangus, ĉu tio estos mia kulpo? Mi ne larmus, se ŝi farus tion.“

Amiko mia, vi helpas al mi ĉe la afero – por plaĉo *mia* – tial vi estas ĉi tie – sola mi eble ne sukcesus. Sed, se vi retroevitos, mi transmondigos vin. Ĉu vi komprenas tion? Kaj, se mi devos mortigi vin, mi mortigos ankaŭ ŝin – kaj poste, mi supozas, ke neniu plu scios ion pri tio, kiu faris tiun buĉadon.“

„En ordo, se necesas fari tion, ni faru tion tuj. Ju pli rapide des pli bone – mi jam tute tremas.“

„Fari ĝin NUN? Dum ĉeesto de la gastoj tie? Aŭskultu – mi komencas suspekti vin, tion sciu unue. Ne – ni atendos, ĝis kiam la lumoj ne plu lumos – ni ja ne devas rapidi.“

Huck divenis, ke sekvos tuj silento – jen afero, kiu estis eĉ pli terura ol ĉiu longega interparolado pri murdo; tial li ĉesis spiri kaj faris tre delikatan retropaŝon. Li metis la piedon atenteme, sed firme, surteren, post ŝanceliga balancado sur unu piedo preskaŭ falinte al unu flanko kaj posta al la alia. Li retropaŝis plian fojon, kun la sama zorgemo kaj en la sama danĝero – jen kraketis branĉeto sub piedo! Li ĉesis spiri kaj aŭskultis. Neniu sono aŭdeblis, estis absolute kviete. Lia dankemo ne konis limojn. Nun li turniĝis en sia spuro, inter la baraĵo el Sumach-

arbustoj, li turnis sin tiel zorgeme kvazaŭ li estus ŝipo – kaj poste li paŝis rapide antaŭen, sed atenteme. Alveninte ĉe la ŝtonrompejo, li sentis sin sekura kaj tial li kvazaŭ ekflugis sur siaj rapidaj facilmovaj piedoj. Pli malsupren kaj pli malsupren li rapidegis, ĝis kiam li atingis la domon de la kimro. Li frapis laŭte la pordon kaj baldaŭ montriĝis la kapoj de la maljuna viro kaj de liaj fortegaj filoj en la fenestroj.

„Kial la bruo tie? Kiu frapegas? Kion vi celas?“

„Enlasu min – rapide! Mi rakontos ĉion al vi.“

„Kiu vi estas?“

„Huckleberry Finn – rapide enlasu min!“

„Huckleberry Finn, efektive! Tio ne estas la nomo, kiu malfermigas multajn pordojn, mi pensas! Sed enlasu lin, filoj miaj, por ekscii, pri kio temas!“

„Mi petas, vin, ne diru al iu, ke estas sciigo de mi“, tio estis la unuaj vortoj, kiujn Huck diris, kiam li enpaŝis. „Bonvolu, ne faru – ili mortigus min, certe –

sed la vidvino estis kelkajn fojojn afabla al mi, kaj mi rakontu tion al vi, mi VOLAS rakonti tion, se vi promesos al mi, ke vi vi neniam mencios, ke estas de mi.“

„Ĉe Georgo, li efektive HAVAS ion por rakonti aŭ li ne agus tiel!“ klarigis la maljuna viro: „Ekparolu kaj neniu ĉi tie perfidos vin, knabo.“

Post tri minutoj la maljuna viro kaj liaj filoj kuris jam armite sur la vojo supren al la monteto, kaj ĝuste ili iris ŝtelire en la Sumach-padon, kun la pistoloj ĉemane. Huck ne akompanis ilin plu. Li kaŝiĝis malantaŭ granda roko kaj ekaŝkultis. Sekvis longa timiga kvieto, kaj poste subite ekknalis armiloj kaj aŭdeblis krio.

Huck ne plu atendis la detalojn, li forsaltis kaj kuregis malsupren de la monteto, tiel rapide, kiel liaj piedoj portis lin.

Ĉapitro 30

Je ekmateniĝo Huck palpis sin supren de la monteto kaj frapis mallaŭte la pordon de la maljuna kimro. La internuloj dormis, sed estis dormo, kiu estis kvazaŭ ligita al hararbutono, pro la okazaĵoj de la nokto. El fenestro eksonis voko:

„Kiu estas tie?“

La timema voĉo de Huck respondis mallaŭte:

„Bonvolu enlasi min! Estas nur Huck Finn!“

„Jen nomo, kiu malfermas tiun ĉi pordon tage kaj nokte, bubo! Kaj estu bonvenigata!“

Jen strangaj vortoj por la oreloj de la vagabonda knabo, kaj la plej plezurigaj, kiujn li iam ajn aŭdis. Li ne povis rememori, ke tiujn laste diritajn vortojn oni uzis iam ajn al li. Oni rapide malfermis la pordon kaj li enpaŝis. Oni prezentis sidlokon al Huck kaj la

maljuna viro kaj ambaŭ fortegaj filoj rapide vestis sin.

„Nu, knabo mia, mi esperas, ke vi fartas bone kaj havas grandan apetiton, ĉar tiam, kiam la suno leviĝos, matenmanĝo estos tuj preta, kaj krome kun fajfante varmegaj trinkaĵoj – estu tute malstreĉita pri tio! Mi kaj miaj filoj esperis vian aperon kaj restadon ĉi tie lastnokte.“

„Mi terure timemis“, diris Huck, „kaj tial mi forkuris. Mi malaperis, kiam la pistoloj ekknalis, kaj mi kuris seninterrompe dum distanco de tri mejloj. Mi revenis nun, ĉar mi ja volas scii, kio okazis, sed mi venis antaŭ tagiĝo, ĉar mi ne volis renkonti la diablojn, eĉ ne, se ili estas mortaj.“

„En ordo, kompatinda knabo, vi aspektas kvazaŭ vi travivis duran nokton – sed jen lito por vi, post la matenmanĝo. Nu, ili ne estas mortaj, knabo mia – ni tre tre bedaŭras tion. Ni sciis ja pro via priskribo, kie ni povos kapti ilin. Tial ni ŝtelire proksimiĝis al ili, ĝis kiam ni estis nur kvin metrojn for de ili – la Sumach-pado estis tenebra kiel kelo, kaj ĝuste tiam mi estis ekternonta. Jen la plej stulta malbonŝanco, kiu imageblas! Mi provis reteni tion, sed mi estis sen

ŝanco. Estis neeviteble, kaj tial okazis! Mi estis la gvidanto kun jam levita pistolo ĉemane, kaj kiam la ternado ekis, tiuj friponoj susurige forkuris tra la arbustoj por forlasi la padon. Mi kvazaŭ ekpemis: „Pafu, filoj!“ kaj mi pafis en la direkto, kie la susurado aŭdeblis. Tion faris ankaŭ miaj knaboj. Sed ili obskure malaperis, tiuj kanajloj, kaj ni persekutis ilin tra la arbaro. Mi pensas, ke ni neniam trafis ilin. Ĉiu el ili pafis unufoje, kiam ambaŭ ekkuris, sed iliaj kugloj fajfis preter ni kaj ne vundis nin. Kiam ni ne plu aŭdis iliajn paŝojn, ni finis la ĉasadon kaj forlasis la monteton por vekti la ĝendarmojn. Ili kolektigis grupon da viroj kaj foriris por gardi la riveran bordon, kaj tiam, kiam fariĝos hele, la ŝerifo kun la viroj rastos la arbaron. Kaj miaj filoj kun ili. Mi dezirus, ke ni havu priskribon de la banditoj – tio farus la entreprenon multe pli simpla. Sed vi ne povis vidi en la tenebro, kiel ili aspektas, ĉu?“

„Tamen, tamen, mi vidis ambaŭ en la urbo – kaj mi sekvis ilin.“

„Grandioze! Priskribu ilin, priskribu ilin, knabo mia!“

„Unu el ili estas la surdomuta hispano, kiu vagadis

unu-aŭ dufoje en la urbo, kaj la alia estas malice aspektanta ĉifonita...”

„Tio sufiĉas, bubo, ni konas la virojn! Ni renkontis ilin en arbore malantaŭ la tereno de la vidvino, kaj ili rapide skuis la polvon de la piedoj. Ek, filoj, kaj diru tion al la ŝerifo – vian matenmanĝon vi ricevu morgaŭ matene!”

La filoj de la kimro ekiris tuj. Kiam ili elpaŝis el la ĉambro, Huck saltis surpieden kaj ekkriis:

„Ho, bonvolu ne rakonti al iu, ke mi denunciis ilin! Ve, bonvolu!”

„En ordo, ĉar vi diras tion, Huck, sed vi devus ricevi la rekonon por tio, kion vi faris.”

„Ho, ne, ne! Bonvolu ne rakonti tion!”

Kiam la junaj viroj forestis, la maljuna kimro diris:

„Ili ne rakontos tion – kaj ankaŭ ne mi. Sed kial vi ne

volas, ke oni eksciu tion?“

Huck ne volis klarigi pli ol tio, kion la viro laŭ li jam tro multe scias pri unu el la viroj. Je ĉio en la mondo li ne volis, ke la viro ekkonu, ke li scias ion pri tiu ulo – la ulo mortigus lin, se li ekscius ion, certe.

La maljuna viro promesis plian fojon, ke li tenos tion sekreta, kaj diris:

„Kial vi ekhavis la ideon persekuti ilin, bubo? Ĉu ili aspektis suspektaj?“

Huck silentis, dum li formis enkape dece memgardeman respondon. Poste li diris:

„Nu jes, vi scias, ke mi estas speco de ulo, al kiu la sorto ne ridas – almenaŭ ĉiuj asertas tion, kaj kion diri kontraŭ tio? Ili pravas, kaj kelkfoje mi apenaŭ povas dormi, ĉar mi pensas pri tio, kaj iel mi provas kutimiĝi pri nova vivmaniero. Tiel estis en la lasta nokto. Mi ne povis dormi, kaj tial mi promenis sur la strato meze de la nokto kaj rompis la kapon pri ĉio, kaj kiam mi alvenis la konstruendejon ĉe la aĉa

Taverno de l' Abstinenculoj, mi apogis min denove al la muro por plia pripenso. Jes ja, kaj ĝuste en tiu momento tiuj du uloj proksime de mi ŝtelire preterglitis, kun io subbrake; kaj mi supozis, ke ili ŝtelis tion. Unu el ili fumis kaj la alia volis havi ties cigaron por bruligi sian; tial ili haltis ĝuste antaŭ mi kaj la cigaroj eklumigis iliajn vizaĝojn, kaj mi vidis, ke la pli granda viro estas la surdmuta hispano, kaj mi ekkonis lin pro la blanka vangobarbo kaj la okulkovrilo, kaj la alia aspektis kiel ruĝe flava ĉifonita diablo.“

„Ĉu vi povis vidi la kanajlojn dum la eklumo de la cigaroj?“

Tio konsternis Huck-on dum momento. Poste li diris:

„Nu, mi ne scias – sed iel mi pensas, ke jes.“

„Poste ili iris plu kaj vi...“

„Sekvis ilin – jes ja. Tiel estis. Mi volis scii pri kio temas – ĉar ili kvazaŭ limakis. Mi sekvis ilin kiel hundo ĝis la murŝtuparo de la vidvino kaj staris en la

tenebro kaj aŭdis, kiel la ĉifonito petis indulgi la vidvinon, kaj la hispano ĵuris, ke li ruinigos ŝian belon, tiel, kiel mi rakontis tion al vi kaj al viaj du...”

„Kio?! La SURDMUTULO diris tion, ĉu?”

Huck do plian fojon erare diris ion! Li provis kiel eble plej bone kaŝi al la maljuna viro, kiu estas la hispano, kaj tamen lia lango ŝajne decide intencis puŝi lin en malfacilaĵojn, spite al ĉio ĉi, kion li provis fari kontraŭ tio. Li kelkfoje provis elturniĝi el la dilemo, sed la okuloj de la maljuna viro atente rigardis al li, kaj tial liaj senintencaj diroj plimultiĝis. Baldaŭ la kimro diris:

„Knabo mia, ne timu min. Mi ne kurbigus eĉ kaphareton de vi, ne je ĉio en la mondo. Ne – mi protektus vin – mi protektus vin. La hispano ne estas surdmutulo, tio glitis el vi sen intenco, tion vi ne plu povos kaŝi de nun. Vi scias ion pri la hispano, kion vi volas retenigi. Nu, fidu al mi – diru, kio estas tio? Mi ne perfidos vin.”

Huck rigardis dum momento al la honestaj okuloj de

la maljunulo, poste li kliniĝis al li kaj flustris orelen al li:

„Li ne estas hispano – estas Indiĝen-Joe!“

La kimro preskaŭ saltis el sia seĝo. Tuj li diris:

„Nun ĉio estas sufiĉe klara. Kiam vi parolis pri tio tranĉi noĉojn en orelojn kaj tratranĉi nazlobojn, mi pensis, ke tio estas viaj propraj plibeligaj troigoj, ĉar blankuloj ne venĝas sin tiel. Sed ja indiĝeno! Tio estas alia afero.“

Dum la matenmanĝo ili daŭrigis la interparoladon, kaj la maljuna viro diris dum tio, ke la lasta, kion li kaj liaj filoj faris antaŭ enlitiĝo, estis havigi lanternon kaj ekzameni la murŝtuparon kaj ties najbarecon pro sangomakuloj, ke ili ne trovis ilin, sed grandan faskon kun....

„KUN KIO?“

Eĉ ne fulmo ne kun pli miregiga rapideco povus salti ol la vortoj de Huck de ties palaj lipoj. Liaj okuloj

gapis nun vaste malfermitaj, kaj li retenis la spiron, dum li atendis respondon. La kimro estis alarmita – li komencis retrogapi al Huck – dum tri sekundoj – kvin sekundoj – dek – kaj poste li respondis:

„Rompŝtelista ilaro. Sed pri kio TEMAS je vi?“

Huck refalis en la seĝon, enspiris plifaciligite, sed profunde, neimageble dankema. La kimro rigardis lin serioze kaj scivoleme – kaj baldaŭ li diris:

„Jes, rompŝtelista ilaro. Tio ŝajne konsiderinde bonfartigas vin, ĉu? Sed kio eskcitis vin tiom? Kion atendis VI kiel trovaĵon?“

Huck estis embarasita – la esploremaj okuloj estis fiksitaj al li – li donus ĉion por povi respondi ion prudentan – sed nenio tia ofertigis – la inkvizicieca rigardo trapenetris lin pli kaj pli – sensencan respondon li ja ekhavis – kaj ne estis tempo pesi ĝin – tial li riskis diri – kun pepanta voĉo:

„Dimanĉajn lernejoblibrojn, eventuale.“

La streso de Huck estis tiel granda, ke li eĉ ne povis rideti, sed la maljunulo ridis laŭte kaj ĝoje, kaj pro tio traskuiĝis liaj korpopartoj de la kapo ĝis la piedoj, kaj li diris, ke tia ridado estas fakte mono en la poŝo de viro, ĉar tio malpliigas la kuracistokostojn kiel nenio alia. Poste li aldonis:

„Kompatinda knabo mia, vi estas ja tute pala kaj lacigita – do, ne estas miraklo, ke vi kondutas tiel strange, ke vi perdis la balancon. Sed vi transvivos tion. Ripozo kaj dormo restarigos vin, tute certe, mi esperas tion.“

Huck ĉagreniĝis pri si, ke li kondukis kiel timema ansero, ke li montris tiom suspektigan eksciton. Kvankam li ja mem jam forlasis la penson, ke la pakajo portita el la taverno estas la trezoro, tuj kiam li aŭdis la interparoladon sur la murŝtuparo de la vidvino. Sed li ja nur pensis, ke ĝi ne estas la trezoro – li ne sciis tion, kaj tial la mencio pri la trovita fasko estis tro por lia memregado. Sed entute li estis ĝoja, ke okazis la eta epizodo, ĉar li sciis post la tuta pridemandado, ke la fasko ne estis *la* certa fasko, kaj tial li estis kontenta kaj eksterordinare bonfarta. Fakte ĉio de nun moviĝis en la ĝusta direkto; la trezoro certe estis ankoraŭ en n-ro 2, la virojn oni kaptos ankoraŭ je tiu tago kaj enkarcerigos ilin kaj li

kaj Tom povos forpreni ĉinokte la oron sen iu ĝeno aŭ timo aŭ interrompo.

Ĝuste kiam la matenmanĝo estis finita, iu frapis je la pordo. Huck eksaltis por kaŝi sin, ĉar li eĉ nerekte neniel volis esti ligebla al la plej lastaj okazaĵoj. La kimro enlasis kelkajn damojn kaj ĝentlemanojn, inter ili la vidvino Douglas. Huck rimarkis, ke tutaj civitangrupoj grimpis sur la monteton – por rigardi la murŝtuparon. La sciigoj do jam disvastiĝis.

La kimro devis rakonti la okazaĵojn de la lasta nokto al la vizitantoj. La dankemo de la vidvino por sia savo estis vortriĉa.

„Ne valoras paroli pri tio, sinjorino. Ekzistas iu, al kiu vi supozeble devas esti pli dankema ol al mi kaj miaj filoj, sed li ne permesis menci ian nomon. Sen li ni tute ne estus estintaj tie.“

Kompreneble tio incitis tiom grandan scivolemon, ke la plej grava afero preskaŭ fariĝis duaranga. Kaj la kimro fakte permesis, ke la scivolo penetris profunde en la intestojn de la vizitantoj kaj per tio disvastiĝis en la tuta urbeto, ĉar li rifuzis disdividi sian sekreton.

Kiam ĉio alia estis priparolata, diris la vidvino:

„Mi enlitiĝis kaj endormis dum la legado kaj mi tute ne rimarkis ion pri la bruo, kiam mi dormis. Kial vi ne venis al mi kaj ne vekis min?“

„Ni pensis, ke tio tute ne necesas. Tiuj uloj tute certe ne havis la intencon reveni – ili ne plu havis la ilaron por fari ion, kaj kiun sencon havus vekigi vin kaj terure timigi? Miaj tri negrosklavoj dum la restaĵo de la nokto gardis antaŭ via domo. Ili ĝuste revenis al ni.“

Alvenis ankoraŭ pli da vizitantoj, kaj necesis rerakonti la aferon en la sekvaj horoj denove kaj denove.

Ne estis sabataj lernejoj instruhoroj dum la ferioj, sed ĉiu estis frue matene en la preĝejo. La ekscita okazaĵo estis detale analizita. Pri la friponoj sciigis nur, ke ankoraŭ ne aŭdeblis novaĵo pri ili. Post la fino de la prediko, kiam la paroĥanoj iris tra la ĉefa navo eksteren, ŝoviĝis la edzino de la juĝisto Thatcher apud sinjorinon Harper kaj diris:

„Ĉu mia Becky volas dormi dum la tuta tago? Mi ja jam imagis, ke ŝi certe estas tute lacega.“

„Via Becky, ĉu?“

„Jes“, kaj kun timigita vizaĝo ŝi diris: „Ĉu ŝi ne restadis dum la lasta nokto ĉe vi?“

„Kial, ne.“

SinJORINO Thatcher fariĝis pala kaj sinkis sur preĝbenkon, ĝuste kiam preteriris onklino Polly, kiu vigle interparolis kun amikino. Onklino Polly diris:

„Bonan matenon, sinJORINO Thatcher. Bonan matenon, sinJORINO Harper. Mi havas knabon, kiu ne alvenis hejmen. Mi supozis, ke Tom restadis ĉinokte en iu el viaj domoj. Kaj nun li timas montriĝi en la preĝejo. Mi ĉeokaze devos doni al li predikon pri moroj.“

SinJORINO Thatcher kapneis sen forto kaj fariĝis ankoraŭ pli pala ol kutime.

„Ĉe ni li ne estis“, diris sinjorino Harper, kiu komencis rigardi malkomforte. Profunda aflikteco parolis el la vizaĝo de onklino Polly.

„Joe Harper, ĉu vi vidis hodiaŭ mian Tom-on ĉimatene?“

„Ne, madam'.“

„Kiam vi vidis lin je la lasta fojo?“

Joe provis memori, sed ne certis, kion respondi. La homoj ekstere de la preĝejo haltis. Flustrado vagadis en la vicoj, malbonaŭgura maltrankvilo ekvideblis sur ĉiu vizaĝo. Oni pridemandis timeme la infanojn, kaj la junajn instruistojn. Ili ĉiuj diris, ke ili ne rimarkis, ĉu Tom kaj Becky troviĝis sur la pramsĥipo, kiam ĝi estis veturigata hejmen; estis tenebre, neniu pensis pri tio demandi, ĉu iu mankas sur la ŝipo. Juna viro fine timeme elpuŝis la vortojn, ke ili ankoraŭ troviĝas en la kavernsistemo! Sinjorino Thatcher svenis kaj sinkis teren. Onklino Polly eklarmis kaj premadis siajn manojn.

La alarmo disvastiĝis rapide de lipoj al lipoj, de grupoj al grupoj, de strato al strato, kaj dum kvin minutoj la sonoriloj sovaĝe sonoradis kaj la tuta loĝantaro estis sur la piedoj! La Cardiff-monteta epizodo fariĝis subite tute negrava, la rompŝtelistoj estis forgesitaj, oni selis la ĉevalojn, boatoj plenigis sin per viroj, la pramŝipo ricevis komandojn por la ekveturo, kaj antaŭ ol la hororo daŭris tridek minutojn, ducent viroj torentis jam surstrate kaj surrivere al la Douglas- kaverno.

Dum la tuta posttagmezo la urbeto ŝajne estis vaka kaj morta. Multaj inoj vizitis onklinon Polly kaj sinjorinon Thatcher kaj provis konsoli ilin. Ili ankaŭ ploris kun ili, kaj tio estis ankoraŭ pli bona ol vortoj. Dum la tuta senfina nokto la urbo atendis novaĵojn, sed kiam la matena krespusko leviĝis, ĉiuj vortoj, kiuj aŭdeblis, estis nur: „Sendu pliajn kandelojn – kaj sendu manĝon.“ Sinjorino Thatcher preskaŭ freneziĝis, kaj ankaŭ onklino Polly. La juĝisto Thatcher sendis esperigajn mesaĝojn kaj kuraĝigojn de la kaverno, sed ili ne alkondukis aŭtentikan ĝojon.

La maljuna kimro je tagiĝo revenis hejmen, priŝprucata de kandela sebo, kaj priŝmirita per

argilo, kaj preskaŭ je la fino de siaj fortoj. Li trovis Huck-on kuŝantan ankoraŭ en la lito, kiu estis disponigita al li, kaj Huck deliris en febra stato. La kuracistoj estis ĉiuj en la kavernsitemo, kaj tial venis vidvino Douglas kaj transprenis la flegadon de la paciento. Ŝi diris, ke ŝi faros la plej bonan por li, ĉar li estas kreitaĵo de Dio, egale, ĉu bona, malbona aŭ indiferenta, kaj ke neniu, kiu estas infano de Dio, estas neglektebla. La kimro diris pri Huck, ke li havas ankaŭ bonajn ecojn, kaj la vidvino diris:

„Pri tio vi povas esti certa. Jen la signo de l' Sinjoro. Li forgesis je neniu. Tion li faris neniam. Li kundonis ĝin al ĉiu, kiun li kreis per siaj manoj.“

Frue antaŭtagmeze grupoj de lacigitaj viroj komencis reveni en la urbon, sed la plej fortaj de la civitanoj daŭrigis la serĉadon. Sed ili ne kunportis bonajn sciigojn. Ĉiuj novaĵoj, kiuj gajneblis, estis, ke oni rastis eĉ plej forajn angulojn de la kaverno, kiuj ankoraŭ neniam estis vizititaj antaŭe, ke oni traserĉos ĉiun angulon aŭ fendon detale; ke oni vidis ĉie ajn en la labirinto de la trairejoj forajn lumojn, kiuj hastis tien kaj ĉi tien, kaj ke vokoj kaj pistolaj pafoj sendis siajn vakajn re-eĥojn tra la malhelaj irpasejoj al la oreloj. Je loko, tre malproksime de la tereno, kie turistoj kutime trairas, troviĝis la nomoj

de „Becky & TOM“ skribitaj per kandela fulgo sur rokvandon – kaj ĉemane peco de hararbanto priŝmirita per fulgo. Sinjorino Thatcher rekonis la bantopecon kaj eklarmis. Ŝi diris, ke tio estas la lasta memoraĵo, kiun ŝi havas de la infano, kaj ke neniu alia memoraĵo de ŝi povus esti tiel valora, ĉar ĝi kiel la lasta tuŝis la vivantan korpon de Becky antaŭ ol la terura morto transmondigis ŝin. Kelkaj diradis, ke en la kavernoj eklumas de tempo al tempo tre malproksime lumpunkto, kaj poste sekvis ĉiufoje jubilo kaj dudek viroj kuris tra la reeĥantaj irejoj – kaj poste sekvis ĉiufoje deprimiga seniluziigo; la infanoj ne estis tie, estis nur la lumo de serĉanto.

Dum tri teruraj tagoj kaj noktoj treniĝis la turmentigaj horoj lante antaŭen kaj la urbeto sinkis en senesperan letargion. Neniu plu havis intereson por entrepreni ion ajn. La hazarde ĵus farita malkovro, ke la posedanto de la Taverno de l' Abstinenculoj havis likvoron en sia stokejo, apenaŭ akcelis la pulson de la publiko, kiel ajn neimagebla estis la fakto. En lucida momento Huck direktigis la temon al tavernoj, ĉar li divenis nebule la plej aĉan, kaj fine li demandis: „Ĉu, de kiam mi estis malsana, oni malkovris ion en la Taverno de l' Abstinenculoj?“

„Jes“, diris la vidvino.

Huck rektiĝis supren en sia lito, kun sovaĝa rigardo:

„Kaj kion? Kion oni trovis?“

„Likvoron! – kaj la licencon de la taverno oni forprenis. Denove kuŝiĝu! Kial vi tiom timigis min?“

„Rakontu al mi nur tion – nur tion – bonvolu! Ĉu Tom Sawyer estis tiu, kiu malkovris la likvoron?“

La okuloj de la vidvino subite plenigis sin per ploroj.

„Ŝŝ, infano, ŝŝ! Mi ja jam diris al vi, ke vi NE parolu. Vi estas tre tre malsana!“

Huck pensis: „Do, oni trovis nur likvoron, estus nun granda spektaklo, se temus pri la oro. Tial nun la trezoro estas perdita poreterne, perdita dum eterneco! Sed pro kio ŝi larmas? Kuriozas, ke ŝi larmas.“

Tiuj pensoj pene serĉis vojon en la kapo de Huck, kaj

pro la laceco, kiun ili kaŭzis al li, li endormiĝis. La vidvino diris al si mem: „Jen li dormas, la kompatinda vrakulo. Ke Tom Sawyer trovu ion! Aĥ, se nur iu trovus tiun Tom Sawyer mem! Ne estas plu multaj, kiuj ankoraŭ havas sufiĉe da espero aŭ sufiĉe da forto por serĉi lin plu.“

Ĉapitro 31

NUN ni reiru al Tom kaj Becky, al ties travivaĵoj dum la piknika renkontiĝo. Kun la cetera societo ili promenis sur la malhelaj trairejoj, vizitante la konatajn kavernajn miraklojn – kun preskaŭ troige priskribitaj nomoj tiaj, kiaj „Salono“, „La Katedralo“, „Palaco de Aladino“ kaj tiel plu. Baldaŭ komenciĝis la kaŝ- kaj serĉ-petolado, kaj Tom kaj Becky engaĝis sin kun fervoro, ĝis kiam la klopodo fariĝis iom tro teda por ili; poste ili migris sur kurboriĉa larĝa irejo, alte tenante siajn kandelojn kaj legante la implikitan retejon de nomoj, datumoj, poŝtadresoj kaj motivoj, per kiuj la rokaj vandoj estis ornamitaj (el kandelfulgo). Ili ĉiam vagadis plu kaj interparolis, ili apenaŭ rimarkis, ke ili troviĝas jam en parto de la kaverna komplekso, kies muroj ne estis ornamitaj per pseŭdaj freskaĵoj. Ili fum-skribis siajn proprajn

nomojn sub rokkornicon kaj marŝis plu. Baldaŭ ili atingis lokon, kie gutis akvorivereto de roka elstarajo kaj portis kun si kalkŝtonan sedimenton, kiu formis dum la lante trenigantaj jarcentoj kunligitan krispan Niagaron el trembrila kaj nedetruebla ŝtono. Tom ŝovis sian sveltan korpon malantaŭ la formaĵon por lumini la ŝtonan akvofalon, kun la intenco plezurigi la amikinojn Becky. Dum tio li malkovris, ke la Niagaro fakte kurtenas specon de natura ŝtuparo, kiu estis malvaste enfermita inter du rokovandoj, kaj subite kaptis lin la ambicio fariĝi malkovrinto. Becky sekvis lian vokon kaj ili postlasis fulgосignon kiel estontecan vojŝildon kaj komencis la esploradon. Ili turniĝis tien kaj tien kaj pli kaj pli profunde penetris en la sekretojn de la kaverno, ili metis duan markon kaj sekvis debranĉigon, ĉiam serĉante novaĵojn, pri kiuj ili intencis raporti al la supra mondo. Je certa loko ili trovis vastan halon de kies volbaĵoj pendis multaj trembrilaj stalaktitoj, tiel longaj kaj dikaj kiel virogamboj. Mirante kaj admirante ili migradis, fine ili forlasis la halon pere de unu de la multnombraj trapasejoj, kiuj buŝiĝis en ĝin. Tiu debranĉigo kondukis baldaŭ al ensorĉiga fonto, kies baseno estis enkrustita per glacia formaĵo el trembrilaj kristaloj, ĝi troviĝis en la mezo de la speciala kaverno, kies vandoj estis apogataj per multaj fantaziaj kolonoj, kiuj estis formitaj per la kunkreskado de stalaktitoj kaj stalagmitoj – kiel

rezulto de la seninterrompa akvogutado dum jarcentoj. Sub la tegmento de la supraj volbaĵoj kunpakiĝis vastaj amasoj de vespertoj, miloj en unu amaso. La lumoj ĝenis la bestojn, centope ili flugis malsupren, kriĉante kaj sagante furioze al la kandeloj. Tom konis ties konduton kaj la danĝeron, kiu eliras de ili. Li kaptis manon de Becky kaj haste kuris kun ŝi en la unue atingeblan trairejon; kaj eĉ ne momenton tro frue, ĉar flugilbato estingis la lumon de Becky dum ŝi forlasis la halon. La vespertoj persekutis la infanojn dum sufiĉe longa distanco; sed la fuĝantoj ĵetiĝis en ĉiun novan trapasejon, kiu ofertiĝis, kaj fine ili liberigis sin de la danĝeraj bestaĉoj. Tom baldaŭ trovis subteran lagon, kiu tiom longe etendiĝis, ĝis kiam ĝi perdiĝis en la ombroj. Tom intencis esplori ties bordojn, sed li decidis, ke estas plej bone, se ili unue sidiĝu kaj ripozu dum iom da tempo. Nun, je la unua fojo, la profunda kvieto de la loko kvazaŭ metis sian fridan manon sur la spiritojn de la infanoj. Becky diris:

„Mi tute ne rimarkis, sed ŝajnas al mi, ke pasis longa tempo, de kiam ni aŭdis la voĉojn de aliaj.“

„Se oni pripensas tion, Becky, ni troviĝas

malproksime sub ili. Kaj mi ne scias, kiom malproksime norde, sude, oriente, aŭ kie ajn. Ni ne plu povas aŭdi ilin ĉi tie.“

Becky fariĝis eĉ pli maltrankvila.

„Mi demandas min, kiom longe ni jam estas ĉi tie malsupre, Tom. Ni prefere iru supren al ili.“

„Jes, mi konsentas, eble estos pli bone.“

„Ĉu vi trovos la vojon, Tom? Por mi LA TUTO estas nur kurbigita kaj konfuziga.“

„Mi pensas, ke mi povus trovi ĝin – sed konsideru la vespertojn. Se ili estingus niajn kandelojn, ni sidus en la kaptilo. Ni provu iri alian vojon, por ne devi preteriri ilin denove.“

„En ordo, sed mi esperas, ke ni ne perdiĝos. Tio estus terura!“ kaj poste la knabino ekstremis pro la penso pri la terura eblo.

Ili ekmarŝis sur irejo kaj silente trairis ĝin sur longa vojo, rigardante ĉe ĉiu nova vojkomenco, ĉu io estas konata je ĝia aspekto; sed ili ĉiuj estis fremdaj. Ĉiufoje, kiam Tom faris esploradon, Becky observis lian vizaĝon por vidi enkuraĝigan signon sur ĝi, kaj li diris ĉiufoje:

„Aĥ, estas en ordo. Ne estas la ĝusta vojo, sed ni baldaŭ trovos ĝin!“

Sed kun ĉiu malsukceso li esperis malpli, kaj baldaŭ li sekvis deflankiĝantajn larĝajn vojojn tute hazarde, kun la despera espero, ke li trovos fine ĝuste tiun vojon, kiun ili bezonas. Li diris eĉ tiam ankoraŭ, ke ĉio estas en ordo, sed lian koron premis tia granda plumba ŝarĝo, ke lia voĉo perdis ĉiun konvinkan forton kaj sonis tiel, kvazaŭ li dirus, ke ĉio estas perdita! Becky kroĉiĝis al li pro timo kaj streĉe provis reteni la larmojn, sed ili tamen ekfluis. Laste ŝi diris:

„Ho, Tom, ne zorgu vin pri la vespertoj, ni reiru sur tiu ĉi vojo! Ŝajne ni pli kaj pli devojiĝas.“

Tom haltis.

„Aŭskultu!“ li diris.

Regis profunda kvieto, la kvieto estis tiel profunda, ke eĉ iliaj spiroj estis klare aŭdeblaj. Tom vokis. La voko eĥis tra la vakaj irejoj kaj perdiĝis malproksime en sonoj, kiuj sonoritis kiel ondeto de moka ridado.

„Ho, ne ripetu tion, Tom, estas tiel hororige“, diris Becky.

„Estas hororige, sed mi prefere tamen faru, ĉar ili eble povus aŭdi nin, ĉu vi komprenas?“ Kaj li vokis denove.

La vorto „eble“ estis eĉ pli timiga kaj hororiga ol la fantomeca ridado, ĉar ĝi kvazaŭ prezentis svenantan esperon. La infanoj staris silente kaj aŭskultis, sed okazis nenio. Tom turniĝis subite al la dorsoflanko kaj rapidigis siajn paŝojn. Pasis nur malmulte da tempo, ĝis kiam certa ŝanceliĝemo en la konduto de Tom malkaŝis plian timigan fakton al Becky – ke li ne plu trovas la retrovojn!

„Ho, Tom, vi ne markis la vojon!“

„Becky, mi estis stultulo! Granda stultulo! Mi tute ne pensis pri tio, ke ni devos ankoraŭ reiri! Ne – mi ne povas trovi la vojon. Ĉio estas konfuziga.“

„Tom, Tom, ni estas perditaj! Ni estas perditaj! Ni neniam plu povos iri el ĉi tiu terura loko! Ho, kial ni nur foriris de la aliaj!“

Ŝi sinkis sur la grundon kaj eklarmis tiel freneze, ke Tom estis alarmita de la pensoj, ke ŝi povus morti aŭ perdi sian sanan menson. Li sidis apud ŝi kaj brakumis ŝin, ŝi kaŝis sian vizaĝon ĉe lia brusto, ŝi kroĉiĝis al li, ŝi tute translasis sin al sia terorigo kaj al senutilaj bedaŭroj, kaj la foraj eĥoj transformis ilin en mokridadon. Tom petis ŝin denove komenci esperi, kaj ŝi diris, ke ŝi ne kapablas tion. Tom komencis kulpigi kaj riproĉi sin mem, ĉar li metis ŝin en tiun mizeran situacion; tio havis pli bonan efikon. Ŝi diris, ke ŝi provos esperi denove, ke ŝi ekstaros kaj, ke ŝi iros kun li tien, kien li gvidos ŝin, sub la kondiĉo, ke li ne plu parolos tiel, ĉar li ne estas pli kulpigebla ol ŝi mem.

Tial ili daŭrigis sian vojon – sen celo – simple hazarde – ĉio, kion ili povis fari estis moviĝi. Dum

iom da tempo leviĝis denove espero – ne tial, ĉar ekzistis iu kaŭzo, sed ĉar estas la naturo de la espero revivigi sin, se ĝia fonto ne ĉesis ŝpruci pro tro granda aĝo aŭ pro tro da intimeco pri seniluziigoj.

Post momento Tom prenis la kandelon de Becky kaj estingis ĝin per blovado. Tiu ŝparemo klarigis multon! Ĝi ne bezonis vortojn, Becky komprenis kaj ŝia espero perdiĝis denove. Ŝi sciis, ke Tom havas tutan kandelon kaj tri aŭ kvar kandelajn pecojn en la poŝoj – kaj tamen li devis ŝpari lumon.

Iom post iom la laceco komencis pretendi siajn rajtojn. La infanoj provis ne atenti tion, ĉar estis terura penso sidiĝi, kvankam la tempo fariĝis tiom valorplena por iri en iu direkto, egale en kiu ajn, ĉar tio almenaŭ estus progreso kaj povus doni iujn deziratajn rezultojn. Sed sidado estus nur inviti la morton kaj mallongigi ĝian persekuton.

Fine la fragilaj membroj de Becky rifuzis porti ŝin plu. Ŝi sidiĝis. Tom ripozis kun ŝi, kaj ili interparolis pri la hejmo kaj la amikoj tie, kaj pri la komfortaj litoj kaj antaŭ ĉio alia pri la lumo! Becky ploris, kaj Tom pensis pri tio, kiel li povus konsoli ŝin, sed ĉiuj liaj kuraĝigoj fariĝis eluzitaj, kaj ili sonis sarkasme.

Becky estis tiom superfortita de laceco, ke ŝi ekdormemis kaj poste endormiĝis. Tom estis dankema. Li rigardis al ŝia laca vizaĝo kaj vidis, kiel ĝi fariĝis glata kaj natura sub la influo de agrablaj songoj; kaj iom post iom aperis rideto kaj restis tie. La paca vizaĝo efikis ankaŭ en la spirito de Tom pacige kaj sanige, kaj liaj pensoj formigris al pasintaj tempoj kaj revemaj memoroj. Dum li profundiĝis en primeditojn, Becky vekiĝis kun spirblova malgranda rido – sed tio tuj mortis sur ŝiaj lipoj, kaj sekvis ĝemo.

„Ho, Tom, se mi POVUS dormadi! Mi dezirus vekiĝi neniam plu! Ne, ne, Tom! Ne rigardu tiel! Mi ne diros tion denove.“

„Mi ĝojas, ke vi dormis, Becky, vi sentos nun, ke vi ripozis, kaj ni trovos la vojon eksteren.“

„Ni povas provi tion, Tom, sed mi vidis tian belan landon en mia songo. Mi pensas, ke ni iros tien.“

„Aŭ povas esti aŭ ne. Levu la kapon, Becky, ni serĉu plu.“

Ili leviĝis kaj migris plu, man-en-mane kaj sen espero. Ili provis taksi, dum kiom da tempo ili estas jam en la kaverna sistemo. Sed ĉion, kion ili sciis, estis, ke pasis ŝajne tagoj kaj semajnoj, kaj tamen estis ja klare, ke tio ne povas esti ĝusta, ĉar iliaj kandeloj ankoraŭ lumis. Longan tempon post tio – ili ne plu povis diri, kiom longe ili... Tom diris, ke ili devas iri atente kaj aŭskulti pro gutanta akvo, por ke ili trovu fonton. Baldaŭ ili trovis ĝin kaj Tom diris, ke estas tempo denove ripozi. Ambaŭ estis terure lacigitaj, sed Becky diris, ke ili povus iri ankoraŭ iom plu. Surprizis ŝin, ke li ne konsentis. Tion ŝi ne povis kompreni. Ili sidiĝis kaj Tom fiksas la kandelon per iom da argilo al la vando fronte de ili. Baldaŭ ili cerbumis denove, kaj neniu el ili diris ion dum certa tempo. Poste Becky rompita la silenton:

„Tom, mi estas tiom malsata!“

Tom prenis ion el sia poŝo.

„Ĉu vi memoras tion?“ li diris.

Becky preskaŭ ridetis.

„Estas nia nuptokuko, Tom.“

„Jes – mi dezirus, ke ĝi estus tiel granda kiel barelo, ĉar ĝi estas ĉio, kion ni havas.“

„Mi retenis ĝin de la pikniko por ni, por revii plu, Tom, laŭ la maniero de plenkreskintoj, kiuj faras tion kun la nuptokuko – sed ĝi estos nia lasta...“

Ŝi ne finis la frazon. Tom disdividis la kukon kaj Becky manĝis kun bona apetito, dum Tom nur ronĝadis sian duonon. Estis abunde da frida akvo por fini la festmanĝeton per ĝi.

Post certa tempo Becky sugestis, ke ili moviĝu denove. Tom silentis dum momento. Poste li diris:

„Becky, ĉu vi povus elteni tion, se mi dirus ion certan al vi?“

Becky paliĝis, sed ŝi diris, ke ŝi povus.

„Nu, en ordo, Becky, ni devas restadi ĉi tie, ĉar ni

havas ĉi tie akvon. Tiu peco da kandelo estas nia lasta!“

Becky ekploris kaj komencis vekrii. Tom provis ĉion, kion li povis fari por konsoli ŝin, sed evidente preskaŭ sen efiko. Laste Becky diris:

„Tom!“

„Jes, Becky, pri kio temas?“

„Ili konstatos, ke ni mankas kaj serĉos nin!“

„Jes, tion ili faros! Certe ili faros!“

„Eble ili jam nun serĉas nin, Tom.“

Jes, povus esti tiel, mi esperas, ke ili jam serĉas nin.“

„De kiam ili konstatis nian mankon?“

„Kiam ili revenis al la pramŝipo, mi supozas.“

„Tom, eble tiam estis jam malhele – ĉu ili do rimarkis, ke ni ne ĉeestas?“

„Mi ne scias. Sed egale, via patrino ja rimarkis, ke vi mankas, tuj tiam, kiam ili revenis hejmen.“

La timigita rigardo en la vizaĝo de Becky konsciigis al Tom, ke li eraris. Becky tiunokte ja ne estus reirinta hejmen! La infanoj eksilentis kaj fariĝis pripensemaj. La denova korpremiteco de Becky montris al Tom, ke ankaŭ ŝi havis la saman penson – ke la sabata mateno jam je duono estos pasinta antaŭ ol sinjorino Thatcher malkovros, ke Becky ne estas ĉe sinjorino Harper.

La infanoj fikse rigardis sian kandelopecon kaj observis, kiel ĝi lante kaj senkompate forbrulas; ili vidis kiel la mallonga meĉo restis fine sola; ili vidis kiel la malforta flamo ekflagris kaj refalis, kiel ĝi grimpis supren kun la mallarĝa fumkolono, kiel ĝi dum momento tenis sin tie kaj poste – regis la hororo de la tenebro!

Kiom longe daŭris, ĝis kiam Becky fine konsciigis, ke

ŝi ploras en la brakoj de Tom, ambaŭ ne povis diri. Ĉion, kion ili sciis, estis tio, ke ili vekigis nur post tre longa tempo el la rigideco de profunda dormo. Ili resumis denove sian desperan situacion. Tom diris, ke aktuale povus esti dimanĉo – eble eĉ lundo. Li provis paroligi la amikinon, sed ŝiaj zorgoj ŝargis ŝin tro, ŝi perdis sian esperon tute. Tom diris, ke ili certe jam delonge konstatis, ke ili mankas, kaj sendube la serĉado estos daŭrigata. Li volis voki por ke eble iu venu al ili. Li provis, sed en la malhelo la foraj eĥoj sonadis tiel insidaj, ke ili ne plu provis tion.

La horoj pasis vane kaj denove turmentis la kaptitojn malsato. Porcio de la kukduono de Tom fine postrestis, ili disdividis kaj manĝis ĝin. Sed ili estis ŝajne pli malsataj ol antaŭe. La malgranda resteto de la manĝo vekis nur la deziron pri pli da manĝo.

Post iom da tempo Tom diris:

„Ŝŝ! Ĉu vi aŭdis tion?“

Ambaŭ retenis sian spiron kaj aŭskultis. Jen sono, malforta voko el granda foro. Tom tuj respondis la sonon, kaj gvidante permane Becky-on, li komencis

palpi sin antaŭen en la irejo, en tiu direkto, el kiu aŭdeblis la voko. Poste li aŭskultis denove. Denove la sono aŭdeblis, evidente iomete pli proksime.

„Jen ili!“ diris Tom. Ili alvenas ĉi tien! Ek, Becky, nun ĉio estas en ordo!“

La ĝojo de la kaptitoj estis preskaŭ senlima. Ilia rapideco estis tamen lanta, ĉar falkaptiloj estis kutima minaco tie kaj ĉar oni devis atenti pro ili. Baldaŭ ili atingis tian lokon kaj devis halti. Eble ĝi estis profunda metron aŭ tridek. Ĉiukaze ne eblis transpaŝi ĝin. Tom kuŝiĝis sur sian ventron kaj etendis la manojn tiom longe, kiom eblis, sed ne estis grundo. Ili devas stari tie kaj atendi, ĝis kiam la serĉantoj alvenos tien. Ili aŭskultis; evidente la foraj vokoj eĉ malproksimiĝis! Post minuto aŭ du ili tute ne plu aŭdeblis. Kia kordisŝira mizero! Tom kriis, ĝis kiam lia voĉo raŭkiĝis, sed tio ne estis utila. Li parolis esperige al Becky. Sed eĉ post longega maltrankvila aŭskultado neniuj sonoj denove aŭdeblis.

La infanoj palpis sin malantaŭen al la fonto. La tempo pasis treniĝe lante. Ili dormis denove kaj revekiĝis malsate kaj veanime. Tom supozis, ke jam devas esti mardo.

Nun li ekhavis novan ideon. Estis kelkaj proksimaj flankirejoj. Estus pli bone esplori kelkajn el ili anstataŭ pasigi la peze ŝargantan tempon per pigrado. Li prenis drakoŝnuron el sia poŝo, ligis ĝin al roka elstaraĵo, kaj li kaj Becky ekiris. Tom gvidis ŝin, disruligante la ŝnuron dum li palpis sin antaŭen. Post dudek paŝoj la irejo finiĝis ĉe abismo. Tom surgenuiĝis kaj palpis malsupren kaj poste permane ĉirkaŭ angulon kaj tiom longe, kiom li povis fari tion facile, li provis etendi sin ankoraŭ iom pli dekstren, kaj en tiu momento en distanco ne pli granda ol dudek metroj aperis homa mano tenanta kandelon etendita el la malantaŭo de roko! Tom elpuŝis ĝojan krion, kaj tuj post la mano sekvis ties korpo, kiu apartenis al – Indiĝen-Joe! Tom estis kvazaŭ paralizita, li ne povis moviĝi. Li estis treege dankema en la sekva momento, kiam li vidis, ke la „hispano“ skuis la polvon de la piedoj kaj malaperis. Tom miris, ke Joe ne ekkonis lian voĉon kaj ne venis al li por murdi lin pro la atesto antaŭ la tribunalo. Sed la eĥoj certe fremdigis lian voĉon. Sendube, tiel estis, li rezonis. Pro timo ĉiu muskolo en lia korpo estis tute malforta. Li diris al si mem, ke tiukaze, se li havus la forton reiri al la fonto, li restadus tie, kaj nenio povus logi lin riski renkonti Indiĝen-Joe-on ankoraŭfoje. Sed li memgardis rakonti al Becky, kion li vidis. Li rakontis al ŝi, ke li vokis nur bonfide.

Sed malsato kaj despero je daŭro estas pli fortaj ol timo. Denova senfine longa teda atendado ĉe la fonto kaj plia longa dormo ŝanĝis la situacion. La infanoj vekigis turmentate pro furioza malsato. Tom supozis, ke devas esti jam merkredo, jaŭdo, vendredo aŭ sabato, kaj ke la serĉado estas finita. Li proponis esplori alian irejon. Li estis preta riski Indiĝen-Joe-on kaj ĉiujn aliajn terorojn. Sed Becky estis tre malforta. Ŝi sinkis en mornan apation kaj ne eblis levi ŝin. Ŝi diris, ke ŝi atendos tie, kie ŝi estas, kaj mortos – kaj, ke tio ne plu daŭros longe. Ŝi diris, ke Tom ekiru kun sia drakoŝnuro kaj esploru, se li havas la intencon; sed ŝi petegis lin krome, ke li ĉiam denove revenu por paroli al ŝi; kaj li devis promesi, ke tiam, kiam la terura tempo venos, li staros ĉe ŝi kaj tenos ŝin ĉemane, ĝis ĉio estos finita.

Tom kisis ŝin, kun sufoka sento en la gorĝo, kaj paradis per konfido pri tio, ke li trovos la serĉantojn aŭ elirejon de la kaverno. Poste li prenis la drakoŝnuron kaj palpis sin sur siaj manoj kaj piedoj antaŭen, turmentate de malsato kaj kvazaŭ malsana pro divenoj pri la pereco.

Ĉapitro 32

La MARDA posttagmezo venis kaj cedis al la krepusko. La urbeto Sankt-Peterburgo ankoraŭ funebris. La perditaj infanoj ne estis trovitaj. Publikaj predikoj okazis por ili kaj estis parolataj tre multaj privataj preĝoj, kiuj enhavis la tutan koron de la petantoj; sed ankoraŭ ne venis ĝojigaj mesaĝoj el la kaverno. La plimulto de la serĉantoj rezignis pri plua serĉado kaj reiris al siaj ĉiutagaj okupoj, dirante, ke estas tute klare, ke la infanoj estos troveblaj neniam. Sinjoro Thatcher tre malsanis, kaj dum la plej ofta tempo deliris pro febro. La homoj diris, ke rompigas la koron, kiam ŝi vokas sian infanon kaj levas la kapon kaj aŭskultas dum tuta minuto kaj poste rekuŝiĝas lacigite kaj kun ĝemo. Onklino Polly sinkis en daŭran melankolion, kaj ŝia griza hararo fariĝis preskaŭ blanka. La urbeto marde nokte enlitiĝis malgaje kaj kvazaŭ forlasita.

Sed meze de la nokto ektintis sovaĝa sonorado de la urbetaj sonoriloj, kaj tuj plenigis sin la stratoj per svarmoj de furiozaj homoj duone vestitaj, kiuj vokis: „Elvenu! Elvenu! Ili estas trovitaj! Ili estas trovitaj!“ Patoj kaj kornoj aldoniĝis al la bruego, la loĝantaro

amasiĝis kaj moviĝis al la rivero, ili renkontis la infanojn, kiuj troviĝis en ĉaro tirata de vokantaj viroj, kiun ĉirkaŭis la homoj, kiuj akompanis la tutan festprocesion hejmen, impone marŝantaj sur la ĉefstrato kun tondra jubilo kaj huraoj!

La urbeto estis hele iluminata; neniu denove iris en la liton; estis la plej grandioza nokto, kiun vidis iam ajn la urbeto. Dum la unua duono de horo – la procesio de la urbetaj loĝantoj iris laŭvice tra la domo de juĝisto Thatcher, brakumis la savitojn kaj kisis ilin, ili premis la salutmanon de sinjorino Thatcher, provis paroli al ŝi, sed ne povis – kaj drivis kun larmopluvo el la domo.

La beateco de onklino Polly estis perfekta, kaj preskaŭ same tiu de sinjorino Thatcher, sed tute perfekta ĝi estus tamen nur en tiu momento, kiam la heroldo estus transdoninta la grandan novaĵon al ŝia edzo en la kaverno. Tom kuŝis sur sofo ĉirkaŭata de scivolema aŭskultantaro kaj rakontis la historion pri la mirinda aventuro. Li aldonis ankoraŭ abunde frapajn ornamajn detalojn; kaj finis sian historion per tio, ke li rakontis, kiel li postlasis Becky-on kaj ekpaŝis por esplora ekspedicio, ke li sekvis du trapasejojn tiom longe, kiom lia drakoŝnuro estis longa, ke li sekvis poste trian ĝis la tuta etendiĝo de

la drakoŝnuro kaj jam volis turniĝi dorsen por retroiri – kiam li ekvidis malproksiman lumpunkton, kiu aspektis kiel taglumo, ke li lasis fali la ŝnuron kaj palpis sin al la lumo, ke li puŝis sian kapon kaj la ŝultrojn tra la malgranda truo kaj vidis, kiel la larĝa Misisipo pretortentas! Ke tiukaze, se tio estus okazinta nokte, li tute ne estus vidinta la taglumon kaj neniam esplorinta tiun trapasejon! Li rakontis, ke li reiris al Becky kaj sciigis al ŝi la bonan novaĵon, ke ŝi diris al li, ke li ne malkvietigu ŝin per tia afero, ĉar ŝi estas lacigita kaj ĉar ŝi scias, ke ŝi baldaŭ mortos, kaj ke ŝi ankaŭ deziras tion. Li rakontis, ke li penis konvinki ŝin, kaj ke ŝi poste preskaŭ mortis pro ĝojo, kiam ŝi palpis sin al la loko, kie ŝi ekvidis la bluan taglumon en la truo. Ke li puŝiĝis tra la aperturo eksteren kaj poste helpis ŝin elrampi, ke poste ili sidis tie kaj ploris pro ĝojo, kaj ke tiam preterveturis kelkaj viroj en boateto, ke li vokegis al ili kaj rakontis al la viroj pri la situacio kaj pri la propra elmalsatigita stato, ke ili unue ne volis akcepti la sovaĝan rakonton, ĉar ambaŭ, kiel ili diris „estas kvin mejlojn sude de la apudrivera valo, en kiu troviĝas la kaverno“ — poste ili surboatigis la infanojn, remis al domo, donis al ili vespermanĝon, restigadis ilin ĝis du aŭ tri horoj post ekmalheliĝo kaj tiam akompanis ilin hejmen.

Ankoraŭ antaŭ la matena krepusko oni trovis en la kaverno juĝiston Thatcher kaj la lastajn malmultajn serĉantojn pere de la fadenbuloj, kiujn ili alfiksis malantaŭ si. Kaj oni informis ilin pri la gravaj novaĵoj.

Tri tagoj kaj noktoj da laborego kaj malsato ne estis deskueblaj per unu fojo, kiel Tom kaj Becky baldaŭ spertis. De merkredo ĝis ĵaŭdo ili kuŝis lite kvazaŭ malsanuloj, kaj ŝajnis, ke ili fariĝis pli kaj pli lacaj kaj pli elĉerpitaj dum la tuta tempo. Tom jaŭde ellitiĝis dum iom da tempo, vendrede li estis ekstere en la urbeto kaj preskaŭ dum la tuta sabato; sed Becky ne iris el sia ĉambro ĝis dimanĉo, kaj tiam ŝi aspektis kvazaŭ ŝi postvivis gravan malsanon.

Tom eksciis pri la malsaniĝo de Huck kaj iris al li por vidi lin je vendredo, sed tiutage oni ne lasis lin en la litĉambro de la malsanulo, nek sabate nek dimanĉe. Poste oni enlasis lin ĉiutage al li, sed la vidvino avertis lin, ke li ankoraŭ tenu la buŝon fermita pri sia aventuro kaj ankaŭ ne parolu pri alia ekscita temo. Ŝi staris ĉe ili, por kontroli, ke li obeas. Tom eksciis hejme pri la okazaĵoj sur la Cardiff-monteto; krome ankaŭ, ke oni eventuale trovis la kadavron de la „ĉifonita viro“ en la rivero proksime de la prama albordiĝejo. Li eble dronis, kiam li provis eskapi.

Ĉirkaŭ du semajnojn post sia savo el la kaverno li ekiris por viziti la amikon Huck, kiu jam akiris sufiĉe da forto por elteni ankaŭ ekscitajn sciigojn. Kaj Tom sciis ion, kio interesos lin, li pensis. La domo de juĝisto Thatcher troviĝis survoje de Tom, kaj tial li haltis por viziti la amikinon Becky. La juĝisto kaj kelkaj el ties amikoj implikis Tom-on en interparoladon, kaj iu ironie demandis lin, ĉu li denove estus preta iri en la kavernon. Tom diris, ke jes, kaj ke li ne havus ion kontraŭ tio. La juĝisto diris:

„Nu, vi certe ne estas la ununura, Tom. Mi ne dubas pri tio, eĉ ne iomete. Sed kontraŭ tio ni antaŭzorgis. Neniu iam ajn denove perdiĝos en la kaverno.“

„Kial?“

„Ĉar antaŭ du semajnoj mi ordonis garni la grandan pordon per kaldronfero, krome mi ordonis sekurigi ĝin per tri seruroj – kaj la ŝlosilojn havas mi.“

Tom fariĝis pala kiel littuko.

„Kio okazis, knabo?! Iu ekkuru! Alportu glason da akvo!“

La akvon oni alportis kaj verŝis ĝin sur la vizaĝon de Tom.

„Ha, nun vi denove estas en ordo. Pri kio ĵus temis, Tom?“

„Ve, sinjoro juĝisto, Indiĝen-Joe estas en la kaverno!“

Ĉapitro 33

Dum kelkaj minutoj la novaĵo jam disvastiĝis kaj dekdu boatetoj ŝarĝitaj per viroj estis sur la vojo al la Douglas-kaverno, kaj baldaŭ sekvis la pramŝipo plenigita per multaj pasaĝeroj. Tom Sawyer estis en la boato, kiu veturigis ankaŭ la juĝiston Thatcher.

Kiam la pordo de la kaverno estis malŝlosita, prezentiĝis en la malhela duonlumo de la loko mizera vidaĵo. Indiĝen-Joe kuŝis sur la roka grundo, morta,

kun la vizaĝo proksime de la pordofendo, kvazaŭ liaj sopiremaj okuloj estus fiksitaj ĝis la lasta momento al la lumo kaj jubilo de la libera mondo ekstere. Tom estis tuŝita, ĉar li sciis pro propra sperto, kiel suferis tiu krimulo. Spite al tiu kompatema tuŝiteco, li tamen sentis nun senliman plifaciligon kaj sekurecon, kio malkaŝiĝis al li tiom konscie, kiom li antaŭe ne komprenis tion, kia peza ŝarĝo de timo metiĝis sur lin ekde la tago, kiam li levis sian voĉon kontraŭ la sangosoifa pario.

La Bowie-tranĉilo de Indiĝen-Joe kuŝis apud li, la klingo estis rompita en du pecojn. La granda suba trabo de la pordo estis traborita kaj trahakita en monotona laboro; cetere estis senutila laboro, ĉar la natura roko ekstere formis sojlon, kaj kontraŭ tiu dura materialo la tranĉilo ne havis efikon. Damaĝo, kiu ekestis, estis nur tiu de la tranĉilo mem. Sed eĉ, se ne estus estinta ŝtona baro, la laboro tamen estus vana. Eĉ se Indiĝen-Joe estus foriginta la trabon tute, li ne povis ŝovi sian korpon sub la pordon, kaj li sciis tion. Tial li hakadis la trabolignon nur por fari ion – por tiel pasigi la lacigan tempon – kaj por okupi siajn torturatajn sencojn. Kutime en la rokofendoj de tiu antaŭĉambro troviĝis kelkaj kandelaj sebopecoj postlasitaj de turistoj, sed tie estis tiam neniu plu. La enfermito kunkolektis kaj manĝis ilin. Krome li

sukcesis kapti kelkajn vespertojn, kaj ankaŭ ilin li manĝis kaj postlasis nur ties ungojn. La kompatinda malbonŝanculo mortis pro malsato. Je proksima loko dum eraoj lante kreskis supren de la grundo stalagmito formita per gutantaj akvogutoj de la supra stalaktito. La enfermito disrompis la stalagmiton kaj sur la stumpo li metis ŝtonon, en kiun li skrapis malprofundan kavon, por tie kapti la rarajn gutojn, kiuj falis ĉiun trian minuton kun la malgaja akurateco de tiktakanta horloĝo – proksimume kuleretpleno dum dudek kvar horoj. La gutoj falis jam, kiam la piramidoj estis ankoraŭ novaj; kiam falis Trojo; kiam oni metis la fundamentojn de Romo, kiam oni najlis Jesuon Kriston al kruco; kiam Vilhelmo la Konkerulo kreis la britlandan imperion; kiam velis Kolombo; kiam la masakro de Leksingtono estis „novaĵo“. Ili falas ankoraŭ nun; ili falos plu tiam, kiam estos ĉiuj tiuj okazaĵoj sinkintaj en la posttagmezon kaj la vesperan krepuskon de l' tradicio kaj voritaj de la tenebra nokto de l' forgeso. Ĉu ĉio havas intencon kaj celon? Ĉu la gutoj pacience falis dum kvinmil jaroj por esti pretaj por la bezono de tiu flirtanta homa insekto? Kaj ĉu ili devos plenumi en la sekvaj dekmil jaroj plian gravan taskon? Ne gravas. Pasis jam tre multaj jaroj, de kiam la malfeliĉa bastardo skrapis kavon el la ŝtono por kapti la netakseble valoregajn gutojn, sed ĝis tiu ĉi aktuala tago la turistoj gapas plej longe al tiu

kortuŝa ŝtono kaj la lante gutanta akvo, se ili vizitas la miraklojn de la Douglas-kaverno. „La kaliko de Indiĝen-Joe“ estas la unuaranga el la listo de mirakloj; eĉ „Palaco de Aladino“ ne povas superatuti ĝin.

Oni entombigis Indiĝen-Joe-on proksime de la enirejo de la kaverno. La homoj venis gregope per boatoj kaj ĉevalĉaroj el la urboj kaj el ĉiuj bienoj kaj vilaĝetoj de la regiono, el radiuso de sep mejloj; ili havis siajn infanojn ĉe si kaj ĉiujn specojn de provizaĵoj; kaj ili konfesis, ke ili havis preskaŭ tiel kontentigan tempon dum la funebro, kiel ili estus havintaj dum pendumado.

Tiu entombigo finigis la pluan kreskon de alia okazaĵo – la petskribadon pri indulgo por Indiĝen-Joe. La petskribon subskribis multaj personoj; oni aranĝis multajn larmriĉajn kaj elokventajn kunvenojn. Komitato de eksterordinare dolĉaj inoj estis elektita iri al la guberniestro por veplendadi antaŭ li kaj por petegi lin esti kompatema azeno kaj trakti sian devon per piedoj. Pri Indiĝen-Joe oni diris, ke li murdis kvin civitanojn de la urbeto, sed, ĉu gravas? Se li estus Satano persone, tamen troviĝus sufiĉe da senfortuloj pretaj por subskribi per sia nomo indulgo-petskribon kaj verŝi sur ĝin ploron el

siaj eterne difektaj kaj likantaj akvodistribuejoj.

Je la mateno post la funebro Tom kaj Huck retiriĝis al privata loko por havi gravan interparoladon. Huck intertempe eksciis de la kimro ĉion pri la aventuro de Tom kaj la vidvino Douglas, sed Tom diris, ke li pensas, ke estas unu afero, kiun ili ne rakontis al li, kaj ke li nun kun li intencas interparoli tiun aferon. La vizaĝo de Huck morniĝis. Li diris:

„Mi jam scias, kio estas. Vi iris al n-ro 2 kaj trovis nenion krom la viskio. Neniu diris al mi, ke estis vi, sed mi tuj divenis, ke nur vi povas esti tiu, tuj kiam mi aŭdis pri la viskinegoco; kaj mi sciis ankaŭ, ke vi ne havas la monon, ĉar vi tion al mi iel estus sciiginta, kaj vi rakontus tion al mi, eĉ se vi silentus pri tio al ĉiu alia. Tom, io supozigis min ĉiam, ke ni neniam povos firmteni la predon.“

„Kial, Huck? Mi ja neniam fajfis ion pri la tavernposedanto. Vi ja scias, ke lia taverno estis en ordo je tiu sabato, kiam mi iris al la pikniko. Ĉu vi ne memoras, ke vi tie devis gardostari en tiu nokto?“

„Ho, jes! Ŝajnas nur tiel, kvazaŭ tio okazis jam antaŭ

jaro. Estis ĝuste en tiu nokto, kiam mi sekvis
Indiĝen-Joe-on al la vidvino.“

„VI sekvis lin?“

„Jes – sed silentu pri tio! Mi supozas, ke Indiĝen-Joe
postlasis ĉi tie ankoraŭ kelkajn amikojn, kaj mi ne
volas, ke ili fariĝu koleraj pri mi kaj traktu min per
fiaj trukoj. Sen mi li nun estus tute sen difekto en
Teksaso.“

Poste Huck rakontis sian tutan aventuron konfide al
Tom, kiu antaŭe aŭskultis nur la parton pri la kimro.

„En ordo“, diris Huck, baldaŭ reveninte al la ĉeftemo,
„kiu ajn pinĉprenis la viskion en n-ro 2, tiu
pinĉprenis ankaŭ la monon, mi supozas – ĉiukaze ĝi
estas perdita por ni.“

„Huck, la mono neniam estis en n-ro 2!“

„Kio?“ Huck esploris fervore la vizaĝon de la
kamarado. „Ĉu vi denove trovis la spuron al la mono,
Tom?“

„Huck, ĝi estas en la kaverno!“

La okuloj de Huck ekflamegis.

„Diru tion denove, Tom.“

„La mono estas en la kaverno!“

„Tom – diru kiel honesta indiĝeno – ĉu vi ŝercas? Ĉu vi parolas serioze?“

„Mi seriozas, Huck – mi tiom seriozas, kiom ankoraŭ neniam dum mia tuta antaŭa vivo. Ĉu vi eniros tien kun mi kaj helpos eligi ĝin?“

„Mi vetas, ke mi volas! Mi volus, se ni povus lumigi la vojon tien kaj ne povus perdiĝi.“

„Huck, ni povos fari tion sen la plej eta ĉagreneto en la mondo.“

„Ege bonege! Kio instigas vin pensi, ke la mono...”

„Huck, atendu, ĝis kiam ni enestos tie. Se ni ne trovos ĝin, mi konsentos, ke vi ricevos mian tamburon aŭ ĉiun alian aĵon, kiun mi havas en la mondo. Mi ĵuras!”

„En ordo — jen surprizo. Kiam ni ekiros?”

„Tuj nun, se vi volas, ĉu vi estas sufiĉe forta?”

„Ĉu la kavernvojo tien estas longa? Mi denove surpiedas, sed dum mallonga tempo, du aŭ tri tagojn, sed mejlon mi povus migri, Tom — almenaŭ mi pensas, ke mi povus.”

„Estas ĉirkaŭ kvin mejloj laŭ la vojo, kiun ĉiuj iras, krom mi, Huck, ĉar nur mi konas vojon, kiu estas multe malpli longa. Huck, mi veturigos vin rekte tien sur boateto. Mi drivigos la boateton al tie kaj mi retrovoje remos tute sola. Vi eĉ ne devos kurbigi manon.”

„Ni tuj startu, Tom.“

„En ordo. Ni bezonas iom da pano kaj viando, kaj niajn pipojn kaj unu aŭ du saketojn, kaj unu aŭ du drakoŝnuretojn kaj kelkajn el tiuj dentvicaj aĵoj, kiujn oni nomas Lucifer-alumetojn. Mi diras al vi, multfoje mi deziris, ke mi havu kelkajn, kiam mi enestis tie antaŭe.“

Iom post tagmezo la knaboj prunteprenis boateton de iu, kiu ĝuste ne ĉeestis, kaj tuj survojiĝis. Kelkajn mejlojn sude de la kaverno diris Tom:

Jen la truko, la tuta vojo malsupren de la kaverno aspektas simile – neniuj domoj, neniuj lignejoj, ĉie la sama vepro. Sed, ĉu vi vidas tie supre la blankan loketon, kie okazis terglito? Jen unu el miaj memorigaj signoj. Ni albordiĝu nun.“

Ili albordigis la boateton.

„Nu, Huck, tie, kie ni staras, ni povus tuŝi la truon per fiŝkapta vergo. Provu trovi ĝin.“

Huck serĉadis ĉie, sed trovis nenion. Tom marŝis fiere en densan vepran areton el Sumaĥ-arbustoj kaj diris:

„Jen ĝi! Rigardu al ĝi, estas la plej fajna truo en la tuta lando. Sed silentu pri tio. Jam delonge mi volas esti rabisto, sed mi sciis, ke mi bezonas por tio lokon kiel ĉi tiun. Sed kie trovi tian? Jen la problemo. Nun ni havas ĝin, kaj ni tenos ĝin sekreta. Nur Joe Harper kaj Ben Rogers rajtos eniri – ĉar, kompreneble, ni devos havi bandon, alikaze ĉio estus tute sen stilo. Tom Sawyer-bando – tio sonas grandioza, ĉu ne, Huck?“

„Okej, sonas bone, Tom. Kaj kiun ni prirabos?“

„Ho, preskaŭ ĉiun. Ni embuskos homojn – jen la plej ofta metodo.“

„Kaj mortigos ilin, ĉu?“

„Ne, ne ĉiam. Ni metos ilin en la kavernon, ĝis kiam ili kunhavas la elaĉetsumon.“

„Kio estas elaĉetsumo?“

„Mono. Oni devigas ilin, ke ili kunskrapu ĉiun monon, kiun ili havas, de amikoj ktp. Kaj se oni estos reteninta ilin dum jaro ĉe si kaj la mono ne estos kunskrapita, oni murdos ilin. Jen la kutima vojo. Nur inojn oni ne mortigas. Oni enkarcerigas ilin, sed ne murdas. Ili estas ĉiam lindaj kaj riĉaj kaj terure timigitaj. Oni forprenas iliajn horloĝojn kaj aliajn aĵojn, sed oni ĉiam demetas la ĉapelon antaŭ ili kaj parolas ĝentile al ili. Neniu estas tiel ĝentila, kiel rabisto – tion vi povas legi en libroj. Nu, kaj iam la inoj enamiĝos en onin, kaj kiam ili estis en kaverno dum semajno aŭ du semajnoj ili ĉesos plori, kaj poste oni tute ne plu povos eligi ilin. Se vi ilin elpelus, ili turniĝus sur kalkanumo kaj revenus. Tiel legeblas en ĉiuj ĉi libroj.“

„Ha, tio estas mojosa, Tom. Mi pensas, ke tio estas pli bona ol esti pirato.“

„Jes, kelkmaniere estas pli bone, ĉar oni estas pli proksime al la hejmo kaj al la cirko ktp.“

Intertempe ĉio estis preta kaj la knaboj grimpis en la

truon, Tom kiel la unua. Ili pene moviĝis ĝis la fino de la trairejo, poste ili fiksis siajn drakoŝnurojn interligitajn per nodoj, kaj moviĝis plu. Post kelkaj paŝoj ili atingis la fonton, kaj Tom sentis kiel iras tremado tra lia tuta korpo. Li montris al Huck la restaĵon de la kandela peco, kiu estis fiksitaj per argila bulo sur la roka vando, kaj li rakontis, kiel Becky kaj li kune observis la flameton dum ties lasta flagrado kaj estingiĝo.

La knaboj nun komencis interparoli flustrante, ĉar la kvieto kaj la malhelo de la loko ŝargis iliajn spiritojn. Ili daŭrigis sian iradon, kaj baldaŭ atingis kaj eniris la alian trapasejon, ĝis kiam ili alvenis la „abision“. En la kandelolumo ili vidis, ke ĝi ne estas efektiva abismo, sed nur kruta argiladeklivo, kiu kondukas ok aŭ dek metrojn pli profunden. Tom flustris:

„Nun mi montros al vi la sekvan, Huck.“

Li tenis sian kandelon super si kaj diris:

„Rigardu foje ĉirkaŭ la angulon, tiom malproksime, kiom vi povas. Ĉu vi vidas ion? Tie transe sur la granda roko – pentrita per kandela fumo?

„Tom, tio estas KRUCO!“

„Nu, kaj kie estas nun via numero 2? *Sub la kruco*, ĉu ne? Ĝuste tie mi vidis Indiĝen-Joe-on, kiel li tenis alte sian kandelon, Huck!“

Huck gapis dum certa tempo al la mistika signo kaj poste li diris kun tremanta voĉo:

„Tom, ni foriĝu de ĉi tie!“

„Kio! Kaj la trezoron ni lasu ĉi tie, ĉu?“

„Jes, ni lasu ĝin. La spirito de Indiĝen-Joe fantomadas ĉi tie, certe.“

„Ne, ĝi ne farus tion, Huck, ĝi ne farus. Ĝi hantus la lokon, kie Indiĝen-Joe mortis – do, malproksime, ĉe la elirejo de la kaverno – kvin mejlojn for de ĉi tie.“

„Ne, Tom, tio ne estas ĝusta. Ĝi hantas la lokon ĉirkaŭ la mono. Mi scias kiel fantomoj kondutas, kaj

ankaŭ vi.“

Tom ektimis, ke Huck pravas. Duboj kolektiĝis en lia menso. Sed baldaŭ li ekhavis ideon:

„He, Huck, kiaj stultuloj ni estas! La spirito de Indiĝen-Joe ja ne hantas lokon, kie estas kruco!“

La argumento estis konvinka kaj efikis senpere.

„Tion mi ne pripensis, Tom. Sed tiel estas. Jen nia bonŝanco, la kruco. Mi pensas, ke ni nun tie grimpu malsupren kaj serĉu la keston.“

Tom ekiris kiel unua kaj postlasis krudajn ŝtupojn en la argila deklivo, kiam li descendis. Huck sekvis lin. Kvar larĝaj irejoj debranĉiĝis de la malvasta kaverno, en kiu troviĝis la granda roko. La knaboj esploris tri el ili sen sukceso. En tiu, kiu estis plej proksima al la bazo de la roko, ili trovis niĉon malsupre kovritan de littukoj kaj malnovan ŝelkon, dikan haŭton de lardo kaj la zorgeme prironĝitajn ostojn de du aŭ tri kortbirdoj. Sed monokesto tie ne estis. La buboj ratis kaj denove ratis la lokon, sed vane. Tom

objctis:

„Li diris, ke SUB la kruco. Jen tio, kio estas plej simila al io, kio estas sub la kruco. Sub la roko mem ĝi ja ne povas esti, ĉar la roko troviĝas firme sur la grundo.“

Ili ankoraŭfoje traserĉis ĉion kaj poste sidiĝis senkuraĝigite. Huck ne plu havis ideon. Post certa tempo diris Tom:

„Rigardu foje, Huck, tie estas piedpremaĵoj kaj iom da kandela sebo sur la argilo, sur unu flanko de la roko, sed ne sur la aliaj flankoj. Nu, kial? Mi vetas, ke la mono ESTAS sub la roko. Mi foje subfosos ĝin argile.“

„Tio ne estas malbona ideo, Tom!“ diris Huck vigle.

Tom subite eltiris sian „aŭtentikan Barlow-tranĉilon“ kaj li ne fosis profunde eĉ dek centimetrojn, kiam li jam puŝis sur lignon.

„He, Huck, ĉu vi aŭdas tion?“

Huck ekkomencis fosi kaj skrapi la argilon. Baldaŭ ili malkovris kaj forigis kelkajn tabulojn. Ili malkovris naturan fendon, kiu kondukis sub la rokon. Tom engrimpis kaj lumis per sia kandelo tiel sub la rokon, kiel li povis, sed li diris, ke li ne povas vidi la finon de la fendo. Li proponis esplori ĝin. Li kliniĝis kaj iris plu; la malvasta irejo iom post iom kondukis pli malsupren. Li sekvis la vojkurbiĝojn, unue dekstren, poste maldekstren, kun Huck je ties kalkanoj. Tom turniĝis heziteme al mallonga vojkurbiĝo kaj vokis:

„Dio mia! Huck, rigardu!“

Estis la trezorkesto, tute certe, okupanta komfortan malgrandan groton, kune kun malgranda pulvora bareleto, paro da fusiloj en ledaj ingoj, du aŭ tri mokasenparoj, ledozono kaj kelkaj diversaj forĵetindaĵoj, kiuj estis tute malsekigitaj de falintaj akvogutoj.

„Nun ni havas ĝin lastfine!“ diris Huck, trafosante per siaj manoj la malheliĝintajn monerojn. „Ho, nun ni estas riĉaj, Tom!“

„Huck, mi ĉiam supozis, ke ni posedos ĝin. Tio estas preskaŭ tro neimagebla, sed nun ni havas ĝin, tute certe! Tamen, ni ĉi tie ne konduku kiel frenezuloj. Ni eltrenu ĝin de ĉi tie. Lasu min foje provi levi la keston.“

La kesto pezis ĉirkaŭ kvindek pundojn. Tom tre pene kapablis levi ĝin, sed ne povis ĝin porti oportune.

„Tion mi jam supozis“, li diris; ILI portis ĝin tiel, kvazaŭ ĝi estus peza, je tiu certa tago en la hantata domo. Mi rimarkis tion. Mi pensas, ke estis ĝuste kunpreni la malgrandajn saketojn.“

La mono estis baldaŭ pakita en la saketojn kaj la knaboj portis ilin al la krucroko.

„Nun ni ankoraŭ elprenu la fusilojn kaj la aliajn aĵojn“, diris Huck.

„Ne, Huck – lasu ilin tie, tiuj estos la decida truko, kiam ni estos rabistoj. Ni konservos ilin tie dum la tuta tempo, kaj ni ankaŭ tie festos niajn orgiojn. Estas tre komforta loko por orgioj.“

„Kio estas orgioj?“

„Mi ne scias. Sed rabistoj ĉiam festas orgiojn, kaj kompreneble ankaŭ ni devos fari tion. Ek do, Huck, ni estas ĉi tie jam dum longa tempo. Fariĝis jam malfrue, mi supozas. Krome mi estas malsata. Ni manĝos kaj fumos, kiam ni estos ĉe la boateto.“

Baldaŭ ili aperis en la Sumaĥ-vepro kaj ĉirkaŭrigardis memgarde, ili konstatis, ke ne ekzistas danĝero je la bordo, kaj baldaŭ ili manĝis kaj fumis en la boateto. Kiam la suno kliniĝis al la horizonto, ili depuŝiĝis kaj survojiĝis hejmen. Tom remis laŭ la bordo dum la longa krepusko kaj gaje interparolis kun Huck, kaj kiam jam malhelis, li albordigis la boateton.

„Atentu foje, Huck“, diris Tom, „ni kaŝos la monon en la subtegmento de la vidvina lignoremizo, kaj mi venos morgaŭ matene kaj ni kalkulos kaj disdividos ĝin, kaj poste ni serĉos lokon en la arbaro, kie ĝi estos sekura. Vi kuŝiĝos ĉi tie kaj gardos, ĝis mi estos alveturinta la malgrandan manĉareton de Benny Taylor. Dum malpli ol minuto mi estos for.“

Li malaperis kaj baldaŭ revenis kun la ĉareto, metis la du saketojn en ĝin, ĵetis kelkajn trivitajn vestĉifonojn sur ilin kaj ekiris, tirante sian ŝarĝon post si. Kiam la knaboj venis al la domo de la kimro, la knaboj haltis por ripozo. Ĝuste kiam ili volis moviĝi plu, la kimro elpaŝis kaj diris:

„Halo, kiu tie estas?“

„Huck kaj Tom Sawyer.“

„Bone! Akompanu min, knaboj, ĉiuj atendas vin. Jen tien! – Kaj moviĝu, rapide! – Mi tiros vian ĉareton. Hehe, ĝi ne estas tiel rapide kiel ĝi devus esti. Ĉu vi enhavas brikojn? Aŭ metalon?“

„Malnovan metalon“, diris Tom.

„Tion mi jam imagis tiel, la knaboj en tiu ĉi urbeto prefere emas ŝarĝi pli da ĉagreno sur sin kaj disipi pli da tempo por kolekti malnovan feron, kiun ili vendas al fandejo por sespenconero ol enspezi la duoblon de mono per regula laboro. Sed tia estas la homa

naturu – moviĝu rapide, moviĝu rapide!“

La knaboj volis scii, kial ili devas rapidi.

„Ne tro cerbumu, vi ekscios tion, se vi estos ĉe vidvino Douglas!“

Huck diris kun iom da timo – ĉar li delonge kutimis esti suspektata erare:

„Sinjoro Jones, ni ne faris ion nedecan.“

La kimro ridis.

„Nu, mi scias nenion pri tio, Huck, knabo mia. Mi scias nenion pri tio. Ĉu vi kaj la vidvino ne estas bonaj geamikoj?“

„Jes. Certe. Almenaŭ ŝi estis ĉiam amikema al mi.“

„Do, en ordo. Kial vi do timas?“

Tiu demando ankoraŭ ne estis tute respondita en la malrapide laboranta kapo de Huck, kiam li estis ŝovata kun Tom en la loĝoĉambro de sinjorino Douglas. Sinjoro Jones postlasis la ĉareton proksime de la pordo kaj sekvis la knabojn.

La ĉambro estis hele lumigata, kaj ĉiuj, kiuj estis aŭtoritatuloj en la urbeto, ĉeestis tie: la geedzoj Thatcher, familio Harper, familio Rogers, onklino Polly, Sid, Maria, la pastro, la gazetredaktisto kaj multaj aliaj, kaj ĉiuj en dimanĉaj vestoj. La vidvino salutis ilin kun tia afableco, kian oni povas apliki en la plej favora kazo al du personoj, kiuj aspektas tiaj, kiaj ili. Ili estis kovritaj per argilo kaj kandela sebo. Onklino Polly fariĝis profunde ruĝega pro honto, sulkigis la frunton kaj kapneis kun rigardo al Tom. Sed neniu suferis eĉ je duono tiom, kiom la du knaboj. Sinjoro Jones diris:

„Tom ankoraŭ ne estis hejme, tial mi rezignis pri tio serĉi lin, sed tiam mi kvazaŭ stumblis pro li kaj pro Huck, rekte antaŭ mia pordo, kaj tial mi kondukis ilin rapide ĉi tien.“

„Kaj tion vi faris ĝuste“, diris la vidvino. Sekvu min, knaboj.“

Ŝi kondukis ilin al la dormoĉambro kaj diris:

„Do, nun lavu kaj transvestigu vin. Jen du novaj kostumoj – ĉemizoj, ŝtrumpetoj, ili ĉiuj estas kompletaj. Ili apartenas al Huck – la duonon de la vestoj aĉetis sinjorino Jones, kaj mi la alian. Sed ili taŭgas por vi ambaŭ. Ekvestu vin. Ni atendos, ĝis kiam vi estos laŭorde vestitaj.“

Poste ŝi foriris.

Ĉapitro 34

HUCK diris: „Tom, ni forkuru senspure, se troviĝos ŝnuro. La fenestro ne estas tro alta de la grundo.“

„Feko! Kial foriĝi per ŝnuro?“

„Nu, mi ne kutimiĝis pri tiom da homoj. Mi ne eltenas tion. Mi ne iros malsupren al ili, Tom.“

„Ho, ne sentu vin ĝenata pri tio. Tio estas nenio. Min tio tute ne ĝenas. Mi protektos vin.“

Sid aperis.

„Tom“, li diris, „la onklino atendis vin jam dum la tuta posttagmezo. Maria pretigis viajn dimanĉajn vestojn, kaj ĉiuj estas nervozaj pro vi. Diru foje – tio estas ja sebo kaj argilo sur viaj vestoj, ĉu ne?“

„Nu, sinjoro Sidĉjo, okupiĝu pri viaj propraj aferoj. Cetere, kia spektaklo estas ĉi tie?“

„Estas unu el la festetoj de la vidvino, kiujn ŝi faras ofte. Ĉifoje estas por la kimro kaj ties filoj, ĉar ili tiris ŝin el la kaĉo en tiu certa nokto. Kaj ĉu vi scivolas? – Mi povus flustri ion al vi, se vi volas scii tion.“

„Aha, kaj kion?“

„Nu, la olda sinjoro Jones havas la intencon surprizi la homojn ĉivespere ĉi tie, sed mi subaŭskultis, kiel li

rakontis hodiaŭ al la onklino pri la sekreto. Ĉiuj eksciis ĝin – ankaŭ la vidvino, kvankam ŝi provas ĉion por ŝajnigi, ke ŝi ne scias ion. Sinjoro Jones nepre volis, ke Huck estu tie. Sen Huck tio ne funkcius rilate la sekreton, ĉu vi komprenas?“

„Sid, sekreto pri ĉio, ĉu?“

„Ke Huck persekutis la rompŝtelistojn ĝis la vidvino. Mi supozas, ke sinjoro Jones volas fari el tiu sekreto grandan aferon, sed mi vetas, ke tio fariĝos pli-malpli fiasko.“

Sid subridis tre kontente kaj aplombe.

„Sid, ĉu estis vi tiu, kiu perfidis tion?“

„Ha, ne cerbumu pri tio, kiu estis. IU rakontis ĝin – tio certas.“

„Sid, ekzistas nur unu persono en la tuta urbeto, kiu tiom malicus fari tion, kaj tiu estas vi. Se vi tie estus anstataŭ Huck, vi forŝtelus vin malsupren de la monteto kaj rakontus pri la rompŝteluloj al neniu. Vi

kapablas fari nenion krom malicaĵoj, kaj vi ne povas elteni, se iu ricevas laŭdon tial, ĉar li faris ion bonan. Jen prenu do – sen danko, kiel diras la vidvino – kaj Tom frapis permane la orelojn de Sid kaj akompanis lin per kelkaj piedbatoj al la pordo. „Nun iru al la onklino kaj rakontu tion al ŝi, se vi havas la kuraĝon – sed morgaŭ mi repagus tion al vi!“

Kelkajn minutojn poste sidis la gastoj ĉe la manĝotablo kaj pli ol dek infanojn oni sidigis ĉe malgrandaj flanktabloj, tiel, kiel tio estis kutima dum tiu tempo je tia tago. Ĝustatempe sinjoro Jones faris mallongan paroladon, en kiu li dankis al la vidvino por la honoro, kiun ŝi prezentas al li kaj la filoj, sed li diris ankaŭ, ke estas alia persono, kies modesto ...

Kaj tiel plu kaj plu tiel. Li levis la vualon de la sekreto pri la partopreno de Huck en la aventuro kiel eble plej lerte dramece, sed la surprizon, kiun ĝi kaŭzis, estis grandparte nur ŝajna, kaj ne tiom brua kaj entuziasmegiga, kiel ĝi estus sub pli bonŝancaj cirkonstancoj. Ĉiukaze la vidvino ŝajnigis sin tamen tre mirigite kaj ŝutis tiom da komplimentoj kaj dankvortoj sur Huck-on, ke li preskaŭ tute forgesis la apenaŭ elteneblan rigidecon de siaj novaj vestoj – sendepende de la tute netolerebla malkomforto esti elmetita kiel celtabulo al ĉies rigardaĉoj kaj laŭdegoj.

La vidvino diris, ke ŝi havas la intencon doni al Huck hejmon sub sia tegmento kaj volas zorgi pri lia edukiteco, kaj ke tiukaze, kiam ŝi estos ŝparinta sufiĉe da mono, ŝi ebligos iun modestan negocon al li. Jen la bonŝanco por Tom. Li diris:

„Huck ne bezonas tion. Huck estas riĉa!“

Nenio krom grandega peno resti ĝentila retenis la societon dece kaj kamaradece ekridi pri tiu plezura ŝerco. Sed la silentado estis iom embarasa. Tom finis ĝin:

„Huck havas monon. Eble vi ne povas imagi tion, sed li havas amason da ĝi. Ho, vi ne devas rideti – mi povas montri tion al vi. Atendu minuton.“

Tom kuris eksteren. La societanoj perplekse rigardis sin reciproke kaj pridemandeme al Huck, kiu ne kapablis diri ion.

„Sid, kio perturbas Tom-on?“ demandis onklino Polly. „Li... nu..., oni neniam scias, kion la knabo

efektive celas. Mi neniam...”

Tom enpaŝis denove, batalis kun la pezo de la saketoj kaj onklino Polly ne finis sian frazon. Tom ŝutis la amason de la flavaj moneroj sur la tablon kaj diris:

„Jen – kion mi diris al vi? La duono de ĝi estas la posedo de Huck, kaj la alia duono mia!”

La vidaĵo prenis de ĉiuj la spiron. Ĉiuj gapis, neniu diris ion dum momento. Poste aŭdeblis la unuanima voko pri klarigo. Tom diris, ke li povas liveri ĝin, kaj li faris. La rakonto estis longa, sed plenŝtopita per interesaĵoj. Okazis preskaŭ neniu interrompo, kiu ĝenus la sorĉon de ties fluo. Post la fino de la rakontado diris sinjoro Jones:

„Mi pensis, ke mi surhokigis surprizeton por tiu ĉi renkonto, sed ĝi impresas nun nenium plu. Tio ĉi metas ĉion en la ombbron, kiel mi devas koncedi.”

Oni kalkulis la monon. La finsumo estis iom pli ol dekdu mil dolaroj. Tio estis pli ol iu ajn de la ĉeestantoj iam ajn antaŭe vidis per unu fojo,

kvankam tie estis diversaj homoj, kiuj havis
konsiderinde pli da posedo ol la monon surtable.

Ĉapitro 35

La leganto estu certigita, ke la monbeno al Huck kaj Tom kaŭzis grandan eksciton en la povra urbeto Sankt-Peterburgo. Tia granda sumo, kaj krome eĉ kontanta, preskaŭ ŝajnis neimagebla. Oni parolis kaj ĝojis pri la mono, gloris ĝin tiom, ĝis kiam ekŝanceliĝis la menso de multaj civitanoj, pro la streĉiteco de la malsaniga ekscito. Ĉiun „hantatan“ domon en Sankt-Peterburgo kaj la najbaraj vilaĝoj oni dismetis plankon post planko, kaj la grundon sub ĝi oni trafosis kaj rastis pri kaŝitaj trezoroj – ne knaboj faris, sed viroj – kelkaj el ili eĉ sufiĉe seriozaj kaj neromantikaj. Kie ajn Tom kaj Huck aperis, oni ĉirkaŭis, admiris kaj gapis ilin. La knaboj ne povis memori, ke iliaj rimarkoj antaŭe iam trovis tiom da atentemo; sed nun oni traktis ilin trezoroj kaj ripetis ilin. Ĉion, kion ili diris, estis certagrade rigardata notinda; evidente ili nun perdis la kapablon diri iujn banalaĵojn; oni eĉ rastis ilian pasintecon kaj malkovris en ĝi antaŭsignojn pri okulfrapa genieco. La urbeto gazeto publikis biografiajn portretojn pri la knaboj.

La vidvino Douglas, sesprocente interezigis la monon de Huck kaj la juĝisto Thatcher faris la saman por Tom pro la postulo de onklino Polly. Ambaŭ knaboj havis enspezojn, kiuj estis gigantaj – unu dolaron dum ĉiu semajntago kaj duonon de dolaro dum ĉiu dimanĉo. Estis la sama sumo, kiun enspezis la pastro – ne, estis tio, kion oni promesis al li – sed ĝenerale li ne povis kunkolekti tiom. En tiu malnova simpla tempo sufiĉis dolaro kaj kvarondolaro por loĝigi kaj nutri knabon, kaj por frekventigi lin lerneje – kaj krome por vesti kaj lavi lin.

Juĝisto Thatcher havis tre bonan opinion pri Tom. Li diris, ke neniu kutima knabo estus kapabla savi lian filinon el la kaverno. Kiam Becky rakontis al sia patro tute konfide, kiel li transprenis ŝian vipadon en la lernejo, li estis videble tuŝita. Kaj kiam ŝi petis pri indulgemo pro la granda mensogo, kiun Tom deliktis por transigi la vipadon de ŝiaj sultroj sur siajn proprajn, diris la juĝisto, superfortita de siaj sentoj, ke estis nobla, oferema kaj grandanima mensogo – mensogo inda por teni la kapon alte kaj por marŝi je la flanko de Georgo Vaŝingtono tra la historio kun la laŭdata vero pri la hakilo! Becky pensis, ke la patro neniam aspektis tiom granda kaj superba, kiom en tiu momento, kiam li migradis sur la koridoro,

stamfis la plankon perpiede kaj diris tion. Ŝi tuj forkuris al Tom por rakonti tion al li.

Juĝisto Thather havis la esperon, ke el Tom iam fariĝos elstara advokato aŭ granda militisto. Li diris, ke li volas zorgi pri tio, ke Tom estos akceptita en la Nacia Militista Akademio kaj poste estos trejnata en la plej bona jura fakultato de la lando por prepari lin por ambaŭ karieroj aŭ por unu el ili.

La riĉo de Huck Finn kaj la fakto, ke li troviĝis de nun sub la protekto de la vidvino Douglas, enkondukis lin en la socion – ne, ŝiris, ja ĵetegis lin en ĝin – kaj li suferis preskaŭ pli ol li povis elteni. La servistoj de la vidvino zorgis pri tio, ke li ĉiam estu purlavita kaj deca, kombita kaj brositita kaj ili enlitigis lin nokte en nesimpatiajn littukojn, kiuj ne havis eĉ unu punkton aŭ makulon, kiun li povis premi al sia koro kaj rigardi amiko. Li devis manĝi per tranĉilo kaj forko; li devis uzi servtuketojn, tason kaj teleron; li devis lerni per sia instrulibro kaj frekventi la preĝejon, li devis paroli tiel dece, ke la parolo fariĝis sengusta en lia buŝo. Kien ajn li turniĝis, la ferstangoj kaj mankatenoj de la civilizo lin enfermis kaj ligis liajn manojn kaj piedojn.

Brave li eltenis tion dum tri semajnoj kaj poste li iutage malaperis. Tre afliktite la vidvino dum kvardek ok horoj ĉie lasis serĉi lin. La publikon tio profunde koncernis; ili serĉis lin supre kaj malsupre, ili rastis la riveron por trovi lian kadavron. Je la tria tago frue matene Tom Sawyer vagadis saĝe traserĉante kelkajn malnovajn vakajn barelojn malantaŭ la forlasita buĉejo, kaj en unu el ili li trovis la fuĝinton. Huck tie dormis. Li ĝuste manĝis kelkajn ŝtelitajn restaĵojn de iu bizara manĝo, kaj poste li kuŝis tie kaj fumis pipon. Li estis nelavita, nekombita kaj nekombinta kaj en la samaj ĉifonitaj vestoj, kiuj faris lin pitoreska en la tagoj, kiam li estis libera kaj beata. Tom do trovis lin, rakontis al li pri la tumulto, kiun li kaŭzis kaj li urĝis lin reveni hejmen. La vizaĝo de Huck perdis sian trankvilan kontentecon kaj ĝi fariĝis melankolia. Li diris:

„Ne parolu pri tio, Tom. Mi provis, sed ĝi ne funkciis. Ĝi ne funkciis, Tom. Ĝi ne taŭgas por mi. Mi ne kutimiĝis pri tio. La vidvino estas kara al mi kaj afabla, sed mi ne povas elteni tian vivon. Ŝi vekis min ĉiumatene precize je la sama tempo, mi devis lavi min, ili kombis min kiel freneziĝinte, ŝi ne lasis dormi min en la lignoremizo, mi devis vesti min per tiuj damnitaj vestoj, kiuj sufokas min, Tom, ili ŝajne tute ne tralastas iun aeron. Kaj ili estas tiel terure

ŝikaj, ke mi nek povas sidiĝi nek sterni min en ili, nek ruliĝi sur io. Mi jam tiom longe ne plu glitis sur keloklapo malsupren por... nu, kvazaŭ estus jam antaŭ jaroj. Mi devis iri en la lernejon kaj ŝviti sen interrompo – mi malamegas tiujn stultajn bonintencajn preĝojn! Mi ne rajtis kapti muŝon en la preĝejo, mi ne rajtis maĉi. Mi devas porti dum la tuta dimanĉo ŝuojn. La vidvino manĝas laŭ sonorilo, ŝi enlitiĝas laŭ sonorilo, ŝi vekiĝas laŭ sonorilo – ĉio estis tiel terure regula, ke homa estaĵo ne povas elteni tion.“

„Nu, ĉiu faras tion tiel, Huck“.

„Tom, tio ne plibonigas la aferon. Mi ne estas ĉiu, kaj mi ne povas ELTENI tion. Estas terure esti ligita kiel mumio. Kaj la manĝo havigeblas multe tro facile – mi ne havas intereson je tia manĝo. Mi devas peti, se mi volas fiŝkapti; mi devas peti, se mi volas naĝi. Ĉe la diablo, mi devas peti pri ĉio. Nu, dum la tuta tempo mi devis paroli noble, tio ne estis komforta. Mi devis ĉiutage grimpi en la mansardon kaj sakri por forigi tiun guston el mia buŝo, aŭ mi estus mortinta, Tom. La vidvino ne lasis fumi min, mi ne rajtis kribi, mi ne rajtis oscedi, nek etendi min nek skrapii en ĉeesto de homoj...“ Poste li diris kun speciala agaco kaj ofenditeco: „Kaj patro komprenu!

Ŝi preĝis dum la tuta tempo. Mi neniam vidis inon tian! Mi DEVIS fuĝi, Tom – mi simple devis! Kaj baldaŭ rekomenciĝos la lernejo, kaj mi devus iri tien – nu, TION mi ne eltenus, Tom. Aŭskultu, Tom, esti riĉa ne estas tio, kio ĝi estas laŭ aserto. Ĝi estas nur ĉagreno kaj ĉagreno, kaj ŝvito kaj ŝvito, kaj la eterna deziro esti morta. Sed la vestaĉoj ĉi tie taŭgas por mi, kaj tiu barelo taŭgas por mi, kaj tiujn mi ne plu deskuos. Tom, mi tute ne estus glitinta en la tutan kaĉon, se ne estus pro la mono; sed nun, Tom, metu mian parton al via kaj donu al mi ĉeokaze dekcendon, ne tro ofte, ĉar mi fajfas pri ĉio, kio havigeblas facile. Kaj vi iru por mi al la vidvino kaj pardonpetu min ĉe ŝi.“

„Ho, Huck, vi scias, ke mi ne povas fari tion. Tio ne estus justa. Kaj krome, se vi provus la aferon dum iom pli longa tempo, ankaŭ vi ŝatus ĝin.“

„Ŝatus ĝin! Jes – tiel, kiel mi ŝatus varmegan fornoplato, se mi sufiĉe longe sidus sur ĝi. Ne, Tom, mi ne volas esti riĉa, kaj mi ne volas vivi en tiaj damne sufokaj domoj. Mi ŝatas la arbaron kaj la riveron kaj barelojn, kaj tial mi restos ĉe ili. Malbenite! Ĝuste, kiam ni ricevis la fusilojn kaj la kavernon kaj ĉion tion, kion ni bezonas por esti rabistoj, leviĝas ĉi tie tiu tuta idiotaĵo kaj fuŝas ĉion!“

Tom ekkonis sian bonŝancon:

„Nun aŭskultu foje, Huck, esti riĉa ne detenas min fariĝi rabisto.“

„Diru, ke ne! Neimageble, ĉu vi vere tute seriozas, Tom?“

„Mi tiel seriozas, kiel mi sidas ĉi tie. Sed, Huck, ni ne povus akcepti vin en la bando, se vi ne estus respektinda, sciu tion.“

La ĝojo de Huck finiĝis.

„Vi ne povus akcepti min, Tom? Ĉu vi ne akceptis min kiel piraton?“

„Jes, sed tio estas alia afero. Rabisto estas pli altranga ol pirato, kutime. En la plej multaj landoj ili estas treege altrangaj nobeluloj –dukoj kaj similuloj.“

„Nu, Tom, ĉu vi ne estis ĉiam mia amiko? Vi ja ne

ekskludus min, ĉu? Tion vi ne farus, Tom, ĉu?“

„Huck, mi ne volus fari kaj mi ne VOLOS fari tion – sed kion diru la homoj? Nu, ili dirus simple: 'Fi! Tiu Tom Sawyer-bando! Enestas sufiĉe da fatrasuloj en ĝi. Ili celus vin, Huck. Vi ne ŝatus tion, kaj ankaŭ ne mi.“

Huck silentis dum certa tempo, implikita en internan mensan batalon. Fine li diris:

„En ordo, mi reiros al la vidvino, kaj provos elteni tiun vivon ankoraŭfoje dum monato, se mi rajtos aparteni al la bando, Tom.“

„Konsentite, Huck, tio estas genia! Venu kun mi, kamarado mia, mi petos la vidvinon trakti vin iom pli indulgeme, Huck!“

„Ĉu vi faros tion, Tom – ĉu vere? Tio estus bonega. Se ŝi lasus kelkajn el la plej krudaj aferoj. Mi fumus nur sola kaj sakrus nur sola, mi trabaraktiĝus, eĉ, se mi krevus pro tio. Kiam vi fondos la bandon kaj fariĝos rabisto?“

„Ho, tuj. Ni kunigos la knabojn kaj hodiaŭ nokte ni eble jam entreprenos la inicon.“

„Entreprenos kion?“

„La inicon.“

„Kio estas tio?“

„Tio estas, se oni ĵuras, ke oni helpas sin reciproke, ke oni neniam elbabilos la sekretojn de la bando, eĉ, se aliaj hakus onin en pecojn pro tio, aŭ, se oni devus mortigi ĉiun kaj aldone ties familianojn, ĉar iu el tiu familio ofendis la bandon.“

„Tio estas gaja – treege gaja, Tom, tion mi devas diri al vi.“

„Jes, mi vetas, ke ĝi estas tia. Kaj la tuta ĵurado devos okazi meznokte en la plej solecaj kaj plej timigaj lokoj, kiuj troveblas – hantata domo estus la plej

bona ejo, sed tiuj estas ja nun ĉiuj fuŝitaj.“

„Jes, tiel estas. Kaj oni devas ĵuri sur ĉerko kaj signi ĝin per sango.“

„Nu, tio ja sonas promesplena! Tio estas milionope pli bona ol esti pirato. Mi restos ĉe la vidvino, ĝis kiam mi putros, Tom. Kaj kiam mi iam estos laŭorda elstara rabisto kaj ĉiu parolos pri mi, mi supozas, ke ŝi estus fiera, ke ŝi tiris min el la stratfeĉo.

Konkludo

Tiel finiĝas la kroniko. Ĉar ĝi estas eksplicite la historio de *knabo*, ĝi devas fini ĉi tie. La historio ne plu povus evolui longtempe sen fariĝi la historio de *VIRO*. Se iu skribas romanon pri plenkreskintoj, li scias precize, kiam li devas fini ĝin – do dum la nupto. Sed, se li skribas pri junuloj, li devas fini ĝin tie, kie estas por li plej avantaĝe.

La plejparto de la personoj, kiuj agadas en tiu ĉi romano, ankoraŭ vivas kaj estas sukcesaj kaj feliĉaj. Iutage eble povos ŝajni, ke indas la penon verki pri la

historio de la junaj homoj kaj esplori, kiaj viroj kaj inoj ili fariĝis. Tial eble estas saĝe ne malkaŝi tiun parton de iliaj vivoj jam nun.

FINO

PRI LA TRADUKO

Tradukis Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser el la usona originalo.

Lingve kontrolis Vladimir Türk.

Aranĝis Hans-Georg Kaiser.

REDAKTOFINO

je la 28-a de marto en la jaro 2019